B.TRAVEN
MAHAGONTRUNKO

Mahagonciklo
kvara romano



romantraduko el la germana

PRI LA TRADUKO

Aŭtoro B.Traven
Titolo Mahagontrunko

Tradukis
Dorothea & Hans-Georg Kaiser
laŭ la unua eldono
„Die Troza" librogildo Gutenberg
en Zuriko, Vieno kaj Prago 1936

Lingve kontrolis
Vladimir Türk

Aranĝis
Frank Vohla
Hans-Georg Kaiser

Finredakto
je la 12-a de oktobro
en la jaro 2026

Ĉapitro 01

1/1

„Y tu, como te llamas? Kaj vi, kiel vi nomiĝas?“ demandis la kontraktisto, *don Remigio Gayosso*, la junan celtalan indiĝenon, antaŭ kiu li staris.

„Andreo Ugaldo, *su humilde servidor*, via humila servisto!“ respondis la viro ĝentile.

„Bueno. Y de qué sabes trabajar, muchacho? Kian specon de laboro vi faris ĝis nun, ulo? Ĉu vi laboris per maĉeto aŭ per *hacha*, per hakilo?“

„No, *patrón*, mi laboris por *don Laŭreano* en *Chiapa de Corso* kelkajn jarojn kiel *carretero*, kiel ĉaristo.“

„Tiukaze vi bone scias labori kun bovoj, ĉu?“

„Si, patrón, muy bien. Jes, patrono, tre bone.“

„Boyero! Brutpelisto!“ diris *don Remigio*, turnante sin al la *capataz*, al la inspektisto, kiu sekvis lin kiel serĝento kun notlibro enmane.

La *capataz* ŝovis sian prironĝitan krajonon en la buŝon, rigardis poste la obtuzan pinton dum certa tempo kaj fine diris: “La nomon, *puerco sucio*, kota porko!“

„Andreo Ugaldo.“

„*Su humilde servidor, jefe*, tion vi aldonu, se mi demandas vin pri via stinkanta nomo, vermo naskita en sterko. Ĉu vi komprenas? Ankoraŭfoje, la nomon!“

„Andreo Ugaldo estas mia nomo“, diris la juna indiĝeno, rifuzante obstine al la inspektisto la ĝentilan riverencon, kiun li ofertis al la kontraktisto libervole. La *contratista*, la vera generalo tie, ne trovus tion tiom grava kaj eĉ ne perdus vorton pri tio, se la viro simple dirus la nomon al li sen aldoni iun honorigan riverencon. Estas ĉiam nur malgrandeta homa vireto, kiu postulas senkompate de subulo kaj sendefendulo la plej rigidan honoran ateston, ĉar la vireto pri sia vera digno ne havas komprenon kaj tial ne povas havi komprenon pri ĝi, ĉar li tiom malmulte posedas de ĝi. Tiu, kiu neniam forgesas fiksi siajn medalojn sur sia brusto, ne estas tute certa pri siaj meritoj.

„Kiel vi nomiĝas, mefito?“ kriegis la *capataz*.

„Andreo Ugaldo.“

„Via tre humila servisto, sinjoro mia! Tion vi aldonu, kiam mi demandos vin“, kriis la *capataz* kaj fariĝis tre ruĝa en la vizaĝo. „Do, ankoraŭfoje. Porko, kiu vi estas? Kiel vi nomiĝas?“

„Andreo Ugaldo de Lumbojvil.“ La juna viro ne tordis la vizaĝon. Li staris tie trankvile, kvazaŭ li estus skulptita el bruna ligno. Eĉ per la rigardo de siaj malhelaj okuloj li montris nek timon nek ekscitiĝon. Fride kaj firme li fiksis sian rigardon al la vizaĝo de la *capataz*, kiu pro kolero ŝajne preskaŭ estis krevonta.

„Al vi mi ja ankoraŭ instruos blindan obeon, venena bufo, atendu nur ĝis kiam ni estos solaj kune, mi kaj vi“, diris la subestro, dum li skribis la nomon en sian notlibron kaj aldonis en la sekvan rubrikon: *boyero*.

Boyero, tio estis bovoservisto.

Kiam li jam skribis kaj rigardis kelkajn minutojn sian skribitaĵon kun plaĉo kaj tre fieris pri tio, ke li povas skribi tiel bele kaj svingoplene, li rigardis supren kaj observis Andreon. Li ĵus volis kvazaŭ boji plian impetan averton pri la estonteco al la vizaĝo de Andreo, kiam *don Remigio* vokis lin: „He, Ambrosio, diodamnita *lepero*, leprulo, hundo de pigrulo, kie vi estas kun via diodamnita skribado? Venu ĉi tien kaj surskribu tiun *muchacho*. Li laboris kun ligno, per hakilo. Lin vi notos kiel *machetero*. Li diras, ke li bone povas labori per maĉeto. Post nur kvar semajnoj ni donos al li hakilon.“

„A sus órdenes, jefe“, je via servo, ĉefo, tuj vokis la *capataz*, kiam li estis vokata kaj li saltis servofervore per unu salto malantaŭ sian mastron. „Mi estas jam ĉi tie, *don Remigio*, kaj ĉiam laŭ via tre taksata ordono.“

„Ekskribu kaj ne babilu tiom da stultaĵoj. Ek, antaŭen, azeno. Ĉiu horo ĉi tie nenecese pasigita kostas al mi sakon plenan de mono. Ĉielo kaj infero, *Madre Santísima en el lado de dios*, Sankta Virgulino je la flanko de Dio, kial mi iam lasis kondamni min al tio transpreni mahagonkontraktojn?! Ĉiu tago en tiu ĉi sovaĝejo inter barbaroj kostas min tutan jaron de mia bela kaj sana vivo. Mia patrino, sanktulino, kia ne ekzistas dua, ankoraŭ en sia simpla tombo elartikigus siajn membrojn, se ŝi scius kiel

mi devas sklavlabori ĉi tie, kaj kion mi devas toleri sub tiu arda varmego por povi vivteni mizeran vivon kaj perlabori kelkajn favajn centavojn por fariĝi griza en honorindeco."

Don Remigio alvenis la finon de la longa vico de la mahagonlaboristoj varbitaj por laboro en la ĝangalo kaj alvenintaj tien en la sama tago. Li postulis sesdek virojn, sed la varbaj agentoj povis sendi nur kvardek kvin virojn. En letero, kiun la *capataz* transdonis, ili sciigis al li, ke li devu esti kontenta ricevi tian altan kvanton da viroj. Aliaj kontraktistoj devis kontentiĝi pri malpli granda kvanto da viroj, kaj lin la agentoj *don Ramon* kaj *don Gabriel* preferis nur tial, ĉar li neniam provis prironĝi la varbajn proviziojn, sed bonvoleme transprenas la antaŭkostojn kaj pagas la proviziojn.

Don Remigio demandis ĉiun unuopulon el la envicigitaj monteriaj laboristoj, plej ofte indiĝenojn kaj kelkajn mestizojn pri la nomo, li komparis la nomojn kun tiuj sur la listoj, kiujn la agentoj sendis al li, kaj tiam li komencis disdividi la homojn en laborgrupojn, en kiuj la junaj viroj sekve de siaj korpaj fortoj kaj kapabloj aŭ spertoj pri certaj laboroj estos plej utilaj por la kontrakto.

Kiam li nun jam finis tiun tre streĉan kaj tre respondecoplenan laboron, plaĉis al li lamenti pri sia sorto kaj plendi pri sia mizera ekzisto. Ĉar surtere krome neniu kompatis lin, kaj li troviĝis de tempo al tempo en sufiĉe melankolia humoro, ne estis alia eblo ricevi kompaton, almenaŭ ne en tiu ĉirkaŭo, krom antaŭplendi ion al si mem.

Rimarkoj
boyero = brutpelisto
Bueno. Y de qué sabes trabajar, muchacho? = Kian specon de laboro vi faris ĝis nun, junulo?
capataz = subestro, skipestro, gvidanto de laborgrupo, kontrolisto, *inspektisto*
capataces = pluralo de *capataz*
carretero = ĉaristo
contratista = kontraktisto
hacha = hakilo
lepero = leprulo

1/2

Tiu pridemandado kaj disdivado de la varbitaj mahagonlaboristoj en la labortrupojn okazis sur la vasta tereno de la administracio aŭ de la administrado de Mahagono-Ekspluato-Kompanio. La tereno estis duoninsulo, formita de du praarbaraj riveroj, kiuj tie kuniĝis kaj de tie kune fluis plu, por flui post longa migrado tra la ĝangalo kaj tropika vepro, fine en la gigantan torenton *Ushumacintla*. Ĉu temis pri distanco de cent aŭ ducent aŭ eĉ kvarcent kilometroj, sciis neniu, ĉar oni tie neniam mezuris distancojn kaj ankaŭ neniu havis tempon je dispono por fari tion aŭ emi fari tion. Pri sciencaj esploroj tie neniu havis intereson, kaj eĉ multe malpli iu interesiĝis tie pri iuj naturbelaĵoj, kiuj atendeblas laŭ geografiaj libroj.

La tereno estis plata kaj abunde prikreskata per sekaj herboj de ebenaĵo. Tiun ĉi terenon de la oka matene ĝis la kvina posttagmeze ŝarĝis sufokiga tropika ardo, kiu magrigis jam per si mem

la magrajn herbojn eĉ pli kaj preskaŭ ekbruligis ilin. Nur malmultaj arboj kaj arbustoj staradis timide, kvazaŭ ili hontus pri sia ekzisto enmeze de la sekaj herboj. Ju pli da herboj forbrulis des pli nudiĝis la sabla tero. De tiu ardanta tero la furioza varmego reĵetiĝis en bolantan kaj briltreman aeron, tiel, ke tiukaze, se oni staris en tiu malfermita tereno, oni timis fari profundan kaj sanigan spirtiron, ĉar oni supozis, ke tuj elsekiĝus la loboj de la pulmo.

La administradaj konstruaĵoj, la *oficinas,* la centraj burooj, estis nenio alia krom la kutimaj indiĝenaj kabanoj de la tropika Ameriko, nur pli grandskale konstruitaj. Certan kvanton da fortaj trunkoj oni puŝis per batoj en la grundon. Sur tion oni metis tegmentan trabaron same faritan el krudaj trunkoj kaj poste interligis ilin per lianoj kun la vertikale starantaj trunkoj. Nur hakiloj necesis, sed ne najloj. La tegmenton oni kovris per palmfolioj. La murojn oni formis per maldikaj trunketoj, kiujn oni, dense envicigitajn unu apud la alian, metis en la teron kaj poste kunligis per malpli dikaj lianoj. La pordoj estis krude pritranĉitaj dikaj tabuloj el mahagono, kaj ili moviĝis helpe de krude prilaboritaj ĉarniroj el dura ligno de alia speco. Ĉiu unuopa konstruaĵo estis starigita kiel ĉi tiu.

Interne de ĉiu konstruaĵo estis apartigitaj ĉambroj, kies vandoj same konsistis nur el dense envicigitaj trunketoj. La pordoj, kiuj ebligis la eniron de unu ĉambro al alia, se efektive ekzistis pordoj, konsistis aŭ el krudaj tabuloj aŭ el trunketoj kunplektitaj per bastoj. Sur kelkajn el la pordoj oni pikis pecon da griza kartono, sur kiu estis skribita la nomo de la kontraktisto aŭ de la oficisto, kiu tie havis sian oficejon. Kelkaj el tiuj kartonŝildoj

havis krome la surskribon *„Privatejo“*. Ie aliloke la rimarko aspektus ridinde kaj ironie; ĉar tute nenio, kion oni povus nomi *„privata afero“,* estis farebla en tiu konstruaĵo aŭ en unu el la apartigitaj ĉambroj sen tio, ke iu, kiu ĝuste estis proksima, povus vidi kaj aŭskulti tion tiel klare, kvazaŭ ĝi okazus sub libera ĉielo. Sed la vorto *„privatejo“* havis tie la sencon evidentigi, ke rilate la konstruaĵojn temas pri laŭregulaj kaj civilizitaj oficejoj. Kaj ne, kiel eble hazarda alkurinta gazetraportisto povus opinii, pri kabanoj, en kiuj kanibaloj trovis rifuĝejon.

Sur tabloj, faritaj el krude prihakitaj mahagontabuloj kuŝis negocolibroj de la sama maniero kiel oni trovas ilin ankaŭ ĉie aliloke surtere, kie oni entreprenas negocojn.

Nur inkon oni apenaŭ ie vidis. Kaj la iometo da inko, kiu troveblis en diametro de cent mejloj, estis trovebla en la privata oficejo de la *gerente,* de la administranto, ĉe kiu ĝi servis por subskribi ĉekojn. Sed eĉ tiu inko estis pli ofte pli sekigita ol likva. Ĉiuj enskriboj en librojn aŭ listojn oni faris per inka krajono aŭ per kutima krajono, pro kio ili perdis absolute nenion de sia valoro; ĉar tiu, al kiu tio ne plaĉis, ja povis iri tien kaj fari tion pli bone. En certaj semajnoj kaj monatoj de la jaro ne estis permesite lasi la librojn nokte sur la tabloj aŭ sur la krudaj bretaroj, sed oni devis pendigi ilin per ŝnuroj je traboj saturitaj per kreozoto. Se oni forgesis tion, okazis ofte, ke oni matene ne plu trovis la libron aŭ nur kelkajn forgesitajn maĉaĵojn. Formikoj aŭ skaraboj aŭ *cucarachas,* blatoj, renkontis la librojn dum siaj vagadoj kaj aŭ manĝis aŭ pecon post peco forportis ilin kaj stokis la pecojn en siaj konstruaĵoj.

Eĉ pli da zorgemo necesis pri leterkovertoj. De leterkovertoj la bestetoj formanĝis ĉion, kio estis gumita. Sed, se oni sukcesis konservi la kovertojn kontraŭ insektoj, ili tamen povis fariĝi maluzeblaj en la pluvotempo, kiam ili kungluiĝis, kaj tiel bone, ke ili malfermeblis plu nur per distranĉado.

Unu el la konstruaĵoj estis modernigita kaj eniris sub la influon de futurismaj arkitektoj. Temis pri la konstruaĵo kiu servis al la administranto kiel ĉefa oficejo kaj kiel vilao. Ĉe tiu novtempa konstruaĵo la trunketomuroj estis priĵetitaj per malseka koto, kiu, tuj kiam ĝi sekiĝis, firme gluiĝis je la trunketoj, kio faris ilin netravideblaj kaj ĉe supraĵa rigardado eĉ trompe peris la impreson de cementmuroj. Pri tiu konstruaĵo la kompanio, speciale la administranto estis tiom fieraj, kiel asekurkompanio en Nov-Jorko pri sia sesdeketaĝa nubskrapulo. Kelkaj imitaĵoj de tiu vilao iom post iom estis nove aldonitaj kaj nomataj bangaloj, sed ne vilaoj.

Estis la eterna deziro de la administranto farbi la domon kun ruĝa aŭ verda farboj. Sed ne ekzistis farboj. Kompreneble li povus mendi la farbojn pere de unu el la komercistaj karavanoj. Sed li ĉiam forgesis la mendon, se estis okazo por tio kaj memoris pri sia deziro nur tiam, kiam la karavano jam formigris. Sed, se li tamen ĝustatempe pensis pri la mendo, li estis kutime ebria. Sed ĉu ebria aŭ ne ebria, ĝi kostis al li tro grandan penon kalkuli, kiom da farbo li bezonus por la konstruaĵo. Ĉe unu el tiuj matematikaj kalkuladoj li iam elkalkulis dek kvar mil kilogramojn da farbo, kiujn li bezonus por farbi la domon. Kaj tiu granda kvanto por domo de dek du metroj laŭlonge kaj ok metroj laŭ larĝo, kaj kun nur unu teretaĝo, ektimigis lin tiom, ke li

rezignis dum certa tempo matematike kalkuli la kvanton de la farbo, kiun li bezonus.

Kaj ĉiam tiam, kiam li aŭ forgesis kunsendi la komision por farbo per karavano, aŭ, se liaj kalkuloj havis tian rezulton, ke necesus karavanoj kun kvarcent muloj por transporti la farbojn tien en la ĝangalon, li liberigis sin de tiu deziro per tio, ke li prelegis aŭ faris paroladon al si mem, kaj en tiu klariĝis, ke verda aŭ ruĝa farbadoj de la konstruaĵo aŭ iu alia ornamo estas nur lukso de degenerintaj pantalonfekuloj, kaj, ke plenvaloraj viroj ne bezonas lukson. Sed tio estis nur senkulpigo. La vera kaŭzo estis, ke nek li nek iu alia dungito tie iam pensis pri tio, pasigi tiom longan tempon en tiu diodamnita brutala sovaĝejo por trovi seriozan intereson pri tio, el kio la domo, en kiu li estis devigita loĝi, konsistu aŭ kiel ĝi aspektu.

La *oficinas*, aŭ la *administracio*, kiel estis nomata la tuta korto kun la diversaj konstruaĵoj, faris al ĉiu novulo la impreson ke ĝi estas planita kaj konstruita nur por servi al la loĝantoj dum mallonga tempo, eble dum ses monatoj, kiel laborkampadejo kaj kiel rifuĝejo, simile kiel la konstruaĵoj en tereno, kie oni drilu nafton. Sed tie, kiel en ĉiuj aliaj monterioj aŭ mahagonaj kampadejoj fine la provizoraj konstruaĵoj fariĝis daŭraj kaj sufiĉe ofte devis servi kvin, ja eĉ dek jarojn al la administrantoj kaj dungitoj kiel loĝ- kaj laborloko.

Kvankam la kvanto de la konstruaĵoj estis limigita, oni sufiĉe rajtigite povis nomi la grandan komplekson urbo. La loĝantoj de tiu urbo post sia alveno plej ofte tre rapide kutimiĝis al tiuj rilatoj. Kaj ili fariĝis tiel indiferentaj, ke neniam aŭ nur ĉeokaze

venis en ilian kapon la penso plibeligi la urbon per bonkvalitaj, sanigaj kaj homindaj bangaloj.

Rimarkoj
cucarachas = blatoj
gerente = administranto, negoca estro, manaĝero
oficinas = burooj

1/3

La administranto, la kontistoj, la skribistoj, ĉiuj estis homoj kun certa grado de edukiteco, foje eĉ kun tre bona edukiteco. Ili ĉiuj havis ĉiam sopiron pri veraj domoj, pri veraj litoj kaj pura ĉirkaŭo. Sed sub tiu ardanta suno, kiu ĉiutage kiel peza klabo ŝarĝis la cerbojn kaj enmeze de armeo de indiĝenoj, kiuj plimulte eĉ ne parolis la hispanan, sed sian pralingvon, kaj kiuj vivis laŭ siaj propraj kutimoj, kaj krome dudek surĉevalajn tagvojaĝojn malproksime de la plej proksima urbeto, kostis en tia ĉirkaŭo kaj sub tiaj kondiĉoj tro da spirita peno ellabori planojn por civilizita urbo, kaj eĉ multe pli da spiritaj strecoj kostus efektive realigi tiujn planojn. Ju malpli oni devis pensi, des pli bone elteneblis tie la vivo.

Krome supozis ĉiu el la dungitoj de la administranto ĝis la plej subranga salajroskribisto, ke certe baldaŭ okazos io, per kio li havos la eblon forlasi tie la okupon kaj reiri kun sekva komercista karavano al civilizita vivo. Sed ĉar ĉiuj dungitoj estis tie nur tial, ĉar ili devis vivi de sia laborosalajro, kaj ĉar ili akceptis la okupon tie nur tial, ĉar ili aliloke ne povis trovi pli bonan, ekzistis nur du maloftaj ebloj por retiriĝi de tie. Unu eblo estis la sciigo, ke unu el ili ricevis bonan heredaĵon. La alia eblo estis,

ke oni ofertis taŭgan postenon en urbo al unu el ili. Pri tia sciigo ili atendis monaton post monato, ĉeokaze ili provis ŝpari por havigi al si malgrandan kapitalon por vivi de ĝi dum certa tempo, ĝis ofertiĝos alia taŭga posteno. Pri tia ŝanĝo ili esperis tiom longe, ĝis kiam ili fine aŭ ĉe la fino de sia kontrakto formarŝis kun karavano sen konsideri malagrablajn ekonomiajn sekvojn. Aŭ se febro senkompate mortbatis ilin. Ankaŭ tio estis rigardata liberigo.

Ĉiuj dungitoj iris tien libervole, tamen tiel libervole, kiel la ekonomia situo de ĉiu unuopulo devigis tion al ili. Pro pura aventuremo certe malofte iu iris en monterion. Sed, se tio tamen okazis, eble pro delogo pere de belaj ĝangalaj historioj, kiuj rakontas pri bunta ekscitiga vivo, la delogito post kvar semajnoj da restado estis preta ŝakri sian animon al iu ajn, kiu helpos al li iel foriĝi de tie. Li estis tiam konvinkita pri tio, ke ne povas esti pli terure en la infero ol tie.

Por buroa laboristo estis multe pli malfacile forkuri de monterio ol por indiĝeno. Sed eĉ indiĝeno faris tion nur tiukaze, se li ne vidis alian elirvojon por gardi sian mizeran vivon. Marŝi dek kvin tagojn sola tra la ĝangalo aŭ eĉ rajdi, estis tiel komplika afero, ke tiu, kiu sciis, kion tio signifas, ne entreprenis tion. Ankaŭ rajdobestoj kaj ŝarĝbestoj necesis. Por aĉeti tiajn bestojn kaj por nutri ilin, oni bezonus monon. Sed la administranto ne donis monon al vojaĝonto, sed nur ĉekon pri la tuta sumo, kiun neniu tie povis monŝanĝi. Kaj eĉ por mil pesoj ne eblis aĉeti rajd- aŭ ŝarĝbeston. Ĉiujn uzeblajn bestojn posedis la administracio. La administranto ne volis kaj ne povis perdi dungiton, tiom longe, ĝis kiam li havos anstataŭulon. Tial li ne vendis bestojn. Sed, se la fuĝinto ŝtelis la bestojn kaj la nutradon, oni

postsendis al li tri *capataces* sur taŭgaj ĉevaloj. Kaj la fuĝinto revenis post malpli ol du tagoj. La administranto estis ne nur la plej supra sed ankaŭ la sola juĝisto; kaj, se li volis, li ankaŭ samtempe rajtis ekzekuti la punon. Se la prirabito, la damaĝito kaj ĉagrenigito, estas samtempe ankaŭ la juĝisto kaj punekzekutisto, tiukaze estus stultaĵo esti kaptita de li. Kaj tial oni prefere provis liberigi sin alimaniere el la kontrolita teritorio de la potenculo, kaj ne per malbone aranĝita fuĝo.

1/4

Estis vera urbo, pueblo, kiu tie estis konstruata. Kvankam la konstruaĵoj de la kompanio estis la plej grandaj, ili estis nek la solaj nek la plimulto. Pli ol tridek aliaj konstruaĵoj dise troviĝis sur la tereno. Kelkaj el tiuj domoj estis konstruitaj laŭ la stilo de la kompanioj, nur multe pli malgrandaj. Aliaj estis konstruitaj tre simple, sen zorgemo kaj sen disipo de tempo. Kelkaj estis nenio alia krom surteren metitaj palmtegmentoj kaj tiom malaltaj, ke la loĝantoj povis eniri la domon aŭ nur kliniĝinte aŭ eĉ nur surgenue.

En tiuj domoj vivis homoj, kiuj ne estis laboristoj de la kompanio, kiuj aŭ entreprenis sendependan negocon aŭ faris ion por la kompanio sen havi kontrakton kiel dungitoj aŭ laboristoj. Jen indiĝeninoj kaj miksrasulinoj, kiuj lavis la vestojn por la dungitoj kaj tenis en ordo la vestojn de la dungitoj, ili flikis ĉemizojn kaj ŝtrumpojn kaj purigis kaj riparis ŝuojn. Krome ĉeestis frizisto kun helpoknabo, kiuj tie tondis la hararojn. Krome tie vivis la *artesanos*, la metiistoj, kiuj laboris por la kompanioj, sed tamen kelkrilate estis sendependaj kaj laboris pli laŭ propra volo

ol sub komando de la administranto. Jen la forĝistoj, la jungilarfaristoj kaj la *cayuqueros,* la trunkboatistoj, do la kanuboatistoj. Kiel loĝantoj de la urbo aldoniĝis la aro de la *zacateros*, la viroj, kiuj flegis la bovojn, ĉevalojn kaj mulojn, tiujn bestojn, kiuj necesis por la laŭorda funkciado de la entrepreno.

Tie loĝis ankaŭ familianoj de la laboristoj, kiuj sekvis ilin en la ĝangalon, ĉar ili havis neniun alian hejmon ol la lokon, kie la filo aŭ la edzo trovis laboron. Kelkaj el tiuj familianoj tie entreprenis malgrandan komercon aŭ metion. Ili havis etan fatrasejon por tiaj aĵoj, kiuj en la granda *tienda*, en la vendejo de la kompanio ne aĉeteblis, ĉar la vendo ne indis la penon. Kelkaj aliaj kudris vestojn por inoj aŭ ĉemizojn kaj pantalonojn por aliaj sendependaj homoj de la urbo.

Kaj krome tie vivis la parazitoj, kiuj troviĝas ĉie, kie laboristoj krom sia laboro apenaŭ trovas iun distron. Temis pri la sekvantaro de la batalanta armeo. Estis la nedifinita, sed tolerata, ĉar nemalhavebla trupo, kiu ekaperas en orministaj setlejoj, en naftokampoj, en minejaj vilaĝoj, tuj kiam homoj komencas streĉe labori.

De kie venas tiu trupo, kiamaniere ĝi ekscias ion pri la nove malkovritaj naftokampoj, kiel ĝi formiĝas kaj organiziĝas dum nekredeble mallonga tempo, kaj kiel ĝi eĉ elmetas sin al danĝeroj por atingi la lokon de enspezoj, tio ŝajne estis same tiel sekretoplena kiel la ekapero de vulturoj super kadavro, kiu ne ekzistas pli longatempe ol dum horo.

Pri enspezoj tiaj, kiaj eblis en orkampadejoj aŭ naftokampoj, oni tie ne povis pensi eĉ iomete. Sed eĉ la mizeraj salajroj pagataj en kompanio ŝajne estis sufiĉe da instigo, ke eĉ tie la batalkampo ne restis tute libera de hienoj.

Oni vendis tie *mescal,* meskalon aŭ komitekon sen pagi impostojn por tio. Tio estis severe malpermesita, ĉar nur la kompanio havis la rajton vendi brandon. Sed oni ĉie plej bone enspezas per tiuj aĵoj, kiuj estas malpermesitaj aŭ havas altajn impostojn. Se oni malkovris unu el tiuj *aguardiente*-vendejoj, la administranto komandis la detruadon de la kabano kaj li malpermesis al la loĝantoj pluan restadon sur tiu tereno. De la forpelito tio glitis kiel pizo de la muro. Li kunpakis siajn aĵojn kaj vagis al alia monterio, kie li tenis malfermita sian brandovendejon, ĝis kiam li estis forpelita ankaŭ de tie. Tiukaze li migris denove al monterio, kie li, post certa sukcesa restado, ree devis translokigi la entreprenon. En kelkaj el la monterioj oni ne tiel severe traktis tion, kaj devis ekesti unue teruraj skandaloj, pliakrigitaj per kelkaj murdoj antaŭ ol li ricevis la ordonon foriĝi. Post kelkaj monatoj li povis provi reveni al la unua monterio. Aŭ tie nun jam estis nova administranto en la ofico aŭ la administranto intertempe devis forpeli tiom da aliaj senkoncesiaj brandovendistoj, ke li ne povis memori pri la reveninto aŭ de tempo al tempo kondutis tiel, kvazaŭ li ne konus lin.

Tiaj malpermesitaj brandovendoj ekzistis en ĉiu ĉefurbo de monterio, ofte samtempe proksimume eĉ ses. Estis strange, aŭ ŝajnis nur strange por la neiniciitoj, ke tiaj fifamaj tavernoj povis ekzisti eĉ nur dum tago sen tio, ke la administranto aŭdis ion pri ili. La kialo, kial li ne eksciis ion pri tio, estis tiu, ke tiuj, kiuj konis fifaman tavernan kabanon kaj frekventis ĝin, konservis la

sciadon pri ties ekzisto kiel sian plej profundan sekreton. Al tiuj, kiuj ne volis rezigni pri la ĉeesto de tia vendejo kompreneble apartenis ankaŭ la dungitoj, do tiuj personoj, kiuj formis la stabon de la administranto. Kaj ne malofte ankaŭ la administranto mem estis videbla en la tavernoj, aŭ tute ebria kiel matroso en haveno aŭ en la espero tiom satdrinkigi sin, ke li forgesos la ĝangalon kaj la monterion kaj ennebuligos sin tiel, ke li konvinkiĝos pri tio, ke tio estas la plej enviinda, kion viro povas atingi en sia vivo, esti la administranto en monterio.

Kelkfoje la kaŭzo de lia indulgo estis malpli lia bonkoreco ol multe pli la fakto, ke la vendejoj aŭ pagis tolerimposton al li aŭ li neniam devis pagi la kalkulojn en la taverno.

La brandotavernoj plenumis plian taskon kiel socia institucio. La vizitantoj frekventis ilin ne nur por plenigi sin per malmultekosta, sed grave kapturniga komiteko, sed ankaŭ por havi kelkajn aliajn ekscitojn de tia maniero, kiajn oni sola ne povas ĝui. Ne estas plezuro ludi per la enhavo de sia maldekstra pantalonpoŝo kontraŭ la enhavo de sia dekstra pantalonpoŝo. La ĝuo kaj la ekscitiĝo ekaperas nur tiukaze, se oni ludas per sia propra mono por gajni la monon de la aliaj gastoj. Ju pli da gastoj havas la volon gajni monon de aliaj, des pli ekscitiga estas la okazaĵo kaj des malpli oni sentas, ke oni disipis tempon vane. Tial estis tute normale, ke oni ludis en tiuj brandovendejoj verve kaj kun fervoro. Oni ludis ĉion ajn eblan, pri kio oni scias pro sperto, ke oni povas ĉe tio gajni kaj perdi. Por krei ŝanĝon en la distro oni enkondukis de tempo al tempo nove eltrovitajn ludojn, kiuj estis kelkajn semajnojn laŭmodaj kaj poste oni ŝanĝis ilin denove. Kaj pentoplene oni reiris al la pli fidindaj kaj pli longe

elprovitaj kart- kaj ĵetkubludoj. Estis plej ofte la ludado, kiu kaŭzis skandalojn, malamikecojn kaj murdojn.

Se enmeze de civilizita lando la plej duraj punoj kaj la plej fervora polico ne povas malhelpi, ke oni malferme aŭ sub ĉiaj eblaj maskoj ludas pri gajnoj en la hela tago kaj nokte, tiukaze oni ne miru, se ankaŭ tie la administranto ne povis forigi la ludadon. Estis des pli nefacile por li malpermesi ĝin aŭ malebligi ĝin alimaniere, ĉar li mem ne scius kiel pasigi la vesperojn, se ne estus okazo por ludado. Plej ofte li koleriĝis kaj forpelis ĉiujn tavernistojn per unu fojo de la monterio nur tiukaze, se li tro ofte aŭ ĉiam malgajnis la ludojn. Sed li kaj la kompanio kaj ĉiuj ceteraj subadministrantoj en la monterioj forgesis neniam, ke la brandovendejoj kaj la ludaj okazoj estis nemalhaveblaj por la regula funkciado de la entrepreno. Sen la neleĝaj brandovendejoj kaj ludokabanoj la vivo de la homoj, kiuj tie devis labori, ofte estus apenaŭ eltenebla, almenaŭ ne dum longa tempo. Al la tieaj metiistoj kaj oficistoj oni devis oferti ion, por ke ili povu nomi la sencon de sia vivo. Alikaze ili forgesus, ke inter ili kaj la bovoj kaj muloj de la monterio ekzistas diferenco. Bovoj kaj muloj ne sentis la bezonon trinki *aguardiente* kaj ludi pri mono; ili estis kontentaj pri tio, ke oni asignis al ili la duran laboron kaj nutraĵojn. Speciale nove alvenintaj oficistoj, post kiam ili ekkomencis trovi la fadenon en la nova ĉirkaŭo, kondutis kiel kaptitaj kojotoj aŭ jaguaroj, kiujn oni alforĝis per kateno. Ili ekfuriozis, ili provis murdi la administranton aŭ la ceterajn buroskribistojn. Ili prenis ĉevalon kaj forrajdis sen nutraĵoj sen sekvi certan vojon. Oni devis serĉi kaj trovis ilin kun febro ie en la ĝangalo.

Ili kolektis novajn fortojn, sed la febro restis en iliaj korpoj por ĉiam. Ili komencis labori kaj samtempe drinki kaj ludi. Sub la eterne same ardanta suno sur ĉielo, kiu ŝajne ĉiam fandiĝis, kaj en aero, kiu estis kiel bolanta vaporo, ili faris sian laboron en duondormo kaj kun sento, kvazaŭ kuŝus plumba ŝarĝo sur iliaj cerboj. Pro la manko de iuj aliaj distroj ili estis post kelkaj semajnoj en stato, pro kiu ili koncentris sian vivintereson dum la tuta tago, komenciĝante per la ekstarado matene, nur je la trinkado de brando kaj la ludado vespere.

Tial ili forgesis la ŝparadon, forgesis la deziron reiri en civilizitan urbon por tie geedziĝi kaj vivi kutiman regulitan vivon. Ĉio fariĝis indiferenta al ili. Kaj grava estis por ili plu nur tio, ke ĉiam estis sufiĉe da *aguardiente* kaj cigaredoj kaj tabako en la *tienda* kaj certan intereson trovis la alto de la monsumo, kiun ili je la lasta vespero forludis aŭ gajnis kaj kiom ili malgajnos aŭ gajnos je la aktuala vespero.

Forgesigi al la homoj ĉion, kio ekzistas ekstere de ilia ĉirkaŭo kaj kio eble ekzistas, estis avantaĝo por la kompanio, tiel, kiel estas utila por diktatoro, se li kapablas subpremadi la regatojn tiom, ke ili fariĝas tute sen intereso pri la politika vivo kaj sentas sin feliĉaj, ĉar ili ne plu devas pensi mem kaj transpreni por si mem iun ajn respondecon. Ŝafo plej bonfartas, estas plej sekura kaj plej feliĉa interne de grego, en kiu ĝi devas fari nenion alian krom paŝti sin, liveri lanon kaj naski ŝafidetojn. Se la novaj dungitoj atingis tiun staton, se ilia penskapablo kaj ilia ambicio similis al tiuj de ŝafoj en grego, jen ili komencis fariĝi uzeblaj kaj fidindaj apogiloj de la kompanio, por kiu ili laboris kaj kiu pagis la salajrojn al ili.

Rimarkoj
aguardiente = kutima brando
artesanos = metiistoj
cayuqueros = trunkboatistoj, kanuveturigistoj
meskalo = *mescal* = alkohola trinkaĵo, distilaĵo el la agavoplanto
tienda = vendejo, butiko
zacateros = brutflegistoj

1/5

La *ciudad*, la urbo, ne estus kompleta sen la aldona altirforto de la *cantinas*. Ĉiam nur ag*uardiente* kaj ludoj ne tute kaj ne sufiĉe abunde povas ĝojigi homon, kies cerbo troviĝas en stato de fermiteco. Simile tiom malofte oni ja povas atendi de ŝafo, ke ĝi estas feliĉa, se ĝi rajtas nur paŝti sin kaj liveri lanon. Ne ĝenu viron ĉe la praktikado de sia genera instinkto, sed rekompencu lin por la vigla uzado de liaj voluptoj kaj vi havos kontentan kaj obeeman civitanon, kiu faros al vi neniujn malfacilaĵojn pro la kontentigo de via malsato pri potenco. Tie ne temis pri la malsato pri potenco, sed pri la malsato pri mono. Sed ambaŭ potencavidoj kompreneble estas identaj. Ili montras alian vizaĝon nur ekstere. Tiu, kiu posedas potencon, samtempe havas ankaŭ la tutan monon kaj male, tiu, kiu havas sufiĉe da mono posedas preskaŭ nelimigitan potencon, posedi tion, kion li deziras. En tiu kazo la tavernistoj plenumis plian socian taskon. Ili penis kontentigi la virojn, kiuj tie laboris, kaj kiuj devis loĝi tie, tiel, ke ties laborkapablo kaj laborpreteco ne estu tro ĝenataj, kio certe ne servus al la celoj de la kompanio.

En la *cantinas* ĉiam troviĝis inoj, kiuj faris sian plej bonan, por ke tia vivo por la viroj ne fariĝu tro monotona. Ili penis per siaj

propraj fortoj kaj per la kunhelpo de la *cantineros* vualigi sian faktan profesion. Kelkaj laboris kiel kelnerinoj. Ili portis al la viroj ĉe la krude ĉarpentitaj tabloj la brandon kaj, kiam ili metis la menditan glason sur la tablon, ili metis duan apud ĝin, por si mem. Tiu dua glaso kompreneble entenis nur kolorigitan sukeran akvon kun enverŝita guto da komiteko. Sed la plenigitan glason oni kalkulis tiel, kvazaŭ ĝi estus plena de pura komiteko. Salajron la kelnerinoj ne ricevadis. Sed etan komisipagon por la glasetoj kun sukera akvo, kiujn ili trinkis mem. Ili lerte aranĝis tion tiel, ke por ĉiu glaso, kiun mendis la vizitanto, tri glasoj estis por la kelnerinoj. Kiam la viro fine estis ebria, tiam aldoniĝis al ĉiu plia glaso, kiun li mendis, ses ĝis dek glasoj por la afabla kelnerino. Intertempe la viro perdis sian juĝkapablon tiom, ke li rigardis la kelnerinon, kiu malofte estis pli maljuna ol kvardek kvin jarojn kaj ankaŭ krome ne montris iun belojn, kiel junan freŝan belan floron de la ina genro. Oni interkonsentis la prezon, kaj poste la viro kaj la ino forlasis la brandovendejon laŭ maniero, ke oni facile povus supozi, ke temas pri gefianĉoj, kiu retiriĝas de la nuptomanĝo por ekscii nun finfine, ĉu la afero indas la penon aŭ, ĉu oni miskalkulis reciproke.

De tempo al tempo la flegistino revenis post horo por rigardi pri alia malsanulo, kiu eble bezonus ŝian kuracadon. Ofte ŝi ne revenis, sed nur je la sekva tago reestis videbla publike.

Aliaj inoj, kies ĉarmoj estis tre sub tiuj, kiuj tie estis postulataj de kelnerino, inoj, kiuj almenaŭ laŭ sia aspekto havis duonon de sia jarcento jam post si, kiuj ofte estis plenaj de variolmarkoj, kiuj strabis, havis oblikvajn buŝojn, ja scias tion nur la sorĉistino de *Potzcuaro*, kiom da verukoj kaj superfluaj barboj ili eble

havis. Ĉiuj ĉi inoj alimaniere devis konfirmigi sin antaŭ la kritikaj okuloj de la mondo. Ili estis kuiristinoj, flikistinoj, kudristinoj, lavistinoj, gargaristinoj kaj lavistinoj de manĝilaroj, laŭ tiu okupo, kiun ili publike koncedis. Sed ĉar tiuj okupoj estis nur preteksto, ili ne enspezigis ion, kaj la fakta profesio, pro kiu ili iris tien, ŝoviĝis antaŭen. Ĉar ili estis malkaraj kaj en tiu urbo montriĝis sen stratlumo nur nokte, mankis neniam klientoj al ili. Multaj el tiuj inoj, por ne diri ĉiuj, estis tie pli feliĉaj ol en la promesita paradizo. Tie, kie ili antaŭe estis, en urbo aŭ eĉ en vilaĝo ili vivis dum la pasintaj tridek jaroj tre ĉaste kaj virgulinece. Ne ĉar ili deziris tion, sed tial, ĉar ili ne trovis, eĉ se ili povis pagi ormonerojn por tio, eĉ kripligitan viron, kiu akceptus iliajn arde pasiajn dezirojn eĉ nur dum tridek minutoj. Sed tie ĉiuj viroj estis tiel sanaj kaj bone konservataj laŭ naturo, ke ili eĉ ne divenis, kio estas deflankiĝo de la naturo, kaj multe malpli unu el tiuj viroj ekhavus la ideon ĉirkaŭvoje voli ricevi ion, kio en certaj cirkonstancoj sur rekta kaj natura vojo ne riceveblis. Por la viroj tie ino simple estis ino. Kaj ĉar ili la inojn, kiujn ili sopiris de tempo al tempo, ne povis havi ĉirkaŭ si, ili prenis tiujn, kiujn ili povis ricevi. La aspekto kaj la aĝo de la inoj estis egale al ili. Tiujn ili ja ne volis uzi. Tiom longe, kiom ino tion havis en ordo kaj en utila stato tion, kion la viroj postulis kaj bezonis, la ino estis bonvena pliriĉigo de la tre trista vivo. Kaj ĉar temis en ĉiuj tiuj kazoj pri inoj, kiuj dum la du lastaj jaroj ne plu esperis atingi tiajn grandiozajn aferojn de la vivo, ili donis pro dankemo ĉiujn siajn fortojn, por ne disipi nedolĉigite eĉ nur minuton de la lasta restaĵo de sia surtera ekzisto. Viroj, kiuj posedis kelkajn spertojn, konkludis el tio, ke tiu, kiu neniam provis ŝrumpitan oldan piĉon, ne scias, kio estas vera ĝuo. Ili tiom ekzaltis sin, ke ili asertis, ke ili ne volus havi freŝan virgulineton eĉ en tiu kazo,

se oni ofertus ŝin sur silka remburaĵo, ĉar nur la spertulo vere scias ŝati aŭtentikan arton.

La administranto kiel plej supra instanco ricevis, koncedite de la *cantineros,* la privilegion pri la *brinco primero,* pri la unua salto, por teni lin en bona humoro pri la neoficialaj tavernoj. En multaj okazoj, oni rajtas diri, en la plimulto de la kazoj, la administranto kompreneble estis dankema al ĉiuj siaj dioj, ke tiu rajto pri la unua salto estis nur privilegio kaj ne devo. Se estus devo, la administranto en multaj kazoj certe preferus retiriĝi en la profundojn de la ĝangalo, kaj reaperi nur tiam, se li jam certus, ke la objekto de minaco tiom malproksimiĝis de la deviga loko, ke ĝi havigeblas interne de dudek kvar horoj eĉ ne per aviadilo.

1/6

Se kelkaj novaj kuracaj flegistinoj alvenis en la urbon, sendis ilin la *cantinero*, ĉe kiu ili ricevis loĝejon kaj laboron, al la *Oficina Particular*, en la privatan oficejon de la sinjoro administranto por peti lin pri la permeso por restado; ĉar la tereno de la koncesio apartenis al la kompanio, la administranto povis malpermesi la loĝadon sur la tereno, kiam ajn li volis.

Tia nova alvenintino prezentis sin modeste kaj ridetante, en siaj plej bonaj vestoj, lavinte sin per tre parfumita sapo, ŝi ĉaste sidiĝis sur la ofertitan duran seĝon kaj diris la frazojn tiel bone vortigite kaj elegante, kiel ŝi supozis tion ĝusta en bona societo.

La prezento okazis ĉiam ĉirkaŭ la sesa vespere, kiam oni atendis de la administranto, ke li tiam havas la zorgojn de la tago post

si kaj povas sin fordoni al pli ĝojigaj pensoj. Li rigardis la vizitantinon kaj demandis: „Kiel vi nomiĝas?“

„Amalia Zarraga, via tre humila servistino, *caballero*.“

„Ĉu vi havis streĉan vojaĝon tra la ĝangalo, *señorita*?“

„Ho, *dios mio*, ĉiopotenca Dio mia, se mi estus sciinta tion antaŭe, mi certe ne estus veninta ĉi tien. Sed mi ne sciis, kion fari. Mi estas *Puxtacan*. Mia povra edzo mortis antaŭ du jaroj.“ Tiumomente ŝi elprenis blankan tuketon, ĉar ŝi nun estis preta verŝi larmojn.

Jen la momento, kiam la administranto laŭ programo devis diri: „Bedaŭrinda sorto, vi estas kompatinda sinjorino.“ Li tiam ekstaris, iris renkonte al ŝi kaj frapis ŝin sur ŝultron. Tio okazis kompreneble nur en tiu kazo, se la sinjorino, kiu prezentis sin, kapablis fari dezirindan impreson al li. Kaj tio dependis de tio, ĉu li troviĝis je tiu tago kaj je tiu horo en forta korpa bezono. Dum tiaj cirkonstancoj li ne traktis tiel skrupule la vizaĝan aspekton kaj la figuron de la vizitantino. Sed, se li je la antaŭa tago estis bone prizorgita, aŭ se li havis ion pli bonan kun pli longa daŭro proksime, tiukaze kun elparolita bedaŭro estis finita la ĉefa parto de la prezento. Tiukaze li diris nur: „Ĉe kiu vi povas labori? Ĉe *don Prisciliano*, ĉu? Bone. Sciu, ke en la kampadejo ni observas, ke ĉio estu laŭorda. Neniun vagadon ĉi tie, neniujn skandalojn. Aŭ mi sentas min devigita resendi vin al Jovel kun la sekva araba komercisto, kiu venos ĉi tien.“

„Mi ja tre dankas al vi, *caballero*, ke mi rajtas restadi ĉi tie por kutimiĝi al mia malĝojiga perdo kaj perlabori ĉi tie en honesta

kaj honorinda profesio mian ĉiutagan panon. *Con su permiso, caballero,* kun via afabla permeso, mi nun retiriĝos.“

Ŝi ekstaris, humile kliniĝis kaj forlasis la buroon.

Sed en tiu kazo, se la *señor administrador* trovus certan plaĉon je la vizitantino, li dirus: „Vi certe multe suferis, *señora,* en via vivo.“

Pri tio ŝi dirus: „*Gracias, caballero, mil gracias,* milfoje kaj milfoje mi dankas pro via kompreno de miaj koraj turmentoj. *Mi alma y mi corazón sangran,* mia animo kaj mia koro sangas, *caballero,* pro la multaj suferoj, kiujn mi gustumis, de kiam mia kara edzo, benita estu lia tombo, devis postlasi min sola en tiu ĉi kruela mondo. Kial mi ne mortigis min tuj je la sama tago, kiam mi vidis sinki lin en la fridan kaj malsekan tombon? Sed, *por la Santísima Madre de Dios,* tio estus ja peko kontraŭ Dio. Kaj ne forgesu, *caballero*, ke mi estas pia kristanino kaj ne iu el tiuj, kiuj ne traktas tion tiom skrupule.“

La administranto intertempe ekbruligus cigaredon kaj plurfoje kapjesus, por tiel komprenigi al la kompatindulino, ke li konas la mondon kaj ties kruelajn falkaptilojn, kaj, ke li trasuferis similan en la vivo.

La vizitantino nun ree manprenus sian tuketon kaj balaus ĝin laŭ la okuloj, atenteme zorgante, ke la penikaĵoj sur la okulharetoj kaj sub la okuloj ne fuŝiĝu per viŝado. Ankaŭ la buŝon ŝi tuŝetus tiel, ke la tuketo ne ruĝiĝus, ĉar ŝi ne havas tiom da fajnaj tuketoj, aŭ, por diri tion tute precize, ŝi posedis nur tiun tuketon, kiun ŝi intencis uzi nur ĉe gravegaj festaj aferoj.

Ŝi fine profunde ĝemus kun postsekva glutado en la gorĝo. Poste ŝi dirus: „Mi esperas nun ĉi tie en la soleco povi forgesi ĉion tion, kion mi trasuferis, *señor administrador*, kaj por ĉiuj privilegioj, kiujn vi estas sufiĉe bonkora cedi min, mi estos dankema al vi eterne kaj eterne ĝis mia vivofino, kiu certe estos baldaŭ."
La administranto tiam ekstarus, irus renkonte al la suferulino, frapus ŝin je plia fojo sur ŝultron kaj dirus: „Nu, ĉio fariĝos bona." Ĉe tio li lasus gliti unu el la manoj pli supren kaj karesus ŝian hararon, kareso, kiu tiom plaĉus al la povra kompatindulino, ke ŝi metus sian kapon proksimen al lia brusto, ke ŝi profunde ektusetus kaj proksimigus la tuketon al la nazo. Ŝi estus tiel senfine dankema por la konsolado, ke ŝi ne povus deteni sin subite kapti la manon kaj premi ĝin kontraŭ unu el siaj vangoj. En la eŭforio de siaj dankemaj sentoj, ŝi ne povus reteni sin kisi forte la manon, tiom forte, ke ŝi kvazaŭ premus siajn dentojn en lian manon.

Nun ŝi rekonciiĝus, kvazaŭ ŝi vekiĝus el sonĝo kaj dirus: „ *Perdóneme, señor,* pardonu mian agon, sed mi ja tute ne scias, kion mi faras, mi estas kvazaŭ ebria. Vi estas tiel bonkora, *señor,* multe pli bonkora ol mi meritas. Mi ne scias, kiel mi danku al vi. Se mi nur scius vortojn, kiel mi povus montri mian dankemon por via granda bonkoreco."

Ŝi nun ŝanceliĝe moviĝus per sia supra korpoparto, kvazaŭ ŝi senkonsciiĝus.

Tiu gesto donus al la administranto la atenditan okazon por diri: „Ĉu vi volas trinki kun mi *copita*, glaseton da konjako, por ke vi rekaptu fortojn? Mi havas bonegan konjakon. Kompren-

eble ne ĉi tie en la buroo, sed en mia loĝejo. Ĉu mi rajtas inviti vin?“

Ŝi nun ridetus: „*Un caballero tan noble y tan fino*, kiel mi povus rifuzi al sinjoro tiel nobla kaj tiel grandanima tian honestan inviton?!“
Ŝi ekstarus kaj irus antaŭ li en la direkto, kiun li alludis. La unuan glaseton sekvus kelkaj pliaj. Li pli proksimiĝus al ŝi, kaj dirus: „Ne sub la brakoj, *por favor*, bonvolu, jen mi estas tre tiklema.“

Post iom da tempo oni aŭdus ŝin laŭte ekridi: „Eĉ sub la koksoj mi ne povas elteni tion.“

La administranto enverŝus plian glaseton da konjako kaj poste li trovus lokon, kie la kompatindulino ŝajne estas malpli tiklema aŭ kie la agrabla sento la malagrablan senton tiom venkis, ke estus peko plendi pri la tiklado.

Ekde tiam ĉio okazus sufiĉe rapide. Oni aŭdus la sinjorinon rifuzi ion kun bone aŭdebla voĉo. Ŝi evidente penus aspekti tre energie rilate sian rifuzon. Sendube ŝi konis siajn klientojn kaj sciis kontraŭ kiu viro ŝi devas montri sin tre volema, kaj kontraŭ kiu atingeblas pli bona sukceso, se oni aranĝas malgrandan memprezenton por supozigi al la ripozĝenita administranto, ke li aŭdace konkeris fieran fortikaĵon kaj venkis post majesta batalo. Ĉiukaze fariĝus la rifuzoj pli kaj pli maloftaj kaj pli kaj pli mallaŭtaj. La lastaj vortoj, kiujn oni aŭdus ekstere rilatus jam nur al la moskitoj, kiuj komencis pike ataki la varmigitajn gambojn de la venkitino.

Se la administranto foje akceptis la ideon, ke povus indi la penon pasigi horon kun la vizitantino, jen li akceptis bonvoleme ankaŭ la longajn paroladojn. Nur tiukaze, se la memprezentantino ŝajne estis jam tro trivita, tiel, ke la administranto, eĉ se li estus en korpa bezono, ne plu povus esperi kelkajn etajn kaŝitajn ekscitojn, kaj li ĝuste konkludus el la cetera konduto de la ofertiĝintino, ke krom la mankoj de korpaj agrablaĵoj mankas al ŝi aldone eĉ talentoj abunde ekvilibrigi per rafinitaj kaj alte kultivitaj agoj de speciala maniero sian mankon pri korpaj preferoj, jen li adiaŭus ŝin tiom rapide, ke ŝi tute ne povus rakonti al li, ke ŝi devis postlasi malsanan patrinon kaj ses pli junajn gefratojn, kiujn ŝi devas prizorgi, kaj kiuj sen ŝia diligenta laboro ĉiuj devus morti pro malsato. Sed en kazoj kiel tiu, kiu nun estis en la vico, se la ĉeestino ne posedis sufiĉe da ĉarmo interesigi lin aŭ ĉar ŝi havis la feliĉon veni je horo, kiam li ne havis ion pli bonan je dispono, plaĉus al li la rolo atenteme aŭskulti rakontojn kaj ilin eĉ garni per konsolaj vortoj kaj per elvokoj de ekmiro aŭ de profunde sentata kompreno. Li scius sufiĉe bone, ke certe plej multe el tio, kio estis prezentita al li, se ne eĉ la tuta rakonto, estas mensogo aŭ parkere lernita el aĉaj romanoj kaj eble jam centfoje aŭ kvincentfoje estis rakontita por samaj aŭ similaj celoj. La ino, kiu scias lerte prezenti ŝajne veran rakonton, konscius, ke ŝi tiel bonege povus kaŝi kelkajn mankojn, kiujn ŝi eble havas. Kiel ĉe la dom- aŭ aŭtomobilvendo tio ĉiam bone enspezigas, se la vendisto bone scias paroli. Per tio li nebuligas kvazaŭ kiel per incenso la kritikan juĝon de la aĉetanto.

La administranto, kiu tie estis la plej altranga persono kaj kiu postulis respekton de ĉiu, kiu venis tien, aŭ almenaŭ atendis respekton, ne povis iri simple al unu el la neoficialaj tavernoj, tie sensence ebriigi sin kaj poste treni unu el la inoj kun si al sia

bangalo. Verŝajne li tie ne trovus inon, kiu je la antaŭa vespero aŭ eĉ nur antaŭ horo ne seksumis kun iu kota bovopaŝtisto aŭ kanububo, ĉar tiu posedis peson; kaj la ino eble havis pedikojn, se ne eĉ pli teruran.

Tiel facile la administranto ne povis ĵeti sian reĝan majeston sur sterkejon, kaj tial, se la *cantineros* deziris, ke li silente akceptu, ke ili vendas brandon kaj entreprenas hazardoludejon, ili devis transpreni silente agnoskatan devigon, ke ili sendu ĉiun damon nove alvenintan pro profesiaj celoj en la domon de la administranto, por ke li povu juĝi ilin, kio okazis kun la preteksto, ke ŝi devas peti la permeson de sia restado ĉe li.

Ĉiu damo de la spertaj *cantineros* dum kelkaj horoj estis insiste instruitaj, kiel ŝi devas konduti antaŭ la administranto. La adminstrantoj de tempo al tempo estis novaj. Kaj ĉiu administranto havis proprajn kaj specialajn idealojn pri tiu homa bezono. La unuaj du aŭ tri inoj, kiuj amikiĝis dum horo kun la nova administranto, havis la taskon esplori liajn ecojn kaj lian guston kaj sciigi tiujn ekkonojn al la *cantinero*.

Rimarkoj
copita = glaseto
Mi alma y mi corazón sangran = Mia animo kaj mia koro sangas
por favor = bonvolu
señorita = fraŭlino

1/7

Al la aktuala administranto, *don Leobardo Chavero*, plaĉis vizitantino nur tiukaze, se ŝi kapablis veki la impreson, ke ŝi estas

relative honesta damo. Ke ŝi efektive estas tre honorinda civitanino, li ne atendis. Ŝi ja alikaze ne estus en la monterio. Sed tamen li ĉiam volis havi la impreson, ke la ino nur pro malfeliĉo, pri kiu ŝi estis senkulpa, estis devigita iri al la plej aĉa labormerkato, kiu por tiaj damoj ankoraŭ estis temo. La monterio estis la plej lasta merkato. Pli aĉa estis neniu alia. Eĉ punkaptitoj, kiuj povis pagi por tio, kaj al kiuj ĉeokaze pro sanokaŭzoj estis ceditaj tiuj rajtoj, certe rifuzus la plejmulton el tiuj inoj. Ju pli vizitantino kapablis veki la impreson al *don Leobardo* la impreson, ke ŝi venis tien nur pro hazardo aŭ pro naiveco, des pli bonan ŝancon ŝi havis dum tagoj, ja dum semajnoj rajti restadi en lia bangalo kaj esti traktata de ĉiuj loĝantoj de la urbo tiel, kvazaŭ ŝi estus lia edzino. Se ŝi komencis enuigi lin, *don Leobardo* ne permesis, ke la koncernata ino loĝu en la kampadejo, sed li atendis, ĝis kiam venis en la monterion karavano de komercistoj , kies posedanton li povis fidi kaj tiam li sendis la inon kun konsiderinda ĉeko en ŝian hejmurbon.

Sed, se ino kondutis malbone, se ŝi interbatis kun li, li elĵetis ŝin senkompate, ne plu zorgis pri ŝi kaj ne restis al ŝi io alia krom retiriĝi en la vicojn de la batalantinoj kontraŭ akra konkurado.

Don Leobardo tiel, kiel ankaŭ neniuj aliaj administrantoj en la monterioj, morale ne estis limigita. Se li havis inon dum kvar semajnoj, tiukaze tiu fakto ne malhelpis lin akcepti novajn vizitantinojn kaj kontroli ilin pri ties kapabloj, kun la antaŭkondiĉo, ke la vizitantino trafas lian guston. Kaj se okazis, ke unu el la novaj vizitantinoj trovis lian specialan plaĉon, li prenis ankaŭ ŝin dum pluraj semajnoj en sian domon, sen rezigni pri la antaŭa damo, se ŝi ankoraŭ plaĉis al li. La nova helpantino estis akceptita kiel kunulino de la antaŭa ino. Se al unu el ambaŭ tiu

speco de intima kaj feliĉa familia vivo ne plaĉis, aŭ, se unu el ili estis kverelema, li eksigis ŝin per ĉeko. Okazis eĉ, ke dum la dek ses monatoj, kiujn *don Leobardo* enoficis kiel administranto en tiu ĉi monterio, li foje dum tri monatoj kaj du semajnoj, kiel observis la loĝantaro, vivtenis samtempe en sia bangalo unu damon kaj tri kunulinojn.

Tio estis tre ĝojiga familia vivo, kaj se ĉio irus laŭ *don Leobardo,* li povus elteni tiel dum tuta jaro. Sed estis du oficistoj, kiuj samtempe trovis plaĉon je unu el la du kunulinoj, kaj kies emoj ĉeokaze estis same responditaj. Kaj, kiam *don Leobardo* kun la damo kaj unu el la kunulinoj provis solvi vivfilozofiajn problemojn, ili alportis malpacon al la hejma feliĉo. La malpacon ne kulpis *don Leobardo*, kiu klarigis, ke li estas preta pardoni al ambaŭ pekemaj kunulinoj kaj al ambaŭ oficistoj, kiuj trovis plaĉon je la pekulinoj, kaj, ke li pretas forgesi la okazaĵojn. Sed kulpis tion la du kunulinoj, kiuj malkovris post tri tagoj, ke ĉiu el ili kaptis la malĝustan el la du oficistoj, kaj kiuj tial volis ŝanĝi la partnerojn. Tio kondukis al revolveraj pafoj, de kiuj la plej multaj kugloj preterflugis, sed du el ili trafis la celon, kompreneble sen la kulpo de la pafintoj, kiuj, kiel ili diris, ne havis la intencon murdi sin reciproke. Tial al *don Leobardo* ne restis alia eblo krom enfermi ambaŭ kunulinojn en ĉambron kaj teni ilin tie enfermitaj ĝis kiam li povis sendi ilin per la karavano de araba komercisto al *Balún-Canán*.

1/8

Kiu venis kiel neiniciito, eble hazarde, tien, en tiun urbon, kiu estis tiom haste starigita en la ĝangalo kaj tiom senornama kaj sobra, tiu gajnis la impreson, ke temas pri kampadejo, en kiu

ĉiu konstruaĵo, ĉiu kabano, ĉiu estaĵo, ĉu homo aŭ besto, havas neniun alian celon krom produkti mahagonon. Tiun celon la urbo kaj ties loĝantoj kompreneble havis, tiel, kiel en mineja loko ĉiu agado rekte aŭ nerekte servas por produkti karbon aŭ ercojn.

Kio okazis ekstere de tiu laboro en tiu kampadejo, homo vidis nur en tiu kazo, se li pasigis tie kelkajn semajnojn. Sed ne kiel vizitanto aŭ kiel gazetskribisto aŭ kiel membro de inspektista komisio, sed li devis esti tie kiel partoprenanto, ĉu kiel dungito, ĉu kiel metiisto, ĉu kiel *contratista*, ĉu kiel komercisto, kiel laboristo aŭ kiel membro de la granda armeo, kiu zorgis pri la plezuro kaj kiu vendis voluptojn, sen kiuj la vivo tie apenaŭ estus eltenebla.

Kvankam la konstruaĵoj de la administrejo laŭ konstrumaniero kaj aspekto estis jam tre diversaj de tio, kion oni imagas kutime pri buroaj konstruaĵoj, eĉ en suker- kaj kafoplantejoj, tamen la konstruaĵoj, kiuj servis al ĉiuj aliaj celoj, estis eĉ pli ol centfoje pli diversaj de tio, kion oni imagas pri tavernoj, ludohaloj, dancejoj kaj la domoj por ina subteno, ekzemple en eta haveno ĉe la pacifika bordo de Centra Ameriko. En tiuj etaj havenoj, kie albordiĝas nur trampaj ŝipoj, kies celoj kaj posedantoj ne ĉiam estas konataj, konservas tiuj ejoj almenaŭ ankoraŭ restaĵon de la brilo aŭ de la rabista romantiko, kiun esperas renkonti soifa maristo bezonanta inon. Li estas tute kontenta kaj pensas, ke estas en ordo, se la du aŭ tri tavernoj de la haveno kaj la dancejoj, kiuj estas alkonstruitaj al la tavernoj, estas konstruitaj el malnovaj kestotabuloj, el platigitaj ladujoj kaj petrolkanistroj kaj el truigitaj pecoj de distranĉitaj ondoladoj. Tiaj konstruaĵoj ĉiam havas ankoraŭ certan ligon kaj rilaton al la civilizacio, se

temas pri la arkitekturo kaj pri la uzataj konstrumaterialoj, ĉar ili delikate memoras pri la aĉiĝintaj kabanoj, kiujn oni ĉeokaze trovas en ĝardenkolonioj ĉe la rando de grandaj fabrikurboj en la cvilizitaj landoj, kie proletoj pasigas siajn dimanĉojn kaj plantas salaton, kiun ĉiam rikoltas aliaj.

Kompare al la konstruaĵoj, kiuj troviĝas en la mahagonkampadejoj kiel plezurejoj, oni povis nomi veraj palacoj la tabulajn kavernojn en la etaj havenoj. Ĉar tie en la monterioj estis eĉ ne kestoj, neniu peco da ondolado, neniuj najloj, neniu pikdrato, neniu fera hoko aŭ io ajn de tio, kio ankoraŭ videblas eĉ en la plej mizeraj havenoj de plej mizera bordo.

Tabloj kaj seĝoj ekzistis nur en la konstruaĵoj de la administrejo, kaj eĉ tiuj mebloj ne estis faritaj per segilo, sed nur per hakiloj kaj maĉetoj. Kelkaj el la dungitoj dormis nur en hamakoj, ĉar ili pro serpentoj, skorpioj kaj grandaj tarantuloj ne povis dormi sur pura tero. Aliaj dungitoj, inter ili la administranto kaj la ĉeflibrotenisto posedis litaĵojn. Tiuj litaĵoj estis kiel ĉiuj mebloj tie el la plej superba mahagono aŭ el ebono. La ligno validis milojn de dolaroj, kompreneble en Nov-Jorko aŭ en Londono. Sed tie ĝi eĉ servis kiel brulmaterialo, se ĝi ne estis sufiĉe bona aŭ sufiĉe granda por povi oferti la necesan mezuron por la merkato. Sed kvankam la ligno de la litaĵoj estis la plej nobla ligno, la litaĵoj mem estis tiel provizore ĉarpentitaj el prihakitaj tabuloj, ke ili meritus la nomon lito nenie aliloke, eĉ ne ĉe povra kamparano en Albanio. Rimenoj el kruda bovohaŭto estis strečitaj krucforme transverse de la lito. Sur tiu plektaĵo kuŝis sternita bastmato kaj sur tio matraco, tre lerte farita de indiĝenoj el la basto de speciala planto. Ĝi estis proksime tri centimetrojn alta kaj relative mola. En eŭropaj landoj oni supozus, ke oni faris ilin

el torfo. La koloro similas ja al tiu de hela torfo. Bonaj kusenoj estis lukse remburitaj per elektita Luizianomusko, kiu tie kreskis abunde.

Tiu speco de litoj kaj matracoj validis en la urbo kiel la plej granda lukso, kiun oni povus posedi. Kaj se la administranto aŭ dungito kondukis inon en sian bangalon, tiukaze certe estis kompreneble, kial la ino sentis sin oportuna kaj konvinkita pri tio, ke angla edukino ne povas dormi pli mole. En siaj loĝejoj la inoj dormis ja aŭ en hamako aŭ sur bastmato sternita sur la tero. Hamako estis jam lukso, kiun nur malmultaj inoj povis permesi al si; ĉar eĉ, se ili havis monon, povis okazi, ke la *tienda* de la kompanio ne havis hamakon en la stokejo. Kaj ne estis certe, ĉu la sekva karavano alportos kelkajn. Iafoje estis en la kampadejo indiĝenaj viroj kaj inoj, kiuj faris negocon el tio plekti hamakojn el basto.

La tavernoj kaj ludohaloj konsistis plej ofte nur el unu aŭ du krudaj tabloj starigitaj sub la libera ĉielo. Tiu maniero validis jam kiel nobla. La malpli noblaj trink- kaj ludohaloj estis nenio alia krom la nura tero, kie la vizitantoj kaŭriĝis laŭ la maniero de indiĝenoj kaj trinkis la meskalon aŭ tuj el botelo aŭ el fruktoŝeloj. Ankaŭ la ludado okazis sur nuda tero.

Aliaj tavernoj havis duonon de palmtegmento, kiu estis apogita al arbo aŭ fosto tiel, ke ĝi estis direktita kontraŭ la vento aŭ en la plej multaj okazoj kontraŭ la rigardoj de la adminstrejaj konstruaĵoj. La ŝtonfrapistoj ĉe la kamparaj vojoj en Eŭropo faras sian laboron sub similaj primitivaj konstruaĵoj, kiuj estas ja konsiderinde pli malgrandaj, sed por tio kelkajn gradojn pli elegantaj ol tiuj, kiujn oni starigis en la kampadejo.

Krome ekzistis domoj faritaj el tuta palmtegmento, kiujn oni metis sen palisoj sur la teron apud vojo. La du gablajn flankojn oni fermis per seka arbustaĵo. Unu el la gablaj flankoj estis la pordo. Se oni forŝovis la arbustaĵon, jen la pordo estis malfermita. Kaj se oni kovris la gablan flankon per la arbustaĵo, jen la pordo estis fermita. Tiamaniere konstruitaj estis la domoj, en kiuj loĝis la kelnerinoj kaj aliaj inoj, tie ili akceptis siajn gastojn por interparoli kun ili pri korpa geografio.

Dormi la homo devas, kaj se li ne havas liton, li devas dormi sur la tero. La inoj, la plimulto de la metiistoj, brandotavernistoj kaj laboristoj havis kiel loĝejon nur tiajn kabanojn, kiuj estis palmtegmento, kies gabloj ne sufiĉe altis, por ke oni interne povu stari rekte. Ĉar multaj, certe la plimulto de la loĝantoj el tiuj domoj havis nek liton nek hamakon, ili dormis sur mato sur la tero. Ĉiu unuopulo, kiu matene vekiĝis sen esti ĝenita fare de serpento aŭ de skorpio aŭ iu alia el la dekmiloj da ĝangalreptilioj, rigardis sin favorigita de la sorto tiel, kiel soldato, kiu nevundite revenas el longa milito.

La metiistoj kompreneble povis konstrui pli bonajn kabanojn, ĉar ili estis lertaj. Sed mankis al ili la tempo. Ĉiu tempo de sunleviĝo ĝis sunsubiro, inklude de dimanĉo, apartenis al la kompanio. En la nokto ili dormis, kaj ili ankaŭ ne povis fari tiun laboron en la nokto. Tiel ili loĝis ĉiam nur sub la tegmento, ĝis kiam ĝi iutage forbrulis aŭ uragano detruis ĝin. Tiam ili havis ĝuste tiom da tempo por konstrui novan tegmenton, kiu plej ofte aspektis eĉ pli mizere ol la antaŭa. Ĉiu esperis povi liberigi sin de la ŝuldoj, kiujn li havis ĉe la kompanio, por povi reiri en sian hejman regionon. Ĉar ĉiu esperis, ke tio okazos baldaŭ, tial

ĉiu kontentiĝis pri la primitiva domo, kiun li havis. Ĉar ju pli longe li laboris en la monterio, des pli da ŝuldoj li havis ĉe la kompanio kaj des pli senesperiga estis la perspektivo povi skui tie la polvon de la piedoj. La ŝuldojn oni unue devis forlabori antaŭ ol oni rajtis forlasi la kampadejon.

Kompreneble ekzistis ankaŭ alia speco de domoj. Ĉe tiuj la tegmento estis metita sur palisojn, sufiĉe alta, por ke oni povu stari ĉe la lito rekte kaj eĉ iom da loko restas libera super la kapo. Kelkaj el la *aguardiente*-vendistoj posedis tiajn domojn. Ofte oni plibeligis tiujn domojn per tio, ke unu el la flankoj estis kovrita per arbustaĵo, tiel, ke ekestis vando. Iafoje oni konstruis duan vandon je tiu maniero kaj tiel la tavernisto apartenigis ĉambron, kiun li kovris de ĉiuj flankoj per arbustaĵo. En tiu ejo li dormis kun sia edzino aŭ, se li ne estis akompanata de edzino, jen laŭvice kun unu el la *meseras*, el la kelnerinoj, kiuj priservis en lia taverno.

Kelkaj el la metiistoj, kiuj apartenis al la pli inteligentaj, nomataj *maestro*, do majstro, kiel ekzemple la forĝisto, la jungilarfaristo, la poŝtrajdisto, la *mayordomo* de la *arrieros,* kiuj ĉiuj estis bone pagataj, ĉar ili nemalhaveblis por la funkciado de la entrepreno, kaj tial estis respektataj kaj sendependaj, tiel, kiel la dungitoj, loĝis en kabanoj, kiuj, nur malpli grandskale, ne estis malsimilaj al la konstruaĵoj de la administrado. Komparate laŭ la cirkonstancoj tiuj domoj rigardeblis kiel la plej altkvalitaj domoj, kiuj atingeblis por la loĝantoj de tiu urbo.

Rimarkoj
aguardiente = brando
arriero = mulisto, mulpelisto

mayordomo = intendanto, domkortega mastro, administranto, domisto
mesera = kelnerino

1/9

Ĉe la ekstrema rando de la tereno kaj proksime de tie, kie komenciĝas la ĝangalo, staris aĉe aspektanta kabano sen vandoj. La rompiĝema palmotegmento montris kelkloke truojn, kaj la diseriĝantaj ĉevronoj konkludigis, ke ĉe la sekva ŝtormo certe de la tegmento postrestos nenio. Putriĝema tabulo fiksita je unu el la plej gravaj palisoj, havis veterbatitan surskribon, evidente skribitan per larĝa krajono de ĉarpentisto. Kelkaj el la literoj fariĝis nelegeblaj. Sed tiu, kiu scias deĉifri misterajn hierglifojn, kapablis malkovri kun iom da pacienco, ke la skribo iam tekstis: E*scuela*, lernejo.

La monterioj laŭ leĝo estis devigitaj konstrui kaj teni en bona stato lernejojn por la infanoj de siaj laboristoj kaj dungitoj kaj de ĉiuj ceteraj homoj, kiuj loĝis tie. La leĝo en formo de instrukcio celis, ke la monterioj tute ekipu la lernejojn kaj ankaŭ zorgu pri la instruisto kaj pagu lin. Sed ĉar tio en la instrukcio ne estis legebla eksplicite vorton post vorto, sed ĉe la transdono de la koncesio nur dirita, ke oni devu konstrui kaj teni en bona stato la lernejon, tial plenumis la kompanio la instrukcion nur tiel, kiel interpretis ĝin la kompanio mem.

Deko da palisoj estis fositaj en la teron kaj sur tio oni metis palmtegmenton. Por eviti, ke iu rilate la sgnifon de la kabano eraras, oni fiksis per najlo tabulon kun la surskribo *Escuela Rural*, vilaĝa lernejo. Ekde la komenco de la monterio en tiu lernejo oni neniam instruis infanon. Kaj la kabano servis tial

dum la plej varmaj horoj de la tago kiel substarejo por muloj kaj azenoj por ke ili ĝuu iom la ombro. En la jarobilancoj de la kompanio, de kiuj oni devis transdoni kelkajn kopiojn al la instancoj, troviĝis ankaŭ la *escuela* kiel posedo de la kompanio kaj eksplicite kiel inventara posedo en la alto de du mil sescent pesoj. La vera valoro baziĝis nur sur la uzita labortempo de kelkaj peonoj kaj kostis kvar pesojn kaj okdek centavojn.

Ĉiu monterio havis tian lernejon, ĉar ili laŭ leĝa instrukcio devis havi ĝin. La antaŭe detale prikribita estis la plej bona el ĉiuj. La lernejoj de la aliaj monterioj havis jam delonge nek tegmenton nek ĉevronojn. La lernejo de la monterio *La Tumba* konsistis nur plu el paliso, kiu atestis pri malaperinta pompo. La aliaj palisoj estis de jaroj aŭ putriĝintaj aŭ iu uzis la ankoraŭ uzeblajn palisojn por iu pli bona celo. Ne estis ironia rimarko, sed hazarde efektiva fakto, ke la ununura paliso, kiu ankoraŭ postretis, ankoraŭ portis la tabulon, sur kiu ankoraŭ du literoj legeblis: s...l... La aliaj literoj tute paliĝis.

Ĉiuj ĉi lernejoj antaŭ la diktaturo ne ekzistis. Sed poste ili estis menciataj en la raportoj de la ministerio pri instruado en la nombro de la kamparaj lernejoj kaj montris al la tuta mondo, kiajn strečegojn entreprenis *El Caudillo*, la gvidanto, por levi la nacian nivelon de la edukiteco. La diktatoro diktis, dekretis kaj ordonis, kaj jen vidu, nova popolo estis naskita kaj ekokupis sian laŭmeritan lokon inter la civilizitaj nacioj de la Tero.

Rimarkoj
escuela = lernejo
Escuela Rural = lernejo kampara
El Caudillo = La gvidanto

ĈAPITRO 02

2/1

Iafoje ŝajnis, ke tie tempo estas tre multekosta. Sed alitempe okazis, ke oni tiel malavare disipis la tempon, kvazaŭ eĉ eternecoj estus sen valoro.

En multaj rilatoj estis simile kiel sur la ekzercejoj de soldatoj. Kun multe da kriado, kun minacoj kaj puŝoj oni pelas la soldatojn matene je la kvara kaj duono el la simplaj litoj. Poste oni batalas pri kvaronoj de minutoj, insultadas, kverelas, ĉar serĝentoj peras la impreson, kvazaŭ la bonfarto de la tuta homaro dependus de tio, ke la kompanio precize dum kvin sekundoj estas ĵetata de unu angulo de la ekzercejo al transversa angulo por ekstari envicigite precize je la sesa kaj kvindek naŭ minutoj kaj kvardek kvin sekundoj.

La kapitano de la kompanio aperas je la sepa kaj dudek minutoj, migras laŭ la vicoj tien kaj tien por trovi tie ie ne firme pendantan fadenon kaj ie aliloke oblikve butonumitan butonon kaj fine povu konstati kun kontentiĝo, ke la buko de la leda pantalonzono ĉe certa soldato estas ŝovita ekzakte unu kaj kvaronon de milimetroj tro maldekstren, jen mondoskuiga okazaĵo tia, ke la serĝento tion devas noti en sia notlibreto por konservi tion poreterne.

Du horojn poste io komencas okazi. La kapitano ordonas, ke morgaŭ la kompanio devos enviciĝi sur la ekzercejo duonon de

horo pli frue, ĉar ĝi ĵus malfruiĝis tiurilate. Tiam oni iom post iom konvinkas la soldatojn pri tio, ke ili ankoraŭ ne kapablas kuri, sed, ke ili devas lerni tion unue por fariĝi uzeblaj civitanoj. Ĉar la tempo, kiun oni uzas por instrui al junaj viroj, ke ili ne kapablas nature movi siajn brakojn kaj okulojn nek memori pri tio, kiel ili nomiĝas, ne estas pagata de la kapitano kaj de la serĝento, sed de la impostpaganta popolo, tial oni ripetas la simiecan komedion ĉiutage kaj ĉiujare ĝis kompleta stultiĝo; kaj la eduka trejnado kaj instruado, kiu kun plena sukceso povus estis finita post kvar monatoj por ĉiu normala sana viro, oni bezonas tri plenajn jarojn kun la rezulto, ke la gvidantoj de la sistemo konsentas kun serioza fervoro kaj post sufiĉe detala konsidero, ke necesus eĉ ses jaroj por efektive sukcesi.

Tie ne statis multe alie. Sed la kaŭzoj estis klarigeblaj kaj kompreneblaj. *Don Remigio* komencis malbeni sian vivon kaj sian sorton, vidalvide kun la disipo de tempo, kiun kostis pridemandi la alvenintajn laboristojn kaj asigni laborgrupojn al ili. Li kelkfoje estis pafmortigonta sian *capataz*-on, sian serĝenton Ambrosio, ĉar tiu ne estis sufiĉe rapide je dispono kun la notlibreto, kiam *don Remigio* bezonis lin.

Kiam la pridemandado tiam fine estis finita, okazis spite al hastado kaj rapidado nenio plu.

Don Remigio lasis stari la virojn en la tropika sunardo, kvazaŭ ili estus ŝtonblokoj, kvankam ili marŝis ekde la lasta kampadejo de la unua matene por povi esti en la monterio ĉirkaŭ tagmezo. Pri tio, ĉu ili tie forbrulos aŭ renversiĝos aŭ freneziĝos, li ŝajne ne tre zorgis. Kompreneble ili kostis lian karan monon. Por ĉiu unuopulo li devis pagi tiujn ŝuldojn, pro kiuj la viro estis vendita

tien aŭ intertraktita. Por ĉiu unuopulo li devis pagi la imposton de la laborkontrakto en alto de dudek kvin pesoj al la prezidanto de la *municipalidad* en Hucutsin, por ke la instanco permesu kapti la viron, se li forkurus. Krome li devis pagi altajn komisiojn al la varbaj agentoj, kiuj en privataj kaj ŝtataj bienoj kaj en vilaĝoj kunaĉetis peonojn, kiuj havis ŝuldojn, kontraŭ la pago de la ŝuldoj al la mastroj aŭ kontraŭ la pago de la policaj punoj por aliaj indiĝenoj, por povi konduki ilin tien en la monterion. Neniu povis atendi, ke la *enganchadores,* la varbaj agentoj, laboras por nenio, des malpli, ĉar estis ilia negoco, ĉe kiu ili esperis fariĝi tre riĉaj. Fine ankoraŭ al ĉiu varbita viro de la agento estis pagata antaŭpago per kontanta mono por pli facile logi la virojn konfirmi la kontrakton antaŭ la estro de la municipo kaj tiel veki antaŭ la cvilizita mondo la impreson, ke temas pri simplaj laborkontraktoj tiaj, kiaj ili simile estas intertraktitaj ĉie tutmonde. La malnova „kaciko“ komprenis tion multe pli bone ol la freŝe elkoviĝintaj diktatoroj vualigi la veran staton de homaj rilatoj interne de la lando kontraŭ misfidemaj gestoj de la ceteraj popoloj, kaj tio kun la helpo de buŝŝtopita kaj sin antaŭ li humiliganta kaj prostituanta gazetaro. Tio, kion la laboristoj rakontis aŭ disvastigis, estis nenio alia krom mensogoj kaj kalumnioj. La vero estis nur tio, kio estis skribite en la laborkontraktojn kaj konfirmite de la laboristoj, kaj kio havis la stampilon de rajtigita instanco. Ke la indiĝenaj laboristoj povis nek legi nek skribi, la diktatoro ne rigardis kiel sian propran kulpon. Ja kial ili ne lernis legi kaj skribi? Ili estis tro stultaj por tio kaj ne havis la deziron lerni tion.

Ĉiujn ĉi sumojn kaj monojn, kiujn la *contratista* pruntedonis, la viro devas forlabori en la ĝangalo. Oni ne povas atendi de *contratista*, ke li pagos pro nura homamo tiun monon por indiĝeno,

eble eĉ ducent pesojn, kaj poste diros al certa viro: „Mi tre dankas pro via afableco, ke vi permesis al mi pagi viajn ŝuldojn kaj doni al vi la antaŭpagon, kiun vi prenis por ebriigi vin kaj seksumi kun putinaĉoj. Iru hejmen en vian gepatran domon, plimultigu vin kaj vivu feliĉa kaj kontenta ĝis la fino de viaj tagoj!“

Ja kial kontraktisto faru tion? En tiu ĉi mondo, en kiu ĉiu devas batali por sia ĉiutaga pano, ankaŭ kontraktisto ne povas donaci ion sen tio, ke ĝi mankus je iu alia fino. Li devas damne streĉe labori por vivteni sin kaj por esti sukceca. En la kazo, se li ne havus ion, kiam li iam fariĝus maljuna, jen li devus almozpeti. Tial li devas zorgi pri sia bonfarto tiom longe, kiom li kapablas. Ankaŭ la edzino kaj la infanoj hejme volas vivi. Kaj se li devas labori streĉe, kial do ne la peonoj? Por io alia ili ja tamen ne taŭgas kaj ili faras nenion krom stultaĵojn. Se ili ne havas laboron, tiukaze ili nur ebriigas sin. Anstataŭ pensi pri io alia, kaj speciale pri tio kiel liberigi sin el siaj ŝuldoj kaj el sia sklavigo, ili disipas siajn tutajn belajn laborfortojn nur por enmondigi gregon de infanoj.

Krome la homoj en Nov-Jorko kaj en Londono volas havi meblojn el mahagono. Kial ili volas havi ilin, tio nin, la *contratistas*, tute ne koncernas. Tio estas afero ilia. Sed oni povas perlabori monon el tio, belan monton el mono. Ĉiuj ĝangaloj estas plenaj de *caoba*. Ni eĉ ne scias, kion ni faru kun tiom da mahagono. Ni havas tiom grandan amason de ĝi, ke ni faras eĉ niajn fervojajn relotrabojn el mahagono kaj ebono. Kial ni ne fordonu kelkajn tunojn de nia abunda superfluo de tiu splenda ligno al la suferantaj homoj? Kompreneble necesas eligi ĝin de la ĝangalo. Ni, la kontraktistoj, tion ne povas fari solaj. Mi plej malmulte. Mi

havas tuj dikajn sangoblazojn je la manoj, se mi hakas mahagonon nur dum tri horoj. Mahagono estas dura kiel fero, damne! Sed tiuj indianoj, ebriaj kaj fikemaj, kiel ili estas, estu feliĉaj, ke ili faras ion por la patrio kaj, ke ili plialtigas la eksportajn nombrojn.

Tiu opinio de la *contratista* estas certe ĝusta, ĝi atestas prudenton kaj profundan komprenon pri la komplikaj leĝoj de la monda ekonomio. Kompreneble, indiĝeno pensas alie pri tio. Tial li estas ja povra proleto kaj ne direktoro de banko. Kaj estas simple nekompreneble por ĉiu normale pensanta homo, ke tiuj de Dio damnitaj proletoj ĉiam kaj de eterne tute ne volas kompreni kiel prudentaj kaj ĝustaj kaj ŝtatkonservaj estas la ideoj kaj vidpunktoj, kiuj estas pene kaj zorge elkovitaj de diktatoroj kaj de fabrikdirektoroj kaj dum sendormaj noktoj por la bonfarto de la patrio. Damnite kaj de Dio malbenite, oni devus simple mortpafi ĉiujn proletojn, por ke fine foje iam estu paco en la lando. Kial la mizera hundido entute estas proleto? Tio estas kulpo lia. Estas neniukaze la kulpo de la kontraktistoj, ke la peonoj ĉiam havas tiom da ŝuldoj ĉe siaj mastroj. Ankaŭ la mastro bezonas sian monon kaj, se li fine perdas la pacienc on kaj volas rehavi sian monon, ĉar li devas havi ĝin, kaj tiam vendas la peonojn al la kontraktistoj por la ŝuldosumo, jen oni malfermegas la fibuŝon kaj kriadas pri homkomerco kaj sklaveco.
Ĉio estas tiom memkomprenebla, tiel simpla, tiel logika, tiel prudenta, ke oni devas miri nur pri tio, kial la subigitaj proletoj ne volas kompreni tion. Tuj se ili iam foje ekkomprenos kaj plene perceptos, ke ĉio, kion oni faras al ili, okazas nur je ties bonfarto, ke neniu diktatoro kaj neniu akciulo iam pensas aŭ pensis pri tio tuŝi la dignon de la proleto aŭ eĉ intencas sklavigi ilin kiel laborbestojn, do se la proletoj foje akceptos tion, ke oni

celas nur ilian bonfarton, ja ilian plej grandan bonfarton, tiukaze tiam ankaŭ fine maturiĝos la tempo, en kiu oni rajtos rigardi ilin prudentaj, kaj tiam ĉiu unuopa proleto havos la perspektivon fariĝi eĉ fabrikdirektoro kaj prezidanto de kontrolkonsilio. Sed tiom longe, kiom li ne komprenas tion aŭ ne volas kompreni tion, li devas teni la fibuŝon fermita kaj permesi, ke oni regas kaj donas ordojn al li.

Laŭ tio okazis tie ĉio laŭleĝe kaj laŭrajte. Maljusteco okazis al neniu. Neniu havis kaŭzon plendi. Ĉiu ago farita de la varbaj agentoj, de la *contratistas* kaj de la kompanioj, okazis ĉiam kaj en ĉiuj cirkonstancoj enkadre de la leĝoj. Se montriĝis truoj en la leĝoj, ekzistis ja diktatoro, kiu fermgluos tiujn truojn per subskribo. Kaj tio, kion la diktatoro faris, estis ĉiam prava, ĉar ĉiu el liaj agoj estis konfirmata de la *Cámara de diputados*. Se okazis, ke *diputado* kontraŭis ion, li ĉesis esti per tio deputito, ĉar li ĝenis la sanktigitan ordon kaj la ŝmiritan realigon de la negocoj. Nur jesulojn oni toleris en la C*ámara* kaj en la Senato. Vivo estis plezurego. Kaj tiu ulo, al kiu tio ne plaĉis, ne havis la rajton vivi kaj oni pafmortigis lin. Se estis mildigaj cirkonstancoj oni metis lin en la koncentrejon *El Valle de los Muertos*, jen tereno ĉirkaŭbarita per pikdrato enmeze de la plej bone elektitaj malariomarĉoj en la sudo de la federacia ŝtato *Veracruz*. Tien oni metis lin por ke li neniam revenu. Estis la ora erao de la diktaturo.

Rimarkoj

Cámara de diputados = parlamento de deputitoj

enganchador = varba agento

kaciko =indiĝena vilaĝestro, tribestro, en tiu ĉi ĉapitro moke uzata por El Porfirio

municipo = loka administrejo
municipalidad = municipo aŭ municipio (urbo aŭ teritorio havanta relative sendependan registaron)
diputado = deputito, parlamentano

2/2

Dum la mahagonlaboristoj staris en vico kaj atendis post sia pridemandado, ke oni diru al ili, kion ili faru, iris ilia kontraktisto *don Remigio* en la magazenon, al la *tienda*, kie li sidiĝis sur keston kaj ĝeme lamentis pri la dura laboro, kiun li faris, kaj poste li postulis botelon da komiteko. Li komencis trinki, kaj iom post iom li pli bonfartis. Sian rajdobeston li estis kondukinta sub ombran arbon. La homoj ne interesis lin. Ili estis ja prudentaj kaj sciis, kion fari. Sed tio, kion ili faris sen speciala komando, ĉiam estis malĝusta kaj la *capataz* iris renkonte al ili kaj vipis poste la vizaĝojn de ses viroj.

Ili kaŭrigis sin sur la arda sabla grundo kaj atendis. Sed la sunardo fariĝis neeltenebla, kaj tial unu post la alia levis sian pezan pakaĵon kaj serĉis ombran lokon sub la arboj aŭ en la proksimo de kabanoj.

2/3

Ambrosio, la *capataz*, estis irinta al unu el la neoficialaj tavernoj, ĉar li sciis, ke li ricevos tie la brandon pli malmultekoste ol en la *tienda*, en la magazeno de la kompanio. Kompreneble, en la tavernoj estis ricevebla nur la kutima meskalo, dum en la *tienda* estis havigebla la bona *comiteco añejo*.

Ambrosio tuj havis je siaj flankoj tri inojn, kiuj helpis al li ĉe la trinkado kaj ĉe la plialtigo de la trinkaĵkostoj. La knabinoj ricevis nur sukeran akvon, ĉar tiukaze, se ili trinkus brandon, ili ne longe eltenus tion, kaj la tavernisto ne enspezus sufiĉe. Ambrosio kompreneble ne sciis, ke la inoj trinkas nur akvon. Tial li tre miris, ke ili tiel facile kaj rapide kapablis tute ebriigi lin tiel, ke li falis sub la tablon. Sub la tablon ne estas tute ĝuste, ĉar ne ekzistis tablo. Ambrosio sidis sur alta tabulo, kiu kuŝis sur la tero, kaj kiu tie kaj en ĉiuj kabanoj estis nomata: *la silla*, la seĝo. De tiu seĝo Ambrosio komencis malsuprengliti, ĉar li ne plu povis vidi la tabulon precize, ĉar liaj okuloj palpebrumis pli kaj pli obtuzigite kaj nebuligite.

Sed li retenis sufiĉe da konscio, por ke li povu akcepti veton, kiun proponis la knabinoj por teni lin trinkanta. Li devis solvi la enigmon, kiu el la knabinoj havas la plej dikajn gambojn supre ĉe la koksoj. Li vetis plenan botelon da *aguardiente*, ke li povas solvi la enigmon ĝuste. Poste li tuŝis ĉiun el la tri knabinoj sub la jupo por konstati, ĉu li gajnis aŭ perdis. Ankaŭ la knabinoj sidis ĉiuj sur seĝo tia, kian havis Ambrosio. Ili vestis sin sub la jupo nur per mallonga subĉemizo. Tial la cirkonstancoj de la veto estis okazis sufiĉe gajiga kaj ŝrikiga. Kompreneble li perdis la veton, ĉar li jam delonge perdis la ĝustan mezuron por ĝusta taksado.

Tiu vetado kaj la solvo de tiu enigmo, ne estis la lastaj okazaĵoj. La knabinoj havis tre varian programon por la prezentado.

„Pli poste mi revenos, por forkonduki vin, *chula*, friponino“, diris Ambrosio al la plej grasa.

„*Como no*, kial ne? Kiel estas pri la arĝento, *caballero*?“

„Ne zorgu pri tio, *mi jefe – don Remigio* estas mia *jefe*, tion vi ja scias – li donas al mi tiom da antaŭpago, kiom mi volas havi. Sen mi li povus fari eĉ ne iomete da laboro. Se mi ne estus ĉi tie, li ne kapablus sendi eĉ nur unu viron antaŭ la arbojn.“

„Kia giganto vi estas!“ La knabino diris tion ironie, sed Ambrosio perceptis tion tiel, kvazaŭ estus admiro.

„Vi kaj mi, tion notu bone, povos fari eĉ tute aliajn kaj pli bonajn aferojn. Se mi volas, mi povos esti morgaŭ *contratista*, kaj mi enspezas *montones de dinero,* montojn da mono. Jen mi kunprenos vin, vi povos loĝi ĉe mi, tiom longe, kiom vi volas. Se la *comerciantes*, la komercistoj, venos, jen diru nur, kion vi volas havi kaj mi aĉetos ĝin al vi, ĝuste tiel, kiel ĉion ĉi.“ Li klakis la fingrojn por aludi, ke li povus aĉeti la tutan varon de la arabaj komercistoj, kiuj venas en la monterion, pli facile ol botelon da *aguardiente*.

„Pri tio ni parolos, *hombre*, kiam vi estos *contratista.“* Ŝi iom malproksimiĝis de li kaj ŝovis iun el siaj koleginoj al li.

Ambrosio ne rimarkis, ke li ekhavas je sia flanko alian knabinon, kiun li premis dense al siaj gamboj. Li parolis plu sen lasi ĝeni sin kaj promesis al tiu ino, ke li kunprenos ŝin al Balún-Canán, kie ŝi foje povos vidi, kiel bone li komprenas trakti verajn damojn, ĉar ĉi tie, en tiu diodamnita kampadejo estas eĉ ne unu damo. „Ĉiuj estas nur putinoj ĉi tie, tute kutimaj tekilaj putinoj“, li kriis subite, dum li komencis leviĝi ŝanceliĝante: „Nenio alia vi estas ĉi tie krom tute kutimaj putinoj kaj inoj de

la strato. Ankaŭ la du maljunaj fikemaj matraculinoj, kiujn la administranto havas en sia damnita kaj naŭze odoranta bangalo, estas nur tute kutimaj trotuaraj putinoj, kiujn mi konas tre bone ekde *Tuxtla*."

Nun enmiksiĝis la tavernisto. „Tenu fermita via fibuŝon, damne! Se la administranto aŭdos vin, li ekflamigos mian budon kaj forbruligos ĝin kaj forpelos min inferen."

„Tiu, tiu sklavo de putinoj? Li ja foje venu ĉi tien. Mi ja diros la ĝustan al li. Mi cetere tuj iros al li foje transen kaj diros al li tute impertinente fronte al li, ke li havas nur putinojn tie." Ambrosio ŝoveladis per siaj brakoj. Li ekkriaĉis, kvazaŭ li havus la intencon kanti. Li skuadis la kapon, viŝis sin per la plataj manoj trans la vizaĝon kaj kriis: "He, *chula*, ĉe la diablo, kie vi kaŝas vin?"

„Iru al li", komandis la tavernisto al la knabino, kun kiu Ambrosio amuziĝis unue. Flustrante la tavernisto aldonis: „Iru al li, mankarese tuŝu lin iom je la gamboj kaj puŝu lin eksteren de ĉi tie. Alikaze la administranto saltos sur mian nukon. Diru, ke vi volas kuŝigi vin ĉe li. Eble vi sukcesos eligi lin de ĉi tie. Tiam sidigu lin tie, kie vi povos liberigi vin de li."

Ambrosio, kvankam jam iom peza en la kruroj, estis eĉ preta sekvi ŝin. Sed apenaŭ li forlasis la kabanon, kaj venis sub la sunon, li jam falis laŭlonge. La tavernisto trenis lin kun la helpo de la inoj en la ombron de arbo kaj lasis kuŝi lin tie.

En tiu momento *don Remigio* kriis el la *tienda* trans la placon: „Ambrosio! Ambrosio!"

Ne ricevante respondon eĉ post kelkfoja vokado, li kriis plena de kolero: „Fikema filo de putino kaj de ebriema leprulo, kie vi fikumas denove? Venu ĉi tien, malbenite!“ Ambrosio ĝuste tiumomente ne kapablis aŭdi ion, eĉ multe malpli li kapablis stari sur siaj piedoj.

Don Remigio, kolera kiel rinocero skuita el la dormo, kuradis tien kaj tien sur la placo por serĉi sian *capataz*.

La knabino proksimiĝis kokete dancpaŝete al *don Remigio,* ridetis al li kaj diris: „*Caballero*, kiel estus kun ni ambaŭ hodiaŭ nokte?“

Don Remigio blekis al ŝi: „Iru inferen, hundofilino. Mi havas nun aliajn zorgojn.“

„Kiun vi do serĉas, *señor contratista*?“ demandis la knabino sen esti eĉ iomete impresita pro lia ĉagrenita humoro.

„Mi ja estu damnita ĉiele kaj infere, mi serĉas tiun alkoholavidan *parandero* kaj vagabondon, mian *capataz*.“

„Nu, kiel li nomiĝas?“

„Ambrosio. Damnite! Mi devus nomi lin Postaĵ' Merdulo, tiun mizeran pigrulon.“

La knabino tuj sciis, kiun li celis. Kaj ĉar Ambrosio ne trinkadis kun ŝi, sed kun aliaj knabinoj, kiujn ŝi ne ŝatis, kaj kun kiuj ŝi eterne kverelis, tial bonfartigis ŝin diri: „Aĥ, tiun vi serĉas, *señor*. Tiukaze vi ne devos iri longatempe. Jen iru nur tridek

paŝojn kaj tie vi trovos lin malantaŭ arbotrunko. Porko ne povas esti ebria tiom, kiom li. Tio ĝojigos vin, *señor*."

Tiam ŝi ne plu okupiĝis pri la *caballero*.

„Rosita estis ensorĉige bela, sed ŝi havis tri infanojn", ŝi kantetis trile kiel birdo kaj iris al unu el la kabanoj, ĉar ŝi sciis, ke tie ĉimomente sidas kelkaj *arrieros,* mulpelistoj, ĉe la ludkartoj kaj antaŭ *aguardiente*-botelo. Ŝi multe prefere pasigus la posttagmezon, la vesperon kaj la nokton kun la *contratista*. „Sed, se oni volas manĝi fruktojn, kaj oni ne povas ricevi mangojn, tiukaze oni do devas kontentiĝi pri bananoj", ŝi konsilis sin kun ŝultrolevado. Tiam ŝi mallaŭte subridis sen vere intenci tion, ĉar ŝi formis komparon, kiu ĉiam maldece estas akceptata, se oni prezentas ĝin per simila paroltono aŭ per oblikva rikano.

Rimarkoj
chula = friponino
hombre = viro

2/4

Don Remigio iris en tiu direkto, kiun alludis la knabino. Kaj jen li trovis sian *capataz*-on, kiu estis sterninta sin tie sur la tero kun vizaĝo, kiu pro sia profunde ruĝa koloro kaj la ŝveliteco vekis la impreson, kvazaŭ ĝi krevus en sekva momento. La ulo ĝemis en sia nebuligita dormo kiel malsanegulo. Esti profunde kaj altprocente ebria de tiu *aguardiente* destilita el agavo aŭ el meskalo aŭ el sukerkano, kaj eble eĉ de miksaĵo el tiuj tri specoj, estas ebrio, kiu apenaŭ kompareblas. Sed esti ebria de tiu brando je la frua posttagmezo en tropika lando kaj aldone preskaŭ

sen havi ombron pro la ardanta suno kaj laŭlonge sternita surtere, tio transformigas eĉ la plej stabile starantan drinkfraton en senhelpan kaj kompatindan korpan amason.

„Ebria porko, *sinvergüenza*, impertinenta kanajlo, senhonta kaj bruta bestaĉo de stratrabisto!!“ kriis *don Remigio*, kiam li vidis Ambrosion en tiu stato.

Li senkompate puŝis lin per la botoj sur la ripojn, kvazaŭ li volus marteli truon en la korpon.

Sed la viro ne moviĝis kaj ankaŭ ne ŝanĝis sian pozicion. Li ŝajne estis en profunda narkozo. Kelkfoje li gluglis, kvazaŭ la lango glitus malsupren de la gorĝo. Jen li gruntis ĝemante: „*Si, jefe!*“ Sed tio estis ankaŭ la lasta signo, kiun li donis por alludi, ke ankoraŭ ligas lin maldika fadeno kun la realo, spite al obtuzigita konscio.

Li diris tiun „jes!“ nur aŭtomate, pro longa kutimo.

Don Remigio senfare staris ankoraŭ kelkajn sekundojn, poste li kraĉis sur Ambrosion, turniĝis kaj retrorigardis al la konstruaĵo, en kiu troviĝas la *tienda*, el kiu li ĵus venis.

Li volis reiri tien kaj konsideri la tagon kiel perditan. Lante li promenis sur la placo. Post kelkaj dekoj da paŝoj li haltis kaj rigardis alidirekte. Tie li vidis kampadi la virojn en disaj grupoj. Kelkaj kuŝis proksime de arboj, aliaj en la ombro de la kabanoj. Kelkaj dormis, aliaj kunsidis kaj babilis. Aliaj kirle miksis en siaj fruktoŝeloj posolon kun akvo, kiun ili alportis el la rivero.

Don Remigio pli proksimiĝis al ili, nombris ilin kaj vokis: „Jen mankas ja ok aŭ naŭ uloj, kie ili estas do?“

„Ili iris al la rivero por bani. Ili havas sangantajn piedojn.“ Unu el la viroj vokis tion kaj pro ĝentileco preskaŭ tute stariĝis, dirante tion.

„Alvoku ilin. Kaj poste vi ĉiuj venos transen al la *tienda*.“ *Don Remigio* iris antaŭe. Post kelkaj paŝoj li turniĝis malantaŭen kaj vokis: „Kunprenu viajn pakaĵojn, por ke oni ne ŝtelu ilin de vi. Ne eblas scii, kiom da friponoj kaj hundofiloj ĉi tie libere kuradas?!“

En la sama momento elpaŝis ino el unu de la kabanoj. Ŝi estis nudapieda, ŝia hararo taŭzita, ŝi vestis sin nur per jupo kaj kota flirtanta bluzo, kiu vaste malfermiĝis tiom, ke ŝiaj mamoj supre elpendis. Ŝi ne estis unu el la volonte servemaj knabinoj de la kampadejo, sed verŝajne unu el la multaj inoj, kiuj tie iam vivis kun sia edzo.

„*Oiga, señor!*“ ŝi vokis, apogante siajn brakojn forte sur la koksojn kaj eĉ pli etendante la jam per si mem ŝvelintan subventron tiel, ke ŝi etendis sin eĉ pli antaŭen: „Aŭskultu, viro de honoro, ni ĉi tie estas nek friponoj nek banditoj. Ni estas ĉi tie pli honestaj ol vi.“

„Jes, tion mi scias, kaj tenu fermita la buŝon. De vi, aĉa maljuna dorlotino de marotoj, ja neniu volas scii ion. Kaj mi estus la lasta, kiu vizitus vin.“ Dirante tion, *don Remigio* turnis sin nur parte al la ino.

La ino senĉese naive paroladis kaj gluglis kaj forte eskcitiĝis, tretadis per la nudaj piedoj sur la teron, minacis per la brakoj. Sed *don Remigio* komprenis eĉ ne vorton el centoj, kiujn ŝi postkriis al li.

„Kiu estas tiu maljuna kokino, kiu blekis tie?“ demandis *don Remigio* la vendiston en la magazeno, kiam li ree alvenis tien.

„Tio estas *doña* Julia. Kiel ŝi nomiĝas krome, mi ne scias. Ŝi estas iom prironĝita je la kapo. Tavernisto origine trenis ŝin ĉi tien, kun ses aliaj inoj. Kiam ŝi ne plu multe valoris, tio signifas, kiam ŝi ne plu logis klientojn por la tavernisto, trovis sin kanuveturigisto, kiu plaĉis al ŝi, kaj kun tiu ŝi vivis de tiam en *Tres Champas*. La viro iutage renversiĝis kun sia kanuo kaj dronis. Kun sia familio ŝi poste venis ĉi tien. Ŝi estas nur dum ok semajnoj en tiu ĉi kampadejo. Tio estas la kaŭzo, kial vi ne konas ŝin, *don Remigio*.“

„Sed kial ŝi ne reiras al sia pueblo, de kie ŝi devenas?“

„Jen ŝajne io ne estas tute laŭorda. Se mi ĝuste aŭdis tion, ŝi tie mortpikis alian inon pro ĵaluzo. Kaj kiam la polico persekutis ŝin, estis tre bonvene al ŝi, ke ŝi povis iri kun la tavernisto en la monterion.“

„Tio pri la mortpikado tiukaze certe okazis jam antaŭ tri aŭ kvar jaroj“, diris *don Remigio*, enverŝante al si konjakon el la botelo, kiun metis la helpanto de la vendisto al li sur la magazenan tablon.

„Certe kvar jarojn“, konfirmigis la *tendero*, la posedanto de la magazeno.

„Jen ja falis sufiĉe da polvo sur la aferon, tiel ke la okazaĵo jam delonge estas pardonita kaj forgesita.“ *Don Remigio* plenverŝis denove glaseton.

„Ŝi ŝajne bonfartas ĉi tie. Ni supozas, ke ŝi ne volas foriri.“ Nun la *tendero* mem plenigis por si duonon de glaseto.

„Certe estas ankoraŭ io alia, jen mi certas“, diris *don Remigio*. „Ŝi hontas antaŭ sia familio aŭ ŝia pli frua edzo intertempe edziĝis. Tio estas la plej bona, kion ŝi povas fari, supozigi al la tuta mondo, ke ŝi ne plu ekzistas.“

„Mi pensas, ke vi pravas.“

„Aŭskultu, *don Telesforo*!“ diris *don Remigio*, ŝanĝante la paroltonon, por diri per tio, ke la klaĉo ne tre interesas lin kaj, ke li nun emas transiri al la negocoj.

„*Bueno*, pri kio do temas?“

„Miaj uloj alvenos ĉi tien. Malfermu por ĉiu konton ĝis, ni diru, kvindek pesojn.“

„Volonte, *don Remigio*. Donu nur la nomojn al mi.“

Rimarko
tendero = posedanto de magazeno, komercisto, vendisto de nutraĵoj

2/5

Ĉiuj indiĝenaj viroj kolektiĝis antaŭ la *tienda*. *Don Remigio* paŝis sur la sojlon kaj parolis al ili: „Mi malfermigos ĉi tie konton por ĉiu el vi. Por ĉiu kvindek pesojn. Tiuj estos kredito sur via konto. Vi povos aĉeti kion ajn aŭ tion, kion vi bezonas. Dum la sekvaj dek du monatoj ni ne revenos ĉi tien al la *oficinas*. Ni restos ekstere en la *selva*, en la ĝangalo. Sed neniu el vi ricevos brandon por pli ol unu peso. Sciu tion."

La homoj komencis moviĝi kaj sovaĝe kiel anseroj interbabili, por reciproke klarigi al si, kion ili bezonas. Estis speciale la novuloj, kiuj volis scii de la spertuloj, kiuj jam antaŭe laboris tie, kion oni bezonas kaj ĉu oni efektive bezonas ion.

Kiel plej sperta estis plej bone konata la chamulano Celso Flores, filo de *Panchito Flores* de *Ishtacolco*t. Celso havis jam du jarojn da laboro en la monterioj post si. En la trisemajna marŝo tra la ĝangalo tien, li faris sin sufiĉe ŝatata ĉe siaj laborkunuloj per instruoj kaj kamaradaj agoj. Li ŝajne estis vere bona amiko. Per kelkaj interbataloj li havigis respekton al si en la tuta trupo. La novuloj estimis lin kiel sian instruiston kaj konsilanton, la malfortuloj kiel sian helpeman kamaradon kaj ĉiuj agnoskis lin kiel sian gvidanton kaj parolanton. Celso donis ankaŭ nun bonajn konsilojn. Kaj preskaŭ ĉiujn konsilojn, kiujn li fakte donis, ĉiam finis per la sekva frazo: „Se vi ne vere bezonas ion certan kaj sub ĉiuj cirkonstancoj, tiukaze ne aĉetu ion, eĉ ne por centavo. Ju pli frue vi forlaboros viajn ŝuldojn des pli frue vi povos esperi iri hejmen al via patrino aŭ al via edzino. Vi ankoraŭ ne konas la inferon ĉi tie, sed semajnon poste vi ja kompren-

os, kial mi konsilis tion al vi. Kaj nun agu laŭplaĉe. Kial viaj favaj zorgoj koncernu min?“

2/6

Don Remigio prenis sian liston kaj alvokis la unuan viron. Li diris la nomon, kaj la *tendero* skribis la kontosumon en la libron. Samtempe la helpanto demandis la viron: „Kion vi do volas havi?“

Kaj la *contratistas* kaj la *tenderos* kutimiĝis pri tio, ke ĉe tiuj kontoaranĝoj ĉiu viro aĉetis la tutan konton en la ofertita alto, en tiu ĉi kazo kvindek pesojn, en aliaj kazoj sepdek pesojn aŭ cent pesojn en la formo de varoj. Tiujn kontojn oni ne aranĝis kaj ofertis kun tiel grandanima gesto por ĝojigi la indiĝenajn laboristojn aŭ eĉ por bonfartigi ilin. Ĝojo, donacoj kaj bonfartigaj agoj estis aferoj, kiuj eble estis uzataj ĉe la varbado kiel logaĵo, sed se oni estis jam en la ĝangalo, neniu plu konis tiujn vortojn, multe malpli ties signifon.

La kontojn oni aranĝis bonfartige al la kompanio kaj por ĝojigi la *contratistas*. Ju pli granda estis la konto, des pli longe la indiĝenoj devis labori por ĝi. Ili fariĝis liberaj nur tiukaze, se estis forlaboritaj ĉiuj ŝuldoj, kiujn la agento pagis por la varbita viro, ĉiuj antaŭpagoj, la kontraktstampilaj impostoj kaj la provizioj. Tiom longe, kiom la kontoj ne estis perlaboritaj, laboristo, kiu volis forkuri ,estis kaptata de la instancoj kaj kiel dizertinto rekondukata en la kampadejon. La tutajn kostojn de la kaptado kaj rekondukado oni skribis kiel ŝuldon sur la konton de la fuĝinto. Por la forkurado li ricevis specialajn punojn, laŭ la humoro de la *contratista* ĝis kvincent skurĝobatojn aŭ eĉ mil da

ili, kiuj iom post iom estis donitaj al li, dum kelkaj semajnoj. Eĉ la provo de forkuro estis sufiĉe draste punata.

Ju pli alta estis la ŝuldokonto, kiu devis esti forlaborita, des pli longe la kompanio kaj la *contratistas* povis esti certaj pri siaj laboristoj. Sed la kompanio pere de la kontoj enspezis duoble, ĉar ĉiuj varoj, kiuj estis vendataj en la *tienda*, senescepte aĉeteblis nur en la *tienda*, en la magazeno de la kompanio. La prezoj estis kvinfoje, okfoje, ja eĉ dudekfoje pli altaj ol en la plej proksima priloĝata loko. Nur la *tienda* de la kompanio havis la rajton vendi ion ajn al la laboristoj; kaj ĉiuj laboristoj estis devigitaj aĉeti nur en la *tienda* de la kompanio.

Kompreneble alvenis ankaŭ sendependaj komercistoj en la monteriojn, plej ofte araboj. Sed tiuj komercistoj sen la permeso de la kompanio ne rajtis vendi ion sur la tereno de la kompanio, aŭ nur bagatelaĵojn kaj malgravajn aĵojn, kiujn la *tienda* pro ties eta valoro ne vendadis. Al tio apartenis manspeguletoj kun sanktulo aŭ la Sankta Virgulino sur la dorsa flanko, kombiloj por fiksi kaj ornami inan hararon, vitroperloj, fingroringoj kun grandaj vitrodiamantoj, orelringoj de la plej aĉa speco, rubandoj el la plej malkara artifika silko, butonoj, tvirno. Kompreneble la komercistoj havis ankaŭ pli da varoj de la sama aŭ eĉ pli bona speco kaj eĉ por pli malaltaj prezoj ol ili aĉeteblis en la *tienda*. Kaj estis tiuj varoj, pri kiuj fakte temis la batalo. Al tiuj apartenis: pantalonoj, ĉemizoj, bastĉapeloj, sandaloj, kruda ledo, roboj, lanaj rubandoj por zonoj kaj la hararo, katunaj ŝtofoj, satenŝtofoj, pripresita katuno, kalikotaj ŝtofoj, malkaraj silkoŝtofoj, moskitoretoj aŭ ŝtofoj por la produktado de tiuj retoj, cigaredoj, *tabako* kaj antaŭ ĉio brando. Bona *Comiteco Añejo*, kon-

jako kaj viskio, kiun havis la *tiendas*, aĉetis nur la administrantoj kaj oficistoj, kaj ĝi havigeblis nur en malmultaj boteloj. Ĝi estis tro multekosta. Sed eĉ la administrantoj, la oficistoj kaj la *contratistas* kaj agentoj ofte preferis, se ili pasigis tie kelkajn tagojn, pli bonan specon de la komiteko, kiu estis multe malpli kara ol konjako aŭ viskio kaj plej ofte kostis nur kvinonon de la prezo por konjako. Tiu ĉi speco vojaĝis sub la nomo *Habanero*, de tempo al tempo sub la nomo *Cognac Mexicano*.

Komerco kaj metioj estis liberaj en la respubiko. Sed neniu rajtis malfermi sian magazenon aŭ elmeti siajn varojn sur la tereno de alia, sur tereno, kiun li nek aĉetis nek havis en farmo nek luprenis. Kie ajn alvenis la komercistoj, ili estis ĉiam sur la tereno de monterio, kie la kompanio, la posedanto de la koncesio havis la rajton pri suvereneco.

Ofte kompreneble tiu aŭ tiu *tienda* havis ne sufiĉe da varoj aŭ almenaŭ ne certajn varojn. Tiukaze la laboristoj ricevis la permeson aĉeti tiujn varojn de sendependa komercisto, se ĝuste iu ĉeestis. Sed neniu en la kampadejo havis kontantan monon, aŭ, se jes, nur tre malmulte da ĝi . Neniu bezonis monon, ĉar ĉiu, kiu vivis tie, ricevis varojn de la *tienda* pere de la konto. Krome la kompanio eldonis valorbiletojn, sed ĉiam pere de la konto. Tiu, kiu volis do aĉeti ion de komercisto, povis pagi nur per valorbiletoj de la kompanio. Estis ankaŭ nur tiuj valorbiletoj, kiuj cirkulis kiel mono en la kampadejo, per kiuj oni do ludis, aĉetis en la neoficialaj tavernoj la brandon, kaj per kiuj oni donacis por memoro ion al komplezemaj inoj.

La valoro de tiuj biletoj estis difinata de la kompanio, tiel, ke la kompanio por kvardek pesoj en formo de valorbiletoj skribis

kvindek aŭ eĉ sedek pesojn sur la konton de la koncernato. Neniu povas pruntedoni monon por nenio. La komercisto kun tiuj valorbiletoj en sia hemjmloko povis entrepreni nenion, ĉar tie ili ne havis valoron. Antaŭ la forveturo li devis ŝanĝi ilin ĉe la *cajero*, ĉe la kasisto de la kompanio. Kontantan monon li ne ricevis, ĉar tie ja ne estis mono. Li ricevis ĉekon, kiu estis elpagata en formo de mono en la banko en Jovel aŭ ĉe la ĉefa agento de la kompanio en Jovel aŭ en Villa Hermosa. Sed, se la kompanio reaĉetis de la komercisto la valorbiletojn kontraŭ ĉeko, jen denove la kompanio aŭ la *cajero* difinis la ŝanĝvaloron, kiu ofte estis kvin aŭ dek procentojn malpli valora ol la origina eldonvaloro.

Kutime la komercisto kaj la *cajero* interkonsentiĝis antaŭe pri tiu negoco. Ĉiuj ĉi gajnoj, interezoj kaj ŝanĝdiferencoj devenas kompreneble el la poŝoj de la laboristoj, ĉar tiuj estis ja la ununuraj, kiuj aĉetis ion, la ununuraj kiuj kreis la vendeblajn komercajn valorojn. Neniu alia produktis tie ion ajn. Ĉiuj vivis kaj aktivis de la diferenco inter ambaŭ prezoj, tiun, kiun la laboristo ricevis por la forhakado kaj transportado de la mahagono, kaj tiun, kiun la kompanio ricevis en la havenoj Obregon kaj *El Carmen* de la usonaj kaj anglaj mahagonaj komercistoj.

Se la laboristoj rigardis la finkalkulojn de siaj aĉetoj en la kampadejo, ili trovis, ke ili aĉetis ĉe la sendependaj komercistoj eĉ ne je joto pli malmultekoste kaj nur malofte pli bonkvalite ion ol en la *tienda*. Se entute ekkoneblis diferenco, temis nur pri kelkaj centavoj. Sed oni enkapigis al la laboristoj pere de la ŝajne libera aĉeto ĉe la komercistoj la ideon, ke ili estas sendependaj ĉe siaj aĉetoj kaj havas influon je la fiksado de la prezoj, ĉar ili

ja ŝajne laŭplaĉe povis aĉeti ion en la *tienda* aŭ ĉe ĉeestanta sendependa komercisto.

Ofte la *tienda* foraĉetis de alveninta komercisto ĉiujn varojn, kiujn tiu portis kun si, kvazaŭ kiel fatrason. La *tienda* faris la prezon. Ĝi, estas vere, translasis al la komercisto por lia tri- aŭ kvarsemajna marŝo kaj por liaj eldonoj por pakbestoj kaj mulpelistoj sufiĉe da profito. Sed la kompanio tamen multe malpli koste akiris la varojn ol se ĝi sendus siajn proprajn karavanojn, ĉar la kompanio ne riskis ion por la perdo de la ŝarĝbestoj kaj varoj dum la marŝo. La komercisto povis intertrakti kun la aĉetisto de la kompanio, kun la *tendero*, la finprezon kaj provi elmarĉandi la plej bonan prezon. Se neniu interkonsentiĝo eblis, la *tendero* simple diktis la transprenprezon. Se la komercisto ne akceptis la prezon, tiukaze la kompanio ne permesis al li tie prezenti la varojn. Li devis plu marŝi kun siaj varoj du, tri aŭ kvin tagojn tra la ĝangalo ĝis la sekva monterio, kie oni eble ofertus eĉ malpli altajn prezojn al li. Povis okazi, ke la viro devis retromarŝi kun sia tuta karavano kaj sia tuta komerca varo dum kvar semajnoj ĝis sia ekvojaĝloko sen tio, ke li vendis eĉ nur pinglon. Pro la duobla transporto la varo tiam estus tiom multekosta, ke, egale kiom ajn favore li eble vendus ĝin en la urbo, li *tamen* ĉiam perdus monon. Tiel estis do facile klarigeble, kial komercisto neniam rifuzis interkonsentiĝi bonvoleme pri la prezo kun la administranto, kial komercisto neniam rifuzis entute kaj detale fari ĉion tion, kion la adminstranto aŭ la *tendero* ordonis, kaj kial li preskaŭ ĉiam estis preta interkonsentiĝi pri la gajno kun kiu ajn, kiu tie havis la decidan povon.

Rimarkoj
cajero = kasisto

comiteco añejo = komiteko, kiu estas pli longe aĝigita en lignaj bareloj ol simpla komiteko
tendero = posedanto de magazeno, komercisto, vendisto de nutraĵoj

2/7

Post kiam *don Remigio* vokis kvar nomojn kaj la viroj venis al la *tienda* kaj tie ricevis sian skribitan konton, li trovis la laboron jam tro lacige. Verŝajne pro rapide aperanta memoro pri la knabino, kiu antaŭ kvaronhoro ridante provis inviti lin, tio subite fariĝis certa al li, ke homo povas atendi sian feliĉon ne nur de trista laboro, sed ke li bonfartas antaŭ ĉio tiukaze, se li – eĉ, se estus tiel nur dum du horoj kaj preterpase – havas helpantinon ĉe sia flanko. Kaj ĉar la kara Dio en la ĉielo tion tiel decidis, *don Remigio* akceptis neniun kaŭzon, kial rezigni pri tiu ĝojo. La ino, kiun li konservis en sia *semaneo,* en la propra laborkampadejo, profunde de la ĝangalo en sia kabano, *doñja Javiera*, estis jam sufiĉe maljunulema, ŝi fariĝis jam ŝima kaj ĉeokaze ŝi estis sufiĉe enua. Tre granda belulino kaj sveltulino kun rondaj formoj ja ne venis al monterio kaj tiu, kiu akceptis vivi kun li en la soleco de la ĝangalo, unu aŭ eĉ du tagojn malproksime de la *oficinas*, estis malofte tia, kia li tute certe deziris ŝin. Oni devas preni tion, kion oni povas ricevi kaj por tio eĉ tre danki al la dioj.

Tial oni ne povis riproĉi *don Remigio*-n – konsiderante ĉiujn cirkonstancojn – ke ĉeokaze liaj deziroj turnis sin ankaŭ al distrado. Kiam li subite sentis leviĝi tiajn pensojn en si tre vigle, li rigardis sin pere de la dura laboro de la kontonotado malhelpita povi translasi sin al la necesa distro kaj intimiĝi kun ŝi.

„Tio estas la laboro de tiu fikema *cabrón* nomata drinkavida *capataz“,* li kriis kolere kaj klake draŝis sur la liston, kiun li mantenis surgenue. „Ĉe Satano, mi nun devas sidi ĉi tie kun la listo kiel pedikohava skribaĉa bubeto, dum tiu sklavo de putino dormas en sia dolĉa ebrio dum la tuta longa posttagmezo.“ Li vokis al indiĝeno el la grupo kaŭranta antaŭ la *tienda*: „Hehe, kiel vi nomiĝas?“

La ulo salte ekstaris kaj diris: „Teofilio Palacio, *su humilde servidor, patroncito.“*

„Bone, prenu la bastonon, kiun vi havas kaj transiru al tiu de Dio damnita hundobastono kaj batadu lin, ĝis kiam liaj ostoj moliĝos kiel vindotuko. Esti ebria je hela brila tago! Kaj mi devas fari ĉi tie la tutan diodamnitan laboron tute sola.“

„Kiun hundobastonon, *patroncito*?“ demandis la viro, kiu ŝajne ne konis tiun specon de kromnomo.

„*Bueno, bueno*, estas jam en ordo. Restadu ĉi tie. Mi ja dece traktos la vermulon. Du monatojn da salajro mi minusos de tiu *lepero*, li drinkas kaj fikumas en ĉiuj tiuj anguloj, kie li vidas pendi inan fadenon. Li ricevu la peston kaj 'hispanan kolumon' aldone!“ *Don Remigio* pli kaj pli koleriĝis, des pli, ĉar li nun denove vidis promenadi du knabinojn malproksime inter la kabanoj. La knabinoj estis nudapiedaj kaj havis nenion sur la korpo krom florornamitaj delikategaj diafanaj katunvestoj. Ili devis iri eĉ kun rigardo al la suno, kio ŝajne tre ĉagrenis *don Remigio*-n, ĉar li estis tro malproksime por havi per tio personan ĝuon.

„Donu la botelon, *muchacho“*, li diris al la helpanto. Li enverŝis duonplenon de akvoglaso da *habanero* kaj sinkigis ĝin sakrante gorĝen. Poste li aŭdigis grakan sonon, pri kiu nur malfacile direblis, ĉu per tio li volis sufoki la akran gluton, kiu brulis kiel fajro en la gorĝo aŭ, ĉu ĝi estis esprimo de bonfarto.

Li dorse apogis sin al la kruda seĝo kaj volis sidiĝi oportune. Ĉe tio li puŝis la kolbon de la peza revolvero, kiun li portis zone, forte postaĵen kaj resakris: „Kiajn seĝojn vi havas ĉi tie, nekredeble“, li diris kun ĉagrenita voĉo, „ili estas perfektaj torturiloj.“

Hilario, la *tendero*, ridis kaj diris: „*Don Leobardo* mendis aŭtentikajn klubofotelojn en Meksikurbo, ankaŭ fotelon speciale por vi, *don Remigio*.“

Don Remigio strabis al la *tendero* kaj kvazaŭ gruntis ĉagrenite: „Merdo, mi ĝuste nun ne emas al tiaj stultaj ŝercoj. Kiu estas la sekva?“

Kiam la alparolita indiĝeno staris en la *tienda* kaj postulis siajn varojn, *don Remigio* ŝajne cerbumis pri nova ideo, kiel li povos liberigi sin de tiu enua laboro. Li simple povus doni la liston al la *tendero*, por ke tiu alvoku la virojn. Sed *don Remigio* fidis al neniu. La *tendero* eble alskribus du aŭ tri pliajn nomojn. Kaj *don Remigio* devus respondeci ties kontojn. La laŭdire eldonitajn varojn la *tendero* poste povus ŝakri en la kampadejo. Ĉiam ĉeestis aĉetantoj, speciale por florornamitaj roboŝtofoj kaj por silkaj rubandoj.

Sed la ideo, kiu nun enkapiĝis ĉe *don Remigio,* estis bona kaj ĝi komplikigis tion por la *tendero* noti varojn kredite al li, kiun prenis nek li nek unu el liaj viroj.

Li vokis transen al la aro: „Ĉu iu el la bando povas skribi kaj legi?“ Kelkaj el la viroj reciproke rigardis sin. Sed kelkaj el la indiĝenoj, kiuj ne komprenis sufiĉe de la hispana, kaj kiuj parolis nur sian propran lingvon, tute ne sciis, kion celis la *contratista* kaj tial ili demandis tiujn el siaj kamaradoj, kiuj parolis kaj la hispanan kaj indiĝenan lingvojn.

„Nenion nekutiman“, ili respondos al li.

Celso diris ne laŭte al Andreo, kiu kaŭris apud li: „Vi ja povas legi kaj skribi.“

„Kompreneble, mi povas tion. Mi estis ja *encargado*, karavanestro ĉe *don Laŭreano*“.

„Estas en ordo, ke vi ne anonciĝas.“ Celso kapjesis kamaradece al li. „Mi diras al vi la sekvan, se mi vidos, ke iu anonciĝos por la skribado, mi frakasos vespere lian grimacilon.“

Estis eble ankoraŭ du aŭ tri pliaj en tiu aro, kiuj kapablis legi kaj skribi, eĉ se nur tre supraĵe. Sed neniu anonciĝis, kvankam neniu el ili aŭdis, ke Celso poste pli severe rigardos la eventualan fervorulon.

„Kompreneble ne“, diris *don Remigio* ĉagrenite, „kiu povus havi tiom da feliĉo ĉi tie? Certe ne mi. Inter kvindek ne estas ununura

viro, kiu kapablas skribi. Des pli bone, damne, mi nun vere volus iri transen kaj tiom longe prilabori la putinosklavon per vipo, ĝis kiam li fariĝos sobra. Sed per tio mi ja ne servus al mi. Jen li strikos morgaŭ kaj mi bezonas la drinkavidan porkulon tiom, ke mi eĉ ne povas permesi al mi la lukson tiri la haŭtŝiraĵojn de liaj ostoj."

Ne restis al li io alia krom sidi tie, krom voki la nomojn kaj kompari la kontojn.

„Neniam ŝoviĝu antaŭen! Faru el tio la plej gravan leĝon ĉi tie!" konsilis Celso al Andreo. „Oni certe neniam ŝoviĝu antaŭen en la vivo, nur, se temas pri noktovazo via. Vi neniam ricevus ion por tio, krom duobla laboro kaj piedbato postaĵen. Min neniu kaptos plu per dolĉaj paroladoj kaj ankaŭ ne per flatema rideto sur la lipoj. Min ne, *manito*, frateto mia. Sed aŭskultu, vi povus helpi al mi lerni skribi kaj legi. Mi jam scias iom pri tio. Mi jam povas skribi la grandan literon I, tio estas nur streko. Mi povas skribi ankaŭ la grandan literon L, tio estas nur streko kun alia streketo ĉepiede aldonita, kaj la granda T havas strekon kaj supre tegmenton sur tio. Mi ne estas tute tiom stulta, kiom vi eble supozas."

„Kial ne? *Como no?* Tio ĝojigos min montri tion al vi. Mi ja ankaŭ al mia *mujer*, al mia edzino instruis la skribadon kaj la legadon."
„Kie via edzino estas nun? Ĉu ĉe siaj *padres*, ĉe siaj gepatroj?" demandis Celso.

„Ne, ŝi ne plu havas gepatrojn. Ŝi estas tute sola en la mondo. Ŝi havas nur min. Kaj mi estas vendita ĉi tien nur por la ŝuldoj de

mia patro kaj mi povas fari nenion por ŝi, eĉ ne skribi al ŝi. Mi ja ne scias, kie ŝi nun estas. Mi konsilis al ŝi, ke ŝi iru al Tonala. Tio estas apud la fervojolinio. Tie ŝi povus labori ĉe familio kiel servistino. Ŝi nomiĝas Steleto, *Estrellita*, tio estas nun ŝia nomo. La nomon donis mi al ŝi. Kiam mi trovis ŝin, ŝi ne havis nomon. Eble iam ĉi tien venos viro, kiu devenas de Tonala kaj tiam mi eble povos ekscii, ĉu ŝi alvenis en Tonala kaj ĉu ŝi laboras tie.“ Dirante tion, Andreo sentis en sia gorĝo strangan premon, kaj li ankaŭ sentis, ke liaj okuloj fariĝis malsekaj. Kiam Celso rigardis Andreon, tiu ridetis kaj diris: „Ha, la ŝvito fluetas en miajn okulojn. Estas damne varmege ĉi tie, *un verdadero infierno,* vera infero.“

„Ankoraŭ ne, frateto“, ĝustigis Celso. „Kun la infero vi konatiĝos post du semajnoj, kiam ni estos en la *semaneo*, en la kampadeja laborejo, kaj kiam ni laboros antaŭ la arboj. Tiam vi ne plu havos tempon kaj neniun penson plu por *Estrellita* via kaj kie ŝi eble estas kaj kion ŝi faras. Tiam vi pensos plu nur pri vi mem, kaj pri nenio alia plu en la mondo.“

Rimarkoj

doñja = sinjorino

encargado = Iu ajn respondeculo aŭ laborestro, zorganto por certa afero

habanero = speco de komiteko, kiu estas iom pli bona ol malkara komiteko

hispana kolumo = fimozo (mallarĝigo de la penisa prepucio)

lepero = pigrulo

mujer = edzino, vivkunulino

semaneo = laborejo, labordistrikto, kie oni hakas la mahagonarbojn

Su humilde servidor, patroncito = Humile je via servo, patronĉjo.

2/8

En tiu momento la *contrastista* vokis Andreon al la *tienda,* por ke li faru aĉetojn.

„Kvindek pesojn konte, *muchacho*. Ĉu konfirmite, Andreo Ugaldo?“

„*Si, patroncito*. Ĝuste kaj konfirmite. *Confirmo*“, respondis Andreo.

Don Remigio postulis de ĉiu el la viroj la konfirmon. Tio signifas, ke la viro en la ĉeesto de la *tendero* kaj de aliaj, kiuj staris tie, devis konfirmi per sia parola konsento, ke li transprenis kvindek pesojn sur sian ŝuldokonton. Ĉar la viroj kapablis nek legi nek skribi kaj ankaŭ ne kapablis kalkuli per pli grandaj nombroj, ili devis konfirmi per sia parolita konsento la ĝustecon de la ŝuldoj, antaŭpagoj kaj kontoj. Ĉe tio oni neniam trompis la indiĝenojn, ĉar tio estus kontraŭleĝa. La diritaj sumoj ĉiam estis ĝustaj. La ekspluato kaj maljusteco okazis per senhonta altigo de la prezoj. La plialtigo de la prezoj kompareblaj kvazaŭ al impertinenta uzurado laŭleĝe eblis. Komercisto havas la rajton fiksi tiujn prezojn, kiujn li supozas necesaj por sukcese negoci. Sed tie ne ekzistis konkurado. La laboristoj estis devigataj aĉeti la varojn en la *tienda,* ĉar nur tie ili povis ricevi ilin, sen enpoŝa mono. La alto de la prezoj simple klarigeblis; kaj neniu kontraŭuzura leĝo, eĉ se tia efektive ekzistus, povus ŝanĝi ion je tiaj okazoj. Ja eĉ en la urboj tute permeseblis por la investitaj kapitaloj altaj interezoj kun dek kvin, dudek kvin aŭ kvardek procentoj. Por la prezoj oni prezentis kiel kaŭzojn la eksterordinare

altajn transportkostojn, pro la risko dum la transportoj kaj la risko de perdoj, se ekzemple ŝuldanto formortus sen tio, ke oni povus respondecigi garantiulon por la pagado.

„Kion vi volas havi?“ demandis la helpanto la indiĝenon.

„Moskitoreton mi bezonas.“

„Bone. Dek du pesojn.“ La helpanto ŝiris la maldikan teksaĵon el la bretaro, en kiu la retoj estis stivataj. Ĝi ne sufiĉe rapide eltireblis kaj tial peco de la ŝtofo ŝirmalfermiĝis. Per tio la reto perdis parton de sia valoro.

En alia magazeno neniu aĉetanto plu akceptus tiun reton. Truo en la moskitoreto tiel facile kaj tiom multnombre lasus eniri moskitojn, precipe, se ŝvitas la dormanto, ke li estus preskaŭ sen reto. Necesas bone kunkudri la ŝiraĵon. Sed poste ĝi estas flikita reto. Sed ĉiu aĉetisto, kiu pagas por nova reto, havas la rajton postuli por sia mono nedifektitan kaj neflikitan reton.

La helpanto vidis la longan ŝiraĵon. „Tio ne estas problemo, *muchacho*, tion vi fiksos per pinglo.“

Li donacis al Andreo du pingletojn.

Andreo sciis, ke li kiel indiĝeno kaj laboristo rilate al ladino, do al meksikano, ne povus defendi sukcese sian rajton, se li rifuzus akcepti la reton. Tial li diris nenion. Kiel ĉiuj liaj kamaradoj li kutimiĝis al tiaj bagateloj tiom, ke li tute ne atentis tion kaj estis nek ĉagrenita nek tordis la vizaĝon.

La helpanto buligis la reton kaj ĵetis ĝin al Andreo, kiu ĝin kaptis kaj ŝovis sub sian maldekstran brakon.

„*Un pavillon*, jen moskitoreto, kostas dek du pesojn, Andreo Ugaldo“, ripetis la *tendero*, dum li skribis la monsumon sur tiun paĝon, sur kies unua linio legeblis la nomo de la viro. Li skribis per kopia krajono. Ĉion oni skribis tie per kopikrajono, ĉar inko sub tiu sunardo ne longe restas fluanta.

„Ĉu konfirmite, Andreo Ugaldo?“ demandis la *tendero*.

„*Si, patron, es correcto*.“

Moskitoreto de tiu malkara speco kostis en la plej proksima urbo tri pesojn. Ĉe la plej proksima fervojstacio ĝi kostis en kutima *tienda* du pesojn aŭ eĉ dudekkvin centavojn malpli, kaj oni volvis ĝin ĉe tio en paperon kaj kunŝnuris ĝin lerte.
„Kion krome?“ demandis la helpanto.

„*Un petate*, unu bastmaton, *muy barato*, tre mamultekostan “, postulis Andreo.

„*El mas barato*, la plej malmultekosta, kiun ni havas, kostas tri pesojn kaj sesdek centavojn“, diris la helpanto kaj ekbruligis cigaredon.
En la ĉiusemajna sabatofoiro en Jovel tia mato kostas kvardek centavojn. Ĝi estis dika, kruda, plektita el la plej kutima basto kaj ĝi estis sen buntaj ornamaĵoj, kiujn enteksas la indiĝenaj matoplektistoj.

Andreo konis la prezojn sufiĉe bone, tiel, kiel li sciis ankaŭ la varoprezojn por tiu speco de moskitoretoj kaj la plej multajn varojn, kiujn oni tie vendadis. Li estis dum jaroj *carretero,* ĉaristo. En la karavanoj li transportis de la fervojstacio varojn, kiuj kostis dek mil pesojn, sur aĉaj kaj de Dio forlasitaj kamparaj vojoj, ducent ĝis tricent kilometrojn longaj, en la internon de la vasta ŝtato. Li frekventis foirojn renkontitajn sur siaj vojoj, kaj tial li kolektis abundajn sciojn ne nur pri prezoj, sed ankaŭ pri la kvalito kaj uzebleco de iaj ajn penseblaj varoj.

„La mato estas ja tre multekosta“, li diris, batalante pri siaj pesoj, kiujn li tute ne perlaboris ĝis tiam.

La *tendero* vidis de la kontolibro supren kaj rigardis observeme la viron, kiu tie kuraĝis diri tion. En ĉiuj monterioj kaj en ĉiuj *tiendas* de la monterioj oni rigardis tion kiel gravan ofendon de ĉiu moŝto, se indiĝena laboristo malfermis la buŝon por diri ion, kio eble povus soni kiel propra opinio. Estis tiel ne nur en la monterio, sed en la tuta vasta respubliko sub la diktaturo, ke neniu laboristo nek en fabriko nek en la bienoj kaj des multe malpli en la kafoplantejoj, en sukerplantejoj kaj en la ĉiklaj arbaroj rajtis esprimi vorton sen tio, ke la laboristo antaŭe petis pri permeso. Li devis akcepti la opinion ankaŭ de la plej nelavita el siaj estroj sen kontraŭdiro kaj kun la sama devoto kaj humilo kiel dum prediko en katedralo.

Sed la *tendero* ŝajne estis en gaja humoro, aŭ li ne volis ekscitiĝi, ĉar eble li atendis vespere aliajn ekscitojn.

Rigardinte mirigite Andreon dum kelkaj sekundoj, li turnis la okulojn transen al *don Remigio*, kiu intertempe denove enversis akran *habanero por si* kaj evidente ne multe atentis tion, kio okazis tie.

La *tendero* ekridis subite kaj ŝajne volis uzi la kontraŭdiron de Andreo por ŝerco. Sed rimarkante, ke *don Remigio* rigardas en alia direkto trans la placon, kie denove florornamitaj katunjupoj svingiĝas ĉirkaŭ nudaj gamboj, li decidis konservi la ŝercon por alia okazo. Bonaj ŝercoj en la monterioj apartenas al la multekostaj, tre sopirataj kaj ofte rabataj varoj, kaj Hilario ne volis disipi la ŝercon, kiun li elpensis kaj pri kiu li supozis, ke ĝi estas bonega.

Tial li diris nur: „Hehe, kian prudentan viron ni ĉi tie havas antaŭ ni! Tro multekoste, ĉu? Tro multekoste por vi. Mi sidiĝos sur mian postaĵon kaj plektos por vi specialan maton, por kvin centavoj. Ĉu vi ne volas, ke mi aldone ankoraŭ triku por vi paron da lanaj ŝtrumpoj?“
„Ne, tion mi ne postulas, *señor,*“ respondis Andreo kun paroltono kvazaŭ li dirus tion senpripense pro naiveco. Sed aliaj viroj, kiuj staris proksime, komprenis la mokon, kiu estis en la vortoj de Andreo kaj ekridis laŭte.

Tio la *tenderon* ekkolerigis kaj li kriis al Andreo: „*Chingate tu madre*, de Dio damnita *cabrón* kaj filo de stinkanta hundino, se la mato estas tro multekosta al vi, jen feku ĝin el via stinkanta postaĵo, se vi povas havi ĝin tiel pli malmultekoste.“
„He, kio tie okazas? Kruco kaj infero!“ vokis *don Remigio*.

„Je ĉiuj diabloj kaj sanktuloj, *don Hilario*, ĉe l' Ĉiopotenca, fine bonvolu fari al mi la komplezon rapidi rilate al la *muchachos*. Mi vere estas sata pri tio ĉi sidi sur mia leda postaĵo kaj preĝadi la nomojn kiel ridindan rozarion, damne! Eksvingu la hufojn aŭ mi foriĝos kun miaj knaboj sen preni kontojn."

„*A sus ordenes, don Remigio*, mi estas je via servo, laŭ viaj ŝatataj ordonoj", diris la *tendero* nun ektimigite. Kverelon kun *contratista* li ne povis riski. Li devus elteni hontigan traktadon, se *don Remigio* formarŝus sen preni varojn perkonte kaj, se ekscius tion la adminstranto.

Malpli agresive ol antaŭe li diris nun al Andreo: „Se la *petato* estas tro multekosta por vi, jen vi kompreneble devas provi elteni sen ĝi. Ni ne havas maton, kiu kostas malpli."

„Bone, donu ĝin do al mi, *jefe*, mi devas havi petaton."

„*Un petate*, tri pesojn kaj sesdek centavojn, Andreo Ugaldo. Ĉu konfirmite, m*uchacho*?"

„*Correcto, señor*."

„Kion plu?" demandis la helpanto, post kiam li ordoneme sciigis al Andreo, ke li prenu al si unu el la matoj, kiuj staris kunruligitaj en angulo.

„Tri pakaĵetojn da tabako", postulis Andreo.
„Prenu ses, *muchacho*", enmiksiĝis *don Remigio*, „verŝajne vi ne revenos dum ok aŭ dek monatoj ĉi tien, se ni jam foje estos profunde en la ĝangalo."

„Bone, do ses“, diris Andreo. „Aŭ donu ok.“

„Mil diabloj!“ vokis nun la helpanto. „Ĉu vi volas havi ses aŭ ok da ili? Diru, kion vi volas.“

„Okej.“

„Ho ve, vi, Andreo, aŭskultu“, vokis Celso al li, „tiuj ja nur ŝimos ĉe vi, se vi prenos tiom da ili.“

„Tenu fermita vian fian paroltruon, he vi!“ kriis la *tendero* transen al Celso. Kaj dum li surskribis la sumon en la konton, li legis: „Naŭ kaj sesdek, ĉiu pakaĵeto kostas peson dudek, konfirmite, ĉu?“

„*Cierto, señor“,* respondis Andreo.

„Kion plu?“demandis la helpanto Andreon, ĵetante la tabakpakaĵetojn al li el angulo.

„*Nada mas“*, nenion plu“, respondis Andreo kaj estis komenciĝonta forlasi la magazenon.

„Kiom li do havas?“ *don Remigio* ekrigardis supren.

Don Hilario kunkalkulis ĉion kaj diris: „ Dudek kvin kaj dudek.“

„Vi ja povus preni dudekkvin pesojn aldone, *muchacho*“, vokis *don Remigio*.

„*Gracias, patroncito, muchas gracias,* mi tre dankas al vi, sed mi bezonas nenion plu.“

„Ĉu neniu ĉemizo? Ĉu neniu pantalono?“ demandis *don Remigio* suspekteme.

Andreo estis nuda je la supra parto de la korpo tiel, kiel ĉiuj viroj. Ili ĉiuj devis porti sian pezan pakaĵon surdorse kaj volis konservi siajn ĉemizojn, kiuj alikaze trafrotiĝus dum la marŝo. „Mi havas miajn ĉemizojn en la pakaĵo, patrono“.

„Sed via pantalono estas tute ĉifonita. Eĉ ne unu peco estas en ordo.“

„Mi havas alian pantalonon en la pakaĵo, *patroncito*, kun via tre bonvolema permeso.“, diris Andreo per modesta voĉo.

„Tute laŭ via plaĉo, *muchacho“*, diris *don Remigio*. „Do la sekva, Gregorio *Valle* de Bujvilum.“

Kaj turninte al la *tendero,* li aldonis: „Tiun *don Gabriel* kaptis por mi. *Don Gabriel*, sciu, estis pli frue *secretario* en Bujvilum. Jen intima amiko de *don Casimiro*, la *jefe politico* tie, nun li estas kompaniano de *don Ramo*n. Li estas, mi celas *don Gabrielo*-n, fripono de Dio damnita. Sola mi ne vojaĝus kun li tra la ĝangalo.“

„Mi ne konas lin“, respondis *don Hilario*, „sed tio, kion mi aŭdis pri li, ne estas plej bona, sed plej fia.“

Turnante sin al Gregorio, li demandis: „Kion vi volas havi?“

„*Nada*“, Gregorio diris koncize kaj iom obstine.
„Ĉu nenion?“ ripetis la *tendero*.

Kaj „Nenion, ĉu?“ samtempe kaj kun mirigita paroltono demandis *don Remigio*.

„Ne, nenion“, diris ankoraŭfoje Gregorio. „Mi volas forlabori la monpunon, kiun *don Gabriel* kroĉis al mi por pugnokverelo, kiun mi havis, kaj poste mi volus iri hejmen al mia edzino kaj al miaj infanoj.“

„Sed vi ja ĉi tie povus preni por kvindek pesoj varojn perkonte“, memorigis lin *don Remigio*.

„Tion mi scias, *patroncito*, sed tiukaze mi devus restadi ĉi tie multajn pliajn monatojn por forlabori la novan ŝuldon, sed mia edzino kaj miaj infanoj atendas min.“

Don Remigio kvazaŭ gruntis por si mem, levis poste la ŝultrojn kaj diris al *don Hilario*: „Se li ne volas preni ion, nu bone, tio ne afliktas min.“

Li volis voki la sekvan, kiam Gregorio diris kun iom tremanta voĉo: „Mi prenos ses pakaĵojn da tabako.“

Li vidis la ok pakaĵetojn da tabako ĉe la brako de Andreo, kaj kiam li pretiriris lin dum la eniro en la *tienda*-n, flirtis la spica odoro de la freŝa pura ankoraŭ netraktita tabako ĉirkaŭ lia nazo. Tio do instigis lian deziron pri tabako. Li ricevis la postulitajn ses pakaĵetojn, li konfirmis la sumon kaj kiam ili ankoraŭfoje

demandis lin, ĉu li ne bezonas ion pluan, li diris decidite: „*No patron, gracias.*“

„*Celso Flores*“, vokis nun *don Remigio*.

„Kaj *Celso Flores*“, ripetis *don Hilario*, skribante la nomon en la kontolibron.

Celso paŝis antaŭ la magazentablon, kaj sen esti demandita, li eltondris brue: „Ses pakaĵetojn da tabako.“

Kiam li jam prenis ĝin kaj la sumo estis konfirmita, li rapide turniĝis kaj intencis forlasi la magazenon.

„He, vi!“ postvokis lin *don Remigio*. „Ĉu tio estas ĉio, kion vi prenas?“

„Jen ĉio, *patroncito*“, diris Celso kaj eliris al siaj kunuloj.

Don Remigio per salto leviĝis kaj rigardis la *tendero*-n.

„Kio tio estas? Kio okazas ĉi tie?“ li diris ekscitite. „Montru foje al mi.“ Li tiris la kontolibron al si, turnis ĝin, tiel, ke li povis legi la kontojn, kaj retrofoliumis ĉiujn tiujn flankojn, sur kiuj estis skribitaj la novaj kontoj.

Li supraĵe legis la kontojn kaj diris poste al *don Hilario*: „Tio estas ja stranga, eĉ ne unu el ili prenis varojn por pli ol tridek pesoj.“

„Tio estas ĝusta“, respondis la *tendero*. „Kutime en aliaj tagoj, la kvindek pesoj de konto ne sufiĉas, kaj ni devas ofte altigi la konton ĝis okdek, por doni al ĉiu tion, kion li postulas.“

Don Remigio ne foriris de la magazentablo, ĵetis rigardon sur la liston kaj alvokis la sekvan.

„Kion volas preni vi?“ li demandis lin tuj, kiam la viro envenis, „ĉu eble ankaŭ nur tri pakaĵetojn da tabako?“

„Kun via afabla permeso, patrono, mi volas havi kvar“, diris la viro, metante sian kapon humile al la ŝultroj.

„Kaj krome nenion plu? Ĉu tio estas ĝusta, filo de putino?“ sarkasme demandis *don Remigio* dentgrincigante.

„*Con su muy amable permiso, patroncito*, kun via tre bonvolema permeso, *patroncito*, tio estas ĝusta, mi volas havi nenion plu krom kvar pakaĵetojn da tabako“, respondis la indiĝeno.

„Kaj tamen vi havas nur ĉifonojn sur la kota postaĵo“, diris *don Remigio* koleriĝante. „En via pakaĵo vi havas ja eĉ ne unu ĉifonaĵon. Tion mi scias.“

„Se vi plej afable volus permesi al mi diri tion, p*atroncito,* mi havas en mia pakaĵo moskitoreton kaj ankoraŭ sufiĉe bonan maton. Kaj ĉemizojn aŭ pantalonojn mi ne bezonas en la *semaneo*, en la laborejo. Mi laboros tute nuda.“

Don Remigio levis brakon kaj batis permane transversen de lia vizaĝo.

La viro staris dum certa tempo tute senmova; kaj kiam li vidis, ke la *contratista* retrofoliumas la libron kaj ne intencas bati lin je plua fojo, li turnis sin trankvile, premis siajn kvar pakaĵetojn da tabako sub brakon kaj eliris, kie li kaŝe retiriĝis kiel serpento inter la ripozantaj homoj.

Kiam ankaŭ la sekva ulo postulis nur tri pakaĵetojn da tabako kaj nenion plu, *don Remigio* ekkoleris: „*Por Madre Santisima y por Jesu Cristo*, tio estas ja ribelo! Ĉi tie la ribelo jam jam tute vigle marŝadas!“

„Nu, ne tiom ekscitiĝu“, trankviligis lin la *tendero*. „Tio ne estas nova, *don Remigio*. „Okazas ja ofte, ke la homoj, kiam ili alvenas ĉi tien, aĉetas nenion, ĉar ili ĉion kunprenis de la *feria*, de la Sanktula Festo en Hucutsin.“

„Mi ne scias – pripenseme respondis *don Remigio*, „tio povus esti, povus esti tiel. Tio jam okazis. Sed ĉi tie io ne estas laŭorda. Kie ĉi tie estas nur tiu diodamnita putina filo, nomata *capataz*. Tiu ja kaptus ilin je la nuko, tiel, ke ili forgesus ĉi tie impertinenti per vortoj. Sed li estas ebria, tiu porko, kaj surdorsas en sia propra saŭco kaj diboĉas sur la tero kun la mizeraj putinoj.“

„Do, la sekva. Kiel vi nomiĝas?“ *Don Remigio* tute forgesis rigardi en la liston kaj alvoki laŭliste. Li simple ŝiris la plej proksiman al si kaj demandis lin pri la nomo.

„Santiago Rocha, *su humilde servidor*, *patroncito“*, diris la viro kaj paŝis en la magazenon.

Don Remigio retrovis sian trankvilon, kiam li aŭdis, ke Santiago prenis krom ses pakaĵetoj da tabako kaj moskitoreto ankoraŭ tiom da aĵoj, ke li preskaŭ tute foruzis la kvindek pesojn, kiuj estis ceditaj al ĉiu el ili.

„Cetere, kiom da ŝuldoj vi havas sur via konto ĉe mi?“ demandis *don Remigio* subite.

„Mi havas nur la kvindek pesojn kiel ŝuldon, kiun *don Ramon* kalkulis por la *enganche*, por la varbado. Mi survoje aliĝis al la trupo.“

„Do sekve vi havas neniun kontrakton kun la instanco en Hucutsin, ĉu?“ volis scii *don Remigio*.

„Ne, *patroncito,* sed nun mi havas preskaŭ jam cent pesojn sur mia konto.“

„*Bueno* en ordo, foriĝu el la *tienda* por ke la sekva povu enveni.“ *Don Remigio* vokis novan nomon.

Santiago Rocha, kiu, tiel kiel Andreo, estis *carretero*, ĉaristo, tie troviĝis sub la varbitaj laboristoj, ĉar li devis fuĝi, mortbatinte per *aguardiente*-botelo la deloganton de sia edzino, magazenposedanton en *Cintalapa.* Fuĝante, li renkontis hazarde la trupon de la varbitaj mahagonlaboristoj kaj miksis sin inter ilin por atingi kun ili la terenon de la monterioj, kie serĉus lin neniu policano iam ajn. Kaj ĉar li pro sia rapide decidita fuĝo povis porti kun si ne multon, li tiam tie estis devigita aĉeti tion, kion li bezonis plej urĝe. Per tiuj kialoj li senkulpigis sin ĉe Celso, kiu antaŭe konsilis al ĉiuj preni nur tiom sur la konton, kiom nepre

necesas. Kaj li nun supozis, ke Celso tordus kolere la vizaĝon pri li pro la multaj aĉetoj. Sed Celso komprenis lin kaj diris, ke estas bone tiel, kaj ke li ne riproĉas lin pro tio. „Estas cetere tute bone, ke vi prenis pli ol la aliaj“, li aldonis, „la patrono alikaze eble tro facile rimarkus, ke ni ĉi tie ion interkonsentis, kaj estas pli bone, se nenio frapas lian atenton.“

Rimarkoj
cabrón = fikulo, merdulo, virkapro, idioto ks.
enganche = varbado, kontraktfarado,
habanero = speco de komiteko, kiu estas iom pli bona ol malkara komiteko

2/9

Kiam fine ĉiuj aĉetoj finiĝis, diris *don Remigio* al la *tendero*, al la administranto de la magazeno: „Bonvolu montri al mi foje la kontolibron.“

La *tendero* turnis la libron tiel, ke ĝi kuŝis antaŭ *don Remigio*. La *contratista* foliumadis en ĝi kaj skuis la kapon. Kiam li redonis poste la libron al la *tendero*, li suprentiris la ŝultrojn.

Tial diris la *tendero*: „Jes ja, ankaŭ mi trovas tion stranga. La *muchachos* aĉetis neniam tiom malmulte perkonte en nova kontrakto. Ĉu tiurilate io ne tute laŭordas? Kiel pensas vi pri tio, *don Remigio*?“

„Kio pri tio ne laŭordu, tion mi volus scii“, respondis la *contratista*. Sed en liaj vortoj kunsonis necerta paroltono, kiun *don Hilario*, la t*endero,* komentis tre ĝuste, ĉar li opiniis: „Mi tute

ne pensas, ke oni devas afliktiĝi. La *muchachos* estas tiom bonvolemaj kaj tiom paciencaj, kaj se ili ĉeokaze havas certan kvanton da *aguardiente* kaj de tempo al tempo la eblon bone plenverŝi sin, ili estas tiel kontentaj kiel la anĝeloj en la ĉielo."

„Estas ja ĝuste tio, *don Hilario*, kio frapis mian atenton. Ili apenaŭ prenis *aguardiente*. Eĉ ne indas paroli pri la kvanteto. Alikaze, se mi havigis novan kontrakton al ili, ili neniam povis havi sufiĉe da brando. Tre prefere ili kunportus tute plenajn barelojn en la ĝangalon. Bonvolu enverŝi al mi sukan gluton! Ne, ne tiun fingroĉapeleton. *Dios mio,* donu al mi tuj plenigitan akvoglason. Tio ja eĉ ne indas la penon levi tiun plenigitan tekulereton."

Don Remigio svinge enverŝis la alkoholaĵon, gruntis kiel porko, skuiĝis kaj ŝmacis poste bonfarte per larĝa buŝo.

Li ekpaŝis el la *tienda, sed* haltis sur la sojlo de la pordo, transrigardante pripenseme la grupon de la viroj, kiuj leĝere estis sternintaj sin kaj babilis.

„He, vi!" li vokis al unu el la uloj, kiuj ripozis proksime de li. „Kiel vi nomiĝas?"

„*Luis Campos, a sus ordenes, patroncito*."
„Venu ĉi tien!"

La viro, kiu leviĝis de la tero, kiam li estis demandata pri la nomo, saltis tute proksimen al *don Remigio*: „*A sus ordenes, patroncito*, mi estas je via servo!"

„Ĉu vi volas havi *trago*-on, bonan gluton?“

„Tute laŭ via plaĉo, patroncito.“

„Enversu glaseton por li, *don Hilario*, „la kutiman“, diris la *contratista* al la *tendero*.

La ulo ĵete engorĝis per unu gluto la enhavon de la glaseto, viŝis per etendita mano la buŝon kaj diris poste, farante kliniĝeton: „*Muchas gracias, patroncito!*“ Kaj tuj poste, kiam li jam atendis kelkajn sekundojn pri nova ordono, li komencis forŝteliĝi kiel serpento, tiel lerte, ke oni ne havis la impreson, ke li foriĝas intence, por eviti komision.

Sed *don Remigio* ne plu okupiĝis pri la viro. Li vidis foriri lin al ties pakaĵo, sen tio, ke li revokis lin kaj sen klarigi, kial li vokis kaj demandis lin pri lia nomo. Li postrigardis lin per forestaj okuloj, kiuj preteriris ne nur la viron, sed la tutan aron, kiu kampadis tie, kvazaŭ tie estus nur aero.

Li turniĝis al *don Hilario*. „Enversu novan grandan glason. Hodiaŭ mi ne povas ekmalsekigi mian diodamnitan *garganta,* mian gorĝon. *Caray,* fulmotondro, mi volus scii, kio estas pri mi. Mi ne plu estas la aŭtentika *don Hilario*, pri tio vi povas fidi. La *calentura*, la damnita *paludismo*, la tiel nomata ĝangala febro, sidas profunde en miaj intestoj, kaj tiu diodamnita febro ne plu foriĝas. Jen tio, kio estas pri mi. Mi supozas, ke tio estas la lasta kontrakto, kiun mi faras.“

„Jes tion mi jam scias, *don Remigio*. Kiom da lastaj kontraktoj vi fakte jam faris?“ *Don Hilario* ridis, kiam li diris tion.

La *contratista* rigardis la magazenan administranton, ridis simile, tiris sian zonon supren, rektiĝis per etenditaj ŝultroj, ŝovis la revolveron pli antaŭen, iris paŝon al la pordo kaj vokis transen al la ripozantaj viroj: „Ek do, *adelante, muchachos!* Transiru al la *bodega*, al la remizo!“

Rimarko
adelante = Antaŭen!

2/10

La aro fariĝis vigla. La viroj rektiĝis, fiksis la portorimenojn de siaj pakaĵoj sur la frunto kaj marŝis tien, kien braksignis *don Remigio*, transen al la *bodega*.

La *bodega* estis la remizoj, en kiuj oni konservis ĉiuj ilojn, jungilarojn, krampojn, ĉenojn, grimpajn ferojn, hakilojn, maĉetojn kaj aliajn ilojn bezonatajn en monterio. La administranto de la remizo estis *don Mariano Tello*, oficisto de la kompanio, kiu tie tenis en ordo la provizaĵon kun la helpo de du indiĝenoj kaj krome respondecis pri la librotenado de la stokejo, kaj kiu, se ne estis laboro en la remizo, devis kontroli la laboron de la forĝistoj kaj jungilarfaristoj. Tamen restis ĉiam sufiĉe da tempo al li. Tial oni okupis lin en ĉiu unua semajno de ĉiu monato kiel helpanton ĉe la preparo de la ĉiumonata specifita kalkulaĵo.

Ke necesas tenadi librojn kaj, ke la ĉefa komandejo de la kompanio en *Villahermosa* regule postulas ĉiumonatan bilancon, enkapiĝis al la administranto evidente nur tiukaze, se li memoris, ke li troviĝas jam meze de la lasta semajno de la monato kaj,

ke ili faris ekde la unua de la monato aŭ neniujn aŭ nur ĉeokazajn enskribojn. Tiam ili subite dibočis en laboro de matene je la sesa ĝis vespere je la naŭa en la *oficinas* por ankoraŭ ĝustatempe fini la monatraporton. Jen tiuj laboroj, ĉe kiuj la administranto de la *bodega* devis kunlabori tre strečе por helpi egaligi la tri semajnojn da pigreco fare de la buroaj oficistoj. Ĉiufoje, se la skribistoj, librotenistoj kaj ceteraj okupatoj vidis sin kaŭrantaj antaŭ giganta neprilaborita monto de listoj, notfolioj, notfolietoj, mahagonsplitaĵoj kun surskribitaj zigzagaĵoj, ciferoj kaj hieroglifoj, kiel tio okazis en ĉiu lasta semajno de ĉiu monato, jen ili ĵuris reciproke, ke ili ja laboros en la sekva monato pli regule, kaj ke ili ne lasos pasi tagon sen fari ĉiuvespere ĉiun enskribon kaj havi ĉiun kalkulaĵon je la ĝusta loko.

Sed, se la monata raporto kun ĝemado kaj ŝvitado fine pere de la postrajdistoj estis forsendita, tiam ili sentis sin tiom lacigitaj, ke ili unue devis ripozi dum tuta semajno por rekolekti fortojn. Dum tiu ĉi semajno oni drinkis, ludadis kaj dibočis kun putinoj tiom, ke la kompatindaj homoj en la sekva semajno devis ripozi pro la strečoj de la ripoza semajno kaj tial denove ne povis labori. La postsekvan semajnon ili tiam uzis por rekapti la ekvilibron kaj refortigi sin. Tiam sekvis la lasta semajno de la monato, en kiu oni superhome laboregis kiel kutime, por ankoraŭ ĝustatempe pretigi la raporton.

Tiu malreguleco de la laborado atingis sian kulminon dum la pluvperiodo. Tiam la poŝtrajdistoj nek kapablis alveni nek foriri, ĉar ili forsinkus kun la ĉevaloj en marĉoj kaj ŝlimo. Nun amasiĝis tiom grandaj montoj da laboro, ke la paperoj kaj listoj plenigis vastan spacon de la plankoj ĝis la tegmentoj; ĉiu laboro

estis ŝovita en sekvan semajnon kaj de tiu semajno al sekva semajno kaj de monato al monato. Kaj ĉiu konsolis sin per tio, ke forsendeblus raportoj pro la eterna pluvo ja neniukaze, kaj ke tiutempe ankaŭ ne venus iu el la ĉefkomandejo tien, kaj, ke oni tial certe rajtas trankvile prokrasti kvar aŭ kvin monatraportojn, ĝis oni konstatos, ke la pluvperiodo proksimiĝas al sia fino.

Kvankam nun la kvanto de la laboroj, kiujn la administranto de la *bodega* devis plenumi faris profundan impreson al ĉiu, al kiu oni detale priskribis tiujn laborojn, oni tamen devas konstati, ke la *bodega*-viro kapablis vivi sufiĉe trankvilan vivon. Tio eble estis la kaŭzo, kial li kondutis tre nervoze kaj ekscitite, se grupo de laboristoj venis al lia *bodega* por postuli ilojn. Jen li kriadis kaj sakris al siaj du junaj indiĝenoj tiom, ke oni povis aŭdi tion en la tuta tereno. Kun kolera kriado oni ĵetadis la aĵojn al la laboristoj. Kaj se tiuj ne sufiĉe rapidis por doni la nomojn de la iloj, la *bodega*-viro ĵetis al ili en la vizaĝon tion, kion li ĝuste havis ĉemane.

Unue la *hacheros* paŝis antaŭen, la hakistoj. Ĉiu *hachero* ricevis du taŭgajn ŝtalhakilojn. Malbonkvalitaj hakiloj ne uzeblis por la fere duraj lignoj tie. Al ĉiu viro oni skribis tiujn hakilojn sur la konton. La sumo, kiun oni kalkulis por ĉiu hakilo al ĉiu hakisto, estis la trioblo de la prezo, por kiu la hakilo aĉeteblis en vendejo de feraĵoj en la plej proksima fervojstacio, kie ĝi jam per si mem estis sufiĉe multekosta en komparo al la prezoj en la grandaj urboj. Kompreneble, se la hakisto je la fino de sia kontrakto reportis la hakilojn, ankaŭ, se ili estis damaĝitaj pro la laboro, oni malŝarĝis la sumon de lia konto. Sed, kiel ajn zorgeme la homoj traktis la hakilojn, estis tamen ofte tute neeviteble, ke unu aŭ eĉ du hakiloj perdiĝis de viro. La ĝangalo ne estas herbejo, neniu

agro, neniu kultivata abia arbaro. Ĉe la laborado okazas tre facile, ke hakilo falas el la mano de hakisto kaj, ke ĝi fulmrapide falas en riveron aŭ en profundan ravinon, kiu estas tiel dense prikreskata per ĝangalaj plantoj, ke la viro por serĉado devus maldensigi la vepron dum pluraj tagoj kaj tamen ne retrovus sian hakilon. Aŭ la hakilo falas dum la pluva tempo en iun el la larĝaj ŝlimejoj. Se la hakisto ne vidis tute precize, kien falis la hakilo, jen ĝi kostis kelktagan kaj ofte tute vanan serĉadon kvazaŭ per lupeoj por trovi la hakilon. Ne tre malofte ĝi kostas la vivon de la viro, ĉar li perdas dum la serĉado en la marĉo la teron sub la piedoj.

Post la *hacheros* sekvis la *macheteros*, kiuj ricevis po du maĉetoj, same skribitajn sur ties konton.

Tiam oni eldonis la grimpajn krampojn, por kiuj ĉiufoje respondecis certa malgranda laborgrupo, ĉar ne ĉiu viro bezonis ĉiutage tiajn krampojn, sed nur en specialaj cirkonstancoj.

Lastfine envicis la *boyeros*, la bovoservistoj. Ili ricevis la jungilarojn, la ĉenojn, krampojn kaj ŝnuregojn. Ĉiu viro estis respondecigita je parto por certaj aĵoj de tiu ekipaĵo per tio, ke oni skribis parton de la tuta sumo sur lian konton.

La prezoj de ĉiuj tiuj ilaroj kaj ekipaĵoj estis trioble, ja ofte eĉ sesoble pli altaj ol la sumoj, kiujn oni postulis por tio en la urboj. Sed ne direblas, ke la prezo estis tro maljusta. Eĉ forta kaj bone trejnita mulo povis porti sur tiuj longaj vojoj tra la ĝangalo apenaŭ pli ol kvar metrojn da fortikaj ĉenoj. Kvar pioĉoj aŭ ses hakiloj estis kutime jam konsiderinda ŝarĝo por besto.

Persone respondecigi la laboristojn por la ilaro kaj la ekipaĵoj ŝajne estis maljusta. Sed oni ne preterkonsideru, ke, tute sendepende de la prezo, la iloj tie en la ĝangalo estis ne anstataŭigeblaj. Ili estis tie tiom valoraj kiel la diamanto por putodrilisto aŭ karbodrilisto. Se la diamanto forrompiĝas, oni uzas tagojn, ja semajnojn por rekapti la diamanton. Se mankus iloj, oni ne povus labori kaj laŭ la stato de la ĝangalpadoj povus daŭri ok monatojn, antaŭ ol la perditaj iloj reanstataŭigeblus.

Fariĝis vespero, kiam ĉiuj viroj jam transprenis sian ilaron kaj la administranto de la iloj hurlis je la deka fojo, ke tiukaze, se eĉ nur unu viro plu lamentus pri tio, ke liaj hakiloj estas tro malpezaj aŭ tro ofte uzitaj aŭ tro obtuzaj, li tuj pafmortigus tiun viron, ke li krome pro malsato proksimas jam al kolapso kaj tial devas akcepti abundan gluton. Li fermis nun la krudan pordon per penda seruro kaj diris al la *contratista:* „Se vi krome ankoraŭ ion bezonas, *don Remigio*, tiukaze revenu matene."

„Tute en ordo por mi. Mi cetere tute samopinias, ankaŭ mi nun bezonas abundan gluton. Mia gorĝo sentiĝas kiel malnova elsekigita ledohoso. Mi eĉ ne povas gluti plu. Palpu foje ĉi tie, *don Mariano*."

„Mi ne devas premsufoki vian gorĝon", respondis *don Mariano* kun sufera voĉo. „Vi devus rigardi foje mian gorĝon interne. Ĝi estas tute ŝtonigita, kaj mi devas diri al vi, *don Remigio*, se mi ne foriĝos baldaŭ de ĉi tie kaj ne venos inter civilizitajn homojn, jen vi povos fermi ĉenon ĉirkaŭ mia kolo kaj ligi min al arbo. Mi rajtas diri al vi, ke mi estas sur la rekta vojo ĉi tie transformiĝi en gorilon. Fidu tion aŭ ne. Sed mi jam trifoje sonĝis en la lastaj kvar monatoj, ke mi estas gorilo kaj kiel idioto tamburas mian

bruston kaj en la dormo mi tiom kriis, ke la du skribistoj kiuj loĝaĉas kun mi en la sama bangalo, saltis surpieden kaj elverŝis sitelon kun akvo sur mian kapon. Tiom multe mi timigis ilin en mia sonĝo, ke ili eĉ timis, ke mi povus manĝi ilin vivantaj."

„Ĉar vi parolas pri manĝo, *don Mariano*", diris la *contratista*, „mi malsategas. Ŝajnas, ke la diodamnita pagano, nomata ĉino, forgesis sonori por la vespermanĝo."

Kvazaŭ la ĉino nur atendus pri tiu lamento kaj eble sentus tion en la aero, ke tuj iu krios al li, kial ankoraŭ ne surtablas la vespermanĝo, li paŝis el sia kuirejo kaj svingadis la grandan mansonorilon kiel signon, ke ĉiuj *caballeros* venu al la *comedor*, al la manĝohalo, kie li pretas malkaŝi al ili, kiajn magiajn sorĉfortojn li kapablas.

Rimarkoj
boyero = *bovoservisto*
hachero = *hakisto*
machetero = maĉetisto

ĈAPITRO 03

3/1

Bona manĝo kapablas plibeligi tristan vivon per gajaj momentoj, tiel, kiel bona kuiristino kapablas fari misedzecon eltenebla. Sed tie, en la monterio *La Armonía* eĉ la manĝo estis parto de tio, kio mornigas la vivon kaj samrangigas la restadon kaj la laboradon al punoj.

Du ĉinoj transprenis per kontrakto la nutradon de la dungitoj en la *oficinas*. Ĉiu dungito ĉiutage pagis peson kaj kvindek centavojn por tri manĝoj, kiuj estis liverendaj de la ĉinoj.

Neniu atendas de la ĉinaj kuiristoj en naftokampadejoj, en minejaj regionoj, en kafo-, sukero-, banano, - sisal-, kaj kakaoplantejoj, en ĉiklokampadejoj kaj kie ajn ili povas esti, ke ili montru similajn kapablojn ĉe la preparado de homa nutrado, kiel la grandaj kuiristoj de grandaj francaj hoteloj. Se oni devas akcepti la ĉinajn kampadejajn kuiristojn, kiuj laboris jam en kelkaj kampadejoj kaj havis la eblon kolekti abunde spertojn, tiukaze oni rapide konvinkiĝas, ke tiuj ĉinaj kuiristoj sendube ĉiuj trapasis sian metian lernotempon en la sama kuirejo. En ĉiuj kampadejoj, ankaŭ se ili disas du mil mejlojn, oni ĉiam ricevas saman manĝon, en sama formo, en sama sinsekvo, kun sama gusto, ja eĉ kun samaj mankoj de salo aŭ pipro en samaj manĝoj. La pano, kiun bakas tiuj kuiristoj, havas en ĉiu kampadejo, kie ajn ĝi troviĝas, precize saman oleecan guston. Tiu oleeca gusto devenas de la oleo aŭ de la graso, kiu estas metata en la paston, por ke la pano en la tropika ardo iom pli longe konserviĝu, restu mola kaj manĝebla.

La manĝo ĉiam estas sufiĉe abunda. Tion oni devas koncedi. Por la prezo, kiun ĉino ricevas, li ne povas meti kaviaron sur la tablon, ankaŭ ne doni antaŭmanĝon konsistantan el aŭtentika salamo, trufoj aŭ hepatopastecoj. Eĉ tie, kie oni pagas ĉiutage al li tri aŭ eĉ kvin pesojn por tri manĝoj, li povas meti nur la kutiman manĝon sur la tablon, ĉar la prezoj, kiujn li devas pagi por la ingrediencoj, estas tiom altaj, ke lia enspezo estas nur iomete pli granda ol tie, kie li devas produkti la manĝojn por peso kaj kvindek centavoj. Prosperas la ĉinaj kuiristoj nur per sia diligento, per sia persistemo kaj per tiel lerte pripensita ekonomio, ke la konata nutrado de kvin mil homoj per kvin panoj kaj du fiŝoj efektive ne povas esti rigardata kiel eksterordinara afero.

Kiel en ĉiuj aliaj kamapadejoj, tiel estis ankaŭ tie: la du ĉinoj limigis sian aĉetadon de varoj je minimumo. Kion ajn ili povis mem produkti, tion ili perlaboris en la tempo, kiu restis al ili inter la kuirado. Ĉiun legomon ili tie mem kultivis sur eta kampo, kies akvumado ampleksis trionon de ilia tuta laboro. Ili bredis kokinojn, porkojn kaj kaprinojn. Ĉion ili persone havigis al si kaj portis ĝin kun apenaŭ imagebla peno tra la ĝangalo sen perdi eĉ nur kokinon aŭ kaprideton. Dum la noktoj ili ne povis pace transdoni sin al sia meritita dormo, ĉar ili ĉiam devis gardi siajn kokinojn kaj kapridetojn, por ke ilin ne ŝtelu fatrasuloj, kiuj estis en kampadejo.

Dum ĉiu manĝo ili disdonis biskvitojn, freŝajn varmegajn sodokuketojn de la speco, kiu mankas sur neniu tablo en Usono. Tagmeze kaj vespere oni ĉiam ricevis varman kukon plenigitan per ananasoj aŭ bananoj aŭ pomkaĉo aŭ prunoj. De kie la *chinks*, la ĉinoj, ricevis tiujn aĵojn, estis eĉ por la dungitoj enigmo. Pro la tiaj cirkonstancoj la produktado de la plej multaj belaj aĵoj

entute eblis nur helpe de konservitaĵoj el ladoskatoloj. Sed ili estis je dispono. Kaj se okazis, ke ili ne estis je dispono, tiukaze ekflamis terura tumulto en la *comedor*. Tiukaze la koleriĝintaj manĝantoj riproĉis la kuiriston, ke li trompas ilin pri la laŭrajta plenvalora manĝo, ke li volas dolare milionuligi sin per ilia malsato kaj mizero kaj ili minacis lin, ke tiukaze, se sekvatage li ne havos ĝustan laŭhoman manĝon surtable, ambaŭ kuiristoj retroviĝos ligitaj al longa ŝnuro kaj tiom longe estos trempitaj en la riveron, ĝis kiam ili verdiĝos.

Je la matenmanĝo por la *caballeros*, do tio signifas, la dungitoj kaj la *contratistas,* oni donadis iun frukton, plej ofte papajon, kiun plantis tie la ĉinoj. Se papajo, melonfrukto de arbo, ne havigeblis, jen eble estis je dispono la koro de juna palmo serĉita kaj trovita de indiĝena knabo en la ĝangalo. Aŭ oni ofertis avenflokojn, aŭ krude muelitan tritikon, aŭ iun alian el la multaj usonaj kornofruktoj, kiuj troveblas sur usona matenmanĝotablo, kaj kiujn transportas diligentaj usonaj fabrikistoj ĉien en Usono kaj en Suda Ameriko en skatoloj kaj kartonujoj, kaj kiujn ili tiom bone enkondukis, ke oni povas trovi kelkajn el tiuj avenaŭ tritikoproduktoj certe eĉ en magazeno de la plej eta indiĝena vilaĝeto rande de la ĝangalo.

Kiel sekva menuparto sekvis kelkaj ovoj, ĉiam laŭ la deziro de la manĝulo aŭ rostitaj aŭ stufitaj aŭ kirlitaj kiel omletoj. Ĉiun deziron oni atentis. Poste sekvis rizo kun stufitaj kubetoj el seka viando. Kaj tiam kafo dolĉigita per kruda sukero kaj grasigita per lakto el lada skatolo.

Multajn el la nomitaj konservaĵoj, tiel, kiel ankaŭ kafon kaj de tempo al tempo eĉ teon, oni havis en la stoko de la *tienda*, kaj

tie ili aĉeteblis. Sed nur, se la kuiristoj estis en granda embaraso kaj la aĵojn nepre devis havi, ili aĉetis iom en la *tienda*. Ĉion, kion ili bezonis por la kuirejo, ili ricevis per la transportoj, per kiuj ili antaŭe fiksis certajn prezojn.

Tiu, kiu deziris tion, ricevis je la matenmanĝo aldone *frijoles*, do nigrajn fabojn. Fabojn oni ricevis kiel bazon en ĉiu manĝo, tiel, kiel ĉie en la hispana Ameriko kaj tiel, kiel en la plej grandaj partoj de Usono. Tie tiu manĝo distingiĝas nur per tio, ke krom la nigraj faboj, simile tiom ofte estas donataj brunaj aŭ blankaj.

Post la matenmanĝo la dungitoj laboris aŭ pretendis fari ion ajn, kion ili nomis laboro. De tempo al tempo ili foriris por fiŝkapti rivere aŭ por ĉasi ĝangale. La predon oni vendis al la ĉinoj aŭ al aliaj loĝantoj de la monteria urbo.

Kelkfoje la dungitoj devis labori ankoraŭ pli streĉe. Tio estis, se ili ricevis de la administranto la komision rajdi al foraj *semaneos* por inspektado kaj por enkontigi la produktitajn kvantojn de la hakita ligno. La *semaneos*, la distriktoj en la profundoj de la ĝangalo, kie oni hakis la mahagonon, kelkfoje malproksimis pli ol tutan streĉan tagan rajdon de la *oficinas*. La posta plej proksima *semaneo* estis de la unua denove malproksime duonon aŭ kvaronon de tago. Tiel facile povis okazi, ke la adminstranto aŭ unu el la dungitoj, se ili frekventis *semaneo*-n, estis survoje dum semajno aŭ eĉ pli longe. Por la administranto aŭ la dungitoj tiuj inspektaj rajdoj, kvankam ili permesis certan ripozon de la trista unuformeco de la vivo en la *oficinas,* estis torturo.

Rimarko
comedor = manĝohalo

3/2

La ĝangalo ĉie estis la sama laŭ aspekto, sen oferto de iu ŝanĝo por la okuloj aŭ la animo. En la malseka ĝangala densaĵo la ardo estis pli premanta kaj pli laciga ol en la *oficinas*. La malhele verda krepusko, kiu neniam maldensiĝis, ŝarĝis la animon kaj la koron kaj estigis la melankolian senton, ke ĉio surtere estas sen senco. Eĉ la grandaj simioj, kiuj saltis alte en la arbokronoj de branĉo al branĉo kaj sekvis rajdiston kun kriado proksimume dum tridek minutoj, ĵetante al tiu forrompitajn putriĝemajn branĉojn, tute perdis pro ties ofteco post kelkaj horoj la intereson por la vojaĝanto.

Kun la indiĝena knabo, kiu akompanis lin, la rajdanto povis paroli preskaŭ pri nenio, ĉar la knabo parolis nur la indiĝenan kaj la rajdisto nur la hispanan kaj kutime konis nur la plej necesajn indiĝenajn esprimojn kaj nociojn.

Ne malofte la administranto aŭ la dungitoj revenis hejmen de tiuj rajdoj malsanaj por ĉiam, kun korpo plenigita per nevenkebla febro kaj per animo ekputriĝanta de kronika pigremo kaj kun ĝeneralaj reagaj mankoj de pensado kaj strebado.

Reveninte de tia rajdo, la *empleado*, la dungito, dum semajno perceptis la manĝojn de la ĉinoj kiel verajn donojn de Dio kaj la ananasajn tortojn, kiujn li, kiel li asertis ankoraŭ kvar semajnojn antaŭe, eĉ ne povis flari sen esti skuata de naŭzo, rigardis

nun kiel la plej delikatan, kion ĉina aŭ iu ajn alia homa kuirartoj kapablas krei.

Laŭvere oni supozas, ke tiaj rajdoj esence kontribuis al tio, ke la *caballeros* povis kutimiĝi al tiuj eterne samaj manĝoj tiom, ke ili verŝajne perdus la apetiton, se la manĝoj iam deflankiĝus iomete de si mem. Tion oni kompreneble ne devis timi, ĉar la ĉinoj nur pro serioza atako de mensa handikapiteco pliigus la dek kuirreceptojn, kiujn ili kapablis kuiri, je unu aŭ eĉ je du manĝoj.

3/3

La tagmanĝo konsistis el diversaj menueroj. Jen la buljono, ĝi estis la unua parto. La buljono laŭ la baza elemento estis ĉiam la sama buljono, kelkfoje kuirita kun seka viando aŭ kun sovaĝa porko, aŭ kun sovaĝa meleagro aŭ oferita koko, sed kelktempe el freŝa porko aŭ kaprinoviando. Sed egale el kiu speco de viando la buljono estis kuirita, ĝi gustis ĉiam same nedifinebla kaj akveca, tiel, ke eĉ por sperta frandulo estus tre komplika afero diri kun certo, kiu besto kaj kiu birdo liveris la bazan elementon de la buljono.

Sed por ne tro evidentigi la samformecon, okazis ofta ŝanĝo rilate la firman parton de la buljono. Tiu firma parto ĉiam estis farita laŭ la semajna tago aŭ el rizo, aŭ el brunaj faboj, tomatoj, nudeloj aŭ el *garbanzos*, do el grandaj hispanaj pizoj, kiuj havas la econ apenaŭ moliĝi. La ĉinoj sorĉis ankaŭ verdajn legomsupojn, pri kies deveno en la kampadejo cirkulis multspecaj onidiroj.

Kiel duan menueron oni prezentis kelkajn ovojn. Ĉiu unuopa manĝanto ĉe la surtabligo de la buljono estis demandata kiel li deziras havi la ovojn. Post la ovoj sekvis sur la tablo bifsteko el seka viando. Tiu bifsteko estis tiel tenaca, ke oni devis tranĉi ĝin en kubetojn, kiujn oni, post mallonga provo de sensukcesa maĉado, simple glutis, por ke oni almenaŭ havu ilin en la stomako kaj tiel sekurigu al si la percepton, ke oni manĝis bifstekon. De tempo al tempo kompreneble oni ricevis anstataŭ la bifsteko freŝan ĉasitaĵon, kokon, sovaĝan birdon aŭ etan kapridon.

Tiom malofte, kiom la manĝantoj de tempo al tempo sciis pri la deveno de la verdaj legomsupoj, ili sciis en preskaŭ ĉiuj kazoj ion pri la devenoj de la seka viando kaj de la freŝa viando. La ledeco de la seka viando senprobleme konkludigis, ke temas certe pri la viando de maljunaj lacigitaj muloj kaj azenoj, kiuj per si mem fortrotis en la regnon de l' eterneco kaj ankoraŭ sufiĉe frue estis trovitaj antaŭ ol ili estus tro fridaj por esti uzataj kiel bonkvalita viando. Krome temis eventuale ankaŭ pri tiuj bestoj, kiuj falis kaj minuton antaŭ ol ili mortis, estis mortpikitaj. Kaj fine temis ankaŭ pri muloj kaj ĉevaloj, kiujn eble atakis pumo, kaj kiuj sufiĉe kapablis defendi sin por ankoraŭ povi treniĝi en proksimecon de la kampadejo por tie ricevi pro kompato la mortigan pikpuŝon.

Pri malnova, bone salita seka viando, ne direblas kun certeco, de kia speco la besto devenas. Se la gusto al la manĝantoj ŝajnis suspektiga ili vokis tuj la ĉinon al si: „Aŭskultu, *chinito*, malgranda ĉino, kiu malĝojiga speco de viando tio estas hodiaŭ? Vi ja eble ne krude transmondigis maljunan mulon, ĉu?“ Post tio la ĉino haltis dum sia hasta kurado de servado, kunfaldis ambaŭ

manojn super la brusto, montris la belan rideton de kontenta kaj grasa budhao kaj diris: „*Caballelos,* ho, miaj sinjoloj, ĉu vi ne konas tiun bonegan viandon? Kia peko kontlaŭ la saĝoj de Konfuceo! Jen la viando de supelba bona foltika ĝangala vilaplo. Jen donaco de la ĉielo en tiu tiom tlista legiono. Ĉu vi dezilas pluan bonan tlanĉaĵon de la femulo, *caballelos*?“

Al tio la ĉinoj disdonis freŝan blankan panon kaj varmegajn sodobakitaĵojn. Krome tomatojn kiel salaton. Ankaŭ rizon kun muelita kapsiko. Ĉe maloftaj okazoj ili disdonis ankaŭ telereton kun avare surmetitaj terpompecoj aŭ kun rostitaj terpomaj disketoj.

Poste sekvis la neeviteblaj nigraj faboj, aŭ tutaj aŭ disfrotitaj aŭ varmigitaj kiel kaĉo nomata: *frijoles, refritos.* Kio ajn mankis ĝis tiam je la abunda plenigado de la stomako, okazis per aldona porcio da *frijoles.* Ili estis la kerno de tiu manĝo, kiel de ĉiu alia je tago.

La akvo, kiu staris en argilaj boteloj sur la tablo, estis simple la akvo, kiu estis ĉerpita el la rivero. Iafoje ĝi estis flaveca, de tempo al tempo ruĝeca kaj kelkajn fojojn verdeca. Oni trinkis ĝin tiel, kiel ĝi venis el la rivero. Se iu alludus, ke oni kuiru aŭ iel filtru la akvon, oni sendube supozus, ke en lia kapo kelkaj klapoĉarniroj estas lozaj. La glaso kun *aguardiente*, kies enhavo post la kafo gargare estis sendita en la stomakon, jam zorgis por la kuirado kaj filtrado de la glutita akvo. Kaj se tiu malnova kampadeja rimedo ne taŭgus, jen kilometron malproksime de la ripozejo estus ja sufiĉe da loko, kie oni povus enfosi la akvotrinkinton, ĉe kiu ne funkciis la filtrado. Nur ne ekscitiĝi pri tiaj bagateloj, ĉar ja finfine ĉiam okazos la sama.

Post la *frijoles* sekvis la ananasa torto aŭ banantorto aŭ torto plenigita per marmelado, kies deveno por la manĝantoj restis simile tiel neklara kiel la deveno de la verdaj legomsupoj kaj de certaj manĝoj el la seka viando de la ĝangalaj viraproj. La tortopecon oni moligis dum la glutado per glaso da frida teo aŭ varmega kafo. La teo de unu el la *chinitos* estis ofertata kun la rimarko: „*Te, helado, cabalello!*“ Tio signifis: Glacia teo. Sed ĉar tie ne ekzistis glacio, la donita teo estis varmeta. Per duono de citrono kaj per abunda sukero ĝi ricevis guston. La saĝaj viroj preferis varmegan kafon, kun granda ŝprucaĵo de usona lakto el skatolo kaj kun du aŭ tri pecegoj da kruda sukero.

Se ankaŭ tio estis finita, la manĝantoj kvazaŭ gruntis, etendiĝis, forte spiregis, oscedis, ekbruligis cigaredon, treniĝis eksteren en la ombron de la kornice superpendanta tegmento de sia bangalo kaj faligis sin en hamakojn.

3/4

Ĉifoje ili almenaŭ havis senkulpigon por sia nelaboremo. Nu, kiu idioto estas tiel stulta, ke li sidiĝas en tiu tagmeza ardo ĉe kalkulregistroj? La ĵurnaloj ja tute kaj ĝis la lasta paĝo moliĝus de la riveroj de ŝvito, kiu torentas de oni.

Post paca dormo dum tri aŭ kvar horoj la plagataj dungitoj rektiĝis de siaj balancaj hamakoj kaj gargaris la gorĝon almenaŭ per kvarono de brandobotelo, kun la rimarko, ke ili devas lavi la dormon el sia stomako kaj samtempe seninfektigi la glutitan akvon.

Nun ili vagadis iom en la kampadejo, nur por konstati, ĉu ankoraŭ bonstate ĉeestas ĉiuj inoj, je kies ĉeesto oni havis intereson pro la longaj vesperoj. Trankviligite la viroj retropromenis al la ĉefkonstruaĵoj kaj nun fine antaŭ la ĵurnaloj. Malferminte sian tagregistron, ĉiu el ili ĝemis dum iom da tempo, bruligis cigaredon kaj skrapadis la krajonon, kiun li intertempe intencis uzi. Kiam la krajono fine inklinis al tio esti uzebla, tiam la dungito memoris pri tio, ke por regulita digesto necesas ankoraŭ aliaj aferoj ol nur seninfektado de la stomako. Li serĉis malnovan gazeton kaj marŝis transen al la dometoj, kie li decidis legi la gazeton en paco kaj kun sindediĉo por esti informita pri la politiko, kiu deruliĝis surtere antaŭ kvar monatoj, ĉar tiu gazeto estis la plej nova, kiun li havis. Kaj ĉar jam ĉio pasis kvar monatojn, la leganto ne eskcitiĝis kaj lia digesto tial estis senĝenata kaj ne malsaniga.

Ĉe tiu necesa kaj interesa okupo pasigis ĉiu individuo almenaŭ horon. Sed, se la gazeto estis plenigita per longa murdoraporto aŭ per bone ludata geedziĝa dramo, jen oni dediĉis ĝis du horoj al la digestado. Oni devas honori kaj respekti sian korpon, se oni posedas ĝin; post la transmondiĝo de la korpo ja ne plu havos valoron okupiĝi pri la digesto.

Forlasante la dometon, rimarkis la *empleado,* ke intertempe ekmalheliĝis, tiel, ke certe baldaŭ estos la sesa vespere. Ĝis la sesa li estis devigita labori. Tio legeblis en lia kontrakto.

Li rapidis nun transen al la burooj, kie tiu aŭ tiu el liaj kolegoj ŝajne jam provis iom labori kaj atendis nur la momenton, kiam dometo por bezono estos libera, por esti informita pri la kuro de l' mondo interne de la lando kaj ekstere.

La reveninta viro fariĝis nun tre diligenta, li skribadis kvazaŭ sovaĝiĝinte je sia ĵurnalo, haste ŝovadis notfolietojn kaj listojn sur sia tablo tien kaj tien kaj pelmeligis ĉiujn paperojn tiel, ke tiukaze, se subite venus en tiu momento la administranto, tiu rimarku kun kontento la diligenton kaj paciencon de siaj subuloj.

La administranto malofte atendeblis pli frue. Li havis sian propran buroon apartigitan de la ceteraj. Sed, ĉu li pene laboris, uzante ĉiujn siajn spiritajn fortojn, aŭ ĉu li okupiĝis kun tiu aŭ tiu damo aŭ kun siaj du donantinoj de ĝojo, uzante ĉe tio ĉiujn siajn fizikajn kapablojn, tion esplori ne apartenis al la laŭkontraktaj taskoj de liaj subuloj. Por tio li estis tie la administranto, por ke li havu la rajton mem decidi, kiu el liaj devoj plenumendas je tiu aŭ tiu horo plej urĝe.

Kaj okazis, kiel ajn strange tio ŝajnas al naivulo, ke ĝuste en tiu momento, kiam la administranto venis en la buroon, estis eksvingata la mansonorilo, per kies jubilaj sonoj vokis unu el la ĉinoj la *caballeros* al la vespermanĝo, ĝuste kiam la administranto trovis ankoraŭ ĉiujn siajn subulojn tiel furioze skribantaj en la tagregistrojn, ke torentis ondoj de ŝvito de iliaj ruĝaj varmegaj fruntoj, kaj ke li povis kontenti pri tia disciplino kaj tioma laborfervoro.

ĈAPITRO 04

4/1

„Fine oni ja nun ricevos iom en la stomakon“, diris *don Remigio* al *don Mariano*. „Tagmeze mi ĝuste nur trinkis tason da kafo. Pro la *muchachos*, kiujn mi unue volis havi en bona ordo, mi ne povis preni tempon po mi.“

„Ĉi tie ni povos lavi la manojn“, diris *don Mariano,* dum li renkonte proksimiĝis al kruda ligna tabureto, sur kiu staris emajla pelvo kun akvo. Jen apud ĝi kuŝis peco de kutima flava sapo kaj krome pendis malbone lavita griza mantuko sur stango.

La du *caballeros* lavis siajn vizaĝojn kaj la manojn, ĉiu kombis la hararon kaj tiam ili paŝis al la *comedor,* al la manĝosalono.

La manĝosalono estis granda ejo sub palma tegmento. Tri flankoj de tiu ejo havis vandojn, kiel kutime el kunigitaj lignaj bastonetoj. La kvara flanko estis nur parte fermita. La plej granda parto estis malfermita.

En la mezo staris longa krude prilaborita tablo el dikaj mahagontabuloj, kiujn oni laŭvere devus nomi diloj. La diloj estis nerabotitaj kaj nur prihakitaj. Je ĉiu longa flanko troviĝis longa benko simile tiel krude prilaborita kiel la tablo, same el mahagono. La tero estis abunde kovrita per s*acate*, do per longaj ĝangalaj herboj. Tial oni povis iri en la *comedor* kiel sur tre dika mola tapiŝo. Sub la herboj, sur la nuda tero kuŝis dika tavolo el cindro, kiu malhelpu, tiom, kiom tio efektive eblas, la enrampadon de reptilioj kaj insektoj.

En angulo estis dua ligna tabureto, sur kiu staris pelvo kun akvo, kaj kie prete ĉemanis sapo kaj mantuko, por ke tiuj, kiuj volas lavi sin ne devu atendi tro longe, se la pelvo ekstere en la portiko ne sufiĉis.

Je la vandoj, parte premitaj sur lignajn fostetojn, parte fermgluitaj per maĉgumo kontraŭ la fostoj, pendis buntaj reklamafiŝoj de cigaredofabrikoj, de bierfarejoj, de komitekaj distilaparatoj, kartonaj restaĵoj de neaktualaj kalendaroj el firmaoj de sufiĉe grandaj urboj, enkadrita bildo de *Nuesta Señore de Guadalupe,* de Dipatrino kaj tri ne kadritaj kaj profunde ŝiriĝintaj bildoj de la sanktuloj Antonio, *Jose kaj Juan Bautista*.

Ĉiuj ĉi plibonigoj ĉeestis danke al la artsento de la du ĉinoj, kiuj en la jaroj, de kiam ili tie posedis la restoracion kaj kafejon, ornamis iom post iom la vandojn je tiu ĉi maniero.

Ĉiuflanke transverse de la manĝohalo estis pendigitaj ruĝaj, verdaj, flavaj kaj bluaj paperaj girlandoj, kiuj tie pendis ekde la lasta nomtago de la sinjoro administranto, kiam okazis en tiu halo giganta bakĥanalio, kun danco kaj ĉio, kio okazas ĉe tiaj trinkfestoj. Tiuj girlandoj kaŭzis multe da laboro kaj kostis al la ĉinoj sufiĉe da mono, ili aspektis bele kaj donis al la sufiĉe aĉa ejo afablan karakterizan trajton kaj al la manĝantoj pli bonan apetiton. Tial oni lasis pendi ilin, kaj ĉiu estis kontenta. En la kuro de la tempo ili ja per si mem difektiĝus kaj defalus kaj ĉe tio komprenigus, ke nun jam estas tempo entombigi ilin.

Sur la tablo kuŝis verda vakstolo, kiu je la anguloj kaj eĝoj estis tiom trafrotita, ke oni povis meti siajn manojn en la truojn. Tiu ĉi tablotolo donis al la manĝantaj dungitoj ĉiutage trifoje la oka-

zon laŭte interparoli pri la avaro de la ĉinoj, kaj tiel, ke la ĉinoj ĉe la servado devis kvazaŭ gluti tion. Kaj ĉiufoje, kiam unu el la dungitoj klarigis, ke li tute certe detiros post la manĝo la vakstolon kaj bruligos ĝin antaŭ la manĝejo, ĉar li nun jam satas pri la porkaĵo kaj fine volas vidi alian tablotukon kun aliaj koloroj, diris la ĉino: „Tle bone, *caballelos, muy bueno*, tiukaze vi ĉiuj manĝos sul kluda ligno. Mi mendis novan tolon jam antaŭ dek monatoj, tion mi povas plĵuli ĉe ĉiuj miaj alte honolindaj kaj noblaj antaŭuloj. Sed se la *pataches*, la kalavanoj, la tablotukon ne kunplenas, jen ja ne estas kulpo mia. La solto kaj la plovidenco kulpigendas, kaj ne mi."

„Tenu fermita la babililon, ĉineto!", vokis *don Leobardo* trans la tablon. „Alportu finfine la kuketojn kaj la kafon, aŭ ni sidos ankoraŭ post tri horoj ĉi tie. Kaj se vi ne havigos baldaŭ novan tab-lotukon ĉi tien, fulmotondro, jen mi detiros vian felon, transkolorigos ĝin kaj surmetos ĝin kiel tablotukon, por finfine havi ĉi tie homindan kovrilon."

4/2

La *caballeros* sidis leĝere ĉe la tabloj. La pli junaj dungitoj ŝovis siajn neoportunajn seĝojn pli proksimen kaj sin apogis perbrake sur la tablo, post kiam la ĉino antaŭmetis al ili teleron kun varmega supo.

Don Leobardo rigardis al la *contratista*, kiu sidis apud li, kaj poste li diris kun laca voĉo, kvazaŭ la parolado kaŭzus penon al li: „Sinjoroj miaj, jes ja, mi celas vin, tie malsupre. Ni tamen ne neglektu la morojn kaj kutimojn de civilizitaj arbohakistoj, eĉ

en komplikitaj cirkonstancoj kaj en la soleco de la tropika ĝangalo, ĉirkaŭataj de jaguaroj, de pumoj kaj de sovaĝaj *indianoj*. *Bonvolu, sinjoroj miaj, ni havas hodiaŭ gaston inter ni, don Remigio*. Eble ni almenaŭ dum certa tempo rememoru pri tio, ke ni surhavas pantalonojn, eĉ se nur tre kotŝmiritajn kaj ne promenadas en ĉemizoj kiel la *caribes*."

Pro la neoportuneco tuj en fia humoro, la junaj skribistoj, kiujn koncernis tio, deprenis siajn manojn de la tablo. Unu el ili diris ne laŭte al najbaro: „Aĥ, merdo, la ĉefo volas reludi la harmonikon." Tiam ili sorbis ŝmace sian supon, trempinte panon en ĝin por doni al ĝi pli densan konsiston.

„Vi estos treege surprizita, *don Remigio*, pri la granda novaĵo, kiun mi nun sciigos al vi", diris *don Leobardo*.

Ĉiuj, kiuj sidis ĉe la tablo, ekaŭskultis.

„Mi ja pli frue devus scii ion pri novaĵo ol vi, *don Leobardo*. Antaŭ du tagoj mi parolis kun *don Ramon* kaj *don Gabriel*, kiuj havigis al mi la novulojn por la kontrakto. Tiuj diris nenion pri specialaj novaĵoj."

„Ili sciis nenion. Mi eksciis tion el letero de la kompanio."

„Vi do havas ĝin jam dum kelkaj tagoj ĉe vi, *don Leobardo*."

„Vi pravas, sed antaŭe ne ofertiĝis la ĝusta okazo por paroli pri tio. La kompanio vendis la monterion!"

Ĉiuj, kiuj sidis ĉetable, inklude *don Remigio*, forgesis ŝovi la manĝeron jam surpikitan, en la buŝon.

Post iom da tempo demandis la *contratista*: „Al kiu vendita?“

„Al la tri fratoj *Montellano*.“

„Al tiuj kojotoj, ĉu ?“ diris mirigite *don Remigio*.

„Jes ja, al tiuj rabistoj. Kion vi diras pri tio?“

„Kion do faros la kompanio?“

„La sinjoroj de la kompanio decidis, ke ili organiziĝos tute alie. Mi supozas, ke ili havas bonegan politikan nazon. Certe ili flaras ion. Povas esti, ke la olda knabo tie supre, la diktatoro, ekŝanceliĝas sur sia seĝeto, kaj la kompanio provas ĝustatempe retiriĝi el la koncesio. Se supreniĝos novaj regantoj, facile povos okazi, ke la koncesioj kaj kontraktoj, aprobitaj de la diktaturo, estos nuligitaj kaj nova konfirmo ne estos donata al la ĝistiamaj koncesiistoj aŭ nur sub novaj kondiĉoj.“

„Ne afliktiĝu“, diris *don Rafael*, la plej maljuna librotenisto, „ne zorgu vin, *caballeros*, la olda kaciko tie supre sur sia troneto, sidas pli firme en la selo ol iam ajn antaŭe, speciale nun, kiam li komencis instali novajn virojn kun pli modernaj ideoj kaj doni pli da liberoj al tiuj, kiuj estas kontraŭ la diktaturo.“

„Jen la plej bona signo, ke la olda vulpulo rimarkas, ke lia majesto komencas paliĝi“, diris *don Leobardo*. „Jen ja ĝuste la

kaŭzo, kial li ankoraŭ en la lasta horo rapide provas apogi la falantan konstruaĵon per novaj kolonoj. Sed estas tro malfrue; kaj mi supozas, ke la kompanio scias pli ol ĝi ŝajnigas. Tabasko kaj speciale *Villahermosa* estis ĉiam ribelemaj kontraŭ la diktatoro. Kaj *Villahermosa* verŝajne komencos boli."

„Tiukaze la kompanio do tute retiriĝos el la mahagona negoco, ĉu?" demandis *don Remigio*.

„Jes, tion mi supozas."

„Sed per kio la tri fratoj *Montellano* povas pagi tion?"

„Tiuj sufiĉe da mono enkasigis kiel *contratistas*, sur la alia flanko de la rivero", diris *don Leobardo*.

„Jes, mi konsentas tion."*Don Remigio* kapjesis kaj pikumadis en sia manĝo. „Mi ankoraŭ neniam konatiĝis al *contratistas* brutalaj tiaj, kiaj estis ili, tiuj fratoj *Montellano*. La *muchachos*, la kompatinduloj, kiuj falas en iliajn manojn, havas kaŭzon diri, ke ili scias, kiaj estas diabloj, kaj ili ne devos lerni tion en la infero. Tiel oni kompreneble povas gajni dum kelkaj jaroj grandan posedon. Sed per tia posedo mi ja tamen ne volus ŝarĝi mian konsciencon."

„Mi konas ilin", diris *don Leobardo*. „Mi konas ilin el la tempo, kiam mi estis la administranto de *„La Constancia"*.

La fratoj *Montellano* estis *contratistas* en *El Rompido*, proksime de nia monterio. Ĉu iam ajn viro povis liberiĝi vivanta el ilia kontrakto? Mi supozas, ke ne. Sed ili sciis, kiel eligi la lignon

kaj plenigi sian sakon per mono. Alian *contratista*-n en *El Rompido* ili ne permesis. Antaŭe *El Rompido* havis ok *contratistas*. Tiu okupo ne povis alporti tiom da viroj, kiom kapablis tion la tri fratoj *Montellano*. Kompreneble tio estis ebla nur tial, ĉar ili kvazaŭ buĉadis siajn *muchachos*, sen pardono kaj sen kompato. Mi estas konvinkita, ke neniu alia *contratista* en la tuta lando forkonsumis tiom da junaj viroj, kiom tiu triopo. Ĉiumonate la agentoj alkondukis novajn trupojn. Kaj ĉion, kio alvenis, akceptis la fratoj *Montellano*, ĉar ili eterne malhavis virojn. Kiam alvenis nova trupo, tiam duono de la lasta trupo transprenita de la fratoj *Montellano*, jam putris sub la tero."

„Tion mi certe scias, *don Leobardo*", diris *don Remigio*, „se tio vere estas tiel, ke tiuj fratoj Montellano aĉetis la monterion, jen mi ne partoprenos tion. Mi kvitigos la kontrakton kun ili. Ili pagos al mi la elspezojn por la kontrakto kaj tiel ricevos la virojn. Sed mi ne laboros kun ili kaj ne helpos pligrandigi ilian posedon. *Dios mio*, mi atendas ja nur pri tio, ke mi havos por mi senkulpigon por entute sen perdo de l' honoro povi retiriĝi el la monterioj kaj por ekentrepreni negocon inter civilizitaj homoj en urbo. Mian edzinon kaj miajn infanojn mi fine foje volas feliĉigi per mia ĉiama ĉeesto. Mia edzino estas kvazaŭ vidvino kaj miaj infanoj orfoj, tiel, kiel statas nun. Nun mi havas bonegan kaŭzon fini mian kunlaboron ĉi tie. Nun mi ne devos plu pensi pri mi, ke mi retiriĝas el la negoco nur tial, ĉar mi volas rezigni pro laco kaj ne plu eltenas ĉi tie. Mi ja bone kaj volonte povus elteni tion dum tri pliaj jaroj. Kaj la monon, kiun mi enspezus en tiuj tri jaroj, estus krome ne malagrabla al mi. Sed labori kun tiuj fratoj *Montellano*, ne, sinjoro, prefere kun servistoj de l' infero."

„La firmao estas jam registrita en *Villahermosa“,* raportis *don Leobardo*. „Ĝi nomiĝas: *Montellanos Hnos*, fratoj Montellano. Fajnaj fratoj.“

„Mi estas konvinkita, ke ili tute ne estas fratoj“, diris *don Mariano*. „Mi konas ilin sufiĉe kaj certas, ke ili ne estas fratoj, ĉiu el ili parolas alian hispanan dialekton. Hispanoj ili estas, sed ĉiu el alia provinco. Tial la frateco estas sufiĉe suspektinda.“

„Sed tre oportuna“, enmiksiĝis *don Rafael*.

„Bone dirite, *don Rafael*, tre oportuna!“ La administranto ridante elpuŝis la vortojn.

„Kion faros vi, *don Leobardo*?“ demandis la *contratista*.

„Mi restados ĉe la kompanio. Ili jam ofertis al mi novan postenon, kun pli da salajro. La kompanio havas grandan sisalplantejon en Jukatano. Jen vi povos renkonti min en mia nova oficejo, sinjoroj miaj“, diris *don Leobardo*, turnante sin al la tuta rondo de la tablo. „Kiu el vi volas kunveni, povas diri tion al mi.“

La dungitoj ankoraŭ ne tute glutis la suprizan sciigon.

„Ne ĉiu el vi povos veni kun mi“, plibonigis sin *don Leobardo*. „Dependos de tio, kiom da buroaj helpantoj kaj kiom da kampadejaj administrantoj mi bezonos. Sed por vi ĉiuj estas sufiĉe da loko. La kompanio transprenis du bananplantejojn de la fratoj *Montellano*, kiel parton de la pago; krome la kompanio havas kvar proprajn bananplantejojn kaj du kakaajn. Kiu el vi deziras

ne plu restadi ĉi tie, povos ricevi alian bonan postenon en nia kompanio.“

„Kiam la fratoj *Montellano* transprenos ĉi tie la monterion?“ demandis *don Mariano*, la administranto de la *bodega*.

„Je la unua de aprilo. Kaj certe interesos vin ekscii, ke la fratoj *Montellano* aĉetis du pliajn monteriojn kaj transprenos ilin je la sama tago, tio estas *La Estancia* kaj *La Piedra Alta*.“

Don Remigio gargaris la buŝon per akvo el glaso, li gargaris brue, elkraĉis la akvon tra la pordo je vasta arko kaj tiam diris: „Do, supozeblas, ke la tri noblaj fratoj ĉi tie volas instali monopolon.“

„Tiel ne nur ŝajnas“, obĵetis la administranto, „tiel estas.“

„Jen kaŭzo plia kaj la finfine decida, sinjoroj miaj, kial mi cedos mian kontrakton je la tridekunua de marto al la fratoj Montellano. Mi prenos tion, kion ili ofertos al mi por la viroj, kiujn mi havas.“

„Memgardu!“ ridante diris la administranto. „Ili ofertos al vi kvaronon de tio, kion vi pagis por la viroj. Sed rezignu pri nenio. Postulu la plenan sumon kaj dudek procentojn aldone por via asertita perdo. La fratoj pagos, kion vi postulos. Sen homoj ili ne povus entrepreni ion en la monterio. La virojn ili bezonas tiom, kiom ili bezonas mahagonon. Sen mahagono ne estus profito, sen *muchachos* neniu mahagono. Se vi obstine insistos pri viaj postuloj kaj diros, ke vi kondukos viajn virojn al *Quintana*

Roo kaj transprenos tie ĉiklokontrakton, se ili ne pagos la postulitan prezon, jen la fratoj elŝvitos peĉon kaj pagos sen plia vorto."

„Tio pravas, *don Leobardo*", diris la *contratista*. „Tiuj bezonas miajn virojn pli ol mi bezonas ilin. Mi aranĝos mian prezon laŭ tio. Eble mi ankoraŭ faros bonan negocon antaŭ mia formarŝo el *La Armonía*."

„Tiel ni ja nun finfine havos okazon por pensi ankaŭ pri la trinkado kaj por malsekigi kaj ŝmiri per oleo la negocon de nia longjara amiko *don Remigio*, por ke ĝi pli bone deruliĝu." diris *don* Leobardo kun laŭta ridado. Li vokis al la ĉino, kiu komencis detabligi la lastajn manĝilarojn. „Ĉineto, kuru transen al mia kabano kaj alportu la botelon kun *comiteco añejo*, la malnovan, ĉu vi komprenas? Estas la botelo kun la ruĝa fermilo sur la korko, la nemalfermita."

„Mi jam eksaltas, *don Leobaldo*", diris la ĉino kaj sagis en la nokton. Post minuto li jam revenis.

„La botelon mi konservis al mi por speciala okazo, *caballeros*", klarigis la administranto. „Kaj tiu solena momento estas nun veninta: la ekveturo el la dezerto. La monterio *La Armonía* kaj Leobardo Chavero revidos sin neniam. *Salud, caballeros*."

Rimarko
caribes = kariboj

ĈAPITRO 05

5/1

La elĝangaligo de la mahagono okazas dum tri etapoj.

La unua etapo estas la hakado de la arboj. *Contratista* transprenas tiun laboron je sia propra kalkulo kaj danĝero kaj kun sia propra kapitalo. Li estas memstara kiel sendependa negocisto. Li liveras la arbotrunkojn al la plej proksima ekflosigejo, kie oni pagas al li por ĉiu tuno da mahagono dek pesojn, de tempo al tempo iom pli, kaj iafoje malpli, ĉiam laŭ la merkata prezo de la ligno. La *adminstrador de l' kampo,* la kampadeja administranto asignas al li la distrikton interne de la koncesia tereno, kiun li devas ekspluati. Ĉiu *contratista* prilaboras alian distrikton, kiu ofte estas du aŭ eĉ tri tagajn vojaĝojn malproksime de la *oficinas*, kie la administranto kun siaj dungitoj havas sian sidejon.

La dua etapo estas la ekflosigado de la trunkoj, laboro, kiu estas gvidata kaj kontrolata de la *oficinas*. Ekde la momento, kiam la trunkoj estas surtavoligitaj ĉe la riverbordo kaj pretaj por forflosigado, la *contratista* ja ne plu zorgas pri la mahagono. Ĝi apartenas nun al la kompanio.

La tria etapo estas la deponigado kaj surŝipigado de la ligno al la kunaĉetistoj. Ĝis certa stacio de la rivero la ligno flosas libere. La trunkoj ĉiuj surhavas la brulmarkon de la kompanio, al kiu apartenas la ligno; ĉar ĉiuj kompanioj, eĉ se ili posedas siajn monteriojn je diversaj malpli grandaj riveroj, finfine devas uzi la saman grandan riveregon por la flosigado. Je la lasta stacio,

kie jam komencas veturadi la motorboatoj, kaj kie la libere flosantaj trunkoj povas fariĝi danĝeraj por la veturiloj, la trunkojn la dungitoj de la kompanioj kvazaŭ fiŝkaptas el la riverego laŭ la brulmarko. Tie la trunkoj tiam estos kunligitaj al grandaj flosoj kaj transportataj de tre lertaj flosistoj al la marhaveno, kie la flosoj poste estos disigitaj kaj la trunkoj deponitaj ĝis kiam oni metos ilin por la plutransporto sur ŝipon. Tiun trian etapon komenciĝantan je la lasta stacio, kien la trunkoj alflosas libere, ĝis la finfina surŝipigo, gvidas kaj kontroladas la kompania komandejo. La komandejo troviĝas aŭ en la haveno aŭ en sufiĉe granda urbo de la regiono.

5/2

La fratoj *Montellano*, *Severo Gurria Montellano*, *Feliks Gurria Montellano* kaj *Acacio Gurria Montellano* decidis ĉe la aĉeto de la monterio, ke ĉiu el ili transprenos la adminstrantan postenon de unu el la tri etapoj. Severo, la plej maljuna, ricevis la taskon kontroladi la trian etapon de la negoco, do la plej gravan; Feliks ricevis la taskon administri en la *oficinas*, kaj Acacio, la plej juna kaj plej eltenema el ili, ricevis la taskon esti la ĉefo de la *contratistas* kaj kiel tia li kontrolu ties laborojn.

La plano estis bona kaj ankaŭ prudenta. Sed kiam ili volis labori laŭ tiu plano, la vojon baris tiom da obstakloj, ke ĝi ne tiel simple lasis efektivigi sin kiel antaŭe pensite.

Don Mariano jam en tiu ĉetabla interparolado alludis, ke li dubas pri tio, ĉu tiuj tri fratoj vere estas reciprokaj parencoj pere de la samaj gepatroj. Tiom longe, kiom ĉiu el la triopo laboris unuope kiel memstara *contratista,* unu apud la alia, ili ĉiam viv-

is en harmonio, sed nun, kiam ili kunĵetis sian tutan monon por aĉeti monteriojn, ĉiu fariĝis misfidema kontraŭ la aliaj. Ili ja certe konis sin reciproke tre bone kaj ĉiu sciis de la aliaj, kiom li valoras kaj kion li faris antaŭ ol ili renkontiĝis por fariĝi fratoj. Se oni havas nomon, kiu ofte retroviĝas en policaj raportoj, juĝistaj verdiktoj kaj prizonlistoj, oni jam agas pro instinko de memkonservado bone deskui ĝin kaj oni serĉas alian, kiu estas malpli konata kaj malpli trivita. La plua vivo tiukaze estos pli oportuna, tiom longe ĝis kiam oni vidos sin ree elmetita al la neceso pluan fojon entrepeni haŭtdeĵeton. Nova uzebla nomo estas ĉiam multe pli sekura, se oni povas prezenti fraton aŭ fratinon aŭ plej bone patron. Tiukaze la nova nomo estas malpli suspektinda. Povas esti, ke la tri fratoj Montellano elserĉis la nomon de siaj gepatroj en telefona adreslibro en Barcelono aŭ en Madrido kaj indikis la nomon de tiuj adoptitaj gepatroj, se estis necese gajni en negocoj pli grandan konfidon. Kompreneble, se la patrino de la fratoj *Montellano* subite estus veninta al Meksiko, ŝi certe tre mirus trovi tie tri filojn, pri kies ĉeesto ŝi eĉ ne divenis ion ĝis tiam.

Ĉar ĉiu el la tri fratoj *Montellano* sciis kun certo, kial ĉiu el ili rigardis tion avantaĝa esti la frato de la du aliaj, tial ilia reciproka malfido certe ne estis sen kaŭzo.

Lasi Severon kiel ĉefkasiston en la haveno, kie li vendas la lignon kaj enkasigas la monon, dum la du aliaj sidas profunde en la ĝangalo, tio ne tre plaĉis al ambaŭ aliaj. Tute ne plaĉis al ili, ke ili vivu disigite unu de la alia. Lasi Felikson sola en la haveno, estis, kiel asertis Severo kaj Acacio, nelerta, ĉar li, laŭ ilia opinio, ne komprenis ion pri negocoj, kaj ĉar li verŝajne vendus la belan karan lignon por malpli da mono ol ĝi kostis por ili mem. Tio

kompreneble estis nur preteksto, por ne devi diri malkaŝe, ke ili ne povas translasi al li la ĉefkason.

Acacio laŭ la opinio de la du aliaj estis tro juna kaj tro malsperta, por entute agi sendepende.

Fine, post longaj intertraktoj, ili ne vidis alian elirvojon ol interkonsentiĝi pri tio, ke ili iros ĉiuj kune en la ĝangalon kaj unue havigu sufiĉe da mahagono. Krome ĉiu el la triopo volis kune flosigi la lignon, kaj fine ĉiu el la triopo volis atendi en la haveno la kunaĉetistojn.

Tio estis tre multekosta labordivido. Kiam ili ĉiuj estis en la haveno, la *contratistas* povis agi laŭplaĉe, tiam ili povis signi la lignon kun la brulmarkoj de aliaj kompanioj kaj vendi al aliaj kompanioj aŭ eĉ flosigi ĝin je sia propra kalkulo kun la helpo de uloj, kiuj atendis ĉe la floskonstrua stacio okazojn por ricevi „sovaĝan lignon“ sub la aktuala merkata prezo.

La *contratistas* de aliaj koncesiitaj kompanioj dum la malĉeesto de la tri fratoj povis enrompi en ties koncesian terenon kaj tie senĝene haki arbojn dum kelkaj monatoj.

Dum la tri fratoj laboris en la ĝangalo, krome povis okazi, ke la prezoj por mahagono havene grimpis tre alte kaj ĉeestis tiom da aĉetistoj, ke oni povas elserĉi tiun, kiu pagos la plej altan prezon. Kaj se la tri fratoj tiam finfine venos al la haveno por vendi, la prezoj male povus esti tre malaltaj, kaj eble ne videblus eĉ unu aĉetisto, kaj la magahono vorus tiukaze pli da deponejaj kostoj ol oni povus enspezi je ĝi. Sed la reciproka malfido venkis, kaj ĉiu el la triopo laboris antaŭ la arboj kiel *contratistas,* tiel, kiel

ili faris tion antaŭe, kun la ununura diferenco, ke nun la tuta gajno transiris al ili kaj ne nur dek pesoj por ĉiu liverita tuno, sed tridek, kvindek, okdek, ja eble ĝis cent kaj dudek kaj eĉ pli da pesoj. Kiu kapablus scii kaj antaŭdiri, kiom povas kreski la mahagonvaloro?

5/3

Ne estis nur la malfido, kiu malhelpis la fratojn gvidi la negocon tiel, kiel ili planis tion origine. La mahagonaj provizoj, kiuj troviĝis en la haveno kaj apartenis ankoraŭ al la kompanio, ne estis inkluditaj en la vendon. La prezo, kiun la kompanio postulis por ili, estis tro alta por la fratoj *Montellano*. La kompanio estis sufiĉe forta por atendi pri la vendo de mahagono, ĝis kiam la ofertita prezo estos laŭ ilia opinio plej favora.

Malmultekosta la monterio *La Armonía* ne estis, kiam la fratoj *Montellano* aĉetis ĝin. La tereno, kiun la koncesio entenis por ekspluatado, estis granda, ĉirkaŭ tri mil kvadratkilometrojn da tropika praarbaro. Ke la tereno de la koncesio estis riĉa je mahagono kaj pli detale rigardate apenaŭ vere tuŝita, tio estis sufiĉe bone konata al la fratoj. Kiel spertaj *contratistas* ili sciis, kie troviĝas la mahagonriĉaj terenoj. Longe antaŭ ol ili entute pensis pri la aĉeto de la monterio, ili jam esploradis la terenon en ĉiu direkto por ne devi aĉeti ĉevalon en malhela stalo.

Sed al monterio apartenis tiam pli ol nur la koncesio. Al monterio apartenis, ĉiam laŭ ties grando, cent, ducent, eble tricent bovoj; al ĝi apartenis ĉevaloj kaj dudek aŭ tridek fortikaj muloj kutimigitaj marŝi tra marĉoj, kaj kiuj tial plej multe kostis. Al ĝi apartenis la konstruaĵoj, kiuj, eĉ se ili estis primitivaj, tamen

prezentis konsiderindan valoron je gajnita laborforto. Al tio apartenis la *tienda*, kiu ĉiam devis havi abundan provizon de varoj. La jungilaroj de ĉiu speco por la havigado de la mahagono, la hakiloj, pioĉoj, maĉetoj, ĉenoj, kroĉiloj, seloj, jugoj, forĝilaroj estis altvalora por tiu, kiu uzas kaj devas uzi ilin. Se aĉetisto ne estus aĉetinta la aĵojn, tiukaze la kompanio donacus ilin al li; ĉar ilin fortransporti kostus pli ol ili enspezigus per vendo en plej proksima loko. Sed la aĉetisto estis senhelpa sen tiuj ilaroj kaj kromaj varoj. Por li ili havis altan valoron, la vendisto sciis tion, kaj tial li ne devis malpliigi la prezojn.

Severo Montellano, la plej aĝa frato, ne lasis pigre kuŝi sian monon, kiun li enspezis kiel *contratista,* li uzis ĝin por pruntedonoj. Kompreneble li ne pruntedonis sian monon al honeste laborantaj plantistoj, sed nur al tiuj, pri kiuj li sciis, ke ili forludas aŭ disipas la monon alie. Li ne pruntedonis sian kare perlaboritan monon por ricevi interezojn. Tio ne estus konsiderinda enspezo. Li pruntedonis ĝin por ke la prezo de iu ranĉo, de iu plantejo aŭ de iu domo, je kies garantio de sekureco li pruntedonis la monon, malaltiĝu, por ke la garantiaĵo transiru tiel en lian posedon. Tiel li kaj liaj du fratoj, kiuj faris tion same kiel li, sekvinte liajn konsilojn, ekposedis tiujn bananplantejojn, kiuj n ili nun uzis kiel pagilon por akiri tiujn monteriojn.

Tiel ili sukcesis akiri la monterion por prezo, por kiu, se oni kalkulas tion en kontanta mono, la kompanio neniam vendus la monterion. La kompanio kompreneble estis pagita relative bone, pere de la inkludo de la plantejoj en la prezon. Tiuj, kiuj aĉetis malkare, tre malalte sub la prezo, estis la fratoj *Montellano*. Ili akiris la plantejojn je dekono de la vera prezo, kaj ĉe la pagado ili tamen prikalkulis la plantejojn plenvalore.

Ĉar ili ne transprenis la mahagonlignon de la kompanio en la haveno, la fratoj do estis sen iuj provizoj da mahagono, kiu pretas por vendo aŭ surŝipiĝo. Jen plua kaŭzo, kial ĉiuj tri fratoj decidis iri en la ĝangalon por unue havigi novajn mahagonprovizojn. Tiom longe, kiom ne estis mahagono en la haveno, oni ja ne povis vendi ĝin.

Kompreneble oni ankaŭ menciis ĉe la interkonsiliĝoj, ke oni povus realigi la vendon havene pere de agentejo tiel, ke la fratoj devus okupiĝi nur pri la havigado de la mahagono. Sed la sama misfido, kiun ili sentis reciproke, ili montris des pli kontraŭ aliaj, en tiu kazo kontraŭ la agentoj, kiuj laŭ la opinio de la fratoj ĉiuj estas trompistoj; tiel fine povus okazi laŭ ili, ke oni devos labori nur por la agentoj.

5/4

La fratoj *Montellano* komencis sian agadon en la monterio per tio, ke ili tre detale kontrolis la salajrojn de la dungitoj, kaj poste la salajrojn de la metiistoj, de la karavanmulistoj kaj de ĉiuj ceteraj laboristoj, kiuj estis senperaj dungitoj de la kompanio kaj apartenis al la ĉefa kampadejo. Inter ili estis la helpantoj de la *tienda* kaj de la deponejoj; jen la knaboj, kiuj purigis por la dungitoj la bangalojn kaj tenis ilin en ordo; jen la paŝtistoj por la bovoj, se la bovoj por ripozo kaj pli bona nutrado estis senditaj en paŝtejojn; la kanuveturigistoj, la peonoj, kies laboro estis kultivi maiz- kaj fazeolkampojn por la nutrado de centoj de viroj, kiuj laboris tie; kaj jen la peonoj, kiuj grasigis porkojn kaj kaprojn por la viandobezono kaj en sia libera tempo tanis kaj prilaboris plu la felojn de buĉitaj bestoj por povi uzi ilin por jungilaroj.

La salajroj ĉiutage fluktuadis inter unu realo kaj ses realoj aŭ sepdek kvin centavoj. La salajroj de la metiistoj po tago moviĝis inter sepdek kvin centavoj kaj unu peso kaj sesdek centavoj. Ĉiuj dungitoj ricevis salajron laŭ sia agado, sia sperto kaj aĝo inter sesdek ĝis ducent pesoj ĉiumonate.

Kvankam la salajroj priskribeblis kiel sufiĉe aĉaj rilate al tio, ke la homoj tie devis vivi en la ĝangalo, kaj ke ĉiu vestaĵo kaj ĉiu uzata artiklo kostis tie trioblon, kvinoblon aŭ eĉ dekoblon de la kutima prezo, la tuta sumo de la elpagitaj salajroj dum jaro estis tamen tiom alta por ektimigi la fratojn Montellano, kiam ili elkalkulis ilin.

Tio, kion oni ne eldonas, estas ŝparita; kaj mono, kiun oni povas reteni en la poŝo, estas mono perlaborita. Tiel pensis la fratoj *Montellano*, kaj ili pensis aldone: Ju pli rapide ni ĉesos la elspezadon, des pli rapide komencos la ŝparado kaj la enspezado. Plej facile kaj plej maldanĝere oni malpliigas la negocajn kostojn, se oni malpliigas la salajrojn. Tio dolorigas tiun, kiu malpliigas ilin, malplej multe. Al kiu tio ne plaĉas, tiu povas foriĝi.

Kiam la dungitoj eksciis pri la salajromalpliigoj, ili ĉiuj foriĝis. Ili apogis sin je tio, ke ili havas kontrakton nur kun la kompanio, sed ne kun la novaj posedantoj, ke krome iliaj kontraktoj fiksas la salajrojn en certa alto, kaj, se tiuj salajroj ne plu estos pagataj, ili ne plu havos la devon plenumi la kontrakton, eĉ, se la kontraktoj estus inkluditaj en la vendon.

La tri fratoj interkonsiliĝis kaj venis al la konvinko, ke ne povas okazi io pli bona al ili ol adiaŭi ĉiujn dungitojn. Tiuj dungitoj ja

nur pigrumis kaj drinkis kaj diboĉadis kun putinoj, kaj ilian tutan laboron don *Severo* povus fari tute sola. Raportojn kaj finkalkulojn oni ne devis fari kaj forsendi, ĉar la tri fratoj estis jam mem la kompanio, kaj al si mem oni ja ne devas sendi raportojn. Kiam *don Severo* venos la sekvan fojon al *Villahermosa*, li ja povus ĉirkaŭrigardi kaj li eble kaptus du aŭ tri ege malsatajn vagabondojn, kiuj scias, kiel trakti ĵurnalojn kaj kalkullistojn, kaj kiuj estos tiom feliĉaj ricevi pagatan postenon, ke ili adoros *don Severo*-n kiel sian savanton, se li promesos al ili kvardek kvin pesojn da salajro ĉiumonate. Ili ja ne devos manĝi ĉiutage por kvindek centavoj trifoje, sufiĉos ja por unu fojo. Pro longa senlaboreco ili kutimiĝis manĝi malmulton; kaj se ili tamen ankoraŭ havus malsaton, ili povus kuiri mem por si kaj ĉeokaze ĉasi ion. *Don Severo* tiom alloge priskribos al ili la vivon en monterio en la profundo de la ĝangalo, kie oni estas ĉirkaŭata de jaguaroj, pumoj, grandaj simioj kaj gregoj de bongustaj sovaĝaj porkoj tiel, ke ili pretos labori por nenio por povi vivi la vivon de Robinsono Kruso.

La afero pri la dungitoj tiel estis aranĝita. Tio, kio estis la ĉefa afero, konsiderinda elspezo, la plej granda, kiun ili havis je salajroj, estis ŝparita kaj oni povis konti ĝin kiel la unuan enspezon.

Don Severo, al kiu liaj fratoj bonvoleme koncedis, ke li havas la plej ruzan kapon kaj la plej grandan lerton trakti financajn aferojn kaj ĉiam solvi ilin avantaĝe, ekokupiĝis nun pri la salajrolistoj de la metiistoj kaj de la peonoj.

La tri fratoj interkonsiliĝis, pri kiuj el la metiistoj kaj peonoj oni povus rezigni plej facile sen problemoj. Kiam oni prinomis tiujn

virojn, oni alvokis ilin kaj *don Severo* sciigis al ili la rezulton de la interkonsiliĝo. Ili ŝajne ne prenis tion tragika. Tion *don Severo* trovis suspektiga; ĉar tiuj homoj vivadis elmane enbuŝen kaj en la urbo apenaŭ vivus pli bone ol ĉi tie.

„Kiom da restsalajro ĉiu el vi ankoraŭ devos ricevi?“ demandis *don Acacio*, la plej juna kaj plej nesperta el la tri fratoj. Al li oni transdonis la taskon adiaŭi la virojn, kiujn *don Severo* kaj *don Feliks* priskribis kiel superfluajn. Unu el ili diris, ke estas dudek pesoj, alia, ke dek du da ili, tria, ke dekok. *Don Acacio* skribis kolektoĉekon por ili ĉiuj, kaj *don Severo* subskribis ĝin.

Estis strange, kiom rapide la homoj ordigis siajn pakaĵojn kaj ekmarŝis. Ili estis ekmarŝontaj, kiam *don Feliks* rigardis sian fraton *don Severo*, kaj tuj poste preskaŭ kriante diris al li: „*Pero, hombre*, sed, he, viro, ŝtipkapulo, ĉu vi kontrolis en la *tienda*, ĉu la homoj eble havas monton da antaŭpago kaj kredito kaj nun foriĝas sen glatigo?“

„Damnite kaj surfekite“, ekkoleris *don Severo*. Per unu salto li estis ekstere kaj du sekundojn poste jam ĉe la trupeto: „Halt, firabistoj, kie estas la ĉeko? La ĉekon al mi, aŭ mi pafos vin teren kiel krucdamnitajn lamajn kuniklojn!“ li kriis.

La viroj kondutis, kvazaŭ ili neniam ajn eĉ nur divenis ion pri ĉeko.

Sed tiam ankaŭ jam *don Acacio* alvenis tien, renkonte iris al viro kaj kriis al li: „Stinkanta hundo, vi havas la ĉekon. Donu ĝin al mi, rapide!“

Jam kurante li eltiris la revolveron kaj poste tenis ĝin premante kontraŭ la viro.

„Mi ne plu havas la ĉekon, *jefe*“, diris la viro trankvile.

„Mi donis la ĉekon al Eŭlalio.“

„Eŭlalio! Eŭlalio!“ vokis *don Severo* trans la placon.

El unu el la brandokabanoj ŝanceliĝante venis ino, kies kota kotonbluzo pendis ĉifone malsupren. Ŝi estis ĝisgorĝe ebria. Ŝia hararo evidente ne estis kombita dum tagoj.

Kiam ŝi aŭdis krii la nomon Eŭlalio, en ŝi certe vekiĝis memoro. Ŝi apogis ambaŭ manojn al la koksoj, kliniĝis por doni pli da forto al sia pulmo kaj tiam ŝi kriegis transen: „Eŭlalio, la fikulo kaj sangadultulo. Mi devas pagi ankoraŭ eĉ lian brandon ĉi tie, kiun li drinkis kun la aliaj inaĉoj.“

„Tenu fermita vian diodamnitan kotan buŝaĉon“, kriis *don Feliks*.

„Teni fermita mian buŝaĉon, ĉu?“ kriis la ino kaj elŝovis dum tio sian langon ĝisekstreme. „Mi tenu fermita mian buŝaĉon? La filo de putino havas la monon kaj estas jam je duono en *Hucutsin* sur sia ĉevalo.“

„Kion vi diras? *Chingue tu matrícula, puta vieja!* Fipublikulino, maljunaĉa putino!“ vokis *don Acacio* kaj kuris al ĉevalo, kiu estis ligita al arbotrunko.

„Be, mi estu maljunaĉa publikulino, ĉu?“ Ŝi kvazaŭ beis transen kiel ŝafo. „Vi ne hopos sur min, publikulo knabeta.“ Per unu fojo ŝi turnis sin, levis sian jupon supren ĝis la ŝultroj kaj kriis: „Do, venu ĉi tien, se vi volas gustumi ion. Mi, putino maljunaĉa? Tion diras tia flavbeka seksavida knabeto al mi!“ Ŝi turnis la kapon malantaŭen por rigardi, ĉu iu el ili akceptas la inviton kaj ĉu ĉiu rigardas tien. Sed neniun el ili tio interesis. Tio kaj similaj aferoj okazis ĉiutage dekfoje, kaj tial tie perdis ĉian logon pro noveco. Kiam ŝi turnis sin tro por povi retrorigardi ĉiujn angulojn, ŝi perdis sian ekvilibron, renversiĝis kaj kun suprenŝovita jupo restis kuŝanta antaŭ la eniro de la kabano.

Don Acacio bezonis malpli ol minuton por seli la ĉevalon. Tiam li sovaĝe vipadis la beston kaj perdiĝis en la densa ĝangalo.

Vespere li rekondukis Eŭlalion. La ĉekon li tuj forprenis de li, kiam li atingis lin survoje. Li transdonis la ĉekon al *don Severo*. Tiu rigardis ĝin kaj tiam li disŝiris la ĉekon.

Rimarko
pero = sed

5/5

La reston de la posttagmezo la du postrestintaj fratoj, *don Severo* kaj *don Feliks* pasigis per tio unue kontroli la kontajn antaŭpagojn de tiuj viroj, kiuj apartenis al la kampadejo. Ili konis sian fraton *Acacio* sufiĉe bone kaj sciis tial, ke li ja alportos la ĉekon, eĉ se tio kostus unu aŭ du murdojn. Kaj se *don Acacio* estus trovita murdita mem, li tamen havus la ĉekon, tiel certe, kvazaŭ li neniam estus doninta ĝin el la mano. Ankoraŭ ne nask-

iĝis viro, kiu povus ŝteli de unu el la tri fratoj *Montellano* ĉekon kaj kun ĝi eĉ forvojaĝus por trankvile enkasigi kaj foruzi ĝin.

„En la tuta kampadejo ne troveblas eĉ unu persono, kiu ne sidas profunde en nia supo“, diris *don Severo*, kiam ili jam finis la postkalkuladon de la kontoj.

„Io pli bona ne atendeblus.“ *Don Feliks* en sia seĝo kliniĝis malantaŭen. „Tiun, kiu de la tuta bando estas superflua, ni elĵetos.“ „Vi ne vere opinias tion tiel, ĉu?“ obĵetis don Acacio. „Certe ne.“

„Tiu, kiu ĉi tie ne pli longe estos uzata, forlaboros sian antaŭpagon antaŭ la arboj. Kaj se li jam forlaboris ĉiun centavon kaj ne pruntepreni ion aldone, tiukaze li povos foriri.“

„Tion mi ja opiniis. Ĝuste tiel mi opinis tion, Severo“, diris *don Feliks*.

„Ni ne venis ĉi tien por bonfartigi iun kaj donaci al ebriuloj brandon. Ni venis ĉi tien por labori ĉi tie.“

Don Acacio paŝis sur la pordosojlon kaj rigardis transen al la bangaloj de la dungitoj. „Mi esperas, ke ili foriros morgaŭ. Mi bezonas bangalon por mi mem.“

„Postmorgaŭ, baldaŭ. Postmorgaŭ ili foriĝos kun siaj ĉevaloj kaj vostoj. Mi esperas nur, ke ili ne kunprenos ĉiujn siajn putinojn kaj lasos al ni kelkajn el la pli bonaj ĉi tie.“ *Don Severo* enverŝis komitekon kaj pafis ĝin kvazaŭ per unu fojo gorĝen.

Ĝuste, kiam don *Acacio* plenigis sian glason, venis *don Julian* en la bangalon, en kiu la tri fratoj provizore aranĝis sian oficejon kaj dormejon.

„*Buenas noches, caballeros!*“ li salutis. „Mi volas peti vin veni al la vespermanĝo, se vi estas pretaj por tio.“

„*Muchas gracias*“, diris *don Severo* parolante por la triopo. „Ni nur antaŭe volas lavi niajn ungojn kaj hufojn.“

Don Acacio, kiu ankoraŭ havis la komitekobotelon en la mano, invitis *don Juliano*-n: „Verŝu unue rapide bongustan gorĝolavilon malantaŭ viajn brustpintojn.“

„Tio estas tre bonvena, por doni al mi kontentan eksteraĵon“, diris ridante *don Julian*.

Kiam li jam trinkis, li kvazaŭ gluglis. Poste li grakegis kiel korvo kaj montris bonfartan vizaĝon. „*Caray*, fulmotondro, tiu gustas pli bone ol la lavbrosiloj, kiujn ni kutime devas gluti.“

„Ankoraŭfoje sinkigu plian, amiko“, konsilis *don Severo*. „Se ĝi estos eltrinkita, ankaŭ ni ne havos ion alian krom tio, kion la turkoj transportos ĉi tien. Cetere,kiel ofte la turko frekventos nin?“

„Ĉiun trian monaton“, diris don *Julian*. „Kelkfoje daŭras ankaŭ kvin monatojn, se la vojoj estas tro malbonaj.“

„Ĉu vi baldaŭ pretos tie?“ demandis *don Severo* siajn du fratojn, kiuj glatigis sian hararon per poŝkombilo.

„*Bueno*, ek do, kaj brue rapidege!“

ĈAPITRO 06

6/1

En la *comedor*, en la manĝejo, kie manĝis la *caballeros,* starigis la ĉinoj du pliajn krudajn tablojn, ĉar ĉe la ununura manĝotablo, kiu tie estis kutime, ne povus sidi ĉiuj, kiuj venis ĉifoje al la manĝo.

Ĉe la du tabloj starigitaj fronte al la finoj de la ĉeftablo, sidis la dungitoj, dum la administranto kun la *contratistas* sidis ĉe la granda tablo, kie li lasis tri lokojn neokupitaj por la fratoj *Montellano*.

Kiam la tri fratoj kun „*Buenas noches, caballeros!“* enpaŝis, troviĝis la administranto *don Leobardo* ĉe la lavtabureto ĉe la enirejo kaj lavis siajn manojn.

„*Ĉinito,* ĉineto“, li vokis al la ĉino, „montru al la *caballeros* ties lokojn.“

La ĉino viŝe purigis per sia makulita antaŭtuko sidlokon sur unu benko kaj du sidlokojn kontraŭe sur la alia benko ĉe la longa tablo. Li faris tion tiel, kvazaŭ li penus ne forviŝi pli da polvo ol okupas la ĉiflanka sidloko kaj la du transflankaj. Ĉu ĉiuj aliaj sidlokoj sur la du benkoj estis polvaj aŭ grasŝmiritaj, tio ne interesis lin. Ke li entute purviŝis la tri lokojn, okazis antaŭ ĉio por

montri al la tri novaj alvenintoj, kie ili sidu, kaj ne, ĉar li volis eksterordinare ĝentili al la viroj.

La tri fratoj sidiĝis. *Don Severo*, kiel la plej maljuna sidis apud la administranto, kaj la du aliaj fratoj sidis kontraŭe al la du *caballeros*.

Kelkaj el la *contratistas* kaj kelkaj el la pli maljunaj dungitoj, la ĉefa libroteniston kaj la administranto de la *tienda* jam delonge antaŭe sidiĝis ĉe la tablo. Ŝajnis, ke tie jam tridek minutojn antaŭe aŭ eĉ pli longe kunsidis certa nombro de viroj, kiuj intertraktadis ion, ĉar la ejo, spite al tio, ke mankis duono de vando, abunde plenis de tabakfumo.

Frotsekigante la manojn kaj kombante la hararon, *don Leobardo* vokis tra la malfermita vando: „*Ya, chinito, listo,* alportu la furaĝon, kaj se ĝi ne estos *de primera* hodiaŭ, treege bona, jen mi disbatos morgaŭ sur via kranio la patojn kaj pelvojn."

„Glacias, *don Leobaldo*", vokis la ĉino el la kuirejo, „mi tle dankas pol la peno. Sed la manĝo estas la plej bona, kion mi kuilis iam ajn en mia tuta vivo."

„Estus via bonŝanco!" vokis *don Mariano*, la administranto de la *tienda*. „Estus via bonŝanco, ĉineto, tion mi devas diri al vi. Se ĝi ne estos la plej bona, hodiaŭ je la adiaŭo, tiukaze vi ne travivos la sekvan sunleviĝon, jen mi pafmortigos vin konforme al la milita juro. Kaj vian skeleton mi lasos putri ĉi tie en la *selva*, en la plej morna loko de la ĝangalo."

La ĉino starigis la unuajn telerojn plenigitajn per varmega supo sur la tablon, pli proksimiĝis al *don Mariano*, kliniĝis konfidence al li kaj diris, siajn du manojn krucigite tenante super la brusto: „Pafmoltigi laŭ milita julo vi povas min, *don Maliano*, kontlaŭ tio mi povus fali nenion, sed miajn ostojn, vi ne povos lasi putli ĉi tie en la *selva.*“

„Tiel do, kial ne, *hijo celeste*, filo de la ĉielo?“

La ĉino ridis gaje petole, tiris la brovojn supren kaj movis montrofingron sen preni la manojn de la brusto kaj diris: „*No*, *don Maliano*. Plipensu, mi pagis la asekulon kaj ĉiujn asekulajn liskojn jam antaŭe; kaj se vi ĉi tie pafmoltigos min, jen sendos la asekulkompanio en Flancisko miajn ostojn al Ĉinio pol entombigi ilin apud miaj altestimataj antaŭuloj kun ĉiuj honoloj. Tio ĉi estas tute pagita.“

„Infero kaj diablo, damnita ĉino, ĉu vi nun foje fine ekos alporti la supon ĉi tien? Aŭ ĉu mi unue devos ĵeti bastonon kontraŭ viaj gamboj?“ vokis *don Leobardo* kaj frapis per kulero ĉagrenigite sur la tabloplaton.

„*Estoy volando, don Leobaldo*, mi ja jam eksagas.“

Kiam li envenis kun la sekvaj teleroj da supo, tiris lin *don* Severo je brako pli proksimen al si mem. „Sciu tion, ĉino, via supo estas tre bona.“ *Don Severo* kaj liaj fratoj jam komencis kuleri, sen atendi, ĝis kiam ĉiu ĉe la tablo ekhavos sian supon antaŭ si.

„*Muchas glacias, caballelo*, mi tle dankas!“

Lastfine ĉiu havis sian supon. *Don Severo* sian ĵus finmanĝis, kiam la ĉino alportis la lastajn supotelerojn. La ĉino staris nun dum certa tempo malantaŭ la manĝantoj por atendi la unuajn malplenajn telerojn por tuj forporti ilin.

Don Severo turniĝis al li kaj diris: „Ĉino, ni transprenus vin ĉi tie kiel kuiriston."

„Tion mi ne pensas, *caballelo*. Vi estos nul tliopo, kaj tial mi eĉ ne povus pellaboli mian ploplan manĝon. Mi supozas, ke mi ilos kun *don Leobaldo* al Jukatano, kaj en la sisalplantejoj mi staligos mian novan kafejon." Li prenis la tri telerojn de la fratoj kaj portis ilin rapidege en la kuirejon.

La *contratistas* kaj la dungitoj interŝanĝis kaŝe rigardojn kaj strabis kaŝe transen al la fratoj por rigardi, kian mienon ili montras. La ĉino diris, ke li devos kuiri nur por tri personoj, tiukaze, se li ne forirus de tie, kaj tio signifis, ke neniu *contratista* kaj neniu dungito havas la intencon kunlabori kun la tri fratoj.

La fratoj kondutis, kvazaŭ ili ne komprenus tion. Aŭ ili jam divenis, ke tie ĉiuj formarŝos.

6/2

Oni parolis malofte dum la manĝo. Oni aŭdis nur la ŝmacadon de la manĝantoj, la klakadon de la manĝilaroj kaj ĉeokaze ĝentilan peton transŝovi salujon aŭ certan keĉupon aŭ iun alian saŭcon kaj tiam kaj tiam aŭdeblis duone perdita frazo pri okazaĵo en la kampadejo.

Je alia tago la homoj post la manĝo tuj ekstaris kaj iris al siaj bangaloj aŭ al la brandokabanoj. Kelkfoje ili ankaŭ plu restadis tie por ludi aŭ por pigreme interparoladi.

Sed hodiaŭ ekstaris neniu. Sen tio, ke iu eksplicite diris vorton pri tio, sciis ĉiu, ke nun okazos konferenco. La *contratistas,* kiuj nur ĉiun trian monaton venis al la *oficinas* kaj restadis tie dum kelkaj tagoj, kaj ĉiu el ili je alia tempo tiel, kiel ĝuste plej plaĉis al ili, venis ĉifoje ĉiuj kune, senvokite. Ili sciis, ke hodiaŭ alvenos tien la fratoj kaj transprenos la monterion.

Unue ŝajne ekestis la impreso, kvazaŭ la *contratistas* kunvenus tien el siaj foraj distriktoj ĝuste nur por saluti la novajn posedantojn kaj por akcepti ties ordonojn.

Sed ne estis tiel. Estis tie neniu, kiu ne konis la fratojn *Montellano*; kaj eĉ la pli junaj dungitoj, kiuj persone neniam vidis iun el la fratoj, konis ties famon, ties agojn kaj ilian avidon. La fratoj *Montellano* kiel kunlaborantoj aŭ kiel kun-*contratistas* en la sama kompanio estis jam sufiĉe neelteneblaj. Sed havi ilin kiel ĉefojn, kiel direktorojn kaj posedantojn de la kompanio, por kiuj oni laboras, tion rifuzis ĉiu, kiu konis ilin aŭ aŭdis ion pri ili.

La kompanio havis kvar *contratistas*, kiuj havigis tie kun siaj laboristoj la mahagonon por la kompanio. Ĉiu el la kvaropo rifuzis daŭrigi sian kontrakton. La frataro *Montellano* provis konvinki neniun, ke li restu tie kaj laboru por ili. Ili sciis, ke tio estus vana, kaj krome, kaj tio estis decida, ĝi estis al ili tre bonvena profunde en la koro, ke neniu el la *contratistas* volis labori por ili. Ili mem estis spertaj *contratistas* kaj tial bezonis neniun

helpanton. Ili jam faris siajn planojn kiel gvidi estontece la monterion tiel, ke ĉiu mono, kiun ili devus pagi al la *contratistas*, trovos la vojon en la propran kason.

La ununura, kio nun rilate la *contratistas* intertrakteblis, estis la transpreno de la kontraktoj. Estis la zorgo de la fratoj *Montellano* transpreni la kontraktojn tiom malmultekoste, kiom eblis. Ke ili, la fratoj, pro sia brutaleco, pro sia avido kaj pro sia neeltenebleco estis tre neŝatataj, ja parte malamataj kaj parte timataj, ili ne rigardis hontego aŭ eĉ malavantaĝo, sed eĉ kiel tre valoran avantaĝon por siaj intertraktadoj. Neniu el la *contratistas* volis labori sub ili, ĉiu volis glatigi sian kontrakton, kaj ĉar ili volis glatigi ĝin, tial la fratoj *Montellano* certis, ke ili povos aĉeti la kontraktojn sub la prezo.

La intertraktadoj, kiuj okazis posttagmeze inter la *contratistas* en la ĉeesto de la administranto *don Leobardo*, temis ĉiuj pri la prezo, kiun ili postulos. Ili decidis ne marĉandi pri la fiksita prezo kaj ne cedi.

6/3

Dum kvarono de horo oni interparolis tie post la vespermanĝo ĉe la tablo nur pri bagateloj. Ĉiu sciis, ke tio estis nur interparoloj pro embaraso por prepari la kernon de la intertraktadoj.

Sed tiam *don Severo* ne pli longe povis kaŝi, kial li entute venis tien al la vespermanĝo. Li same tiel bone povus manĝi nur kun siaj fratoj en la bangalo. „*Don Remigio*“, li diris subite meze de banala interparolado pri la havena trafiko en *El Carmen*, „*don Remigio*, ĉu vi jam listigis vian kontrakton?“

„Certe, *don Severo*, mi havas ĝin ĉi tie.“ *Don Remigio* elprenis sian kontolibron kaj aron da listoj. „Mi havas ĉi tie la nomojn de ĉiuj, kiuj estas en mia kontrakto. Post ĉiu unuopa nomo vi trovos, kion kostas la viro al mi, kiom li intertempe prenis jam sur sian konton, kiom li ricevas ĉiutage kiel salajron, kaj kiom li estos enspezinta ĝis la tago de la transpreno, do, ĝis morgaŭ. La unuopajn kontraktojn de ĉiu viro kun la nomo de la garantiulo kaj la stampo de la *municipalidad* havas *don Leobardo* en sia *oficina*.

„*Bueno*, ĉu? *don Remigio*?“ demandis *don Severo*.

„Mi havas okdek naŭ virojn en mia kontrakto. La entuta ŝuldosumo de la *muchachos* hodiaŭ estas, post minusado de la enspezitaj salajroj, dek naŭ mil ducent kvardek sep pesoj. La provizo je mahagono, kiun mi havas, validas sume rondigite ok mil sepcent pesojn. Estas hakite multe pli da ligno, ĉirkaŭ sescent tunoj, sed tiujn mi ne kunkalkulos, ĉar ili ankoraŭ ne estas fortransportitaj.“

„Tio do tiukaze entute estus kiom, *don Remigio*?“

„Entute sepdek mil naŭcent kvardek sep pesoj.“

Don Severo haste zigzage notis, dum *don Remigio* plu parolis, la nombrojn sur pecon da papero.

„Tio estas en ordo, *don Remigio*“, diris *don Severo* kaj desegnis dikan punkton post la lasta cifero, kiun li skribis. „Tio estus do tio, kion mi devus pagi al vi.“

„Iom pli“, respondis *don Remigio* trankvile.
„Kion do eĉ krome?“ obĵetis *don Feliks*.

„Tuj silentu, ĉu komprenite?!“ vokis *don Severo* al li.

„Estas ja ankaŭ mono mia“, defendis sin *don Feliks*.

„Jen merdo, mono via! Estas ankaŭ mia kaj tiu de *Cachito*. Kaj nun tenu fermita la buŝaĉon!“ konsilis la pli maljuna al li. „Cetere, estu entute ĝoja, ke vi rajtas sidi ĉe ni kaj aŭskulti nin, se interparolas homoj, kiuj komprenas iom pri mono.“

Poste li bruligis cigaredon.

Tuj post la finigo de la vespermanĝo *don Leobardo* el la *tienda* alportigis plurajn botelojn da komiteko, el kiuj oni enverŝadis.

Don Severo nun plenigis grandegan glason ĝis la rando kaj sinkigis ĝin per unu fojo malsupren. La botelo rondiris plu, kaj tie, kien ĝi ne alvenis ĝustatempe, jen avidulo jam enverŝis al si el unu el la aliaj boteloj. La pli junaj dungitoj vokis pro ĝentileco al la pli maljunaj *caballeros* ĉiam *„Salud!“,* antaŭ ol ili trinkis. La *contratistas* kaj la tri fratoj tion ne trovis necesa, ĉar ili ne volis disipi tempon. Trinku, se vi volas trinki kaj ne babilu longe. Tio bonfartigas nek vin nek aliajn.

Finfine, grakinte kaj gruntinte, *don Severo* diris, kvazaŭ li ne atente aŭskultis: „Kion vi diris, *don Remigio*? Iom pli, ĉu? Kio do eĉ pli ankoraŭ?“

„Tio estas ja certe tre simple komprenebla, *don Severo*. Dudek procentojn krompage sur la tutan sumon, pro la translaso.“

„Mi al vi pagu dudek procentojn aldone? Hehe, viro, ni ja ne kunvenis ĉi tien por ekzerci reciproke ĉantaĝon.“

Don Remigio levis la ŝultrojn. „Tio ne estas ĉantaĝo. Mi havis la penon havigi la virojn. Kompreneble, la agentoj havigis ilin ĉi tien. Sed sen mia komisio, sen miaj konsiderindaj antaŭpagoj estus neniu viro ĉi tie. Mi devis instruadi la virojn, ĉar neniu el la viroj komprenis ion pri la laboroj en monterio.“

„Tio ne estas kaŭzo postuli dudek procentojn por ĉio, ĉu ne?“

Don Severo rezigzagadis krajone sur la papero. „Eble ne“, diris *don Remigio*, „sed mi translasos ilin nur por tiu monsumo. Vi aŭ akceptu aŭ rifuzu.“

„Rifuzite!“ diris *don Severo* koncize. Li atendis certan tempon kaj esperis, ke la *contratista* nun komencos marĉandi. Kiam neniu respondo sekvis, li demandis: „Kion vi faros kun la viroj, kiujn vi havos sur la nuko?“

„Nur ne afliktiĝu pri tio, *don Severo*.“ *Don Remigio* ridis kaj tiris la botelon al si.

Li senkorkigis la botelon kaj tenis ĝin permane por verŝi en ĝin. Dum li tenis ĝin kaj la glason svingadis en la alia mano, kvazaŭ li pripensus, ĉu li trinku ĉu ne, li ripetis: „Ne afliktiĝu. Mi iros kun mia bando al *Quintana Roo*. Mi povos ricevi ĉiklokontrakt-

on ĉiutempe. Mi devos diri nur, ke jes. La usonaj maĉgumaj fabrikistoj pagas ĝuste nun tre bonajn prezojn por ĉiklo."

„Povas esti", opiniis *don Severo*. „Sed la vojaĝo daŭros certe kvar semajnojn, eble kvin aŭ ses. Mi konas *Quintana Roo*-on. Dum tiuj ses semajnoj vi enspezos eĉ ne kurban centavon. Se vi estos sur la longa vojo kaj trairos vilaĝojn, vi havos la tre bonan perspektivon, ke duono de la *muchachos* forkuros de vi. Kaj tuj de hodiaŭ al morgaŭ tie kapti ĉiklokontrakton, kiel vi imagas tion, krome ne eblos. Vi devos tie intertrakti kun la *jefes* de la indiĝenoj por ricevi distriktojn tie. La intertraktoj povos etendiĝi tri monatojn antaŭ ol vi certe povos komenci. La *jefes* prenas al si tempon. Tiuj ne devas hasti. Kaj ili atendas tiun, kiu pagos la plej altajn procentojn. Mi konas la ĉiklonegocon, *don Remigio*. Kaj ĉar mi konas ĝin, tial mi estas ĉi tie ĉe la mahagono."

Don Remigio sciis, ke *don Severo* pravas. Li esperis, ke *Severo* ektimus, se li minacus formigri kun la viroj. Sed tiel simple la fratoj *Montellano* ne kapteblis. Ili estis hispanoj, kaj ĝis tiu aktuala tago ili ankoraŭ ne renkontis meksikanon, kiu estis sufiĉe ruza tiri eĉ nur peson el poŝo de la fratoj *Montellano* sen ties permeso. *Don Severo*, ŝajne elkalkulante sumojn sur la papero, observis *don Remigio*-n seninterrompe. Li sentis, ke nun venos la momento, kiam *don Remigio* fariĝos dubema kaj komencos pripensi, ĉu li efektive eble ne povus ricevi sian laŭordan parton tie. Estis granda propableco , ke tiukaze, se li alvenos en la ĉikloterenon, jam ĉiuj kontraktoj estos faritaj kaj disponeblus neniuj distriktoj, kie la ekspluatado indus la penon; la distriktoj kiujn li povus ricevi, eble estus tiel profunde en la ĝangalo, ke li devus serĉi la vojojn tien, fine li estus sen nutraĵoj kaj daŭrus kelkajn

semajnojn, ĝis kiam estus starigitaj la loĝejoj kaj havigita la provianto, tiel, ke oni tiam povus komenci la produktadon. Se tie estus telefonoj aŭ telegrafoj, li povus demandi antaŭe. Sed, ĉar ekzistis neniuj komunikiloj por povi antaŭe interkonsentiĝi, la *contratista* devis transpreni la riskon marŝi kun siaj viroj al plantejo por kapti aŭ grasan kontrakton aŭ magran aŭ tute neniun. Li havis bonajn rilatojn kun la grandaj kunaĉetistoj kaj agentoj de ĉiklo, kiuj en tiu momento tamen estus utilaj al li nur tiukaze, se li povus telegrafi. Sendi heroldon kun leteroj daŭrus tri aŭ eĉ kvin semajnojn; kaj antaŭ ol venus respondo, pasus denove kvin semajnoj. Ĉion ĉi *don Severo* ŝajne sciis sufiĉe bone, kaj tial li havis *don Remigio*-n tiel bone en la ungoj, ke li povis ludadi kun li.

Don Severo ĉesis la zigzagadan notadon. Estis malfacile diveneble, ĉu li efektive elkalkulis ion aŭ nombrojn ŝovis nur tien kaj tien por vekigi la impreson, kvazaŭ li devus elkalkuli precize ĝis la lasta centavo tion, kion li povus pagi, dum li atendis en vero nur la momenton, kiu malkaŝos la malforton de lia kontraŭulo. Eble eĉ liaj du fratoj ne precize povus diri, kion li faris kaj kiel li pensis.

„*Bueno, don Remigio*“, li diris, furioze ĵetante la krajonon, per kiu li kalkuladis, sur la tabloplaton. „*Bueno*, mi pagos al vi rondigitan sumon de dudek kvin mil pesoj por via kontrakto.“

Kun la dudek procentoj, kiujn la *contratista* postulis, la sumo, kiun li atendis, estis tridek tri mil kaj kvincent tridek ses pesoj. La diferenco estis do ĉirkaŭ okmil kaj kvincent pesoj.

Severo ne atendis respondon. Li tiris la ĉeklibron el sia malantaŭa pantalonpoŝo kaj diris: „Mi tuj skribos ĉekon, *don Remigio*. Kiu estas via estimata familia nomo? Ha jes, mi rememoras, *Gayosso, don Remigio Gayosso*."

„Sed aŭskultu, *don Severo*", diris la *contratista* kun perpleksa voĉo. „Por tio mi ne transdonos la kontrakton." „*Bone, muy bueno*, *don Remigio*, jen do retenu ĝin por vi. Ĝi estas tro multekosta." *Severo* klake fermis la ĉeklibron kaj reŝovis ĝin en sian pantalonpoŝon.

Don Remigio, kiu tiom longe supozis, ke la fratoj *Montellano* nepre bezonus lin, ĉar ili sen li ja ne havus virojn, eksentis sin metita en la neceson intertraktadi. Li faris tion preskaŭ timide.

„Kiel mi diris al vi, *don Severo*, kun la provizoj de mahagono kostas min la kontrakto ĉirkaŭ dudek ok mil pesojn. Mi ne plu parolos pri la dudek procentoj. Sed la dudek ok mil pesoj pagendas."

„Tiukaze ni ja jam ekproksimiĝas", diris Severo. „Mi ne devas aĉeti la kontrakton. Mi elsendos miajn fratojn, kaj vi povas fidi al mi, *don Remigio*, ke ili revenos post dek semajnoj kun cent kvindek *muchachos*, kiuj kostos al ni apenaŭ la duonon de tio, kion pagis vi por la viroj. Ni scias, kiel havigi la virojn, kiujn ni bezonas."

„Certe, tion vi scias", diris nun *don Leobardo*.

„Ne estas necese, *don Leobardo*, diri tion tiel ironie", respondis *don Severo* trankvile, enverŝante komitekon en sian glason. „Se

mi bezonas *muchachos*, tiukaze mi devas havigi ilin. Tio okazas ankaŭ al vi tiel. Sen *muchachos* vi ne povas produkti mahagonon, tiel kiel ni. Se reĝo volas komenci militon, li bezonas soldatojn; kaj se li ne povas kapti soldatojn per flataj vortoj, pro la honoro rajti batali por la patrio, tiukaze li kaptas ilin per la minaco, ke li mortpafigos ilin, se ili ĉiuj libervole ne venos kaj ne vivukrios hurae lin kaj la militon. Ni aĉetis la monterion kun ĉiuj koncesioj kaj bezonas *muchachos* tiel, kiel reĝo bezonas soldatojn. Kie estas la diferenco? Diru tion al mi, *don Leobardo*. Per si mem la *muchachos* ne venos kaj ne petos min pri tio rajti labori por la mahagono. Kaj, ĉar ili ne venos mem, mi devos havigi ilin, tiel aŭ tiel."

„Ekzistas diversaj manieroj havigi ilin", diris nun *don Rafael*, la maljuna librotenisto.

„Ĝuste, sinjoro, tre ĝuste. Tial mi ja volas aĉeti ĉiujn kontraktojn ĉi tie sen demandi, kiel la *muchachos* venis ĉi tien, ĉu ili venis libervole ĉu ne." *Don Severo* rigardis al siaj fratoj, kiuj sidis sur la alia tabloflanko antaŭ li. Ili pli proksimigis siajn kapojn tiom, ke ili povis flustri reciproke orelen.

Tio estis nur komedio, ĉar dotamen faris tion, kio plaĉis al li, sen demandi siajn fratojn pri konsilo. Sed ĝi aspektu tiel, kvazaŭ li nun rilate al sia oferto pli senĝenite kaj pli bonvoleme povas cedi iom al *don Remigio*, sen perdi ion de sia komercista honoro.

„Vi ne pensu, *caballeros*, ke ni venis ĉi tien por tratranĉi ĉies kolon", li diris, transirante al sia nova propono.

„Tion oni ne scias tiel precize“, *don Leobardo* ironie obĵetis.
„Kiel vi opinias tion, *don Leobardo*?“ demandis Severo.

„Mi volis diri per tio, ke oni ne scias tiel precize, kial vi estas ĉi tie, ĉu por tratranĉi kolojn aŭ por strangoli gorĝojn.“
Don Severo ŝajne ne ĉagreniĝis pri tio. Eble li rigardis tion eĉ kiel laŭdon. Li diris: „*Don Leobardo*, vi estus la lasta, kiun mi strangolus.“

„Ĝuste“, ridante diris la administranto. „Mi ja ne devas fari negocon kun vi. Mi transdonas al vi nur tion, kion la kompanio vendis al vi; kaj ĉar la *contratistas* ja ankoraŭ nun estas la *contratistas* de la kompanio, mi kompreneble havas intereson pri tio, kiel okazas la transdonado.“

Returnante sin al *don Remigio*, diris *don Severo*: „Vi diras, ke la vera valoro de la kontrakto estas sume dudek ok mil pesoj, ĉu?“

„Tion mi diris, *don Severo*.“

„Mi ofertis al vi dudek kvin mil pesojn. Nu, ni ne estas ĉi tie por ŝteli la kontraktojn. Sed demandon mi ankoraŭ havas pri tio.“

„*Bueno?*“

„Vi havas du *capataces*, du subestrojn, *don Remigio*, ĉu?“
„Tri.“

„Ĉu tiuj konas siajn distriktojn kaj la provizojn?“

„Tiel bone kiel mi.“

„Ĉu ili restos ĉi tie?“

„Du el ili certe. Sed unu el ili iros kun mi. Li estas mia plej maljuna *muchacho*. Tiu ĉe neniu restus, krom ĉe mi.“

„Do, la du aliaj restos, ĉu?“

„Tion mi garantias. Ili ankaŭ ne povus foriri tiel simple, ili havas tro multajn antaŭpagajn ŝuldojn. Unu el ili nomiĝas Ambrosio. Li drinkas, kiam li venas al la *oficinas* kaj taŭgas por nenio. Sed en la *semaneo* li meritas sian salajron. La alia nomiĝas Emeterio, li estas tre fidinda. Li plej bone konas la distrikton kaj estas bona haviganto pri la viroj.“

„Vi volas diri per tio, ke li elpremegas eĉ la lastan fortostreĉan joton el la viroj, ĉu?“

„Iel tiel mi volis diri tion. „Sed Ambrosio estas eĉ pli senskrupula.“

„Kaj pli brutala“, objĵetis *don Leobardo*. „Li estas turmentulo kaj certe estis iam torturisto ĉe la *rurales aŭ* ĉe unu el la neleĝaj nigraj tribunaloj de la kaciko.“

„Nu, tion mi aŭskultas volonte. Mi bezonas lertajn kaj spertajn virojn por la havigado de mahagono.“ *Don Severo* plenverŝis novan glason. „Jes ja, mi bezonas kapablajn virojn. Mi havas eĉ ne unu palison da mahagono en la haveno ĝis nun; ĝuste nur

tion, kio momente havigeblas ĝangale. La *muchachos* devos tre streĉi la muskolojn.“

„Ek do!“ diris *don Rafael* kun larĝa rikano. Ankaŭ li altiris la botelon kaj trinkis.

„Bone, do, *don Remigio*, por ke ni atingu la finon.“ Severo enspiris. „Konsiderante tion, ke mi povas reteni la du *capataces* ĉi tie, kiuj helpos al mi, en ordo, mi do altigos la sumon je dek procentoj, anstataŭ dudek kvin mil pesojn, mi diru do dudeksep mil kaj kvincent pesoj kontante.“

Don Remigio silentis dum certa tempo. Li ne kutimiĝis pri longa intertraktado. Ĝi faris lin laca. La plej dura laboro en la ĝangalo ne povis lacigi lin je duono tiom, kiom horo da intertraktado kun viroj, kiuj ne bonvolemis pagi prezon, kiun li rigardis justa. Li sciis, ke li verŝajne povus premegi mil pesojn plu el la kontrakto; ĉar la fratoj Montellano bezonas la virojn kaj sen viroj povus fari nenion. Sed samtempe li ankaŭ bone konsciis pri tio, ke li havus rilate la ĉiklokontrakton simile tiom da malfacilaĵoj.

„*Aceptado*, akceptite!“ li diris koncize.

Don Severo tuj subskribis la ĉekon por malhelpi, ke *don Remigio* eble ankoraŭ ŝanĝus la opinion.

La aliajn *contratistas* li traktis pli rapide. Ili havis multe malpli da viroj, malpli da provizoj kaj malpli multajn antaŭpagajn sumojn je sia favoro. Ilia pozicio kiel *contratistas* estis malpli forta ol tiu de *don Remigio*. Al ili restis nur unu malfermita vojo, se ili ne akceptus la prezon, kiun *don Severo* ofertis al ili. Kaj tio

estis, restadi plu tie. Sed, ĉar ili ne volis akcepti tion, ili devis cedi al li. Ĉe ili la propono, konduki la virojn al *Quintana Roo*, efikus nur ridindige.

Elkalkulante, kiom li pagis por la kontraktoj, *don Severo* trovis, ke li pagis en ĉiu rilato sub la prezo. Havigi sufiĉe da viroj dum mallonga tempo ne estis tiel simple, kiel li asertis. Tio povus daŭri monatojn. Kaj dum tiu tempo ne estus hakita mahagono. Sed la vera gajno estis tiu, ke la fratoj *Montellano* transprenis samtempe kun la kontraktoj grandajn provizojn da mahagono. Kiam tiuj provizoj foje fine estus en la haveno, tiam ili enspezigus tiom, ke la fratoj ricevus jam nur por la aktualaj transprenitaj provizoj la duoblon, ja la trioblon – aŭ eĉ la kvaroblon de tio, kion ili pagis entute por la kontraktoj. Dependis nur de la merkata prezo. Sed intertempe oni eĉ havigus kaj plu havigus lignon, kaj ĉar ĉiuj viroj havis antaŭpagajn ŝuldojn, tiom altajn, ke ili devus labori por tio unu, du, aŭ eĉ tri jarojn, antaŭ ol ili ricevus iun salajron, sub la kondiĉo, ke ili ne plu altigos siajn antaŭpagajn ŝuldojn, tial ĉiuj elĝangaligitaj mahagontrunkoj de tiam estis pura gajno. La fratoj *Montellano* povis atendi, ke dum jaro estos perlaboritaj ne nur ĉiuj sumoj, kiujn ili pagis por la kontraktoj, sed eĉ aldone la kontanta kapitalo, kiun ili investis por la monterioj kaj la koncesioj.

Rimarkoj

Cachito = La malgranda (frato) en la kunteksto

rurales = *Guardia Rural,* sub diktatoro Porfirio Diaz federacia rura kavaleria kaj ĝendarma policoj, neregularaj helptrupoj,

semaneo = laborloko

6/4

Kiam ŝajnis, ke ĉiuj negocoj estas fintraktitaj, estis preskaŭ noktomezo.

Don Severo oscedis kaj plenigis novan glason. La plimulto de la *caballeros* agis simile.

Unu el la ĉinoj envenis kaj diris al la administranto: „*Don Leobaldo*, mi supozis, ke la *caballelos* eble volas tlinki kafon. Ĝi estas pleta."

„Ĉinĉjo", vokis *don Rafael*, „mi honorus vin per ordeno, se mi estus *El Caudillo*."

„Ne necesas, *don Lafael*, ne necesas", diris ridante la ĉino. „Mi plefelas de la *caballelos* enkasigi dek centavojn pol ĉiu taso, kiun ili tlinkos. Ĉiu taso pol dek centavoj, *caballelos*."

„Alportu do la kafon kaj notu ĝin", diris *don Leobardo*.

„Kompreneble, sinjoroj miaj." *Don Severo* turnis sin al ĉiuj, kiuj tie sidis en la *comedor:* „Estas memkompreneble, ke vi rajtas rigardi la *oficinas* kiel vian domon, tiom longe, kiom komplezos al vi."

„Nur ĝis morgaŭ, kun via permeso, *don Severo*", rediris la administranto.

„Ni havas la intencon morgaŭ konduki la bestojn el la prerio ĉi tien, ni volas laŭordigi la selojn kaj enpaki niajn havaĵojn."

„Tiom longe, kiom vi deziras, *caballeros*, nin vi ne ĝenas“, diris ankoraŭfoje *don Severo*. Li povis diri tion, ĉar li sciis, ke maksimume post du tagoj neniu plu estos tie.

6/5

Dum la fratoj *Montellano* intertraktadis kun la *contratistas*, la *caballeros* ne sidadis tiel, kvazaŭ ili troviĝus en preĝejo. Por tio la preĝoj de *don Severo* ne estis sufiĉe gravaj. Ĉe flanke alŝovita tablo komencis la pli junaj dungitoj viglan ludon per kartoj. Kaj neafliktate pri tio, kio momente okazas ĉirkaŭ ili, ili daŭrigis la ludadon fervore, nur interrompite de la ofta plenigado de glasoj. Ĉe la alia flanka tablo oni ĵetkubadis. Pri kio oni ĵetis la kubojn, oni ne povis aŭdi ĉe la ĉeftabloj. Kaj eĉ tiu, kiu sidis proksime ĉe ili, sed kun la ludantoj ne estis en rilato, apenaŭ scius certe, ĉu oni ĵetis la kubojn por certaj knabinoj aŭ por certaj muloj, kiujn rajdi sur la retrovojo la gajnonto havu la antaŭrajton. Cetere, oni dum la tuta vivo ne tro zorgu pri tio, pri kio oni ludas, sed multe pli pri tio, ke la ludantoj ludu honeste.

Don Acacio, la plej juna el la fratoj *Montellano*, ŝajne estis malpli interesiĝanta pri la negocoj, kiujn deruligis lia pli aĝa frato je la kontenteco de ĉiuj, ol pri alia kontrakto, kiun li volonte rigardus kiel fiksan kapitalon de la monterio, kaj tial esperis povi transpreni sammaniere kiel la laboristojn de la kontraktoj, la metiistojn, la bovojn, la mulojn kaj la konstruaĵojn.

Li trankvile lasis intertraktadi sian fraton kun la lasta el la *contratistas*. Kaj kiam li vidis sian fraton enprofundiĝintan en la intertraktadon kaj *don Feliks* momente ŝajne ne tre atente observis lin, li turnis sin kun intima vizaĝo al la administranto:

„Aŭskultu, *don Leobardo*, kio fariĝos el la knabinoj, kiujn vi kaj kelkaj el la *caballeros* havas en viaj bangaloj? Tiujn vi ja lasos al ni ĉi tie, ĉu? Mi volonte transprenus la grandan brunharan inon, kiu estas ĉe vi.“

„Vi, *don Acacio*, volus transpreni ilin, ĉu? Tion mi povas imagi. Estas domaĝe, ke vi ne kunprenis iun de *Villahermosa* aŭ de El Carmen aŭ de Frontera. La inoj ĉiuj iros kun ni al Jukatano. Ni ankoraŭ ne scias, kiel tie estos en tiu rilato; kaj ni ne volus tro fidi pri Fortuno. Kion oni havas, tion oni scias, sed kion ni eble ricevos tie, ni ne scias. Kaj kion viro bezonas, tion li devas havi. Des pli, ĉar mi ne havos multe da tempo dum la unuaj monatoj en Jukatano por sukcese ĉirkaŭrigardi pro kelkaj helpantinoj. Mi ĉiukaze kunprenos miajn du malsanulflegistinojn. Mi kutimiĝis pri ili, kaj ili pri mi. Sed mi konsilas al vi eble provi atingi ion ĉe la pli junaj *caballeros*, kiuj havos pli da tempo kaj emo fiŝhokadi ol mi. Eble iu ankoraŭ bezonas iom pli da vojaĝmono aŭ havas en la *tienda* ŝuldon sur konto, povas esti, ke li tial cedos siajn akiritajn kaj perlaboritajn rajtojn kontraŭ laŭa kvitigo. Se ne, vi devos komisii iun el la turkoj, por ke li liveru iun je la sekva fojo, kiam li revenos. Li postulos komisian pagon, sed de tempo al tempo la livero indas la komision. Ĝis tiam restos al vi neniu alia eblo krom ĉirkaŭrigardi en la *aguardiente*-kabanoj, ĉu troviĝos tie iu ino por ĉeokaza refreŝigo de viaj perdiĝantaj kapabloj pri saniga dormo.“

Don Acacio ekstaris kaj iris al la flankaj tabloj por interparoli kun la pli junaj skribistoj.

Li ne estis longe tie, kiam *don Eladio* saltis supren kaj laŭte vokis: „Kion vi pensas, kiu mi estas? Ĉu sklavkomercisto? Aŭ *pa-*

trote, kiu komercas putinojn? Lasu min en paco, mil sakroj, pri viaj diodamnitaj porkaĵoj! Kion vi pensas, kie vi estas, *cabrón?*“

„Ĉu *cabrón*? Kaj tio al mi? De tia fikavida filo de skabia hundino? Ĉu al mi?“ Sed tiumomente *don Acacio* jam eltiris sian revolveron kaj pafis dufoje.

Don Eladio estis same tiom rapida, kaj ankaŭ li pafis dufoje. Sed ĉar la ceteraj junaj *caballeros*, kiuj sidis ĉe tio, kutimiĝis pri tiaj negravaj okazaĵoj, tial ili kaptis en tiu momento, kiam ili ekvidis, ke du revolveroj estas eltiritaj kaj tenataj alte, la du ekscititajn batalantojn ĉe la brakoj kaj tiris ilin flanken, tiel rapide, ke la kugloj kaptiĝis en la palmtegmento. *Don Severo* ekstaris sen hasto, ĵetis notfolieton kun zigzagaĵoj, kiun li ĵus tenis mane, per emfaza gesto sur la tablon kaj aldone sian krajonon, poste li pugnobatis sur la tablon kaj kriis transen al Acacio: „Pro Jesuo Kristo kaj pro plifoja diodamnita fulmotondro! Ĉu vi, pepanta koketo apenaŭ glitinta el la ovo, ne povas sidi eĉ nur unu minuton inter honestaj *caballeros* kaj drinki duonon de litro da *aguardiente* sen pafadi ĉiudirekten kiel freneziĝinta preria indiĝeno? *Dios sabe*, sole Dio en la ĉielo scias, kiom multe ni eble bezonos tiujn diodamnitajn rarajn kartoĉojn, kaj vi ekpafas ilin al la *compañeros,* kiuj morgaŭ foriros laŭ sia vojo. Mi devus vangofrapi vin! *Burro*, malgaja azeno! Remetu la kanoneton kaj sidiĝu sur via postaĵo kaj lasu nin ĉi tie en paco!“

„Vi ne rajtas komandi min pri io, ĉu vi komprenas!“ vokis *don* Acacio. „Tiuj diris '*cabrón*' al mi kaj '*patrote*'.“

„Kaj kion ankoraŭ?“ demandis *don Severo* ironie. „Ili ja pravas, ke ili diris tion al vi. Ili ŝajne bone konas vin. Cent *cabrones* vi

validas. Nu, cetere, kio alia krom tute malsatigita *patrote* vi estis, kiam mi kolektis vin de la stratfeĉo. Sidiĝu kaj fermu la babiltruon.“

„Kion vi diras al mi?“ vokis *don Acacio*. „Al mi, ĉu? Vi min kolektis de la strata feĉo, kie do? Se mi ne estus havinta la monon, kiu estus doninta al vi eĉ nur centavon?“

„Enlitiĝu, vi estas tute ebria“, diris *don Severo*, dum li sidiĝis por daŭrigi la intertraktadon.

Sed *don Acacio*, foje koleriĝinte, ekscitiĝis pli kaj pli: „Ĉu ebria, mi? Kaj kiu alia porko volas diri al mi, ke mi ne kapablas trinki?“

Per hasta movo li reeltiris la revolveron. Li pikumadis per ĝi en la aero, sendecide pri tio, kiun li mortpafu. Kelkajn paŝojn li retroiris kaj havis ĉiujn *caballeros* antaŭ si.

Don Severo estis la ununura, kiu ne perdis la trankvilon, kaj kiu ne lasis timigi sin, li nur parte rektiĝis de sia sidloko, prenis botelon, kiu staris antaŭ li kaj ĵetis ĝin per forta kaj bone celita movo tiel, ke ĝi trafis tiel forte la revolveran manon de Acacio, ke solviĝis pafo, sed samtempe ankaŭ la revolvero falis teren. La kuglo trabatis la vandon.

Rimarkoj
burro = azeno
(Solo) Dios sabe = (Nur) Dio scias

6/6

Don Eladio, kiu staris plej proksime, saltis rapide tien kaj levis la revolveron, dum *don Acacio* ŝanceliĝante falis vanden. Tuj poste oni aŭdis ekstere terure kviki porkon, kaj en la sama momento oni perceptis la kriĉadon kaj kriadon de unu el la du ĉinoj: „La polko estas moltpafigita, nia plej bona polko estas moltpafigita."

La porko ekstere proksime ĉe la vando volis pasigi la nokton. Tie estis ŝlimo, kiu ekestis pro tio, ĉar ĉiuj *caballeros*, kiuj lavis siajn manojn en la *comedor,* verŝis la akvon sur tiun lokon proksime de la vando, kiam ili malplenigis la pelvon de la lavtabureto. En tiu ŝlimo la porko dormis ĉiunokte kaj ĝi tre bonfartis dum tio. La loko estis des pli dezirata de ĝi, ĉar ankaŭ ĉeokaze kelkaj tortiljoj, pecoj de pano, malbone prironĝitaj ostoj ĵetitaj tra la vanda malfermaĵo fare de la manĝantoj preskaŭ falis antaŭ la piedojn de la porko tiel, ke ĝi ne devis promeni longe por kapti la bonvenigatajn manĝaĵojn. La kuglo estis tiel mispafita, ke ĝi trabatis la vandon je la suba finaĵo kaj trafis la kompatindan porkon, kiu tute senkulpis pri la kvereloj, en postparton. Ne estis vivdanĝera vundo. Sed por la ĉinoj la porko estis perdita; ĉar ĝi ekde tiam sur vojaĝo ne plu povus esti pelata tra la ĝangalo. Kaj por ŝarĝi ĝin sur la dorson de mulo, ĝi estus tro peza, tute sendepende de tio, ke tio estus ridinda kaj, ke *don* Leobardo certe rifuzus cedi fortan mulon por tia transporto.

La ĉino venis al la *comedor* kun la plej trista mieno, kiun li kapablis montri, li baraktis perbrake ĉiudirekte, batadis per la manoj la aeron kaj dancis tien kaj tien kiel ĉagrenigita derviŝo. Ĉe tio li lamentis kaj hurletis, sed li sciis diri nenion alian krom:

„Ho ve, mia kompatinda, kompatinda polko kaj ĝi devis molti tiel mizele. Ho ve, *mi poblecito cochinito,* kaj ĝi devas nun tiel kluele telule molti. “

Ekstere, evidente kaŭrante ĉe la porko, ĝin karesante, oni aŭdis lamenti kaj veplendi la alian ĉinon. „Vi, nia ĉielo kaj nia tuta liĉo. *Muchacho*, ve, *dulce muchacho*, ho, kala knabineto, ni tiom bone flegis vin, kaj nun vi devas tiom mizele pelei. Ho, *muchacho, muchacho!*“

„He, ĉinĉjo“, diris ridante *don Rafael* kaj imitante la parolmanieron de la ĉino: „Ĉu vi kunaĉetis ankaŭ la *celdo*-n, vian *muchach*-on, mi celas vian kompatindan polkon, en la asekuro, pol ke, ĝi estu enteligita en Ĉinio?“

„*Don Lafael*“, diris la ĉino malgaje: „Mi estas tiom deplimita, kaj vi nun ankolaŭ povas dili eĉ mokvoltojn.“

„Finon al la funebra solenaĵo!“ vokis *don Leobardo* trans la tablon. „La porko estas finita, kaj tio estas bone tiel. Plej bone, ĉinĉjo, ke vi buĉos ĝin tuj, kaj ne atendos ĝis la matena krepusko. Tiukaze ĝi perdus tro da sango. Tiel ni ja ankoraŭ finfine ricevos aŭtentikan adiaŭan manĝon, tian, kian vi ŝuldas al ni, ĉinĉjo.“

La ĉino eligis profundan ĝemon, kvazaŭ li volus akcepti la neeviteblan sorton kun la digno de freŝe farita vidvino. Li brue elspiris tra la nazo kaj diris: „Eble vi plavas, *don Leobaldo*. Atendi ĝis la matena klepusko, tio estus tlo malfrue.“

Li eliris, kaj oni aŭdis paroli lin ĉinlingve kaj ekscitite kun sia negoca partnero. Ili ŝajne post certa tempo interkonsentiĝis pri ĉio; ĉar la ĉino revenis en la manĝejon kaj diris: „*Caballelos*, estas bone, molgaŭ ni havos glandan adiaŭan manĝon kun ĉio tio, kion bona polko povas liveli. Sed, mi devas tle bedaŭli, *caballelos*, ke molgaŭ mi devos plikalkuli po vilo peson pol ĉiu manĝo. Pol malpli mi ne povos fali tion. Sed mi plomesas, ke la manĝoj, kiujn mi molgaŭ sultabligos al vi, estos multe pli valolaj ol peso."

„Nu, bone", ni pagos al vi peson." *Don Leobardo* konfirmis tion al li. „Kaj nun ne faru stultaĵojn, *ĉinito*. Ne kunprenu la freŝan viandon por la vojaĝo, alikaze ni havos ĉiunokte jaguarojn ĉirkaŭ la kampadejo. Morgaŭ tuj detrancu ĉion, kio postrestos kaj pendigu ĝin, por ke ĝi sekiĝu. Ĝi ne tute elsekiĝos ĝis la venonta tago, sed estos tiel pli sekure. Kaj tiukaze ni havos bonajn manĝojn ankaŭ survoje."

„*Muchas glacias, don Leobaldo*. Pli tio mi ne pensis. Jes ja, la jagualoj pelsekutas la fleŝan viandon kiel la muŝoj.

Con su pelmiso, mi nun buĉos la kompatindan polkon. Tio min tle tle dololigas. Sed mi pensas, ke ankaŭ la polkon la kuglo postaĵe dololigas kiel al mi mia sufelo en la blusto." Li elkuris kaj ordonis al sia kunlaboranto rapide liberigi la porkon de ties surteraj doloroj.

Rimarko
Con su pelmiso = *Con su permiso* = kun via permeso

6/7

En la *comedor* fariĝis trankvile post la interparolado kun la ĉino. *Don Acacio* sidis, tute profundiĝinte en sin mem kaj kun fihumuro denove ĉe la tablo. Li sidiĝis al la fino de la benko, ĉar li certe sciis, ke li havus malfacilaĵojn grimpi trans la mezon de la benko sen fali sub la tablon. Nova glaso, plenigita per komiteko, staris antaŭ li. Ĝi estis jam la dua ekde la batalo pri lia honoro. Sed la unuan unu el la dungitoj plenigis je kvar kvinonoj per akvo kaj nur la restintan kvinonon per komiteko. Sed oni povis mistifiki neniun el la fratoj *Montellano*, tute egale, per kio oni provus tion. *Don Acacio* metis la glason nur buŝen, jen li jam sciis, pri kio temas kaj kion celis la bonvolema trinkkunulo. Li prenis la glason kaj ĵetis ĝin kun la tuta enhavo tra malfermitaĵo en la vando. „Tion neniu ĉi tie povas permesi al si rilate al *Cachito*, *soy muy macho,* mi estas aŭtentika viro, kun haroj sur la brusto. Mi scias, kio estas komiteko, kaj kio estas nur pisaĵo.“ Li parolis tion ne dum unu elspiro, sed kun interrompitaj frazoj, sed la ĝustan vortordon li tamen redonis. „*Cabrones*, he, kie je infero kaj Satano estas mia *pistola*, mia revolvero?“ Li palpe serĉis ĝin malantaŭ si kaj malkovris, ke oni forprenis lian 'kanonon'.

„*Cállate!* Tenu fermita vian buŝon, *Cachito*!“ vokis *don Severo*. „Suĉinfanoj ne ludu per lumo kaj tondiloj, kaj tiu, kiu estas tiel ebria kiel vi, ne plu bezonos pistolon. Ek, enlitiĝu!“

„Mi enlitiĝos mian diodamnitan liton, tiam, kiam mi volos. Kaj mi lasas komandi min de neniu ajn, eĉ ne de vi, eĉ, se vi estus efektive mia frato.“

„Ankoraŭ unu plia vorto“, vokis *don Severo* koleriĝinte, „jen mi frakasos tiun botelon sur via kranio tiel, ke eĉ via propra patrino ne plu penus levi vin.“

„Merdo, ke patrino. Ŝi delonge forŝteliĝis transmonden aŭ la diablo sciu, kie ŝi estas kaj kun kiu ŝi kuŝadas. La botelon al mi, mi diras! Se mi volas drinki, tiukaze mi drinkos, kaj se mi volas pafi, jen mi pafos. La sekvan fojon estos ree porko, sed porko sur du gamboj.“

Li rektiĝis, iris paŝon laŭ la tablo kaj ŝovis botelon al si. Li metis la botelon al la buŝo kaj plenverŝis sian faŭkon.

Poste li remetis la botelon kun laŭta bruo surtablen, rektiĝis tute vertikale, plenblovis la bruston, frapis per ambaŭ manoj sur ĝin kaj kriis: „*Muy macho soy yo!* Mi estas aŭtentika viro! Kaj se mi volas drinki, jen mi drinkos. Kaj mi kiel trinkanto sendos vin ĉiujn subtablen. Ĉi tien do venu tiu, kiu sopiras freŝe gisitan kuglon inter la ripoj. Kie estas mia kanono? Mil damnoj! Mi volas havi mian pistolon!“

„Feliks“, vokis *don Severo* al sia frato. „Surnukigu la koketon kaj portu ĝin al ties nesto!“

Feliks ekstaris kaj proksimiĝis al Acacio.

Vidante lin proksimiĝi, li denove ekkoleriĝis: „Unu paŝon plu proksime, kaj okazos al vi tiel, kiel okazis al la porko! Mi buĉos vin. *Soy muy macho y muy bravo*. Mi estas aŭtentika viro kaj kuraĝa, la plej kuraĝa el ĉiuj, ĉu vi komprenas tion, *cabrón* kaj hundido, kiu vi estas!“

„Kondutu dece ĉi tie inter la *caballeros, Cachito!“* diris *don Feliks* trankvilige.

„*Caballeros,* ĉu? Merdo! Ili ĉiuj estas filoj de putinoj!“

„Pli bone estus, se vi irus en vian lulilon kaj eldormus, *Cachito.*“ *Don Feliks* kroĉigis *don Acacio*-n subbrake, por konduki lin eksteren. *Don Acacio* retropuŝis sian fraton tiel, ke li ŝanceliĝis kontraŭ la vando. *Don Feliks* pri tio ne ĉagreniĝis. Li nur ridis. Poste li reproksimiĝis al *don Acacio* kaj batis lin tiel emfazite sur la orelojn, ke li renversiĝis kaj fulmrapide ruliĝis en angulon de la *comedor,* kie li ekkuŝis kiel bulo.

„Nu, levu do finfine la mizerulon, Feliks“, diris *don Severo* „kaj forbaru lin, por ke mi ĉi tie foje povu fini mian negocon.“

Don Feliks levis la kuŝanton de la tero kaj trenis lin eksteren en la nokton.

„He, ĉinĉjo“, oni aŭdis voki lin ekstere, „donu foje lanternon al mi, por ke mi trovu nian bangalon!“

ĈAPITRO 07

7/1

Fariĝis noktomeze.

La *caballeros* oscedis kaj etendis la membrojn. La botelojn oni esploris ĝis la lastaj gutoj, kiuj ankoraŭ eligeblis por plenigi glaseton. Por ĉiu troviĝis ankoraŭ laŭorda glutaĵo por la nokto.

Antaŭe, antaŭ la *comedor*, oni aŭdis ambaŭ ĉinojn manipuladi sian porkon. Ĝi kaŭzis multe da laboro; ĉar ĝi apartenis al la hararkovrita speco, de kiu oni detiras la felon ĉe la buĉado, aŭ kiun oni devas eĉ eltranĉi, se la senhaŭtigo ne glate funkcias, kiel tio ofte okazas.

„*Hasta mañana!* Ĝis morgaŭ, *caballeros*!“ diris *don Severo*, dum li pigre etendis sian pezan korpon. „Ankaŭ mi nun kuŝigos min sur mian rimenmatracon. Mil damnoj! Mi estas sufiĉe laca.“

„*Hasta mañana, don Severo!*“ respondis la *caballeros* kaj dormeme retiriĝis el la *comedor* por rampi en siajn bangalojn.

Sen esti invititaj, sed sekvante instinkton, ili ĉiuj kolektiĝis en la bangalo de la administranto, kiu aperigis botelon kun komiteko kaj konsilis al ĉiuj ankoraŭ ĝue sorbi lastan gluteton.

„Jen fajna bando, tiuj fratoj!“ diris *don Mariano*. „Ili traskuos la monterion.“

„Tion mi povas ĵuri al vi“, konfirmis *don Rafael*, „tion mi povas ĵuri. Ili certe traskuados la monterion. *Por Madre Santisima,* de kie ili nur venis? Ili certe apartenis iam al la plej malsuba rango de *arrieros*, de mulopelistoj.“

„Ĉu apartenis?“ ripetis *don Leobardo* ironie. „Ĉu nur apartenis, *caballeros*? Tiuj ankoraŭ nun apartenas al ili, kaj ankoraŭ nun ne estas io alia krom mulpelistoj kaj certe neniam fariĝos io alia, eĉ se ili enspezus milionojn da pesoj.“

„Mi volus scii nur, kiel ili volas mastrumadi la tri monteriojn sen *contratistas*?“ opiniis *don Rafael*. „Simple, tiel, kiel ili planas tion, kaj eĉ kun grasa gajno“, diris *don Leobardo*. „Ili alvenis ĉi tien kun ses *capataces* , kiujn ili bone konas, kaj kun kiuj ili jam laboris dum la du lastaj jaroj. Tiujn ses ulojn vi devas foje rigardi.“

„Mi vidis ilin hodiaŭ posttagmeze“, interdiris *don Eladio*. „Ili ne estas nur fiaj kaj malicaj subestroj , tiaj, kiaj *capataces* eble estas. Ili estas ekzekutistoj, veraj ekzekutistoj.“

„Vi bone observis tion, Eladio“, koncedis *don Leobardo*. „Ili, ĉiu el ili, voros dum dek du monatoj almenaŭ tridek *muchachos* kun haŭto kaj hararo. Sed ili havigos mahagonon, tio estas certa. Kaj kun la *capataces*, kiuj plu restados ĉi tie kaj ne forvojaĝos kun siaj *contratistas,* la fratoj *Montellano* havos bonan kaj fidindan stabon. Ili pagos al la *capataces* peson kaj kvindek centavojn ĉiutage. Kaj krome ili havos en ĉiu *semaneo* ĉef-*capataz*-on, al kiu ili donos po kvindek centavoj por tuno da liverita mahagono, kaj la dua *capataz* ricevos por ĉiu tuno realon. Ili ja zorgos pri tio, ke oni produktu mahagonon, pri tio

certu, sinjoroj miaj. Al la *contratistas* ili po tuno devus pagi dek pesojn, kaj al la *capataces* ili pagos kvar realojn al la unua kaj unu realon al la dua, tio estas sesdek du centavoj por ĉiu tuno anstataŭ dek pesoj. Kaj la *capataces* forkisos por tiu eta dividendo, kiun ili povos enspezi, la kotkruston de la nuko de la fratoj kaj estos obeemaj kaj fidelaj, se la *contratistas* volus havi sian propran volon kaj ne lasus komandi sin."

„Sed kiel longe tio iros tiel, tion scias nur la dioj", diris *don Rafael*.

„Sed intertempe la fratoj plenigos grandan sakon da mono, kaj se la radoj de la negoco ekgrincos, ili retiriĝos. Sed kial tio koncernu min? Mi plantos sisalon. Estos foje io alia, malsama al la jaroj en la ĝangalo, kie oni povas fariĝi nur freneza, kaj tage kaj nokte estas ĉirkaŭata de fantomoj." *Don Leobardo* sidiĝis sur la eĝon de sia kruda lito kaj komencis detiri siajn botojn. „Tie mi devos rajdi nur kvar horojn kaj tiam mi estos jam en urbo. Ĝi estas malgranda, ja eĉ eta, sed estas urbo. Ĉi tie mi devus rajdi tri semajnojn tra la ĝangalo antaŭ ol mi ekrigardus ion, kio povus esti urbo, se la homoj iom pli penus fari urbon el ĝi."

Li turnis sin al *don Remigio*: „Ĉu vi kunprenos vian *muchacha Javiera*, *don Remigio*?

„Kompreneble, vi ja eble ne pensas, ke mi metos la knabinon en la manojn de tiuj seksperfortuloj? Eble ŝi ne multe taŭgas kaj ŝi havas riĉan, tute skuatan vivon post si, tio certas, sed tiom mi tamen ne dolorigus ŝin, ke mi transdonus ŝin al la graco de tia, kia estas *Acacio*."

„Sed eble ja plaĉus al ŝi postresti ĉi tie.“

„Tio estus tiukaze ŝia afero, kaj mi ne transprenus kulpon. Sed ni jam interkonsentiĝis pri tiu afero. Ŝi foriros kun mi kaj tiam postrestos en Jovel, kie mi aĉetos al ŝi butiketon, kion mi promesis al ŝi. Kaj tiun butikon ŝi havu. Sed kie estas viaj du favorulinoj, *don Leobardo*?“

„Tiuj estas en la bangaleto apude. Ili nun jam delonge dormas. Mi ne aĉetos magazenon por ili. Ili ankaŭ ne volas havi ion tian. Ili preferas helpi al mi ĉe la kultivado de sisalo.“

„Tion mi nomas lojaleco kaj fideleco“, ridante diris *don Remigio*. Poste li laŭte oscedis kaj diris al siaj kamaradoj, al la cetera triopo de *contratistas*, kiuj estis ĉe li: „*Well, compañeros*, mi pensas, ke nun ankaŭ ni kuŝigu nin sur niajn tabulojn. Estas jam post la unua, *buenas noches, caballeros!*“

„*Hasta mañana, don Remigio*!“

Rimarko
Hasta mañana = Ĝis morgaŭ!

7/2

La fratoj *Montellano* aĉetis nur proksimume duonon de la ĉeestantaj muloj de la kompanio por teni la prezon malalte. Ili ankaŭ ne havus bezonon por ĉiuj bestoj, almenaŭ ne en la unua jaro. Estis ilia intenco kunaĉeti junajn bestojn de la indiĝenaj bredistoj kaj plenkreskigi la bestojn tie en la monterio, kie la paŝtejoj kostis nenion al ili.

Tial por la ekvojaĝontoj estis sufiĉe da bestoj por la rajdado kaj la portado de la pakaĵoj. *Don Leobardo* posedis ses proprajn altkvalitajn mulojn. *Don Rafael* kaj *don Mariano*, la pli maljunaj el la dungitoj, havis po tri proprajn bestojn; el la pli junaj kelkaj havis bonan rajdobeston. *Don Remigio* havis kvin, ĉiu el la ceteraj *contratistas* havis kvar.

Tamen la bestoj ne sufiĉus por transporti la grandan kvanton de la forvojaĝontoj. Al la dungitoj, al la *contratistas* kun po unu *capataz,* kiuj volis resti ĉe sia mastro kaj ne pretis labori kun la fratoj *Montellano*, aldoniĝis la knabinoj, kiuj decidis vojaĝi kun tiuj, al kiuj ili havis pli da fido ol al la novaj posedantoj.

Krome tie ankoraŭ estis ambaŭ ĉinoj, kiuj ne volis migri solaj, sed kun la granda karavano. Ili pensis tiurilate pri la pli granda sekureco, kiun ebligas la vojaĝado en granda trupo. Sed tio ne estis la ununura kialo. La alia same gravis al ili. Se ili vojaĝos kun la karavano, ili povos kuiri por la *caballeros* dum la longa veturo, kiu daŭros ĉirkaŭ tri ĝis kvar semajnojn, kaj tiel ili povos daŭrigi sian negocon sen interrompo. Kvankam *don Leobardo* kaj *don Rafael* havis siajn proprajn *muchachos*, la tielnomatajn *mozos,* kiel helpantojn kaj tial ne bezonus ricevi la manĝon fare de la ĉinoj. Sed estos pli oportune havi iun, kiu respondecigeblas por la manĝo. La ĉinoj pene kunportis sian tutan kuirilaron, kaj ili eĉ promesis, ke ili ĉiutage pretigos varmegajn sodobakaĵojn. Kiel ili intencis fari tion, estis ilia sekreto. Sed je la dua tago de la vojaĝo montriĝis, ke ili vere sukcesis surtabligi matenmanĝe kaj vespermanĝe varmegajn sodobulkojn. Tagmanĝojn dum la vojaĝo oni ne preparis.

Don Leobardo transprenis la taskon konduki la bestojn, do la ĉevalojn, mulojn kaj kelkajn grandajn azenojn, kiuj ne estis inkluditaj en la vendon, al la ĉefkomandejo de la kompanio, de kie li kunprenu ilin aŭ al Jukatano aŭ konduku ilin al la bananplantejoj de la kompanio.

Sed, ĉar la bestoj, kiujn li kunkondukis komisie de la kompanio, kaj ĉiuj bestoj, kiuj estis la posedo de la dungitoj kaj de la *contratistas*, tamen ne sufiĉus por transporti la tutan karavanon kun ĉiuj pakaĵoj kaj valizoj, oni akceptis la proponon de *don Severo*, disponigi al la vojaĝantoj aldone eĉ ĉiujn ĉi bestojn, kiujn li aĉetis por la monterio. Tiel grandanima kiel tio aspektis je la unua rigardo, la oferto kompreneble ne estis. *Don Severo* en ĉiu kazo devis sendi karavanon al Jovel por alporti necesajn varojn, kiujn oni bezonas. Tiun karavanon gvidos liaj *arrieros*. La bestoj marŝos ĉiuj sen ŝarĝo kaj oni ŝarĝos ilin nur por la retrovojo. Tial ne malavantaĝis, ke li lasis kuniri la bestojn tuj nun, kaj ĉu ili portos pakaĵojn ĉu ne, tio ne gravis. Estos ankaŭ pli bone por liaj uloj vojaĝi kun la granda karavano; estos malpli danĝere, kaj la vojo, kiu sub la tropika suno fermkreskiĝis tiom rapide, ke oni trovis ĝin post ses semajnoj nur tiukaze, se oni konis ĝin precize, nun estos elhakita per maĉetoj de la multaj *muchachos*, kiuj iros kun la karavano, kaj ĝi estos ankoraŭ malfermita, kiam la karavano de la fratoj *Montellano* revenos sur la sama vojo. Kvankam li sendube havos avantaĝojn pro tio, ke li kunsendos siajn bestojn, li tamen ne forgesis montri mienon kaj geston kvazaŭ li oferus multe nur pro helpopreteco por siaj kuncivitanoj. Tio faris plaĉan impreson al ĉiuj, kiuj nun ekveturis; kaj dum la adiaŭo postlasi bonan impreson, iutage povus fariĝi valora por li. Sed li pensis eĉ pli antaŭen. La karavano, kiam ĝi venos al Jovel tie laŭdos lian grandanimecon kaj li tre deziris gajni

bonan reputacion en tiu grava urbo, tiukaze estos pli facila por li ricevi kreditojn, se li bezonos ilin; kaj li deziris ricevi avantaĝan famon en la vilaĝoj de la indiĝenoj, el kiuj li volis logi novajn laboristojn por sia monterio. Sen lia subteno per ĉiuj bestoj de la monterio, la vojaĝontoj havus diversajn malfacilaĵojn.

7/3

La origina plano estis, ke la karavano je la dua tago post la alveno de la fratoj *Montellano* ekmarŝu tre frue. Sed tio ne eblis.

Ĉe la ŝarĝado de la pakaĵoj montriĝis, ke multaj pakseloj troviĝis en tre aĉa stato. Kaj kiam la *arrieros* nombris la bestojn, ili vidis, ke multaj bestoj ne estis kaptitaj, ĉar ili malproksimiĝis tro de la centra kampadejo. Oni devis serĉi ilin kaj tio kostis multe da mono.

Multaj bestoj, kiuj troviĝis dum semajnoj sur la prerioj, havis mordajn vundojn de jaguaroj aŭ de serpentoj kaj malfermitajn tuberojn kaŭzitajn de insektopikoj. Tiujn bestojn oni devis kuraci, por fari ilin marŝkapablaj.

La *arrieros* havis malfacilaĵojn kun la envicigo de la bestoj laŭ ties labor- kaj portokapabloj, kaj ili havis eĉ pli da peno kun la ordigo de la pakaĵoj. Krome ili malkovris, ke la nutraĵa provizo, kiun ili aĉetis por si mem en la *tienda*, estas nesufiĉa, kaj ke ili tial devis aĉeti pliajn nutraĵojn.

Du knabinoj lamentis kaj klarigis, ke ili estas malsanaj kaj ne povus elteni la vojaĝon, se oni ne atendus tri tagojn ĝis kiam ili fartos pli bone.

Kontraŭ tagmezo de la ekvetura tago fine ĉio estis plenumita tiel, ke eblis ŝarĝi la bestojn.

Don Leobardo proksimiĝis kaj trarigardis la kampadejon: „He, *muchachos*, vi bezonos almenaŭ horon kaj duonon por la ŝarĝado.“

„Jes ja, tiom da tempo ni certe bezonos, *patrono*“, diris unu el la *arrieros*.

„Tiam estos ĉirkaŭ la dekkvara, kiam ni povos ekmarŝi.“

„Certe tiel estos, *patrono.*“

„Kaj je la dekkvina ni devos halti por prepari noktan ripozejon, ĉar la nokto komenciĝos tiom rapide.“

„Certe, patrono. Tiam tiom nigros ke oni vidos nenion plu.“

„Nu, en ordo“, respondis *don Leobardo*, „tiukaze ne indos la penon, ke ni nun ŝarĝos la bestojn kaj ekmarŝos. Bone ripozu kaj ne drinku. Kaj morgaŭ matene je la kvina kaj duono ni jam marŝos! Ĉu komprenite?“

„Tio estos la plej bona, patrono“, respondis konvinkite la *arriero*.

Don Leobardo konigis sian ordonon kaj ĉiuj konsentis ĝin.

7/4

Sed tiu, kiu tamen ne konsentis, estis *don Severo*.

„*Amigo, oiga;* aŭskultu amiko mia!“ li diris al la administranto. „Se vi tiel frue ekvojaĝos, mi havos malfacilaĵojn.“

„Kial, *Don Severo*?“

„Jen forkuros de mi duono el miaj viroj kaj foriros kun via marŝkolono. Sole iri tra la ĝangalo, ili timas. Sed nun ili havos bonan okazon fuĝi. Ĉu vi ne povos atendi ĝis la oka? Tiam estos pli facile por ni kontroli la virojn, kaj mi povos superrigardi la batalkampon.“

Don Leobardo ridis: „*Don Severo*, tion vi ja devus scii pli bone, kiel tio deruliĝas dum la unua tago ĉe ekveturo de tia granda *patache*. Mi ĝojos, se ni marŝos jam je la naŭa.“

Don Severo tamen aranĝis ĉiujn antaŭpreparojn por malhelpi dizertulojn. Li vokis Felikson kaj Acacion al si. Ili manprenis la liston, sur kiu troviĝis la nomoj de tiuj, kiuj laboris tie en la ĉefa kampadejo, en la tereno de la *oficina*, metiistoj kaj peonoj.

Li starigis la homojn laŭvice, legis la nomojn unu post la alia kaj kun sia frato rigardis ĉiujn atenteme por konatiĝi al ili. Poste tiuj en la vico ricevis la komision morgaŭ je la kvina restarigi sin laŭvice, por la engrupigo al laboro. La tempon oni indikis per tio, ke *don* Feliks sonorigis sonorilon, kiu pendis en la portiko de la ĉefa *oficina*.

Kiam la laboristoj sekvamatene aperis por la laboro, la tuta tereno troviĝis jam en tumulto kaŭzita de la antaŭpreparoj fare de la ekvojaĝontoj.

Don Severo kunkolektis ĉiujn siajn laboristojn je unu flanko de la tereno, sufiĉe malproksime de la svarmanta kampadejo de la ekveturonta karavano. Tie li grupigis ilin en du partojn. Unu el la grupoj, inter ili la metiistojn, li kondukis al la *bodega,* kie ili ordigis sub lia kontrolo la deponejon kaj notis la inventaron. Tie ili ĉiuj laŭorde kunestis kaj eskapi povus neniu. La duan grupon, plej ofte peonojn, kutime indiĝenajn laboristojn, li kondukis profunde en la ĝangalon, kie li ordonis al ili haki trunkojn kaj tranĉi palmfoliojn, kiuj necesas por nova konstruaĵo.

Rimarko
patache (hisp.) = kuntekste: karavano, ekspedado

7/5

Vesperon antaŭe la fratoj *Montellano* ruze elkovis novan kaj bonegan planon. Ili decidis liberigi la kampadejon de la multnombraj kolportistoj de *aguardiente*. Ne por eble enkonduki bonajn moralon kaj moron, sed por ke la salajroj, kiujn ili pagis al la laboristoj, ne iru en aliajn manojn, sed en la proprajn. Ĉio, ankaŭ la lasta verdigra centaveto revenu en iliajn poŝojn kaj restu en la familio.

Tial do granda *cantina*, luksa taverno, estis konstruenda, ĉe unu flanko de la tereno, sufiĉe malproksime de la *oficinas*. Tiun *cantina* ili ludonis al fervora *cantinero*, tavernisto, kiu ne devis pagi luon, sed anstataŭe el siaj enspezoj, egale de ĉiu speco, donis

kvardek procentojn al la fratoj *Montellano*. Al tiuj enspezoj apartenis ankaŭ la enspezoj de la *cantina,* de la starigita rulettablo kaj de la ceteraj ludoj, krome ankaŭ la enspezoj de la inoj, kiuj plezurigis la vizitantojn de la *cantina*.

Vizitanto devis pagi por la ino ĉe la *cantinero*, ne al ŝi mem. Tial la vizitanto ricevis kuponon, *ficha*, kiun li transdonis al la damo kiel pagon. La ino pli poste transdonis la kuponon al la *cantinero*, por kio ŝi ricevis dudek kvin procentojn el la pagita prezo kiel sian enspezon. Tiel ankaŭ tiu negoco kontroleblis tiel bone, ke la fratoj *Montellano* precize povis prikalkuli sian enspezon el la pago kaj la *cantinero* aŭ la inoj povis kaŝi neniun kalkulon por si mem.

Se poste okazis, kiam la fratoj *Montellano* instalis jam la negocon laŭ sia imago, ke la inoj favoris je propra kalkulo aŭ nur pro komplezemo aŭ amikeco vizitanton plaĉan al ili sen preni la kuponon de la *cantinero*, oni serioze avertis ilin. Sed, se oni kaptis iun el ili je dua fojo, ke ŝi trompis la fratojn *Montellano* pri ties enspezo, tiukaze oni transdonis ŝin al la *capataz* de la *oficinas,* por skurĝado.

En lia patrio, en Hispanio, aperis en la regionaj gazetoj ofte artikoloj, kiuj laŭdis *don Severo*-n kiel modelan ekzemplon de diligentulo, persistemulo, eltenemulo kaj komercista genio kaj prezentis tiun bonegan viron al la ĉiam nekontentaj laboristoj de Hispanio, kiuj laŭdire estis nur anarkiistoj kaj komunistoj, kiel idealon de laborema homo, viro, kiu mizere povra elmigris al Meksiko kaj alvenis en Verakrucon kun nur dudek pesoj en la poŝoj, sed per diligento kaj lerto fariĝis interne de dudek jaroj

posedanto de kelkaj monterioj, akirinte posedon, kiu ampleksis dek du milionojn da pesoj.

Rimarko
cantina = kantino

7/6

Dum *don Severo* kaj *don Feliks* okupis ĉiujn laboristojn de la *oficinas* kaj tenis ilin sub persona kontrolo, *don Acacio* devis plenumi la taskon observi la forvojaĝantan karavanon duonon de tago, li devis akompani ilin kaj poste reveni. Li rajdis antaŭe. Je taŭga loko li atendis kaj lasis preteriri la tutan karavanon, bone observante ĉiujn vojaĝantojn, speciale tiujn, kiuj eble povus esti laboristoj de la fratoj *Montellano*. Poste li rajdis post la karavano. Proksimume je la kvara posttagmeze li galopis plian fojon ĝis la fronto de la karavano kaj lasis preteriri ĉiujn ankoraŭfoje, por esti certa, ke neniu dizertulo kaŝiĝas en la karavano. Poste li retrorajdis kaj observis zorgeme la vojon kun la intenco kapti ankaŭ tiujn, kiuj eble ŝteliradis malantaŭe por aliĝi al la karavano pli poste.

7/7

Don Leobardo origine kun sia karavano ne volis vojaĝi al Jovel, ĉar tio estis ĉirkaŭvojo por li. Lia plano estis sekvi ekde *Hucutsin* laŭ la norda direkto por atingi kiel eble plej rapide *Villahermosa* kaj tie aperi en sia kompanio por raporto.

Sed alveninte en *Hucutsin*-on, li ricevis la mesaĝon, ke la baĥajontekoj, kies vilaĝoj kaj setlejoj troviĝis sur lia vojo en norda

direkto, jam denove tumulte ribelas pro la maljusteco, kiun ili, laŭ ilia opinio, dum la lastaj monatoj devis suferi de la registaro, speciale de la *jefe político* kaj de la malpli altrangaj oficistoj.

Estis certe, ke la ribelantaj indiĝenoj atakus la karavanon por prirabi ĝin pro la armiloj kaj la municio, kiujn la viroj portis ĉe si. Samtempe tre verŝajne atendeblis, ke ili postulos altan elaĉetan monsumon por la nemalhelpata marŝo de la karavano tra siaj terenoj. Atendi la federaciajn trupojn, kiuj eble jam marŝis kiel punekspedicio, rigardis *don Leobardo* kiel tempoperdon.

Krome la federaciaj trupoj ne estis garantiaĵo por sekureco. La indiĝenoj kaŭris sin kaŝe en densa vepro. Ili estis tiel lertaj rilate la manieron de sia batalo, ke ili laŭplaĉe elserĉis sub la okuloj de la akompanaj soldatoj kaj vojaĝantoj mulojn kun pakaĵoj el la karavano kaj malaperis kun la predo tiel rapide en la profundon de la vepro, ke la persekutantaj soldatoj povis fari nenion kontraŭ tio. Se deflankiĝis patrolo maldekstren, oni atakis la karavanon de dekstre kaj male. Necesus regimento por gardi la karavanon kontraŭ tiu metodo de milito. Sed la soldatoj estis nepre bezonataj en aliaj lokoj por gardi la pli grandajn bienojn de la federacia ŝtato ĉirkaŭe kaj por defendi ilin kontraŭ atakoj.

Don Leobardo estis sufiĉe prudenta ne lasi tiri sin en aventurojn kaj ne riski homajn vivojn kaj havaĵojn, por kiuj li respondecas. Li decidis vojaĝi kun la tuta karavano al Jovel. Preskaŭ duono de la karavano marŝis en ĉiu kazo al Jovel. Al tio apartenis ankaŭ la karavano de la fratoj *Montellano*, kiu havis la komision aĉeti la menditajn varojn en Jovel, kiu tial de tie ne povis iri plu en norda direkto kun *don Leobardo*.

En Jovel restis ĉiuj *contratistas*, kelkaj el la dungitoj kaj kelkaj el la inoj, ĉiuj ĉi homoj, kiuj tie disiĝis de *don Leobardo*, aŭ tial, ĉar ili tie estis hejme aŭ tial, ĉar ili intencis malfermi tie novan negocon aŭ por serĉi novan okupon aŭ pro la intenco plu vojaĝi al *Tuxtla* kaj *Arriaga*, al la fervojstacio. La vojo al *Tuxtla* kaj *Arriaga* troviĝis en la sudorienta direkto, dum *don Leobardo* vojaĝis en la norda.

Jovel ofertis bonajn hotelojn, civilizitajn restoraciojn, riĉe ornamitajn butikojn kaj sufiĉe da plezuroj. Tiel, ke ĉiuj homoj, kiuj devis marŝi kun *don Leobardo* al Tabasko, dankis al li, kiam li komandis, ke la karavano tie ripozu dum kvar tagoj antaŭ ol ili vojaĝu plu. Por ĉiuj ĉi homoj, kiuj pasigis ĝangale multajn monatojn, kelkaj el ili eĉ du jarojn, tio estis kvazaŭ oni malfermus per tiu ordono la paradizon al ili.

ĈAPITRO 08

8/1

La ĉefkomandejo aŭ la urbo de la monterio, *La Armonía*, faris nun, post tri tagoj de hasta agado simila al tumultigita formikejo, fantomece kvietan impreson, kiun kaŭzis la ekmarŝo de tiom granda kvanto de homoj kaj bestoj, ke ekestis la ŝajno, kvazaŭ transloĝiĝus tuta popolo. La metiistoj kaj peonoj ie laboris, tial ili ne videblis sur la tereno. Tio plifortigis la impreson, kvazaŭ la urbo estus tute pereinta kaj senhoma.

Je la tago post la forveturo de la granda karavano la fratroj *Montellano* kun kontentiĝo povis konstati, ke eĉ ne unu viro eskapis.

Pro tiu ekkono ili kvazaŭ sunbanis kiel bonaj soldatoj, al kiuj oni surpikis feran medalon sur la brustan veston por sanga ago, pro kiu sesdek patrinoj kondamnis Dion en la ĉielo, ĉar Li permesis ion tian. Ekzistas ja eĉ ne unu ago ekzercata de homoj, kiu ne estas laŭdata aliloke de iuj aliaj homoj kiel meritoplena. Nur tiam, kiam ili estis jam solaj, komencis la fratoj *Montellano* senti sin kiel la veraj mastroj. Kaj por tute ĝui tiun senton, ili rigardis kiel sian unuan plej gravan taskon priskribi tion, kion faris ĝis antaŭe la kompanio kaj ties administrantoj, stulte kaj idiote kaj en ĉiu rilato fuŝnegoce. En kiun ajn angulon de *la oficinas* ili venis, kiun ajn metiiston aŭ peonon ili renkontis, pro ĉiu ajn laboro, tiu estis laŭ ili farita malĝuste, kaj ĉiu, kiu ordonis tion aŭ ĉi tion aŭ alion, estis por ili azena ŝtipkapulo, tute egale, ĉu li estis ĝistiama administranto aŭ *tendero* aŭ admininistranto de la varotenejo.

Kiam ili laste jam finis tiun neniigan kritikon, la tri fratoj faris kunsidon, en kiu ili interkonsiliĝis, kiel ĉio ĉi pli bone fareblu kaj pli bone farendu. En tiu kunsido parolis kompreneble nur *don Severo*.

Liaj du fratoj havis nur la rajton aŭskulti, kaj tion, kion li ordonis, konsenti kaj devigi sin fari tion kun forto, kaj se necesis, kun verŝado de sango.

Ili kunvenigis ses *capataces*, subestrojn, kiuj laboris kun ili jam dum sufiĉe longa tempo, jen viroj, kiujn la fratoj *Montellano* edukis tiel, kiel ili imagis bonajn *capataces*.

Tiujn *capataces* oni nun alvokis; kaj la dua kunsido komenciĝis.

Kial pagu la fratoj *Montellano* al la *contratistas* dek pesojn por ĉiu liverita tuno da mahagono, kvankam ili mem estas spertaj *contratistas*, kiuj, ĝuste organizitaj, povas fari ĉion solaj, sen la kunhelpo de *contratistas*? La dek pesojn por ĉiu tuno ili mem povos enspezi. *Contratistas* estas fakte ja nur parazitoj, speciale en tiu kazo, se ilin devas pagi la fratoj *Montellano*.

Tial oni decidis, ke *don Feliks* restadu en *la oficinas*, en la ĉefkomandejo. Tie en la centralo devis troviĝi respondeca kaj sperta persono, ĉe kiu kuntroviĝis ĉiuj branĉaj fadenoj de la vaste etendita entrepeno. Tie oni devis transdoni la nove varbitajn mahagonlaboristojn; tien transportis la karavanoj la necesajn varojn; tie estis la *tienda*; tie estis la tendejo de ĉiuj iloj; tie estis la ekflosiga kontrolstacio; tien alvenis ĉiuj mendoj kaj sciigoj tiom longe, kiom la fratoj ne havis ĉefoficejon en la haveno.

Don Severo transprenis la produktadon de la mahagono en *La Armonía*. La plej juna frato, *don Acacio*, transprenis la produktadon de la mahagono en la du aliaj pli malgrandaj monterioj, en *La Estancia* kaj en *La Piedra Alta*, kiuj troviĝis unu apud la alia, kaj tial facile mastrumeblis kune.

Nek *don Severo* nek *don Acacio* havis la eblon esti samtempe en ĉiuj distriktoj aŭ *semaneos* de siaj monterioj. Ĉiu distrikto ĝis tiam estis ekspluatata de unu *contratista*, kaj ĉar la du fratoj samtempe volis prilabori ĉiujn tiujn distriktojn, kiujn gvidis ĝis tiu tago naŭ diversaj *contratistas* — la plej grandan monterion gvidis ĝis tiu tago eĉ kvar diversaj *contratistas* — tial oni devis ŝanĝi la organizadon tute, por povi produkti la samon, ne, la duoblon de tio, kion oni produktis sub la antaŭa organizado de la laboro.

La iamaj *contratistas* kaj la pli maljunaj spertaj dungitoj en sia interparolado kun *don Leobardo* jam alludis, kiel la fratoj *Montellano* verŝajne farus tion por ŝpari la elspezojn por la *contratistas*. Kaj tiel, precize tiel, nun vere okazis.

Por la efektivigado de tiu ekonomia plano ne necesis precipa streĉiĝo de cerbo, nur diktatora perforto kaj sufiĉe da brutaleco.

8/2

Tio estis tre simpla. La genieco de la plano baziĝis sur ties simpleco.

Kiam la ses *capataces* kunestis, *don Severo* paroladis al ili. Ili devis nur kapjesi kaj diri '*Si, patron!*' Ĉion ceteran parolis *don Severo*.

„*Muchachos!*“ li diris. „De nun, ĉar ni nun estas mem posedantoj de monterioj, vi finfine foje povos vere perlabori ion.“

La viroj tre atente aŭskultis por ne perdi vorton, ke la fratoj *Montellano* promesis kromenspezojn al ili, estis por ili neatendita novaĵo.

„Vi kutimiĝis al niaj labormetodoj. Vi sufiĉe longe laboris kun ni por scii, kiel mi opinias tion kaj kiel oni devas labori. Ni, la homoj, ne estas en la mondo por pigrumi, por drinki, por diboĉi kun putinoj kaj por plezurigi nin, sed por labori. Kaj, se mi diras, ke ni, la homoj estas sur tiu ĉi lamentoriĉa Tero por labori, jen mi kompreneble celas diri, ke ni streĉe laboru, tre streĉe, ĝis la

ostoj ekrompiĝu kaj la suko elŝprucu antaŭe kaj malantaŭe. Jen tio, kion mi rigardas laboro. Ĉu komprenite?“

„*Si, patron!*“ unuvoĉe respondis la viroj.

„Mi tial diris al mi, ke vi devos perlabori pli, ĉar vi estas vere bonaj kaj fervoraj *capataces*. Jen plenverŝu do glaseton por vi. Fulmotondro, ne el tiu ĉi botelo, sed el tiu. Vi ja ankoraŭ kapablos diferencigi, kio estas por ni, kaj kio por vi, damnitaj putinfiloj.“

Ne ektimigite, sed nur iom mallertigite pro la kruda riproĉo, ili prenis la botelon kun la kutima *aguardiente*, kiun *don Severo* ŝovis transen al ili.

Ĉiu plenverŝis sian glason, diris *'Salud!'* al ĉiu unuopulo de la tri fratoj kaj engorĝigis la enhavon. Estis nur unu glaso por ili je dispono. Tial daŭris certan tempon, ĝis kiam la glaso rondiris. Tiun tempon *don* Severo ne pasigis pigre.

„Ĉiu unuopulo el vi transprenos distrikton. Tiu, kiu ne volas, povas foriri laŭ sia vojo. Mi tute ne bezonas vin kaj akceptas vin ĉi tie nur pro kompato kaj, ĉar vi ĉiuj havas tro da ŝuldoj pro via eterna drinkado, ludado kaj pro la diboĉado kun la putinoj. Mi fiksos por ĉiu el vi la distrikton.“

Don Severo prenis notfolion. Sur tiu papero li jam disdividis la diversajn *semaneos*. La plej granda kaj plej riĉa el la monterioj aĉetitaj de li estis *La Armonía*, kie troviĝis la *oficinas*. Tiun li transprenis mem. La du pli malgrandajn, *La Estancia* kaj *La Piedra Alta* transprenis *don Acacio*. Tiuj ambaŭ malproksimis

ĉirkaŭ kvar tagorajdojn de L*a Armonía*. *Don Severo* transsprenis *La Armonía* kun kvar distriktoj, kiujn li ne ŝanĝis. Li ŝanĝis nur la nomojn kaj nomis ilin tiam laŭ la kvar ĉielaj direktoj, en kiuj ili troviĝis ekde la centralo: *Norte, Sur, Este, Oeste*. *La Estanci*a kaj *La Piedra Alta* li disdividis en po du distriktoj, la du de *La Estancia* li nomis *Norte* kaj *Sur*, kaj la du distriktoj de *La Piedra Alta*, *Este* kaj *Oeste*. Tiel li skizis tion sur folio kiel krude desegnitan terenan planon. Restis al li tiumomente nur la tasko okupi tiujn distriktojn per la ĝustaj viroj.

„Mi mem transprenos la distrikton *Norte* de *La Armonía*, por esti en via proksimo. Vi, Picaro, transprenos la distrikton *Sur*."

La fratoj *Montellano* vokis neniam iun el siaj viroj per la ĝusta nomo. Eble ili eĉ ne sciis la verajn nomojn, aŭ, se oni efektive iam ajn nomis ilin al ili, ili ja tamen ne fidus al la ĝusteco de la nomoj. Ili multe pli fidis al la *motes*, al la kromnomoj, kiujn ili donis al siaj viroj, kaj kiuj plej ofte estis tiel bone elektitaj, ke ili ne devis peni multe por trovi la ĝustan viron inter la aliaj, sen devi memori ties veran nomon.

„Ĉiu el vi en sia distrikto estas la *mayordomo,* la distriktestro, kun nelimigita potenco. Ĉu vi komprenas?"

„Si, patron!"

„Plenverŝu novan glason al vi. Jen ankaŭ la cigaredoj."

„Ĉiu *mayordomo* ricevos kiel helpanton *capataz*-on, kaj ĝuste tiun de la antaŭa *contratista,* kiu postrestis en la distrikto kaj de ni estas transprenita. Kun tiuj vi paceme kunlaboru aŭ mi

elĵetos vin, sed antaŭ ol vi foriros, ni tanos viajn felojn per suka diodamnita draŝado."

„*Las gratificaciones*, Severo", memorigis lin Feliks.

„Tenu fermita la babiltruon kaj sidu trankvile sur via postaĵo! Mi ja ne forgesos tion. Vi, *Pulpo*, splena oktopodo, transprenos la distrikton *Este*."

„Si, patron!"

„*El Chucho*, vi transprenos la distrikton *Oeste*. La cetera triopo, do *La Mecha*, *El Guapo* kaj *El Faldon*, vi iros kun *don Acacio* al la du aliaj monterioj."

„*Las gratificaciones*, Severo", memorigis lin nun ankaŭ *don Acacio*. *Don Severo* tiam ŝajne rigardis la tempon kiel vere veninta por paroli pri rekompencoj. Tial li ne kriis al *don Acacio*, ke li tenu fermita la buŝaĉon.

El la listoj, kiujn transdonis *don Leobardo* kaj la *contratistas* al li, li jam zorgeme konstatis la precizan kvanton de ĉiuj viroj, kiuj laboris en la diversaj distriktoj. Kaj li ankaŭ elkalkulis, tiel bone, kiel li povis fari tion en la *oficinas,* kiom da *hacheros,* arbohakistoj, estis en ĉiu distrikto kaj kiom da *boyeros*, brutpelistoj, kaj *macheteros*, maĉetistoj. Sen konsideri, ja eĉ sen vere scii, kiaj komplikaj estas la terenoj de la unuopaj distriktoj kaj kiom necesa estas kompleta kvanto de *boyeros*, li simple forstrekis kelkajn virojn de la transportgrupoj kaj transskribis ilin al la *hacheros*.

Rimarkoj
La Mecha = la meĉo
El Guapo = la belulo
El Faldon = la basko

8/3

La ĉiutaga normo de hakisto de mahagonarboj estis du tunoj da mahagono, laŭ instrukcio prihakita kaj ŝelita kaj preta por ekflosigo.

Ĝis tiam ĉiam validis la instrukcio, ke hakisto, kiu ne kapablas liveri ĉiutage du tunojn, en la plej multaj kazoj sen propra kulpo, havis la rajton postliveri la mankantajn tunojn interne de semajno. Tio signifis, ke tiukaze, se hakisto atingis lunde kaj marde kune nur tri tunojn anstataŭ kvar, li povis glatigi la perdon per tio, ke li interne de la sama semajno je unu tago anstataŭ du, atingis tri tunojn, kio vere eblis, se li trovis arbon, kiu jam per si mem pezis du tunojn. Regule liveri ĉiutage du tunojn, estis neimageble dura fortostreĉo por viro, kiu devas labori en la ĝangalo sub tropika sunardo kaj neniam ricevos stomaken ĝustan manĝon, kiun oni povus nomi fortikiga. Se la *hacheros* ne atingis sian kompletan tunan kvanton, oni ne pagis tiujn tagojn, en kiuj ili ne liveris du tunojn; ili do laboris por nenio, kvankam ili eble vere havigis almenaŭ unu tunon aŭ eĉ unu kaj duonon de ĝi.

Sed ĉar la du tunoj ne estis kompletaj, oni ankaŭ ne prikalkulis al ili la vere produktitajn tunojn aŭ nur tiukaze, se ili interne de la sama semajno, de tempo al tempo sub humanaj *contratistas*

dum kvar semajnoj, transdonis la kompletan kvanton por la semajno, do dek kvar tunojn.

Dimanĉoj kaj festotagoj ne ekzistis. Tio estas ankaŭ tute en ordo. Ankaŭ la ĝangalo ne konas festotagojn. En ĝi kreskas la mahagonarboj, *caobos*, ĉiutage, kaj tage kaj nokte sen okupiĝi pri kalendaraj festotagoj. Por tio la ĝangalo ne havas tempon kaj tial ankaŭ la mahagonlaboristoj ne havas tempon por fari tiajn stultaĵojn postuli festotagojn aŭ ripozajn tagojn.

Se *hachero* atingis ĉiam malpli ol siajn du tunojn, oni supozis, ke intence li ne volis liveri ilin. La *contratista* tiukaze alvokis sian *capataz*-on kaj ordonis al li, ke li foje venigu kaj sondu la viron. La *capataces* ne konis alian rimedon krom kruele skurĝi la pigrajn hakistojn. Pri longaj konsideroj pri la fizikaj ebloj aŭ malebloj de la laboristoj neniu cerbumis. Per konsideroj kaj ekzamenadoj ne eblas produkti mahagonon, tiun oni devas haki. Kaj tiu, kiu estis aĉetita por haki la mahagonon pro siaj ŝuldoj, devis fari tion, aŭ ne kaj en tiu kazo elteni la sekvojn.

La interparolado, kiun havis la *capataz* kun la neglektema *hachero*, estis ofte sukcesa. Estontece la viro atingis ĉiutage siajn du tunojn. Sed, se li ne atingis la postulitajn du tunojn je dua fojo, ĉar li spite al la plej fervora volo ne povis atingi ilin, li havis duan interparoladon kun la *capataz*. La finrezulto estis unu el du ebloj: Aŭ la viro kutimiĝis pri tio liveri la postulitan kvanton aŭ li mortis. Aŭ li mortis je la ĉiama trostreĉiĝo, kiun li ne kapablis alfronti, aŭ li mortis je la vundoj, kiujn kaŭzis la *capataz*.

En multaj kazoj la morto de laboristo estis por la *contratista* aŭ por la monterio nur efemera perdo, kaj tiukaze nur perdo je tempo. La plimulto de la *muchachos*, se oni pagis por ili ŝuldojn aŭ policajn punojn, aŭ se oni donis antaŭpagojn al ili kaj ili konfirmis la laborkontrakton por la monterio, estis devigitaj nomi garantianton, plej ofte bonan amikon aŭ fraton, kuzon aŭ bofraton. Do, se kontrakte ligita *muchacho* mortis, eĉ se sekve de akcidento dum la laboro, antaŭ ol li kapablis forlabori la kompletan ŝuldon, kiun li transprenis en la kontrakto, tiukaze oni kondukis en la monterion lian garantianton, kiu tiam devis forlabori la restaĵon de la ŝuldo. Pasis kompreneble de tempo al tempo kelkaj monatoj antaŭ ol oni povis sciigi la garantianton kaj antaŭ ol li alvenis en la monterion. Tio plej ofte estis la ununura perdo, kiun la monterio havis pro tio.

Entute rigardate, la traktado de la viroj, kiel ajn dure tio aspektas, ne estis tiel kruela kiel oni povus supozi. Nek la administrantoj, speciale *don Leobardo*, nek la *contratistas*, havis ĝenerale iun intereson pri tio turmenti siajn virojn. Ili estis korpe, kaj eĉ pli sekse rigardate, plensangaj, tute sanaj kaj normalaj homoj, kiuj eĉ ne havis la plej etan plezuron aŭ sekretan volupton skurĝi siajn virojn kaj delektiĝi je tio. La *capataz* plenumis sian taskon je la viro sen atestantoj, kaj li rigardis tion ne kiel sadisman plezuron, sed kiel laboron, kiun li same tiel volonte evitis kiel ĉiun alian strečigan laboron. Kaj la kompanio kaj ties administrantoj evitis ĉiun brutalecon, tiom longe, kiom ili povis atingi sian celon laŭ pli milda maniero. Tuj, kiam la *contratistas*, almenaŭ la plimulto el ili ekkomprenis, ke viro, kvankam li pruvis la plej bonan volon, simple ne povis plenumi la laborkvanton, ili donis al li alian laboron, se ili havis alian okupon por li; aŭ ili lasis tempon al li elformi siajn kapablojn

tiel, ke li fine tamen kapablis efektivigi ion, kio vere efektivigeblas, se oni foje havas la sperton kaj lernis ĉiujn trukojn de la speciala laboro.

Sed tiaj mildigoj, kiel ili ofte estis uzataj de la kompanioj kaj *contratistas,* kaj plej ofte sen serioza malavantaĝo por la negoco, kompreneble ne povis trovi konsideron en la planoj de la fratoj *Montellano*. Malofte povis perlabori milionojn da pesoj iu, kiu tro indulgis la laboristojn , kaj ankoraŭ neniam povis reteni sian potencon diktatoro, kiu vidis je siaj diktataj subjektoj ion alian ol obeemajn ŝtipojn vestitajn en uniformo.

8/4

Don Severo rigardis la liston por la distrikto *Sur*, kiun li transdonis al *El Picaro*. Li trovis tie la sekvan: dek naŭ hakistojn, dek unu bovoservistojn, kvar bovoknabojn kaj du *macheteros. Macheteros* estas tiuj, kiuj per maĉeto liberigas vojon en la ĝangalo, sur kiuj estu fortrenataj la hakitaj arbotrunkoj.

Don Severo minusis de la dek unu bovservistoj tri virojn kaj tute forigis la maĉetistojn. Li transskribis tiujn kvin virojn sen koni ilin, sen scii, ĉu ili efektive povus labori per peza mahagonhakilo, al la hakistoj. La kvar bovoknaboj devis kuntranspreni la laboron de la du maĉetistoj. Je tiu maniero *don Severo* ricevis por la distrikto *Sur* dudek kvar hakistojn.

Bele elkalkulinte tion tiel, li ekparolis pri la *gratificaciones,* pri la rekompencoj.

„Picaro, kiel mi diris al vi kaj kiel mi diris al ĉiu el vi, mi lasos vin bone perlabori, se ni mem bone perlaboros. Mi ne estas rabisto, kiu ekspluatas povrajn indiĝenojn. Mi permesas vivi. Vi ĉiuj povos bone perlabori, se vi iom atentos interesojn niajn. Ne multe, iom jam sufiĉas. Tio, kion la kompanio liveris ĝis nun estas ja nur fekaĵo. Kion la uloj faris, tion mi ne scias. Ili certe diboĉadis kun putinoj, drinkadis kaj pigrumis. Sen tro streĉi ni facile povos atingi la duoblan kvanton. Kaj la duobla kvanto estas la minimumo, kiun ni devos liveri. Se mi diris, ke mi lasos bone perlabori ĉiun, kiu bone lasos perlabori nin, jen mi tion opinias tiel. Ĝis nun ni estis nur *contratistas*. Tial ni ne povis pagi al vi pli ol viajn ok aŭ dek aŭ dek du realojn ĉiutage. Sed nun ni estas la posedantoj kaj povos perlaborigi vin pli. Vi ĉiuj ekde la sekva unua de la monato ricevos sen escepto dek du realojn ĉiutage, do unu peson kaj kvindek. La aliaj *capataces*, kiuj troviĝos sub via komando, ricevu ankaŭ dek du realojn ĉiutage. Sed nun pri la diferenco.“

La *capataces* ekscitite pli proksimiĝis. Eble ili estis malpli monavidaj ol la fratoj *Montellano*. Sed *don Severo* sciis kiel transigi al ili siajn ecojn, kiuj helpu al li kontentigi lian monavidon kaj tiun de liaj fratoj.

„Picaro, vi havas en via distrikto dudek kvar hakistojn.

Jen la listo. Kompreneble ĉiu devos atingi siajn du tunojn, tiel, kiel ĉiam. Pri tio vi devos zorgi. Se vi havigos al mi kvindek tunojn dum tago, jen mi donos al vi por ĉiu tuno unu realon kiel rekompencon, tio estas ses pesoj kaj dudek kvin centavoj dum tago, kaj vian salajron vi kompreneble ricevos krome. Al via *compañero* mi donos por ĉiu tuno kvaronon de realo. Mi donos

al vi notfolion por li. Sed, se vi atingos por mi malpli ol kvindek tunojn dum tago, tiukaze vi ricevos nur kvaronon de realo por tuno kaj via *compañero* ricevos nenion. Sed, se estos malpli ol kvardek tunoj dum tago, jen vi ambaŭ ricevos por tiu tago neniun salajron kaj tute ne rekompencon."

„*Pero, patrón, entonces*", tiukaze mi laborus ja por nenio", diris *El Picaro* timide.

„Vi ja kun dudek kvar hakistoj povos liveri pli ol kvardek tunojn ĉiutage. Ĉu ne? Ni ja kune, vi kaj mi, atingis pli, tion vi ja scias ankoraŭ bone."

„Jes, kompreneble, *don Severo*, sed de tempo al tempo ne estas ĉemane tiaj arboj, kaj jen oni devas peni."

„Tial mi vin, bandito, faris ja *mayordomo*, por ke vi regulu tion pri la arboj. Por starado kaj gapado mi ne bezonos iun *capataz*, kiun mi pagos. Tiukaze mi same tiel bone povus piki bastonon en la fekon aŭ korvotimigilon, se mi bezonus iun nur por starado. Sed tio ankoraŭ tute ne estas ĉio. Mi diris al vi, ke mi donos realon por ĉiu tuno, se vi atingos pli ol kvindek. Sed, se vi havigos al mi kun la samaj uloj sesdek tunojn dum tago, jen mi donos al vi por ĉiu tuno du realojn da *gratificación* kaj al via *compañero* duonon de realo por ĉiu tuno. Kaj ankaŭ tio ankoraŭ tute ne estas ĉio. Mi donos al vi tri realojn kaj al via *compañero* realon por ĉiu tuno, se vi havigos al mi sepdek tunojn dum tago."

„*Con su permiso, patrón,* kun via permeso, kiel mi havigu do sepdek tunojn dum tago per dudek kvar *muchachos*?"

„Ne kontraŭparolu! Kion vi faros kaj kiel vi faros, tio estos afero via. Por tio mi levis vin en la rangon de *mayordomo*. Se vi ne kapablos pri tio, mi serĉos alian.“

„Tio ne necesas, *jefe*. Vi scias, ke mi ĉiam estis lojala al vi.“

„Ĝuste tial, ĉar mi scias tion, tial mi donas al vi la rekompencojn. Vi facile povos perlabori kvincent pesojn dum monato, aŭ tute nenion. La mono kvazaŭ per si mem saltos en viajn poŝojn. Ankoraŭfoje plenverŝigu glason. Ankaŭ vi, *Chucho*, *Pulpo* kaj la aliaj, priservu vin.“ *Don* Severo turnis sin denove al *El Picaro*: „Kiel vi faros tion, estos afero via. Vi sufiĉe longe lernis de mi por scii, ke tiuj stinkantaj indianaj fiporkoj estas pigraj kiel sterko sur sterkejo. Fie pigremaj en siaj puebloj kaj eĉ dekfoje pli pigremaj en la bienoj. Sed fortajn ostojn ili havas! Kiel feron! Ili dancas dum tri tagoj kaj dum tri noktoj, drinkas kaj diboĉas ĉe tio kun putinoj, ke la vestaĉoj ĉirkaŭflugadas kaj la ŝprucaĵoj kovras vian vizaĝon. Tiuj ja povas labori, se sukcesos al vi kurbigi ilin sub vian jugon. Jen afero via. Mi scias tion, kvar tunojn ili povos haki kaj prikhaki tiel facile, kiel disrompiĝas mia dentopikilo ĉi tie. Kvar tunoj ĉiutage estas kvazaŭ nenio por ili, kvankam ili eĉ ankoraŭ dormas. Sed, se vi ne kapablas tion, jen mi povas serĉi ankaŭ iun alian *capataz* por tiu posteno. Eble *El Tornillo*-n aŭ *El Doblado*-n, kiuj postrestis de la pli fruaj *contratistas*.“

„Sed, *patroncito*, mi diris ja per neniu vorto, ke mi ne volas transpreni tion. Mi bezonas la monon tiom bone, kiom la aliaj; kiam mi intencas aĉeti por mi la ranĉon de don Aŭrelio, jen mi bezonos monon.“

„Bone do, en ordo“.

Nun *don Severo* vokis la sekvanton al si. Estis *El Chucho*. *Don Severo* ne plu devis klarigi tiom, kiom li devis klarigi al *El Picaro*; ĉar tial ili ja ĉiuj estis vokitaj tien, por samtempe aŭskulti, kion *don Severo* celis de ili. Ĉe ĉiu li devis diri plu nur, kiom da hakistoj li havas, kaj kiom da tunoj li devos liveri ĉiutage por ricevi tiun aŭ ĉi tiun gratifikon.

Kiam la konferenco estis finita kaj ĉiuj *capataces* sciis, kien ili apartenu kaj kion ili faru, ili iris al la brandokabanoj por ankoraŭfoje gaje plezuriĝi je la lasta vespero antaŭ la longaj semajnoj de laboro en la ĝangalo. *Don Severo* donis al ĉiuj sufiĉe da antaŭpago por ebligi al ili festi tian plezurigan nokton, por ke jam nur la penso povi permesi al si tiajn noktojn ofte, ilin instigus plenumi ĉiujn taskojn, kiujn li postulis atendeme.

ĈAPITRO 09

9/1

„Eliĝu, *dormilones*, dormemaj servistoj de putinoj! Ĉu la suno eĉ unue brilu sur la la interon de viaj damnitaj nigraj postaĵpartoj?! He, ĉu vi nun baldaŭ ekmoviĝos aŭ ĉu mi helpu vin per *latigo*, per vipo? Do, eliĝu! Tuj alkonduku la bovojn!“ La *capataz* Ambrosio kriis al la *boyeros,* al la bovservistoj per voĉo kvazaŭ iu ofendus lin.

Ambrosion, kiu laboris du jarojn aŭ eĉ pli longan tempon kun *don Remigio*, tiu postlasis en la monterio, ĉar Ambrosio fariĝis

pli kaj pli nefidinda en la lastaj monatoj, li ŝajne taŭgis por nenio plu kaj krome li ne repagis la antaŭpagon kaj ŝuldojn, kiujn *don Remigio* rifuzis transpreni, kiam la kontrakto estis finita pro transpreno. *Don Severo* pagis por Ambrosio la ŝuldojn ĉe *don Remigio*, tiel, kiel li faris tion por ĉiuj ceteraj viroj. Por la fratoj *Montellano* Ambrosio estis valora, ĉar li konis kiel *capataz* sub *don Remigio* la distriktojn de la monterio tre detale kaj kvazaŭ parkere.

Sed la nomo Ambrosio ne plaĉis al *don Severo*. Kiam li venis por la transpreno en tiun distrikton kaj demandis lin, kiel li nomiĝas kaj aŭdis la nomon Ambrosio, li ridis kun rikana mieno kaj diris: „Mi volus scii, kiu nomis vin Ambrosio? Certe estis la diablo, kiu volis fari satanecan ŝercon."

„Sed tio estas *mi nombre verdadero*, mia vera nomo", objetis Ambrosio kaj kiel ŝajnis, sufiĉe ofendite. Sed samtempe li volis fari humile flateman impreson al sia nova mastro, esperante ricevi specialajn privilegiojn kaj rekompencojn, kaj tial li turnis sin kaj turniĝadis servile kiel vermo, kiam li staris antaŭ *don Severo* kaj respondis ties demandojn.

Don Severo rigardis lin de supre ĝis malsupre, kiel li turniĝadis kaj moviĝadis kiel vermo kaj diris tiam: „Nu, *hombre*, Ambrosio estas por mi tro komplika. *El Gusano,* la vermo, estas pli bona por vi. La sanktulo, al kiu preĝis mia patrino, kaj al kiu ŝi rekomendis sian animon por speciala protekto, ŝi estu benata dum eterneco, estis la sanktulo Ambrosio. Vi ne aspektas tia, kia li, *El Gusano*. Do, vi scias nun kiel vi nomiĝas, kaj ne forgesu tion, kiam mi vokos vin aŭ mi fariĝos kruda."

„*A sus ordenes, patrón*“, diris Ambrosio hontigite.

„Vi pli bone fartos kun mi ol vi fartis iam ajn kun *don Remigio*.“

„*Es cierto*? Ĉu tio estas certa, patrono?“ demandis *El Gusano*, per unu fojo repacigite, kiam ŝajne perspektive atendeblis favorado.

„Jes, multe pli bone. Kiom vi perlaboris ĉe *don Remigio*?“

„Dek du realojn, patrono.“

„La samon vi ricevos de ni. Sed krom tio gratifikojn, bonajn rekompencojn por grasaj liveroj. Vi facile povos enspezi kvar ĝis ok pesojn dum tago ĉe mi, ĉu vi komprenas, Gusano?“

„*Si, señor, y muchisimas gracias*!“ respondis Ambrosio. Lia nova nomo, la vermo, subite perdis ĉion malagrablan. Ĉar tiu nova nomo estis tiel rapide ligita kun laŭorda mono, ŝajnis la nomo *El Gusano* al li la plej belega, kiun li iel povus elpensi mem. Ĝi sonis en liaj oreloj kiel sferosonoj kaj pli bela ol ĉiuj laŭdokantoj de Ambrosio en la ĉielo. La laŭdokantoj en la ĉielo certe bele sonas, sed ĉi tie surtere ili ne havas aĉetan forton. Sed la gratifikoj, kiuj estis nun promesitaj al li kun la nomo *El Gusano*, kaj kiujn enspezi li ĵuris al si, ŝanĝeblas jam ĉi tie surtere por ĉio, kio ĝojigas kaj plezurigas normalan homon. Kiun valoron havu la bela nomo Ambrosio, se oni eĉ ne povas aĉeti kredite al si botelon da komiteko por ĝi. Foriĝu do Ambrosio, vivu *El Gusano*. Ne firmkroĉiĝu je malnovaj nomoj, *hombre*, se ili estas nur malhelpemaj por via sukcesa vivo.

La sekva, kion li faris, estis ordoni, ke ĉiuj *muchachos* nomu lin de nun *El Gusano*, se iu vokos lin per la nomo aŭ, se li estos serĉata de *don Severo* aŭ de *El Picaro*, de la *mayordomo;* sed por ĉiuj ceteraj okazoj li postulis, ke li estu alporalata kiel antaŭe per „*mi jefe*“, se la kotaj kaj pedikohavaj *muchachos* volas priparoli ion kun li.

9/2

El Gusano estis la *ayudante*, la asistanto kaj helpanto de *El Picaro*, kiu tie en la distrikto *La Armonía* estis nomumita *mayordomo*. El *Gusano* tial havis intereson je la gratifikoj, kiujn ricevos *El Picaro*.

Don Severo estis bonega konanto de homoj, speciale, se temis pri subigitoj, pri homoj, kiujn li intencis utiligi por siaj celoj. Doni *El Gusano*-n al *El Picaro* kiel helpanton, estis ja diabla penso, sed samtempe ĝi estis ankaŭ ideo, pri kiu li sciis, ke ĝi alportos konsiderajn monsumojn al li.

El Picaro kapablis elpremegi el laboristo la lastan sukoguton, kaj se ne per belaj vortoj, tiukaze per senkompata brutaleco. Tion sciis *don Severo* pro sperto, li ja bone instruis iam *El Picaro*-on kaj sufiĉe longe laboris kun li por observi, kiel sukcesa estis lia instruo kaj liaj instrumetodoj. Ĉar li tiel bone konis lin, tial li donis al li la plej riĉan distrikton, tiun de *don Remigio*, kiu havis la plej multajn virojn.

Don Severo ne povis agi tiom brutale, kiom li certe deziris, ĝuste tial, ĉar li estis nun posedanto kaj prezidanto de la kompanio, kiu troviĝas en la fondado. Kiel kapitalisto, prezidanto de la

nova kompanio kaj ĉefa kontraktisto kun la usonaj kaj anglaj kompanioj, kiuj kunaĉetis mahagonon, li devis konservi al si puran nomon, kiu ne estis malpurigita kaj kotigita per plendoj pri kruelecoj kontraŭ indiĝenaj laboristoj, kiuj iom post iom mortaĉis pli mizere ol bestoj en la ĝangalo, en la laborterenoj de lia kompanio. Estis eble, ke iel fariĝus publike, ke eĉ skribus pri tio usonaj kaj anglaj gazetoj, per kiaj nehumanaj rimedoj oni produktas la mahagonon. Tio povus okazi malpli certe per la sensacia avido de reporteroj, kiuj eksciis ion pri tiuj rilatoj, ol pli rapide kaj pli certe per la konkurenco de la diversaj kompanioj, kiuj aŭ produktis aŭ aĉetis mahagonon. Ĉiu kompanio celis neniigi la aliajn kompaniojn aŭ almenaŭ damaĝi ilin. Damaĝi kompanion je ties reputacio, akuzi ĝin antaŭ la tuta civilizita mondo pri krueleco kontraŭ sendefendaj indiĝenaj laboristoj kaj pruvi tion per ekzemploj estis pli efika ol neniigi la kompanion per pli malaltaj prezoj, tio estis multekosta. Kaj tio facile povus ŝanĝiĝi en armilon, kiu fariĝus la mortiga batilo por la atakanta kompanio mem.

Pro ĉiuj tiuj kaŭzoj *don Severo* kaj liaj du fratoj kiel posedantoj kaj direktoroj de la kompanio devis labori pli memgardeme ol en tiu tempo, kiam ili estis *contratistas*. La kompanio ne estis respondeca por tio, kion faris ties *contratistas*. Ankaŭ, se ili estis detale informitaj, ili ĉiam povis elturniĝi per tio, ke ili ne havis influon pri la labormetodoj de siaj *contratistas,* ĉar la *contratistas* laŭdire estas memstaraj kaj sendependaj entreprenistoj, kiuj laboras je sia propra kalkulo kaj je propra respondeco. Se tiam okazis publika skandalo, la kompanio devis fari nenion alian krom anstataŭi la *contratistas* kaj deklari, ke la *contratistas* ne pli longe havos iun ligon kun la kompanio. Per tio la

kompanio antaŭ la tuta mondo pruvis, ke ili ne toleras la kruelecojn kaj, ke ili forigis ĉiujn virojn el ĉiuj terenoj de la kompanio, eĉ kun konsiderindaj financaj perdoj, kiuj kulpis la brutalecojn. Per tia deklaro la nomo de la kompanio restis sen makulo. Ĉiuj filantropoj, inklude de la socialistaj parlamentanoj, abunde laŭdis ilin pro la rapideco kaj perfekteco, per kiuj ili forigis la fiaĵojn. Kaj la centmiloj da tunoj de la mahagono, kiujn oni havigis per tiaj kruelaj metodoj, nun vendeblis sen ĝeno je la plej alta merkata prezo aŭ eĉ super la merkata prezo. Tio estis brila reklamo por la kompanio; kaj ĝi vendis sian surtavoligitan mahagonon pli facile kaj pli rapide kaj pli favore ol ĉiuj aliaj kompanioj, pri kiuj la publiko ne sciis, ĉu tie ĉiuj menciitaj kruelecoj estis pli senĝene uzataj ĉu ne.

Don Severo, sciante ĉion tion bone, prudente prikalkulante ellaboris novan planon, kiun li nun uzis.

Tiel lerte antaŭe ankoraŭ neniu kompanio mastrumadis, kiel li intencis fari tion. En la distrikto, kiun li mem gvidis, li atentis pri tio, ke ĉio okazu tiel trankvile kaj humane, kiel tio ankoraŭ iel eblas en monterio. Sed li transprenis la plej etan distrikton kaj en lia distrikto laboris la plej malmultaj viroj, kaj krome eĉ elektitaj viroj, kiuj pro sia fizika konsisto ne kapablis plenumi postulegojn, egale ĉu oni turmentis ilin ĉu ne. Ĉiujn fortikajn virojn li asignis al la aliaj distriktoj. Lia distrikto estis nur la dekorita fasado de la konstruaĵo. Por ĉio ĉi, kion la *mayordomos* faris, neniu povis respondecigi lin. Li ne estis tie, kaj neniu atendis de li, ke li ĉeestu ĉie. Tion ja ankoraŭ neniu mortemulo kapablis. Se la skandaloj publikiĝis, oni maldungis la administrantojn kun insultoj kaj hontigoj, kaj se necesis, li persone transdonis ilin al la instancoj. Ke nenio malbona okazu al ili, por tio li

ja zorgis; kaj se ili babilis antaŭ la instancoj pli ol li atendis de ili, li simple lasis ilin en la kaĉo aŭ ili memmortigis sin en sia ĉelo, turmentataj de konsciencriproĉoj. Vekigi turmentajn konsciencriproĉojn, kiuj kondukas al suicidoj, ne estis tro komplika. Ĉio, kion oni devis fari, estis glitigi cent pesojn en la ĝustan poŝon.

Estis tiel, kiel en ĉiu diktaturo. La diktatoro ĉiam estas senkulpa. Lin ĉiam ĉirkaŭas glorokrono. Ĉiam estas la *mayordomos*, la *capataces*, la prizonaj gardistoj, la policistoj, la serĝentoj, kiuj realigas la bestaĉajn agojn kaj maljustecojn.

Don Severo klarigis ankaŭ al *don Acacio*, kiu mastrumadis la du pli malgrandajn monteriojn, la prudentan planon. Ankaŭ *don Acacio* gvidis persone nur negravan distrikton, kun malmultaj *muchachos*. Kaj li gvidis ĝin tiel, ke eĉ la arkianĝelo Gabriel povus diri al li: „Tera filo, viaj surteraj agoj estas sen peko kaj sen manko.

Daŭrigu tiel, kaj la ĉiela regno estos certa al vi. Amen!“

9/3

La *boyeros*, la bovoservistoj, dormis en rapide kaj aĉe starigita palmkabano proksime de la paŝtejo, kie ili havis la bovojn.

Preskaŭ ĉiun semajnon oni devis starigi novan kabanon, ĉar la laborejoj ŝanĝiĝis de semajno al semajno. Paŝtejoj por la bovoj ne ĉiam estis proksimaj. Se ili estis tro malproksime de la lokoj, kie oni laboris ĉe la mahagono, la *macheteros* devis haki la foliaron de la arboj, kiujn manĝis la bovoj. Nur malmultaj arboj

taŭgis por bovofuraĝo. La bovoj ne kontentigeblis nur per verda furaĝo. Ilia laboro estis tro streĉa por povi elteni tiel. Tial oni kultivis en ĉiu distrikto maizon. Ĝi maturiĝis dum dek ĝis dek du semajnoj, ofte eĉ pli rapide. Kaj ĉiun matenon ricevis la bovoj grandan porcion da maizo, kiu estis disdonata de la ĉefa komandejo de ĉiu distrikto kaj altransportita de la *boyeros* aŭ de bovoknaboj. Por tiuj transportoj ili havis fortajn mulojn je dispono.

La distriktoj estis tiom grandaj, ke la laborejoj ofte malproksimis du aŭ tri aŭ eĉ kvin horojn de la *oficina* de la centralo; dum tiu centralo siavice malproksimis de la ĉefa monteria komandejo, de la monteria *ciudad* aŭ urbo, unu aŭ eĉ du rajdotagojn.

9/4

Estis noktomezo, kiam venis *El Gusano* por veki la *boyeros* por la laboro.

Li havis horloĝon, kiun li postlasis en la *oficina,* pro timo povi perdi ĝin; kaj tial li ne povis diri, ĉu estas la unua nokte aŭ la dua.

Ankaŭ *El Picaro*, la *mayordomo* de tiu distrikto, posedis poŝhorloĝon, krome li havis vekhorloĝon en la *oficina*, kie li nun regis, kvazaŭ li estus sendependa *contratista*. Plej ofte, certe ĉiun duan tagon, li forgesis streĉi tiun aŭ tiun horloĝon. Ofte ambaŭ horloĝoj ne plu funkciis. Kaj ĉar tiel la tempo neniam precize konstateblis, ĉiuj kutimiĝis pri tio taksi ĝin dum la tago laŭ la suno kaj nokte laŭ la steloj. Sed jen kompreneble menciindas, ke *El Picaro* ĉeokaze restreĉis la horloĝojn kaj laŭ sia

taksado movis la montrilojn. Kaj krome menciindas, ke *El Picaro*, se li eble iutage venis post kvar aŭ ses monatoj da laboro en la ĝangalo al la administrejo, konstatis, ke liaj horloĝoj malofte pli ol dudek aŭ dudek kvin minutojn diferencis de la horloĝoj, kiujn li vidis en la *ciudad* ĉe la diversaj homoj. Per tio kompreneble ne estu dirite, ke la horloĝoj en la *ciudad* montris la ĝustan tempon, kiel ekzemple tiuj de la fervojoj aŭ de la poŝto de la federacia lando; ĉar ankaŭ en la centraj *oficinas* okazis, ke ĉeokaze ĉiuj forgesis streĉi sian horloĝon. Pro la eterne varmega humido, kiu ŝarĝis la ĝangalon, ĉiuj horloĝoj suferis konsiderinde, tiel ke ili aŭ rustis aŭ oksidiĝis aŭ fariĝis tute neuzeblaj, ankaŭ, se oni restreĉis ilin regule. Sed, ĉu la horloĝoj entute funkciis aŭ tute ne, havis ja neniun gravecon, ĉar tie la tempo perdis ĉiun signifon. Por dividi la tagon aŭ la nokton en certajn partojn, kio pro la rajdoj sufiĉe ofte necesis, por povi esti antaŭ komenciĝonta nokto je certaj lokoj, havis ĉiu ajn kiel plej bonan tempan mezurilon la sunon kaj la stelojn, kiuj fariĝis nur tiutempe neuzeblaj, se la ĉielo dum longa tempo estis kovrita de nuboj. Sed la indiĝenaj *muchachos* eĉ sub ĉielo kaŝita de nuboj havis tempan instinkton, kiu tute sufiĉis al ili por la taskoj, kiujn ili devis plenumi.

Se *El Gusano* kriis al la dormantaj *boyeros*, ke proksimas la sunleviĝo, dum estis ĝuste nur noktmezo, li faris tion tiel troigante kiel faras ĉiu, kiu devas pli frue ellitiĝi, ĉar li devas veki aliajn, kiuj rajtas dormi du minutojn pli longe. Tuj kiam li estis sekura, ke ĉiuj vekiĝis kaj troviĝis ĉe sia laboro, li havis la rajton reruli sin denove en sian kovrilon kaj dormi laŭ kalkulo plu ĝis ĉirkaŭ la tria, laŭ instinkta horo. Kaj tiam li devis veki la *hacheros*, kiuj je la kvara ekmarŝis al siaj laborejoj.

El Gusano substrekis sian vekadon per la botelopintoj, kiujn li emfaze puŝis en la ripojn de la dormantoj, kaj tiel emfaze, ke ili rektiĝis kun surprizita ĝemado kaj eksidiĝis, frotantaj la turmentitan ripon permane. Sed, se ili tiam ankoraŭ ne staris interne de tri sekundoj, *El Gusano* tretis ilin per tuta piedo sur la ventron aŭ femuron aŭ sur tion, kion li ĝuste trafis. Damne kaj ankoraŭfoje malbenite kaj surfekite, indiĝenaj ĝangallaboristoj estu ja neniuj dorlotitaj kaj degeneritaj soldatoj, kiuj unue rajtas delektiĝi dum kvin minutoj je la melodia signalo de trumpeto, kiun antaŭludas iu al ili por ties plezuro, antaŭ ol ili devos ellitiĝi.

„Kota porko, mi tretos sur vian stinkantan fi-vizaĝon, se vi ne tuj elestos!“

Estis Santiago, al kiu kriis *El Gusano*. Santiago jam vekiĝis. Li nur ĝuste okupiĝis pri tio kunfaldi sian kovrilon kaj sian moskitoreton kaj ruli ambaŭ aĵojn en la palmmaton.

„*Pero, jefe*, mi ja rajtos unue ankoraŭ kunruli miajn malmultajn mizerajn ĉifonojn, por ke ili ne plenigu sin per araneoj, formikoj kaj iksodoj, kaj eble eĉ malsekiĝus, se pluvus, ĉu?“

„Kiu ankoraŭ aŭdacas paroli ĉi tie? Mizera pedikohava nano el *Chamula*, vi volas eĉ malfermegi la faŭkon, se mi komandas, ion, ĉu?“ blekis *El Gusano* koleriĝinte, kaj kun la vipo, kiun li jam dekroĉis de la zono dum la vekado de la *muchachos*, li forte batis transverse sur la vizaĝon de Santiago. Tute precize li ne povis vidi, kie troviĝas Santiago, ĉar estis nigra nokto ĉirkaŭe. Sed unu el la bovoservistoj jam ekbruligis tielnomatan lanternon, sed ekstere de la palmkabano. Tio donis malfortan rebrilon de

lumo en la angulon, kie Santiago en la tenebro ordigis siajn aĵojn. Kaj tiu lumeto sufiĉis al *El Gusano* por povi celi al la vizaĝo de Santiago.

„Porkoj, jen tio, kio vi estas, mi ja instruos vin salti tien kaj tien, mi lernigos al vi, kiel oni laboru!“ Ĉe tio rapide klakadis la mallonga vipo transverse sur la nukon de alia viro, kiu ĝuste kliniĝis por simile levi sian lanternon, por povi eltiri per fingropintoj la dikan meĉon kaj ekbruligi ĝin. „Vi ja sciu, kiu mi estas, pigraj stinkantaj mulaĉoj.“

9/5

Apenaŭ li diris tion, jen en la sama momento, kiam li retrotiris la vipon por lanĉi denove sukan baton, eksonis el la tenebre nigra vepro, nur ĉirkaŭ dudek metrojn malproksime, la kantado de viro.

La kantado ne estis tre melodia. Evidente la kantisto mem kunmetis la muzikon, aŭ adaptis la vortojn de la kantado laŭ la maniero de liturgioj, kiujn la viro verŝajne iam aŭdis. Kvankam la kanto ne estis melodia, ĝi tamen estis ritma kaj havis svingon. La voĉo de la kantisto estis fortika kaj firma, ĉiu unuopa vorto de lia kantado tre bone kompreneblis kaj sonis trumpete hele tra la nigra nokto: „*El Gusano, El Gusano, tu hijo, ay*, de *un cabrón*; *e hijo d'una puta perra; tu alma es de chapapote; tu corazón un hueso del infierno; el diablo ya te espera y pronto él felíz será; que se muere El Gusano, que se mueren los Gusanos, los malditos y que víven los Inditos! El Gusano, El Gusano*, filo de putina servisto kaj ido de hundino, via animo estas petrola peĉo, via kor' osto el la infero; la diablo jam atendas vin

kaj sin je vi delektiĝos, mortu *El Gusano*, damnito, kaj longe vivu la indiĝenoj!“

El Gusano kvazaŭ ŝtoniĝis, kiam li aŭskultis la vortojn. Sed kiam eksonis la du lastaj frazpartoj, li jam retrovis sin. Kun rapida subita movo li eltiris sian revolveron kaj pafis trifoje, ĝuste en tiu direkto, el kiu eksonis la kantado. Sed en la eĥo de la lasta pafo aŭdiĝis akre sonanta ridado. Ne estis la ridado de timemulo, estis la sana, kvankam orelŝire akra ridado de viro, kiu sciis, kion li celis, kaj kial li celis tion.

El Gusano ŝiris lanternon elmane de proksime staranta *boyero* kaj saltis al la loko, kie li supozis la kantinton. Sed tie la vepro estis tiom dense prikreskata, ke li ne povis trairi. Li vokis por maĉeto. Kiam unu el la *muchachos* finfine alportis maĉeton, per kiu li volis elhaki vojon al si, li eksentis, ke li nur ridindigus sin, se li provus trovi la kantiston.

Lia sekva intenco estis pafi pliajn fojojn en la vepron, kun la espero, ke li trafos kaj kaptos la viron. Sed pri tiu intenco li rapide rezignis. Estus sensence forpafi eĉ pli da municio, tiom longe, kiom li ne certe sciis, kie estas la kantisto en tiu momento. Municiio en la ĝangalo estis tro valora por disipi ĝin.

Li turniĝis por retroiri al la kabano. Jen enkapiĝis lin alia ideo. Per la revolvero en la mano li moviĝis per du longaj saltoj proksimen inter la *muchachos*, kiuj ĉiuj staris kolektiĝinte ĉe la kabano. Kun rapida gesto li lumadis tien kaj tien kaj nombris la virojn. Ili estis kompletaj. Do ne povis esti iu el la viroj, kiuj laboris kun la bovoj. Dum momento li rigardis misfide al San-

tiago. Tamen li sciis precize, ke Santiago neniukaze estas la kantisto. Li ne estis foririnta kaj staris ankoraŭ en la angulo de la kabano, plu okupiĝante pri la kunrulado de sia *petate*, kiam komenciĝis la kantado. La kantadon detale pripensante, *El Gusano* konvinkiĝis, ke neniel povus esti iu el la *boyeros*; ĉar neniu el ili havis intonacion en la voĉo, kiu similis al tiu de la kantisto.

„Ek, al la laboro!“ li komandis. Sed li diris tion kun multe pli trankvila voĉo ol antaŭ la kantado.

9/6

Kiam la *muchachos* formarŝis al sia laboro, turniĝis *El Gusano* kun la intenco reiri al la kampadejo, kie li havis sian loĝejon en la sama ŝanceliĝema konstruaĵo, en kiu loĝis ankaŭ *El Picaro*. Estis la tasko de *El Gusano* matene veki ĉiujn *muchachos* kaj atenti pri tio, ke ĉiuj troviĝu laŭ la komandita tempo sur sia laborejo. *El Picaro* ĉiam dormis ĉiam iom pli longe kaj elvenis nur, kiam la tuta *semaneo*, en kiu li regis, jam laboris fervore. Li faris tion malpli pro pigreco ol multe pli per la bone pripensita intenco klare montri, ke li estas tie la senlimigita reganto kaj diktatoro, kiu ne devas adaptiĝi al laborhoroj, sed venas kaj foriras laŭ plaĉo.

El Gusano estis irinta ĉirkaŭ dek paŝojn, kiam li ekstaris, du sekundojn li restis staranta, kaj tiam li reiris al la kabano kaj vokis: „Valentin, venu ĉi tien kaj kunprenu vian maĉeton!“

Valentin estis *zacatero* ĉe la kolono de la *boyeros*, la viro, kiu respondecas pri la nutrado kaj flegado de la bovoj, kaj kiu, se la paŝtejo estas tro magra aŭ se tute neniu paŝtejo troviĝas prok-

sime, helpas al la maĉetistoj havigi foliaron de la arboj kaj arbustoj kiel furaĝon.

„Venu kun mi al la kampadejo“, diris *El Gusano* al Valentin.

El Gusano subite ektimis sola reriri al la kampadejo, tra la malhela ĝangalo. Li havis la maloportunan senton, ke la kantisto ankoraŭ kaŝas sin ie en la ĝangala densejo kaj atendas, kiel li ja diris sufiĉe klare en sia kantado, sendi lin al la diablo por fari plezuron al la infero.

La *muchachos* ĉiuj haltis, kiam *El Gusano* vokis Valentinon. Ili ja ne sciis, ĉu *El Gusano* eble havos alian komision por ili, kiun li volas sciigi al ili pere de Valentin.

El Gusano povis vidi je la lanternoj de la viroj, ke ili atendis, kaj li povis ekkoni de sia loko, eĉ, se nur malklare ĉe la lumeto de iliaj lumoj, ke la viroj flustre interparolis. Li imagis, kaj tion certe sufice ĝuste, kion diras la *muchachos* unu al la alia, eĉ, se li ne povis aŭdi ilin.

Tial li sin bridis, kaj anstataŭ diri al la *zacatero*, ke li akompanu lin, li diris nur: „Venu hodiaŭ frue posttagmeze al la kampadejo, por ricevi pli da maizo por la *bueys,* por la bovoj. Ili devos havi pli da maizo, alikaze ili fariĝus tro magraj.“

„*Si, jefe, vengo*, mi venos frue posttagmeze. Mi pensas, ke vi pravas, ĉefĉjo, la bovoj estas tre magraj kaj malbone nutrataj. La paŝtejo, kiun ni nun havas, tute ne taŭgas“, respondis Valentin. Kun laŭta tro krianta voĉo vokis nun *El Gusano* al la *muchachos*, kiuj ankoraŭ tiam staris tie kun la lanternoj kaj atendis:

„Damnita, pigra, stinkanta fiularo, kial vi staras tie kaj gapas kiel buĉitaj kastritaj virŝafoj?! Mi tuj foje venos al vi kaj instruos vin danci, se vi ne tuj saltados. La suno jam ekleviĝas. Kotŝmirita kanajlaro!“ *El Gusano* malfirmigis sian revolveron. „Ekkuru kaj rapide!“ li diris al Valentin. „Helpu al la *muchachos* ĉe la surmetado de la jugoj.“

„Tion mi ja faras ĉiam, *jefe*“, defendis sin la viro.

„Bone, ek al la aliaj!“ *El Gusano* turniĝis, levis sian lanternon por prilumi la vojon antaŭ si kaj migris al la kampadejo.

„Kion li do diris al vi?“ demandis Pedro, unu el la *boyeros*, la proksimiĝantan Valentinon.

„Temas pri pli da maizo por la bovoj. Mi venu posttagmeze al la kampadejo por havigi pli da maizo.“

„Jen preĝeja palavro“, respondis Andreo, la ĉefa *boyero*, „estas nenio krom remaĉaĵo, tio pri la maizo. Li fekis en la pantalonon, jen tio, kion li faris, kaj ĉar li vidis nin stari ĉi tie, li fekis pro timo eĉ pli en ĝin, ĉar ni povus ridi pri li, se li kuntrenus vin, por ke vi prilumu lian vojon.“

„Malbenite, *muchachos*, la *canción*, la kanto tamen trafis la dikan haŭton de lia stomako. Liaj postaĵpartoj ĉiuj estas malsekaj kaj plenaj de argilo, tia porko, damnita de Dio!“ Pedro grakis profunde elgorĝe kaj elkraĉis emfaze. Dum la viroj marŝis stumblete plu tra la morna ĝangalo por atingi sian laborlokon, diris Fidel, plia *boyero:* „Sed kion li propre kantis, pri kio? Mi ne ne povis memorteni ĉion. Sed, tio,kion la kanzonisto kantis,

estas ĝusta. Ĉiu vorto pravas, kvazaŭ kiel skribite. Se mi nur scius, kion li kantis.“

„Atentu foje, kion li kantis, kaj kiel?“ ripetis Andreo. „Nu, proksimume tiel: '*Los gusanos, los gusanos*, ha, tiuj rampadas ja en la kotamaso, manĝas merdon kaj drinkas sterkosukon kaj boras sin tra stinkanta larda graso; ili voras eĉ kadavron plu kaj rampas en mulotruon kun ĝu'.“ „Ne, tute tiel ja ne estis“, diris Pedro.

„Se vi scias tion pli bone“, respondis Andreo ridante, „jen, ek do!“

„Andreo“, enmiksiĝis Matias, „ankaŭ tiel, kiel diras vi tion, ĝi sonas belege, preskaŭ eĉ pli bele ol kantis tion la kanzonisto. Cetere, de kie vi do havas tion? Tio aŭdiĝas kiel aŭtentika preĝeja kanto.“

„Tiu? Tiu Andreo, ĉu?“ diris pro tio Fidel: „Pri tiu vi ja ne miru. Li povas legi kaj skribi, multe pli bone ol *cura*, ol pastro. Tion li legis en libro.“

„Eble. Sed eventuale mi eĉ mem elpensis tion“, opiniis Andreo preterire.

„Neniu surtere povas elpensi ion mem, tion oni povas nur legi en libro, aŭ en gazeto, se vi azeno efektive lernis legi.“ Fidel ne atentis pri la vojo kaj tial li falis en truon.

9/7

La viroj alvenis sur la paŝtejon, kie ripozis la *bueys*.

Kelkaj el la bovoj ekstaris peze flegme per si mem, kiam ili vidis la *muchachos* kun lanternoj proksime. Ili sciis, ke ili nun devos eklabori, kaj ili estis sufiĉe spertaj por scii krome, ke tiukaze, se ili estus tro lantaj ĉe la ekstarado, oni tretus ilin ventren, tiel, kiel oni tretis ankaŭ en la ventrojn de la *muchachos*, se ili ne sufiĉe rapide eksaltis, tuj kiam *El Gusano* komencis veki ilin.

Santiago tenante alte sian lanternon, ĉirkaŭrigardis kaj nombris la bovojn. Tiam li vokis: „*Que chingan todos sus madres*, jen mankas ses bovoj. Ek do, ĉiuj helpu serĉi! Ili troviĝas en la densejo kaj celas manĝi pli da furaĝo de la arbustoj."

Andreo restadis plu sur la paŝtejo kaj kun la helpo de Valentin komencis peli la bovojn pli proksimen al la dormokabano, kie estis stokita la maizo, kiun ricevis la bovoj antaŭ ol ili trotas al la laboro.

Kiam tiu unua trupo alvenis la kabanon, staris tie jam tri el la mankantaj bovoj, kiuj libervole venis tien, ĉar ili sciis, ke ili nun ricevos maizon.

Valentin kuris reen al la paŝtejo kaj vokis la serĉantajn virojn el la densejo. Ili jam trovis la tri aliajn bovojn sen scii, ke la alia bovotriopo estis jam ĉe la kabano.

Dum la bovoj maĉis sian maizon, kaŭris la *muchachos* ĉe la bivakfajro, kie ili kuiris kafon kaj varmigis siajn *frijoles* kaj tortiljojn. La nigrajn fabojn ili spicis per sovaĝa verda pipro kaj la tortiljojn, kiuj gustas per si mem kiel pajlo, la viroj plibongustigis per tio, ke ili disfrotis permane certajn ĝangalajn spicoherbojn sur la tortiljojn. Kelkaj el tiuj spicoherbetoj memoris rilate la guston pri pipra mento, aliaj pri celerio, aliaj pri akra poreo, kaj pliaj aliaj pri petroselo. La kafo staris ĉe la fajro en ladokruĉetoj, kiuj aspektis kiel malgrandaj, sveltaj kaj rekte starantaj bareletoj. Ĉiu *muchacho* havis sian propran kruĉeton, sian propran kafon kaj pecon da bruna kruda sukero.

Matias diris: „Ni refoje ĉasu, por kapti kelkajn grasajn serpentojn, por ke la *frijoles* ne estu tro sekaj."

„Aŭ eĉ pli bone ni elpelu iun *pescuintle* el trunko", konsilis Pedro. „Mi ĝuste havas nun grandan apetiton pri grasa *pescuintle*."

„Kial ne tuj porkan rostaĵon?" demandis Santiago.

„Jes, kial ne? Ankaŭ porkan rostaĵon!" koncedis Matias. „La tuta *jungla* estas plena de grasaj porkoj. Vi devas etendi nur manon."

„Ĉu vi eble havas fusilon? Kiel vi kaptu grasan porkon sen pafilo? Tion do diru al mi", volis ekscii Santiago.

„Per maĉeto mi kaptis foje du *puercos Silvestres,* tuj per unu fojo", fanfaronis Matias laŭ konata ĉasista maniero.

Sed neniu akceptis tion kiel veron, ĉar ili ĉiuj estis bonegaj ĉasistoj, ne pro aventuristemo, sed pro bezono kaj malsato, kapablaj ĉasi per ŝtono aŭ maŝo aŭ primitiva lanco sovaĝajn meleagrinojn, ĝangalajn kolombojn, simiojn kaj serpentojn.
„Ĉu vi? Per maĉeto? Du sovaĝajn *puercos*? Ha, pri tio ridas ja pediko.“ Santiago rigardis dum tio tiel furioze, kvazaŭ la fanfaronado de Matias estus persona ofendo. „Vi per maĉeto du porkojn, ĉu? Eĉ ne unu porkon, eĉ ne ĝuste naskitan, eĉ ne laman kruron de sovaĝa porko vi povus kapti per maĉeto. Mi ja sufiĉe bone konas vin, mi scias kiel vi entute uzas maĉeton. Kaj mi ankaŭ bone scias, kia speco de ĉasisto vi estas. Per maĉeto je unu fojo du sovaĝajn *puercos,* ĉu? Eble hejme en via vilaĝo, du malsovaĝajn kaj lamajn, kiuj troviĝis en barita korto, kaj tial ne povas forkuri, kaj kiuj estas tiom oldaj kaj malsanaj, ke ili renversiĝas per si mem, se knabeto ne pli aĝa ol kvin jaroj skuadas la latojn de la barilo.“

„Tiukaze vi do volas diri, ke mi estas fiulo kaj damnita mensogganto kaj *cabrón* kaj stinkanta filo de putino? Ĉu vi eble volas diri tion per tio? Jen ekstaru do, kaj jen vi tuj vidos kiel mi traktos vin. Tri tiajn, kiaj vi kaj ankoraŭ du pliajn aldone mi alfrontus. Kaj poste mi ankoraŭ sternus min kun du fortikaj *muchachas* sur la maton kaj farus al ambaŭ infanon“, diris Matias volvante siajn fabojn en varmegan tortiljon kaj demordante pecon kun tia emfazita gesto, kvazaŭ li formordus la kapon de unu el siaj surteraj frakasitaj malamikoj.

„Al ĉiu el la du fortikaj knabinoj vi farus nur po unu infano?“ enmiksiĝis Andreo por helpi mistifiki Matiason, kies fanfaronaĵoj estis sufiĉe konataj. „Vi gravedigas ĉiun *muchacha,* kun kiu vi sternas vin sur *petate* nur unufoje? Kia malgaja ulo vi do

estas? Kial vi ne tuj faros tri bebojn al ĉiu el ili, se vi jam foje komencis tion?“

„Ĉu vi eble ne pensas, ke mi kapablas tion? Mi povas pruvi tion al vi, tiel, ke vi ĉiuj malfermegos la okulojn kaj gapos kun malfermitaj okuloj. Tion mi kapablas. Ĉu vi scias cetere, kiom da infanoj mi povus havi, se mi nur celus tion?“

„Jes, tion ni scias, ducent kaj tridek, se ili ĉiuj sukcese estus naskitaj kaj vi ne estus tro stulta konvinki eĉ nur unu *muchacha* pri tio, ke estas plezuro sterni sin kun vi sur mato.“ Tion diris Cirilo, dum ĉiuj ridis kaj tiom longe ridis ĝis ankaŭ Matias komencis ridi kaj tiam finis la matenmanĝan interparoladon per tio, ke li diris: „Vi ne konas min, fratetoj miaj, jen la kialo. Tio estas la sola kaŭzo. Kaj mi pruvos al vi ankoraŭ ĉi tie kaj aliloke, ke mi tute bone scias, kion mi kapablas kaj kion ne.“

„Kion vi ne scias, ni ĉiuj scias, montru fine foje al ni, kion vi kapablas“, diris Pedro, elverŝante ekstaronte la kaforekrementon el sia kruĉeto.

„He, Valentin!“ vokis Andreo. „Ĉu la bovoj jam formanĝis ĉion?“

„Ili remaĉas ankoraŭ.“

„Se ni volus atendi ĝis kiam ili ne plu remaĉos, tiukaze ni sidus ankoraŭ ĉe la sekva Candelaria-festo ĉi tie. Ek, hop, hop! Se *El Gusano* ekvidos nin ankoraŭ kaŭrantaj ĉi tie, jen li karese skurĝos nin en unu el siaj *fiestas,* kaj poste ni povos grati la vermlarvojn el niaj frakasitaj dorsoj.“

La *muchachos* fariĝis nun tre fervoraj. Dum malpli ol du minutoj ili pendigis la kuirilojn kaj la restaĵojn de sia manĝo en la kabano al transversa trabo, rulumis cigarojn, ekbruligis ilin, estingis la fajron per tretado, kaj poste marŝis la bovoj jam pelataj de la viroj, por ke la viroj atingu la laborlokon.

Eble estis tiam jam je la unua kaj duono matene. La aero komencis fariĝi nebula kaj pendigis sin kiel vualoj ĉirkaŭ la malaltaj arbustoj de la ĝangalo.

Rimarko
pescuintle = speco de kuniklo, luksa manĝo en Meksiko kaj apudaj landoj

ĈAPITRO 10

10/1

Andreo vokis la knabon Vicente al si.

Vicente estis magra indiĝena knabo, apenaŭ dek ses jarojn olda. Lia patrino devis ŝuldigi sin per tridek pesoj, post kiam lia patro estis tretita de spitema mulo kaj mortis pro tio. Ŝi ne volis entombigi sian edzon kiel hundon, de kiu ŝi havis ok infanojn. Ŝi aĉetis simplan ĉerkon kaj invitis la pastron, ke li helpu enterigi la patron de la infanoj je kristana maniero.

La *cura* ne povis farition por nenio, sed ĉar Dio donis inteligentecon al li, kaj ankaŭ sanan stomakon, kiu estis ĉiutage pleni-

genda, por ke la inteligenteco ne ekrustiĝu kaj ĉar la korpo bezonis vestojn, por ke ĝi ne kaŭzu publikan ĉagrenon, restis al la *cura* nenio alia krom lasi pagi al si per sonorantaj moneroj por la beno de Dio, kiun li disdonis. Tio per si mem ne estas peko, kaj ĝi estas same tiom honesta negoco kiel haki timonon de ĉaro aŭ forĝi hufajn ferojn. La peko nur tiukaze enŝteliĝas en tiun sanktan entreprenon, ĉar la *curas* enflustras al la homoj, ke la korpoj de la mortintoj nepre estu entombigitaj je kristana maniero,per ŝpatoj kaj ŝoveliloj; kaj per kristana maniero, tio signifas kompreneble kun la helpo de *cura*, kun sonorilado de sonoriletoj kaj disŝprucado de akvo. Kaj se oni enfosas la mortintojn sen speciala konsekro, kiun povas entrepreni nur unktita pastro, tiukaze la kompatindaj animoj devos suferi, jen oni rostkrados ilin kaj ili povos nur vekrii kaj klakadi la dentojn anstataŭ kanti piajn kantojn kaj ludi harpon. Tiel oni konvinkas la homojn, ĉu povrajn ĉu riĉajn, ke la beno de Dio necesas, kaj ke ili devas peni akiri tiun benon por si aŭ por la animoj de la mortintoj aŭ, se oni tuj volas diri tion tute klare, ke ili devas aĉeti ĝin.

La *cura* posedis prezoliston por la diversaj manieroj kaj gradoj de la benoj, kiujn li havis en sia butiko. Kvieta preĝo en la preĝejo, kiun li tiom mallaŭte ekzercis, ke aŭdis ĝin neniu, kostis peson kaj dudek kvin centavojn. Se li preĝis ĝin tiel laŭte, ke oni aŭdis lian murmuradon sen povi kompreni, kion li diris, jen kostis tio du pesojn kaj kvindek centavojn. Se dum tio devis bruli certa kvanto de kandeloj por fari la preĝon pli solena, jen kostis kvin pesojn. Kun la kantado de la ĥorknaboj naŭ pesojn. Kun la sonorado de sonoriletoj dek du pesojn kaj kvindek. La prezo altiĝis ĝis ducent kvindek pesoj, por kio oni liveris ĉion, kio estis en la repertuaro: speciala meso, kompleta iluminado

de la preĝejo, muziko kaj kantado ĉe la tombo kaj ankoraŭ diversspecaj malgrandaj tintadoj kaj vestaj pendaĵetoj, diroj kaj kantetoj, svingadoj de la incensbareleto kaj sanktaj ŝprucetoj, latinaj litanioj kaj surgenuiĝoj. Tiu lukso kompreneble estis nur por la riĉaj bienuloj, la grandaj posedantoj de bienegoj, la generaloj, la riĉiĝintaj *diputados* kaj la *jefe politicos,* la *contratistas* kaj la varbaj agentoj de la monterioj.

La patrino de Vicente, la edzino de povra indiĝena peono, kvankam ŝi volis honoradi sian mortintan edzon per ĉio ajn, kio eblis, povis elspezi nur tridek pesojn, ĉion inkludite:la ĉerkon, la entombigon, la tombofosiston, la benon de Dio, brandon por la funebrantaj viroj, kafon kaj anizlikvoron kaj kelkajn tre malmultekostajn kuketojn por la inoj.

Sed tiujn tridek pesojn la vidvino kompreneble ne havis.

Ĉio, kion ŝi posedis en la domo, estis tridek kvar centavoj. Tial ŝi iris al la bienulo, al la mastro de la bienego, en kiu ŝia edzo laboris kaj dum sia laboro kaj sekve de sia laboro mortis en akcidento.

Post longa marĉanda diskutado kaj interparolado, multaj ploroj kaj petoj, la bienposedanto estis tiom tuŝita de la sorto de la vidvino, kiu nun postrestis kun ok infanoj, ke li sentis sin preta pruntedoni la tridek pesojn al la ino.

„Sed tion vi ja scias, Chabela“, diris afereme la bienposedanto, „ke mi ne povas fordonaci ion. Plej malmulte tridek pesojn.“

„Tion mi scias bone, *patroncito*. Neniu povas fordonaci ion surtere.“

„Tio pravas, Chabela, kaj bone, ke vi akceptas tion. Elpidio, via edzo, Dio benu lian kompatindan animon, postlasis naŭdek du pesojn kaj sesdek kvin centavojn kiel ŝuldon ĉe mi por varoj el la *tienda*, kiujn li ne pagis, kaj kiujn mi devis skribi sur lian ŝuldokonton.“

„Tion mi scias, *patroncito*.“

„Kiom da infanoj vi havas, Chabela?“

„Ok, patroncito. Kvin *varones* kaj tri *hembras*.“

„Tio estas tre bona por vi, ke vi havas kvin knabojn, la knabinoj ne multe taŭgas.“

„Certe ne, *patroncito*. Kaj mi petis *Madre Santísimia* tiom ofte kaj bruligis kandelojn por ŝi, por ke ŝi donu nur *machos* kaj neniujn *hembras* al mi. Sed *Madre Santísimia*, certe, ĉar ŝi mem estas *muchacha*, eĉ se sankta, donis al mi nur tri *muchachas*.“

„Jes, tio ne estas nia kulpo, Chabela. Tio estas la decido de la *Nuestro Señor*, de nia Sinjoro en la ĉielo, kaj ties decidojn ni devas obei.“

„Si, patroncito.“

„Kiom aĝas via plej maljuna *muchacho*?“

„Vicente, ĉu? Li estas nun – li naskiĝis en la sama jaro, en kiu forbrulis la *cantina* de *don Eŭlalio* dum la Candeleria-festo."

„Tiukaze Vicente havas nun dek kvin jarojn. Bone, mi pretas doni al vi la tridek pesojn, *Chabela*, sed Vicente devos pagi tion al mi. Mi parolos kun *don Gabriel*, se li trairos ĉi tie, por ke li varbu ĝin por la monterio, kaj *don Gabriel* repagos al mi la monon."

„Sed Vicente ne eltenos la monterion, *patroncito*. Li estas ankoraŭ tre juna kaj malforta."

„Ĉu vi volas havi la tridek pesojn por la entombigo ĉu ne?"

„Certe, *patroncito*. Mi ja ne povas entombigi mian *karan Elpidio* kiel mortan hundon."

„Tiukaze Vicente do iros en monterion."

„*Si, patroncito*, tiukaze Vicente iros en monterion."

„La tri plej maljunajn *muchachos*, kiujn vi havas, Chabela, mi prenos transen en la domon, ankaŭ la plej maljunan knabinon, por la laboro. La naŭdek du pesojn, kiujn Elpidio havas ŝuldojn ĉe mi, forlaborendos. Tion vi ja scias, ĉu?"

„*Si, patroncito*." La vidvino ĝemis. Ŝi ĝemis nun je la unua fojo dum la longa interparolado.

„Vi kompreneble restos plu en la bieno, kun ĉiuj viaj infanoj, kaj vi laboros tiel plu, kiel jam antaŭe. Viaj infanoj intertempe ja

plenkreskiĝos kaj certe fariĝos diligentaj peonoj. Se vi bezonas ion el la *tienda*, jen venu al mi post la entombigo. Mi skribos por vi konton, Chabela."

„*Muchas gracias, patroncito*."
„Nu, bone, mi pagos por vi la tridek pesojn, kiujn vi nun nepre bezonas. Sendu Vicente al la *tienda*, por ke li prenu ĉion, kion vi bezonas por la *entierro*, por la entombigo."

„*Muchas, muchisimas, mil gracias, patroncito",* diris la ino. Dum la interparolado ŝi staris antaŭ la bienposedanto, kiu lulis sin en la hamako, en la portiko de la domo. Ŝi nun tre proksimiĝis al li, kliniĝis profunde, kaptis manon de li kaj kisis ĝin respektoplene.

La bienposedanto tuŝis per la alia mano la nekombitan hirtan hararon de la ino kaj diris: *„Que vaya con Dios, hija;* Dio gardu vian vojon, filino!"

10/2

Vicente prenis de la *enganchador don Gabriel* dudek kvin pesojn antaŭpage, kiam li lasis varbi sin por la monterio, sekvante la ordonon de la bienulo, por la entombigaj kostoj de sia patro, la tridek pesoj. De la dudek kvin pesoj la knabo donis dudek pesojn al sia patrino, por ke ŝi aĉetu ĉemizojn kaj pantalonojn por la pli junaj gefratoj, por ke ŝi ne ŝuldigu sin pli ol necese ĉe la bienulo.

Kvin pesojn li devis reteni por si mem, ĉar li bezonis *Cobija*-n, kovrilon, maton, ladan kafokruĉeton kaj du potetojn por povi

kuiri por si fabojn kaj eble foje pecon da viando, kiam li troviĝos sur la longa kaj streĉa vojo tra la ĝangalo por esti kondukata kun la ceteraj varbitaj mahagonlaboristoj al monterio. La kovrilo taŭgis preskaŭ nenion, ĉar li ne povis aĉeti bonkvalitan, por tio ne sufiĉis la mono.

Tio estis kvindek kvin pesoj, kiujn li nun havis sur sia ŝuldokonto. Aldoniĝis la dudek kvin pesoj por la stampilo de la prezidanto de la *municipalidad* en *Hucutsin* por la laŭleĝa konfirmigo de la laborkontrakto.

*Don Gabrie*l, la agento, pagis al la bienulo la tridek pesojn, kiam la knabo estis transdonita al li laŭ la kontrakto. *Don Gabriel*, pri kiu certe neniu povis aserti, ke li havas kunsuferantan koron, sentis en tiu okazo, eble la unuan fojon en sia vivo, iom da kompato pri la malforta knabo. Tial li prikalkulis por li nur dudek kvin pesojn por la kontrakta varbado. Krome li penis vendi la knabon en monterion pri kiu li sciis, ke la vivo tie estas ne tiom dura kiel en la plimulto de ĉiuj ceteraj.

Jen la monterio *La Armonía*, kie estis administranto *don Leobardo Chavero*, kiu certe traktis malpli krude la laboristojn pli pro oportuno kaj anima trankvilo ol pro bona koro, kaj kiu eĉ konsolis ilin per tio, ke li diris, ke li zorgos por pli da justeco, se ili venis al li pro plendoj pri kruelaj traktadoj, kiujn ili laŭdire devis trasuferi pro la *contratistas* aŭ ties *capataces*. Kompreneble li tute forgesis tion post duono de horo. Sed la laboristoj almenaŭ gustumis la belan konscion, ke estas iu surtere, kiu aŭskultas iliajn plendojn kaj kiu faris al ili dekon da promesetoj, kiuj bonfartige sonis, se oni elparolis ilin. Ankaŭ tio validas ja multon. En preskaŭ ĉiuj okazoj sufiĉas tute, se la labordonantoj

faras multajn promesojn al la laboristoj, aŭ iliaj regantoj aŭ propraj gvidantoj. Ke oni plenumos tiajn promesojn, atendas neniu. Nur dum revolucio la laboristoj rememoras pri tio, dum tiuj, kiu promesis ion, tiam asertas, ke ili opiniis tion ne tiel, kiel la laboristoj interpretis tion, sed tiel, kiel ili estis favoraj al la ĝenerala bonfarto. Kaj la ĝenerala publika bonfarto estas ĉiam kontraŭ la laboristoj, ĉar, se ĝi estus por la laboristoj, oni devus ne paroli pri la ĝenerala bonfarto aŭ pri la popola bonfarto, sed si
mple nur pri tute kutima nedekoraciita justeco.

Rimarko
municipalidad = municipo aŭ municipio (urbo aŭ teritorio havanta relative sendependan registaron)

10/3

Post la alveno en la monterion Vicente devis aĉeti diversajn aĵojn, kiuj estis nemalhaveblaj: moskitoreto, pli bona kovrilo, kelkaj sandaloj, pantalono. Tial poste lia konto, kiu komenciĝis per la tridek pesoj por la entombigo de lia patro, estis kreskinta ĝis centdek pesoj, sen tio, ke li ĝis tiam perlaboris eĉ nur unu centavon. Aŭ dirate per aliaj vortoj: La originaj tridek pesoj da ŝuldoj pliiĝis proksimume je tricent procentoj.

La knabo ricevis du realojn, dudek kvin centavojn ĉiutage por labortempo, kiu malofte estis malpli longa ol dek ses horojn. Nur por forlabori la centdek pesojn, li devis strecĉe labori kvarcent kvardek tagojn. Sed ĉar de tiuj du realoj eĉ estis pagenda eta sumo por lia manĝo, kiun li devis doni al la kuiristo de la laboristoj, ĉar krome neeviteblis en la kuro de la monatoj pliaj

aĉetoj de pantalonoj, sandaloj, ĉemizoj, tabako kaj aliaj aĵoj, la supozo estus certe ĝusta, se oni asertus, ke Vicente devos labori dekmil jarojn en la monterio antaŭ oli estos forlaborinta la originajn tridek pesojn por la entombigo de sia patro.

Eble necesus nur okmil jaroj, sed unu- aŭ dumil jaroj pli aŭ malpli ne ludas rolon.

Justeco regis en la monterioj. Tio estas direnda, por ne ekestigi erarojn. Ne estis esceptoj ĉe la laboristoj. Ĉiu el ili estis tute same ligita al la monterio kiel Vicente. La laboristoj, kiuj devis streĉi siajn muskolojn plej forte, la hakistoj kaj *boyeros, estas vere,* perlaboris pli bone, kvar aŭ kvin realojn ĉiutage; sed por tio ili havis ja pli grandajn antaŭpagojn kaj pli grandajn ŝuldojn, kaj krome pli altajn salajroreduktojn por fuŝliveroj kaj pli altajn pagojn al la kuiristo. Sed regis tie tiom da justeco, ke ĉiu ajn el ili bezonis sesmil jarojn ĝis dekmil jarojn por esti liberigita per sia laboro de siaj ŝuldoj.

10/4

Eble pro kortuŝa rigardo de liaj malgajaj okuloj vekis Vicente ankaŭ ĉe *don Leobardo* simpation. Li ekkonis je lia aspekto, ke la knabo ne longe eltenus en la ĝangalo. Tial li donis al li facilan *mozo*-laboron, kiel knaboserviston, kiu devis teni pura kaj ordigita la bangalojn de la dungitoj. Tiel la vivo por Vicente estis tute bone eltenebla. Li ricevis de tempo al tempo vangofrapojn de *don Leobardo* aŭ de unu el la aliaj dungitoj, se ili estis ebriaj aŭ, se ili ĉagreniĝis pri io. Sed tio estis rekomenpencita per tio, ke la samaj dungitoj aŭ la inoj, kiuj loĝis kun ili, kaŝe donacis al li tion aŭ tion, kion li certe ne povus ricevi, se li devus labori en la

ilara stokejo aŭ kun la metiistoj. Li rajtis malplenigi la restaĵojn de malfermitaj sardenaj skatoletoj aŭ frande leki el la skatoloj de konservitaj fruktoj la sukon, li ricevis jen pecon de ananastorto postrestinta surtable, jen pecon de ĉokolado, kiu estis nur ekmordita, jen je duono fumitan bonan cigaredon, jen gluton da vino aŭ likvoro kaj ĉeokaze eĉ ĉemizon, kiu eble estis tro granda, sed uzebla por li, post kiam li kunkudris ĝin per kelkaj firmaj fadenoj je la tro vastaj partoj.

Se li ne havus tiom grandan sopiron pri sia patrino kaj siaj gefratoj, tiukaze li certe estus feliĉa tie; ĉar tiel facile kaj agrable li neniam bonŝancus vivi en la bieno, kie la laboro sur la kampoj tute ne estis facila kaj kie hajlis pli da batoj kaj pli fortaj ol tie. Ĉar la bienuloj ne povis permesi perdi laboristojn per tio, ke ili metis malobeemajn kaj pigrajn peonojn en la *calabozo*-n, en la karceron de la bieno, tial la *mayordomo* simple suke batadis ilin por iuj pekoj, kiujn ili deliktis kontraŭ la interesoj de la bienuloj, sed ĉiam vespere kaj tiel, ke ili sekvamatene denove ĝustatempe povu reveni al la laborejo.

Konsiderante ĉion tion, Vicente rajtigite povis diri, ke li bonfartas en la monterio. Sed ke li ne nur bonfartis en la monterio ĝis tiam, sed en vero vivis kiel en la paradizo, li eksciis je la sama tago, kiam *don Leobardo* jam forveturis kaj la fratoj *Montellano* transprenis la monterion.

Al la fratoj *Montellano* humana kunsento aŭ konsideroj pri la korpaj kapabloj de laboristoj estis tute fremdaj. Ili konis nur soldatojn, subulojn, kiuj devis plenumi neniun alian taskon en sia vivo krom akceli la bonfarton de la fratoj *Montellano*. La laboristoj estis nur figuroj, kiuj estis ŝovataj tien kaj tien laŭ la volo

de *don Severo*, de la diktatoro tie, sen havi eĉ la plej etan rajton diri jes aŭ ne aŭ entute elparoli deziron. Tiu, kiu esprimis eĉ nur vorton kontraŭ iu ordono, ricevis, kaj tio estis la plej malgranda ebla puno, sukan piedbaton postaĵen aŭ ventren. Dependis de tio, kiel la viroj staris antaŭ la komandanto. Laŭ tiuj piedbatoj, kiujn ili ricevis de siaj mastroj, la indiĝenoj nomis la hispanojn *cachupines*, tiel kiel ili nomis la germanajn kafoplantistojn kaj terposedantojn *Chinos Blancos,* pro aliaj virtoj, kiuj de la indiĝenoj estis observataj je la germanaj grandsinjoroj – kaj bone observataj.

Rimarko

Gachupines aŭ *Cachupines* = derivaĵo de la azteka vorto *„gatzopin“*, tradukita; rajdisto“ Dum la kolonia tempo en Meksiko, kiu tiam ankoraŭ nomiĝis Nov-Hispanio, oni nomis la koloniistojn naskitajn en Hispanio *peninsulares*, malŝate: *gachupines*). Ili formis la regantan klason kaj okupis ĉiujn gravajn politikajn oficojn. Komence de la meksika sendependiga milito pastro *Miguel Hidalgo y Costilla*, anstataŭ la kutima dimanĉa prediko, alvokis je la 16-a de septembro en 1812 laŭ buŝaj legendoj per sia *Grito de dolores* (dolora krio) al la rezisto kontraŭ la tiranoj. Ĉe tio li vokis: *„Viva la Virgen de Guadalupe* (Vivu la sanktulino de Guadalupe!) *Muerte al mal gobierno,* (Morton al la fia registaro), *Muerte a los gachupines* (La morton al la *gachupines*“)

10/5

Tuj kiam *don Leobardo* forveturis kun la karavano, *don Severo* komencis ĝeneralan inspektadon, unue en la *oficinas*, en la *ciudad*.

„Kion faras vi ĉi tie, *muchacho*?“ oni demandis la knabon.

„*Soy el mozo, patron;* mi estas la servobubo ĉi tie.“

„*Mozo* por kiu?“
„Por *don Leobardo* kaj la ceteraj *caballeros*.“

Don *Severo* rigardis la knabon. „Ĉu vi povas kuiri?“ Li esperis eble povi uzi la knabon kiel kuiriston.

„*No, patron*.“

Don Severo rigardis la knabon denove. Poste li diris: „Turniĝu, lasu min rigardi de la alia flanko.“

Li longe rigardis la knabeton de malantaŭe, poste li ordonis, ke li montru reesian vizaĝflankon, por rigardi lin je plia fojo kaj pli atenteme.

„Tre granda vi ne estas.“ Li kaptis lin je la brakoj kaj palpis ties muskolojn. „Montru la manojn!“

La knabo etendis la manojn antaŭen.

„Ĉu vi neniam faris ion gravan?“

„Mi estas *mozo* ĉi tie, *jefe*!“

„Tion mi nun ne demandis vin. Kaj tenu fermita la buŝaĉon, aŭ mi pugnos vin vizaĝen!“

Tiam li komencis pripensi la aferon.

„Mil damnoj, kien mi metu vin? Por la *mozo*-laboro mi serĉos al mi knabeton, eble iun de ino, kiu ne scias, kion fari kun li, kaj kiu prefere estus sufokinta lin antaŭ ol li elrampis. Tia bone povus fari tion. Kiom da salajro vi ricevas ĉi tie?“
„Du realojn, *patroncito*.“

„Tio estas hontiga, kiel la uloj diboĉis per la mono. Doni al bebo, kiu ankoraŭ suĉas je la mampintoj, du realojn! Tio ja laŭte kriigas onin! Du realojn. Tiel ni post kvar semajnoj bankrotiĝus kaj povus dronigi nin.“

„Du realojn mi havas en mia kontrakto, patronĉjo.“ Vicente defendis sian mizeran salajron.

„Ĉu mi demandis vin?“

„*No, jefe, perdoneme!*“

„Tiukaze tenu fermita vian buŝaĉon!“

La knabo tie staris timigite, kvazaŭ li rampus en sin mem, pro kio li aspektis ankoraŭ multe pli malgranda kaj pli senforta ol li estis efektive.

„Ĉi tie pigrumas neniu“, diris *don Severo*, „ĉi tie oni laboras. Tio, kion vi faras ĉi tie, ne estas laboro por granda kaj fortika knabo, kia estas vi. En ordo, la du realoj restu al vi, ĉar ili jam foje estas en la kontrakto. Vi iros nun al la *bodega*, kaj tie al la ilara tenejo, kaj laboros tie kun *don Feliks*, ĝis kiam mi havos ion alian por vi. Kaj utiligu vin kaj laboru fervore aŭ mi devos vangobati vin.“

„Si, patroncito.“

Vicente iris al la *bodega* kaj laboris kun *don Feliks*. Dum la unuaj tridek minutoj li jam surhavis kvar vangobatojn. Kaj dum la sekva duono de horo *don Feliks* jam dufoje batis per jugotrabo sur liajn gambojn kaj per bastono sur lian kapon, tiel, ke lia kaphaŭto diskrevis kaj la sango fluis malsupren.

„Ĉi tie oni laboru kaj ne dormu!“ Per tiuj vortoj *don Feliks* emfazis ĉiun vangobaton kaj ĉiun ĵeton per bastono aŭ grimpohoko. La motivon kompreneble ne li eltrovis, por tio liaj spiritaj kapabloj ne sufiĉis. La vortoj estis prenitaj el la vorttrezoro de lia frato *don Severo*. Sed *don Feliks* komprenis ĉiam ĝuste uzi la motivon. Pli precize dirate, li uzis ĝin seninterrompe, ĉar laŭ lia opinio, ĝi ĉiam taŭgis, eĉ se li sciis diri nenion krome.

Rimarkoj
No, jefe, perdoneme! = Ne, ĉefo, mi petas pri pardono.
patroncito = patronĉjo
semaneo = laborloko, laborejo
soy el mozo = Mi estas la servbubo

10/6

Kiam *don Severo* kvin semajnojn poste venis al la *oficinas*, kun la intenco, plian fojon fari tie ĝeneralan inspektadon, ĉar li bezonis pli da viroj antaŭ la arboj, li renkontis ankaŭ la knabon Vicente.

„Kie vi nun laboras?“

„En la *bodega*, patronĉjo.“

„Tio ne estas laboro por tia juna fortulo, kia estas vi. Vi aspektas pale. Mi kunprenos vin al la *semaneo*. Tie la aero estas pli freŝa. Tiu bonfartigos vin.“

„*Si jefecito*.“

„Kiom vi enspezas perlabore?“

„Du realojn, *jefe*.“

„Tio estas peko sub la ĉielo de Dio, doni al tia mizerulo nomata knabo, kia estas vi, dudek kvin centavojn da salajro ĉiutage! Tiu mono estas kvazaŭ forĵetita. Vi iros kun mi! Vi laboros kun la *boyeros*. Jen vi meritos la du realojn. Ĉi tie en la *bodega* vi meritus eĉ ne *quinto*-n, kvincentavan moneron. Tiun laboron povas fari knabeto. Filo de la inaĉoj, de la putinoj, kiuj ja tamen nur sufokas siajn infanojn aŭ dronigas kiel junajn katojn. Mi faros diligentan *hachero* el vi. Lasu min foje palpi viajn brakojn. Ne tuj sukcesos, sed post kelkaj semajnoj. Tiam vi povos enspezi tri realojn. Kaj se vi liveros viajn du tunojn, mi donos eĉ kvar realojn al vi.“

„*Muchas gracias, patroncito!*“ En lia voĉo aŭdeblis timo.

„Kvar realojn, se vi atingos la du tunojn. Mi ne priŝtelas povrajn indiĝenojn. Mi trompas neniun pri ties salajro. Lasu doni al vi en la *tienda* tion, kion vi bezonas.“

„Jes, patronĉjo, mi ekiros. Mi certe bezonos kelkajn aĵojn el la *tienda*, se mi migros al la *semaneo*.“

„Mi metos vin al Andreo. Li estas fervora *boyero*. Li scias kiel bone instrui al vi la metion.“

„A sus ordenes, patroncito!“

Kvankam li certe ne havis kaŭzon ridi en la *bodega* dum sia laboro en la unuaj semajnoj, li tamen baldaŭ kutimiĝis pri tio, kaj ĉar *don Feliks* estis pli okupita pri aliaj laboroj en sia *oficina,* li venis nur malofte al la *bodega*, kie Vicente dum la lastaj tri semajnoj plenumis ĉiujn laborojn, kiujn antaŭe, sub *don Leobardo*, faris la administranto *don Mariano Tello*, kiel alte pagita dungito. Sed certe estis malpli da laboro en la *bodega* ol sub *don Mariano*, ĉar ĝuste tiam ne venis novaj laboristaj trupoj. Sed la laboro ankaŭ dum la kvieta tempo estis sufiĉe grava, tiel, ke ĝi bezonus inteligentan kaj plenkreskintan viron. La inteligentecon kaj la plenkreskecon abunde liveris *don Feliks*, kiu donis al Vicente ĉiujn instrukciojn; kaj se ili ne estis plenumitaj precize tiel, kiel li atendis, jen al Vicente fulmrapide hajlis ses bastonbatoj inter la gambojn aŭ la mulovipo sur la nukon.

*K*ompare al la kruele strečа laboro en la ĝangalo kaj la ĉirkaŭ kvincent danĝeroj, kiuj tie embuskis ĉiun viron, tamen estis la estado en la *oficinas* por sufiĉe malforta knabo tia, kia estis Vicente, ĝuste ankoraŭ eltenebla.

Kiam li eksciis, ke oni tuj sendos lin al la *semaneo,* li sentis, ke ankaŭ la lasta fadeno, kiu ligis lin ankoraŭ al la paradizo, estis tratranĉita. Ne estis la teruriĝo pri la laboro en la ĝangalo, kiu

malĝojigis lin. Estis la definitiva disiĝo de la vivo, kiun li havis sub *don Leobardo*, kiu vekis profundan hejmsopiron en li, hejmsopiro pri la kvieto kaj protekto en la bieno proksime de lia patrino kaj de liaj gefratoj. Li ankoraŭ ne estis viro, kvankam *don Feliks* elpremegis kaj batadis la laboron de plenkreska viro el li. Li fakte eĉ ne estis juna viro. Li estis ankoraŭ infano. Kaj neniam en sia ĝistiama vivo li sentis sin pli kiel infano, pli kiel protektbezona hometo krianta je sia patrino ol en tiu momento,kiam *don Severo* sendis lin per fridaj vortoj en la ĝangalon. Li sentus sin pli bonfarta, se li povus sidi sub arbo, por nevidate de iu, elkore povi plori. Tio plifaciligus lian animon kaj la vunditecon, kiun li sentis.

Sed por tio li havis nek tempon nek okazon. Apenaŭ li aĉetis en la *tienda la* bezonatajn aĵojn, jam kriis *don* Severo kolere al li: „He, pigra ftiza bufo, fibubo, kie vi vagabondas nun? Selu mian ĉevalon kaj helpu al la *arrieros* ĉe la surŝarĝado de la muloj, kiujn ni kunprenos al la *semaneo*. Moviĝu, damne! Mi pagos al vi vian salajron, sed mi ne havas monon disipeblan al pigraj indiĝenaj kanajloj.“

Antaŭ ol Vicente vere rekonsciiĝis kaj povis pripensi, kio okazas ĉirkaŭ li, li estis jam kun peza pakaĵo surdorse marŝanta. Li trotis post la muloj, kun la paŝado, kiun havis la muloj. Tiel, kiel la pakmuloj ankaŭ li seninterrompe sinkis profunde en la tenacan marĉon de la ĝangalo; simile al la muloj li devis peni por tiri la piedojn el la marĉo. Tiel, kiel la muloj li stumbletis kaj ŝanceliĝis supren sur la ŝtonecajn montetojn kaj malsupren. De tempo al tempo, se la vojo estis tro kruta, li ĝemis kaj ĝemegis kiel ili. Sed tial li devis elteni la murmurantajn kaj ruliĝantajn furzojn de la pakbestoj trotantaj antaŭ li.Ĉar li timis tro malproksime resti

post la aliaj, kaj eble eĉ fariĝi la predo de jaguaro aŭ perdi la vojon. Kaj se li ne sufiĉe proksimus al la lasta mulo de la trupo, jen li perdus la subtenon, kiun la lasta mulo envice bonvoleme donis en duraj lokoj de la vojo per tio, ke ĝi ne hufobatis, kiam Vicente, kaptante la voston de la besto, pretendis helpon por antaŭeniĝo. La mulo havis pli da kompato kun li ol *don Severo*. Sed oni ne forgesu, ke la mulo ja ne pagis la salajron al li. Eble la besto sentis tute ĝuste, ke la knabo havis pli komunan sorton kun li ol iu ajn alia. Ĉar ĝi trotis je la sama ĉeno. Kaj la plej fidela amikeco formiĝas ja inter tiuj, kiuj estas forĝitaj al la sama ĉeno, kaj tial devas toleri similajn suferojn.

10/7

El Gusano kunprenis la knabon Vicente je tiu mateno, kiam li venis veki la *boyeros,* kaj li transdonis lin al Andreo. Andreo havis la taskon instrui la metion al li, por ke pli forta viro ĉe la *boyeros* fariĝu malhavebla kaj sendebla al la hakistoj.

„Kion mi faru ĉi tie kun tiu malgranda *mosco*? Kun tiu muŝeto? Li ja eĉ ne povas levi jugon kaj li ne estas sufiĉe granda por fiksi ĝin per rimenoj. Tiel ne estus sufiĉe da fortikaj viroj ĉe la *tiros*.“

„Vi faros tion, kion *El Picaro* komandis, ĉu komprenite? Kaj parolu neniujn kontraŭvortojn. Mi povos doni al vi ankaŭ duan plendorson da karesoj, tiel, kiel ĉe la unua fojo. Aŭ ĉu vi jam forgesis tiun?“

„Nur ne zorgu pri tio, tion mi neniam forgesos al ci!“

„Vi cidiras min? Ekkomprenu! Kun vi mi ankoraŭ ne dormis sur la sama petato. Kaj aldonu: *a sus ordenes, jefe!* Ĉu kompenite?“

„Certe, vi havas ja la revolveron.“
„Vin mi ja ankoraŭ kaptos por dua aŭ tria '*fiesta*'. Kaj mi tiukaze okupiĝos unue pri vi, kiam mi ankoraŭ havos plenfortajn brakojn kaj ankoraŭ bone povos levi la brakon por svingigi ĝin“.
El Gusano rikanis tiel, ke ne nur liaj ŝarkokodentoj videblis, sed eĉ pli ties ŝvelinta ruĝviola dentokarno, kiu tre antaŭenŝoviĝis, tuj, se li vastigis siajn lipojn al larĝa rikano. Kaj eĉ multe pli, dum li ridis, ricevis lia ŝvelinta dentokarno tiom frapan atenton en lia malfermita buŝo, ke oni tute forgesis liajn kurtajn dentojn kaj la dentoj aspektis tiel malgravaj, kvazaŭ ili estus nur flave blanka krusto, kiu ne havas alian taskon krom malhelpi plian elŝveladon de la dentokarno.

„Sed unue vi instruos ĉi tie tiun *muchacho*“, aldonis *El Gusano*, kaj se vi estos farinta tion kaj restos al vi ankoraŭ tridek minutoj da tempo, jen mi traktos vian impertinentan karnon sur viaj ribelemaj ostoj ĝiskaĉe.“
”
Jes, tion mi scias, *El Gusano*!“

„*Jefe!*“

„*Muy bien,* en ordo, *jefe*!“ diris Andreo, malŝate levante la ŝultrojn. „La sola vorto ja ne ŝanĝos ion. Mi povos diri ankaŭ *jefe*, aŭ imperatoro. La vorto ne ŝanĝos ion. Gravas, kion mi pensas ĉe tio, se mi diras *jefe* aŭ mastro aŭ gvidanto aŭ l*eader*. Kaj jen unue foje divenu, kion mi pensas. ‚Lekumianpostaĵon‘ estus nenio kontraŭ tio. *A sus ordenes, jefe!*“

„Tion vi regas tute bone, kaj eble ni ja tamen ankoraŭ komprenos nin reciproke iutage. Sed vian ‚unktadon' vi tamen ricevos de mi. Kaj nun, ek do! Kaj firme per tenajloj pinĉu lin. Li estas diodamnita pigrulo, kaj por ke li sciu pri kio ni parolas, li havu la inicadon."

Vicente staris timemigite tie, kiam kverelis Andreo kaj *El Gusano*.

El Gusano rigardis la knabon: „Levu vian pakaĵeton kaj portu ĝin en la kabanon."

Vicente kliniĝis por levi la pezan pakaĵon. Kiam li volis ekkapti la pakaĵon per siaj manoj, batis *El Gusano* sesfoje per la mulovipo sur lian dorson.

„Por ke via pigremo ŝprucu el viaj ostoj!"

Vicente ekkriis kaj sinkis kun ĝemado sur sian pakaĵon.

El Gusano kroĉis la vipon al sia zono, rulumis cigaredon, kaj dum li ekbruligis ĝin, li diris al Andreo: „Se li ne estos obeema kaj ne lernos, vi sciigu tion al mi. Tiukaze mi okupiĝos pri li kun sindediĉo kaj mi notos lin por la *'fiesta'*".

„*Si, jefe!*"

„*A sus ordenes, jefe!*" *El Gusano* komandis respondi Andreon. Andreo levis unu el la tiroĉenoj, kiuj kuŝis surtere. Li tenis ilin en la dekstra mano, kvazaŭ li volus nun iri kun ĝi al sia laboro.

„*A sus ordenes, mi jefe!*“ ripetis E*l Gusano* kun emfazo kaj gvidis sian manon ree al la zono por denove malkroĉi la mulovipon.

Jen Andreo komencis eksvingi la ĉenon.

El Gusano rimarkis la movon en la flagranta necerta lumo de la lanternoj, lasis la vipon netuŝita kaj ekkriegis al Vicente, kiu ĵus ekrektiĝis: „Ĉu vi aŭskultis, kion mi diris al via *maestro*, al via instrumastro kaj kio vin atendos, se vi pigros?“

„*Si, jefe!*“ diris la knabo plorsingulte.

„Kaj krome lasu rakonti al vi, kio estas '*fiesta*', por ke vi pli bone komprenu, kiel oni laboru ĉi tie kaj kiuj rekompencoj ricevebl-os“, aldonis *El Gusano*.

Nun li rigardis Andreon per kunpinĉitaj okuloj kaj diris: „Kaj al vi mi ja ankoraŭ ĉeokaze flustros ion.“

En tiu ĉi momento oni aŭdis el la densa vepro, ĉirkaŭ cent paŝojn malproksime de la dormkabano de la *boyeros* denove la kantiston, kies brua voĉo de tiu mateno, kiam ĝi timigis *El Gusano*-on, ne plu aŭdeblis: „*El Picaro y El Gusano, los hijos de un perro y una puta;* filo de hundo kaj de putino; vian karnon mi ĵetos al la sovaĝaj porkoj kaj viajn ostojn al malsataj hundoj; aldoniĝos ankoraŭ Severo, Feliks kaj Acacio; *y ellos van morir ya mas despacio!* Ili ĉiuj mortos, iom post iom!“

Estis la unua fojo, ke la kantisto menciis ankaŭ la tri fratojn *Montellano*, kiujn li promesis kapti ĉekolume.

El Gusano disipis ĉifoje neniun municion al la nevidebla kantisto. Li nun turniĝis tre rapide, prenis sian lanternon kaj kuris tiel rapide, kiel la densejo de la ĝangalo permesis tion, al la bangalo de la *semaneo*.

Rimarko
tiro = jungitaro (du aŭ pluraj bestoj, kune jungitaj al ĉaro)

10/8

Senspire li alvenis. Li ne prenis al si la tempon iri unue en la *oficinas* por paroli kun *El Picaro*. Li kuris kiel sovaĝiĝinto al la *jacalitos,* en kiuj dormis la *hacheros*. Li kaptis lanternon, kiu pendis je fosto, ebruligis ĝin per tiu, kiun li havis enmane. Dum li faris tion, li kriis: „Elvenu! Ĉiuj eliĝu!“

Gabino, unu el la *muchachos* respondis dormeme: „Sed, *jefe!* Ja ankoraŭ ne povas esti la kvara. Estas ja nur *medianoche*, meznokto.“

„Tenu fermitaj la paroltruojn, hundoj!“ kriis *El Gusano*. Se mi komandas 'Eliĝu!', jen tio signifas 'Eliĝu!' por vi, mefitaj porkoj, kaj eĉ sen kontraŭvorto.“

Antaŭ oli tute finis la frazon, li jam estis ĉe la sekva *jacalito* por krude peli la virojn el la dormo.

La viroj, ĉiuj dormemaj, venis kurante al la placo antaŭ la *oficina*, kie ili kolektiĝis. Ili estis tute konfuzitaj kaj ekscitite interparolis kiel anseroj, dum ili firme premis al si la kovrilojn kiel vualon, ĉar la matenaj nebuloj jam alrampis kaj fariĝis fridetaj.

Unue ili pensis, ke ekbrulis fajro en la *oficina*. Kaj poste ili supozis ke eble ŝtele eniris kelkaj pumoj aŭ jaguaroj en la kampadejon, kaj ke kelkaj viroj, kiuj ĝuste devis eliri pro korpa bezono, estis kaptitaj kaj fortrenitaj. Tio okazis de tempo al tempo, sed oni rimarkis tion ĉiam tro malfrue. Ofte nur post tagoj aŭ eĉ post semajnoj la viroj, dum ili serĉis novajn arbojn, trovis la prirongitajn ostojn de la fortrenitaj laborkamaradoj, kiuj ekkoneblis nur laŭ la disŝiritaj ĉifonaĵoj de ties pantalonoj, kiuj distrite kuŝis tie.

Nur malpli ol tri minutojn bezonis *El Gusano* por havi kune ĉiujn virojn de la *oficina*.

„Venu al mi, Gregorio!“ li vokis al unu el la indiĝenoj.

„Prenu ĉi tiujn du lanternojn kaj sekvu min!“

Poste li komandis al ĉiuj viroj enviciĝi. Tiam li preterpaŝis la vicon, kaj ĉiu devis levi la piedojn, unue la maldekstran, poste la alian. Gregorio kun la lanternoj devis proksimiĝi tiom, ke li preskaŭ brulvundigis la piedojn.

El Gusano ne diris, kion li serĉas kaj kial li inspektas la piedojn. Sed kelkaj el la viroj estis same tiom ruzaj kiel li mem, aŭ eĉ multe pli ruzaj pri tiaj kaj similaj aferoj. Gabino diris al Celso: „Mi scias, kion la vermo serĉas.“

„Malbenite“, respondis Celso al li, „mi ne pensis, ke vi estas tia ruza knabo. Do, kion serĉas la fava hundo?“

„Li serĉas piedojn, sur kiuj gluas freŝa koto. Verŝajne iu ŝtelis botelon *aguardiente* aŭ skatoleton da sardinoj el la *oficina* kaj forkuris kun ĝi. Ĉar li devis kuri tra marĉa tereno, la piedoj kompreneble estas la plej bona pruvo, kiu faris tion."

„Bone observite kaj bone komprenite, Gabuĉjo." Celso ridis. Kaj poste li rigardis al siaj piedoj, „miaj posthufoj estas sekaj kiel miaj oreloj."

„Jen ĝoju, Celso."

„Kial mi ĝoju?"

„Li skurĝus vin ĝiskaĉe, se vi havus malsekajn piedojn." En tiu momento proksimiĝis *El Gusano*: „Levu la hufojn!" li vokis. Gregorio prilumadis ilin.

„Tiuj estas ja malsekaj", diris *El Gusano* misfide kaj ŝovis la brakon de Gregorio per la lanterno pli proksimen al la piedoj.

„Kompreneble ili estas malsekaj", diris Celso kun ĉagrena grunta voĉo.

„Kial miaj hufoj ne estu malsekaj? Mi ja devis kuri tra la rose freŝaj herboj kiel stultulo ĉi tien, ĉar vi forpelis min de mia *petate*. Jen, ankaŭ Gabuĉjo havas malsekajn piedojn. Kaj ankaŭ viaj botoj estas malsekaj. Kaj eĉ Gregorio havas malsekajn piedojn."

„Tenu fermita vian fibuŝon!" blekis *El Gusano* kaj iris plu al la sekva viro por serĉi freŝan koton je la nudaj piedoj.

Kiam li jam ekzamenis ĉiujn virojn, li staris dum certa tempo antaŭ ili, rigardis ilin dubeme, ŝovis sian ĉapelon al flanko, frotis per plata mano sian nukon, gratis sin poste je la koksoj kaj diris fine: „Remarŝu al viaj *chozas*, al la kabanoj. Je la kvara vi vekiĝu kaj eksaltu, aŭ mi helpos al vi ekstari. Kota kanajlaro!“

„Haltu!“ li kriis subite, kiam la viroj ĵus ekturniĝis por ekiri. „Ĉu iu el vi vidis, ke najbaro antaŭ tridek minutoj ekstaris kaj revenis nur antaŭ kelkaj minutoj? Mi donos al tiu, kiu povos flustri lian nomon al mi, botelon da *aguardiente* kiel rekompencon.“ Neniu el la viroj moviĝis.

„Kompreneble ne, neniu vidis ion. He!“ li turniĝis al Dionisio, al la viro, kiu ĝuste staris antaŭ li: „Ĉu vi iun vidis, kiu ekstaris kaj forestis dum duono de horo?“

„*No, mi jefe, dormi,* ne, mi dormis firme.“ „Kaj vi“, li parolis al la sekva.

„*Tambien dormi, mi jefe,* ankaŭ mi dormis.“

„Mi ja kaptos lin, nur ne esperu ion alian“, diris nun *El Gusano* optimisme kaj minace samtempe. Tiam li promenis transen al la bangalo por daŭrigi sian interrompitan dormon.

Pli poste, je la mateno, kiam *El Gusano* sidis kun la *mayordomo El Picaro* ĉe la matenmanĝo, li diris: „*Caray* kaj pluan malbenon, kia granda azeno mi ja estas!“

„Ĉu vi scias tion nur ekde hodiaŭ, Gusano?“ *kontraŭdiris El Picaro* rikanante, dum li deŝiris pecon de la tortiljo, kaj poste,

kiam li jam kaptis nigrajn fabojn per ĝi, ĉion pigreme ŝovis en la vaste malfermitan buŝon. Manĝavide maĉante kaj plezurigante sin pri sia propra ŝerco, li demandis denove: „Ĉu vi scias tion vere nur de hodiaŭ, Gusano, ke vi estas azeno maljuna kaj ŝtipkapa virŝafo? Mi sciis tion jam post la unuaj kvin minutoj, kiam mi konatiĝis al vi, kaj se vi estus demandinta min, kion mi pensas pri vi, mi estus klariginta tion al vi larĝe vizaĝen, ke vi estas eĉ centfoje pli stulta ol vi aspektas. Kaj pli stulta ol vi apenaŭ povus aspekti iu, kiun Dio kreis."

„Certe, sed ĉifoje mi ja vere faris seriozan stultaĵon."

„Jes ja, kaj kiun?"

„Ni havas ĉi tie fi-agitanton, spionon. Tiun mi devos trovi. Poste mi trenos lin al *don Severo*, por ke li pelu lin en la ĝangalon kaj pafmortigu lin. Eĉ, kvankam ni ĉi tie ĉiun viron nepre bezonas por la laboro, spionoj kaj fiagitistoj estas danĝeraj por la entrepreno kaj devos esti pafmortigitaj. Tiukaze la aliaj pli facile reteneblos sub la bastono. Tion diris *don Severo* al mi. Tiu transmondigis tial jam pli ol ses virojn."

„Tion mi scias pli bone ol vi. Mi laboras ja jam dum jaroj kun li kaj helpis al li pafmortigi la spionojn. Ĉu vi kaptis la friponon?"

„Bedaŭrinde ne. Jen, kial mi povus sufoki min mem. Mi supozis, ke li estas inter la *boyeros*. Sed tiuj estis kompletaj. Tial mi kuris ĉi tien kaj nombris ĉiujn virojn. Tiu, kiu mankus, devus esti la spiono. Sed mankis neniu. Tiam mi esploris la piedojn. Jen ja devis esti ankoraŭ kroĉiĝinta koto, pro la kurado tra la ĝangalo.

Sed kiom ajn detale mi inspektis iliajn hufojn, neniu el ili surhavis freŝan koton. Kaj per la serĉado mi nun avertis tiun hundon. En la estonteco li certe bone atentos havi sekajn piedojn. Kial mi ne faris tion tute sen frapi la atenton, sen tio, ke la *muchachos* rimarkus, kion mi serĉas. Iunokte mi tiam kaptus la ulon."

El Picaro ŝmace sorbis sian kafon kaj kun plena maĉanta buŝo li diris: „Domaĝe, ke ni ne havas sufiĉe da ĉenoj ĉi tie. Tiukaze ni povus firmligi ĉiujn *muchachos* per ĉeno dum la noktoj, tiel, ke neniu povus fari stultaĵojn. Mi ja entute firmtenus ilin per ĉeno, ankaŭ dum la laboro. Tiukaze neniam iu povus dizerti, kaj tiel ni ne perdus tempon per la rekaptado."

„Nur ne afliktiĝu, Picaro! Mi ja ankoraŭ kaptos lin. Mi supozas, ke li ŝanĝas sian voĉon, se li nokte elkrias siajn versojn, tiel, ke oni ne aŭskultu je lia voĉo, kiu li estas. Sed danĝera li estas. Ni devos kapti kaj pafmortigi lin! Aŭ li fuŝos la tutan negocon ĉi tie."

„Mi parolos kun *don Severo* pri tio, se li venos iutage al nia kampadejo. Kaj nun ek do, venu, Gusano. Ni devos marki arbojn per krucosignoj."

ĈAPITRO 11

11/1

Andreo trotis kun la ceteraj *boyeros* al la paŝtejo por alkonduki la bovojn kaj aljugigi ilin.

„Ĉu vi jam laboris iam kun *bueys*, kun bovoj, Nene?“ demandis Andreo bonkore Vicenton. „Mi nomos vin, Nene, suĉinfano. Vi estas ja nur bebeto. Kiel vi nomiĝas efektive?“
„Vicente.“

„Malĝojiga nomo. Nene estas pli bona por vi. Nu, kion mi demandis, kun bovoj labori vi ankoraŭ ne povas, ĉu?“

„No, compañero.“

„Tion mi ja supozis. Ĉu vi estas de bieno?“

La knabo kapjesas.

„Ankaŭ mi. Mia patro havis ĉirkaŭ cent pesojn da ŝuldoj ĉe la mastro de la bieno. Kaj kiam la *enganchador* venis al nia bieno kaj kunaĉetis virojn por la monterio, jen mia patrono vendis mian patron pro ŝuldosumo, ĉar la patrono diris, ke li devos ricevi sian monon kaj ne povos atendi cent jarojn pro la mono. Mi tiam estis *carretero*, bovoĉaristo ĉe frajtentreprenisto en *Chiapa de Corso*. Kiam mi tiam aŭdis, ke oni vendis mian kompatindan patron, kaj ĉar mi sciis, ke li ne eltenus tion ĉi tie en la *jungla,* en la ĝangalo*,* la laboron kaj la batojn, mi hejmeniris kaj transprenis la ŝuldokonton de mia patro kaj venis en la monterion. Ĉu vi komprenas, Nene? Tia estas la vivo. Kial venis vi ĉi tien?“

„Pro la kostoj de la entombigo de mia patro.“

„Ankaŭ tio ne estas ne bona. Kolektu ĉiujn viajn fortojn. Vi ne aspektas kvazaŭ vi estus tre forta. Se vi ne manĝos diligente kaj

ne bone gardos vin mem, vi ĉi tie verŝajne ne longe eltenos. Ĉu vi ankoraŭ havas patrinon?“

„*Si, tambien hermanos*, ankaŭ pli junajn gefratojn. Diru, kial *El Gusano* tiom vipis min? Mi ja ne faris ion malbonan“, demandis Vicente per lamenta voĉo.

„Jen la kutima maniero ĉi tie. Tion vi ankoraŭ lernos. *El Picaro* kaj *El Gusano*, tiuj malicaj kanajloj, akceptas ĉiun novan alveninton per suka hajlo de batoj por kutimigi lin, kiel ili diras. Tio estas la politiko de la fratoj, al kiuj apartenas la monterio. Kiom la uloj valoras, kiom senvaloraj ili estas kiel homoj, vi povas ekkoni el tio, ke ili nin skurĝas, kvankam ni estas sendefendaj, kiam ajn ili sentas volupton pri tio. Tiuj banditoj estas la plej mizeraj nanoj, kiujn vi povas elpensi. Se havus mi revolveron kaj vipon, kaj ili ne havus ion tian, jen foje rigardu, kiaj plorsingultaj fiaj lamentuloj ili estus. Tiuj tiukaze pli plorĝemetus ol malsana hundo. Eĉ ne ŝpruceton da kuraĝo kaj sango ili havas enkore, jen la speco, kiu ĵetiĝas sur sendefendajn indiĝenojn kaj batadas ilin. En indiĝenan vilaĝon ili ne kuraĝus iri, eĉ, se ili havus postzone kvindekon da revolveroj. Tion vi trovas ĉiam kaj ĉie; la plej mensmalsanaj, plej kormalsanaj kaj plej mizeraj friponoj estas la plej fiaj turmentantoj de sendefenduloj. Malkuraĝo estas la virto de la diktaturo!“

„Ĉu ili faras tion kun ĉiuj novuloj? Aŭ, ĉu ili faris tion nur kun mi tiel?“

„Kun ĉiuj. Mi diras al vi, Nene. Mi ja kompatis vin, kiam li vin, knabeton, kiu vi estas, tiel kruele draŝadis. Ni ĉiuj kompatis vin. Mi volis salti al vi ambaŭ kaj preni la batadon sur min, kaj ankaŭ

Santiago volis fari tion. Vi povas fidi al ni. Sed tiam ni pensis, ke eble estas pli bone por vi, ke vi konatiĝas al tio. Ĝi durigos vin kaj vi ekhavos la ĝustan koleron, kiun ni bezonas. La sekvan fojon, kiam li havos vin sub siaj manoj en la *„fiesta“,* vi prenos ĝin jam malpli tragike, kaj jam kraĉos sur lin. Nur ne plorĝemetu. Eble ni ja ankoraŭ iam atingos la tagon de la finkalkulo. Oni ja neniam povas certi pri tio. Ĉu vi aŭdis kanti la kantiston? En la ĝangalo. Io embuskas ĉirkaŭe, tion mi diras al vi, Nene. Kaj krome ankoraŭ tio: Se mi aŭ Santiago estus transprenintaj la batojn, tio ne bonfartigus vin. Fidu pri tio. Li tamen batus vin morgaŭ aŭ postmorgaŭ. Ja necesus nur, ke vi forgesus diri *'a sus ordenes, mi jefe!'* Kaj tuj li tanus vian felon, kaj tiukaze multfoje pli kruele ol hodiaŭ, kiam li 'vin ja nur iomete tuŝetis', kiel li mem nomas tion.“

„Ĉu tuŝetis, *compañero?“* diris Vicente. „Delikata tuŝeto! Mi estas certa, ke mia dorso estas diskrevita.“

„Montru tion al mi, kiam ni venos al la akvo. Mi frotos salon sur la vundon, por ke ĝi ne pusu. Se ĝi iam komencos pusi en la ĝangalo, tiukaze fariĝos aĉe. La larvoj rampos en ĝin. Kaj tiujn ni povus forigi nur per *creolina,* per kontraŭinsekta likvaĵo, kaj tio doloras terure, damnite, tion mi devas diri al vi. Kaj se vi ne estos kuracita ĝis la *'fiesta'*, li rekrevigos ĉiujn vundojn per la batoj.“

„Sed tiukaze ja estus pli bone, se mi kurus al la rivero kaj dronigus min“, diris Vicente malesperiĝinte.

„Estus pli bone, Nene, tion mi scias. Sed vi havas ja ankoraŭ patrinon, kiun vi volus revidi, kaj kiu profunde afliktiĝus, se vi perdiĝus. Ĉu ne?“

Apenaŭ aŭdeble Vicente diris: *„Si, asi es.“*

„Kaj ankaŭ gefratojn vi havas, ĉiuj estas pli junaj ol vi. Eble vi ne transvivos tion ĉi tie. Pli ol duono el ĉiuj *muchachos* ne revenos hejmen. Ili mortas kiel muŝoj. Kelkaj je *paludismo*, je la ĝangala febro. Aliaj malsaniĝas stomake, pro la infektita akvo, kiun ni trinkas el kontaminitaj sekiĝantaj flakoj, se la vetero estas tro seka. La bovoj ne trinkas ĝin, sed ni devas, ĉar ni tiom longe ne eltenas tion, kiom la bovoj. Aliaj hakas al si pro neatentemo la hakilon en gambon, kaj la gambo kaptas gangrenon, nekuraceblan putriĝon de karno kaj de ostoj. Tiukaze vi ĝojos, se iu puŝos maĉeton en vian koron kaj liberigos vin de viaj suferoj por doni al vi kvazaŭ lastan gracon. Aliajn prironĝas jaguaro aŭ pumo aŭ ili fortrenas ilin. Aŭ falanta arbo mortbatas viron. Aŭ oni falas sub bovojn ĉe fortrenado de mahagontrunkoj, kiam ses mahagontrunkoj ruliĝas trans viron kaj platpremas lin kiel tortiljon. Kial vi tiukaze dronigu vin en rivero? Kaj eble vi tamen ankoraŭ transvivos ĉion kaj revidos vian patrinon kaj viajn gefratojn. Estas tiu espero, Nene, kiu instruos vin elteni ĉion ĉi kaj ne fini vian vivon.“

„Kaj vi, *compañero*, ĉu ankaŭ vi havas tian esperon?“ demandis Vicente.

„Ni ĉiuj, ankaŭ mi. Mi havas amikinon, kiu atendas min. Malgranda kara knabino. Fulmotondro, ni parolu prefere pri io alia. Damnite kaj surfekite. Kaj ĉi tien ni nun alvenis ĉe la bovoj.“

Andreo alte tenis sian lanternon kaj vokis: „Ĉu vi ĉiujn kunhavas? Aŭ reeskapis kelkaj el ili?“

„Ili ĉiuj estas ĉi tie“, vokis unu el la *muchachos*.

„Jen la tirĉeno, kiu lastnokte mankis al ni“, diris Andreo, dum li lasis fali la ĉenon de ŝultro. „Tiun certe unu el la bovoj trenis post si en la malhelo. Ĝi kuŝis tuj apud la *jacalito*.“

11/2

La bovoj ĉiuj pare estis aljugitaj. Ĉiu *boyero* kunprenis knabon kaj formarŝis kun sia bovoparo.

„Por ke vi pli bone komprenu tion, Nene, mi nun klarigos al vi diversajn aferojn. Paron da kunjugitaj bovoj ni nomas ĉi tie *mancuerna*. Kvin parojn, do kvin *mancuernas,* ni nomas *tiro*. Vi, la knabo, kiu marŝas antaŭ la bovoparo, kaj kiu pelas la bovojn antaŭen, estas *gañan*. Kaj mi, la respondeculo por la bovoparo, estas *boyero*. Do, kaj nun ni ekiru al nia laboro.“

Estis ankoraŭ nun peza, nigra nokto, apenaŭ jam la dua.

„Ja kial ni komencas tiom frue, Andreo?“ demandis *El Nene*.

„Ĉar ni je la deka fakte devos esti finintaj nian taglaboron. Tiam fariĝos tiom netolereble varmege, ke la bovoj ne plu laboros. Tiam ankaŭ aperos la grandaj mordantaj muŝoj, kiuj pretigos inferon al la bovoj, tiel, ke tiuj fariĝos sovaĝaj, kaj ni tiam apenaŭ plu povus bridi ilin. Ili ektretadus kaj provus deĵeti la

jugojn, kaj ne plu eblus labori kun ili. Ili ne plu kondukeblus kaj eskapus.“

„Sed la hakistoj ja nun ne laboras, sed komencos la laboron nur je la kvara kaj tralaboros ĝis vespere“, diris *El Nene*.

„Jen granda diferenco, Nene. Vi konatiĝos ankoraŭ al multaj diferencoj. La bovoj, komprenu, estas ja bovoj. Ni, la *boyeros* kaj la *hacheros*, ni ne estas bovoj, ni estas indiĝenoj, homoj, ni akceptas tion, kion bovoj ne akceptus. Tial la fratoj *Montellano* kaj speciale *El Picaro* kaj *El Gusano* povas trakti nin tiel, kiel ili ne povus trakti la bovojn. Ĉu vi komprenas nun la diferencon, kial la bovoj frue laboras kaj frue finas la laboron, dum ni kaj la hakistoj duoble tiom longe devas labori kiom la bovoj? Se la bovoj ricevos sian ripozon, ĉirkaŭ la dekunua antaŭtagmeze, ni, la *boyeros* kaj *gañanas* ankoraŭ tute ne rajtas ripozi. Ni laboros ĝis la malfrua posttagmezo, ĉar ni ja ne estas bovoj.“

„Tio ja ĉio ŝajne estas multe pli aĉa ol en nia bieno hejme“, diris Vicente.

„Ha, bieno, Nene, estas ĉielo surtere, kompare al monterio. Ĝis nun vi ankoraŭ ne scias tion. Sed post kvar semajnoj vi ne plu deziros alian por vi en tiu ĉi vivo aŭ post la morto ol vivi en bieno, kiel peono kun ŝuldoj. Ankaŭ tie vi ricevos de tempo al tempo de la *mayordomo* batojn. Sed ja ĉiam okazus juste al vi, kaj vi ankoraŭ neniam aŭdis pri peono, ke li mortlaborigis sin en bieno. Kaj *fiesta* en bieno estas aŭtentika *fiesta* kun procesio, kun preĝejo, kun muziko, danco, kun tiom da bona manĝo, ke vi pensas, ke via stomako tuj krevos. Ĉi tie *fiesta* estas amasa

skurĝado, amasa danco de mulovipoj sur la dorsoj de la mahagonlaboristoj, kaj la ludata muziko estas la veaj sonoj, la ĝemado, la vekriado kaj sakrado de la turmentataj kaj torturataj indiĝenoj, kiuj ne kapablis liveri sian ĉiutagan tunan normon kaj tial senkompate estas vipataj aŭ eĉ ankoraŭ pli senkompate pendumataj."

„Pendumataj, ĉu?" demandis *El Nene* mirigite.

„Jes ja, pendumitaj. Tio estas la praorigina eltrovaĵo de la fratoj *Montellano*, por senkompate turmenti la *hacheros* laŭkontrakte ĉiutage devantaj liveri du tunojn, tiom, ke ili povos fuĝi pro tiu krueleco nur tiel, ke ili ĉiutage liveros tri tunojn da mahagono."

„Sed pendumite? Kiel pendumite?" demandis Vicente.

„Nun ne plu cerbumu pri tio, Nene. Vi ja ankoraŭ sufiĉe frutempe konatiĝos al tio. Ni devos fari nun alion. Estos pli bone, se vi atentos viajn piedojn, por ke vi ne faru malĝustan paŝon aŭ ne glitu sub bovojn. Ili tretados vin en la ŝlimon sen intenci tion. Kaj antaŭ ol mi elskrapus vin, vi jam sufokiĝus. Okupiĝu nun pri nenio alia krom pri tio, kion mi instruos al vi."

11/3

„Jen ni do ekestas je mia *semaneo"*, diris Andreo.

„Levu vian lanternon kaj serĉu la sekvan *troza*, kaj se vi trovos iun, jen voku min. Ankaŭ mi serĉos trunkon."

„Kio estas tio, *troza?* Tion vi ja devos diri, se mi serĉu ĝin.“

„Tio estas trunko de hakita mahagono, tuno da mahagono. Hakita laŭ la ĝusta longo, senŝeligita kaj kvadrate prihakita, tiel ke la arbotrunko havas diametre proksimume anglan futon. Vi devos atenti, ke vi trovu veturpretan trunkon, unu *troza*, kiu estas preta por fortrenado. Jen kuŝadas amaso da trunkoj, kiuj kostis multe da ŝvito al la laboristoj, sed ne estas pagotaj al ili. Jen trunkoj, kiuj interne estas putritaj, ofte nur peco estas putrita, kion la hakisto ne povas vidi pli frue ol tiam, kiam li jam trahakis la trunkon. Krome estas aliaj trunkoj, kiuj laŭlonge estas disŝiritaj. Ankaŭ tion la hakisto ne povas vidi pli frue ol tiam, kiam la trunko kuŝas surtere. Ankaŭ tiun oni ne pagos al li. Kaj li laboris por nenio. Tiaj trunkoj restas kuŝi kaj putras tie. Ne zorgu pri tiuj. Je unu finaĵo la trunko, kiu veturpretas, estas kvarangule pintigita. Tiu pintigita parto nomiĝas *chuso*. Do, trunko, kiu ne havas iun *chuso,* vi lasos kuŝi. Aŭ ĝi estas putra aŭ ĝi laŭlonge disŝiriĝis. Aŭ la hakisto pintigos ĝin ankoraŭ sekvatage. Ĉar li hodiaŭ ankoraŭ ne povis pretigi ĝin.“

Vicente iris kun sia lanterno laŭ certa direkto, kaj Andreo laŭ alia. Ĉiu iris zigzage en sia direkto.

„He, Nene, mi devas ankoraŭ diri ion al vi, por ke vi trovu la trunkojn pli facile!“ postkriis Andreo la knabon. „Atentu pri la freŝe hakitaj branĉoj kaj branĉetoj surtere. Tie, kie kuŝas freŝaj branĉoj, vi vidos ankaŭ la trunkon, kaj tuj apud ĝi unu aŭ du trunkojn. La plimulto de la arboj pezas ĝuste nur tunon, unu *troza*, sed estas multaj trunkoj, kiuj havas du tunojn. Se la branĉoj ne estas freŝaj, ili devenas de la arboj, kiuj estis hakitaj antaŭ semajno. Kaj tiuj trunkoj estas jam fortrenitaj.“

„Mi atente rigardos.“

Rimarko
angla futo diametre estas 3o,48 centrimetrojn larĝa

11/4

Tio, kion la *muchachos* nomis *linternas*, lanternoj, havis kun tio, kion civilizitaj homoj konas kiel lanternon, nenion alian komune krom tio, ke ankaŭ la *linterna* servis kiel lumigilo. Estis kruĉo, kiu entenis ĉirkaŭ tri kvaronlitrojn da petrolo. Supre estis enmetita kaj firmlutita tielnomata beko, kaj en tiu beko troviĝis peco de lana ĉifono. Jen la tuta lanterno. Sed por tiu speco da laboro ĝi estis pli utila ol iu ajn alia. Ĝi estis speco de petrola torĉo. Aŭtentika lanterno eĉ ne horon tie eltenus, ĉar la tuta vitro kaj la eksteraĵo disrompiĝus kaj estus tiom kavetigita kaj kurbigita, ke oni nur per longa enigma cerbumado ekhavus la ideon, ke temas pri iama lanterno. Kvankam la lanternoj estis malfermitaj, ili rezistis kontraŭ la ŝtormoj kaj eĉ kontraŭ la pluvo ĝis certa grado. Se ili estingiĝis, la *boyeros* devis tre peni denove ekbruligi ilin. Alumetojn havis eĉ ne unu el la viroj. Alumetoj estis kaj tro multekostaj kaj fariĝus senuzeblaj post portado dum du horoj. Aŭ ili fariĝus malsekaj de la pluvo aŭ de la forta nebulo aŭ de la peza roso aŭ, kaj tio estis la plej ofta kaŭzo, ili kaĉiĝus pro la ŝvito de la laborantaj *muchachos*.

Ĉiu *boyero* havis fajrilon, al kiu oni povas fidi ĉiam, se oni aŭ laboras en ĝangalo aŭ migras tra ĝi. Alumetoj fariĝus malfidelaj. Sed tiuj fajriloj de la mahagonlaboristoj konsistantaj el peco da ŝtalo, fajroŝtono kaj meĉo estis ĉiam fidindaj. Por ekbruligi estingitan lanteron kompreneble necesis ekblovetigi fajreton hel-

pe de la fajrilo kun seka foliaro kaj maldikaj sekaj branĉetoj. Per tiu flameto la lanterno poste estis ekbruligebla. Dum ŝtorma kaj tre pluvema vetero la *boyeros* en siaj labordistriktoj ĉiam tenis viglajn fajretojn por pli rapide povi denove ekbruligi la lanternojn.

Ĉiu lanterno donis lumon nur interne de distanco de kelkaj paŝoj. Tial la serĉado de la *trozas* estis komplika kaj temporaba. La *boyeros* kaj iliaj helpoknaboj, la *gañanes*, tiaj, kiaj Vicente, ĉe la serĉado ne povis promeni. Ili kuradis kiel sovaĝiĝintaj diabloj tien kaj tien tra la densejo kaj la arbustaĵoj de la ĝangalo por trovi la sekvan trunkon. Kaj ili ne nur kuradis kiel sovaĝiĝintaj diabloj tien kaj tien, ili eĉ aspektis kiel sovaĝiĝintaj diabloj, kiam ili rapide kiel katoj, parte kliniĝinte kaj facilmove rampante, kun maĉeto en mano, serĉis sian vojon tra dorna densa arbustaro kun duone nuda korpoparto, vestite nur per suprenŝovitaj kotaj blankaj pantalonoj kaj ĉifonita palmĉapelo sur la peĉonigra longa hararo, fantome iluminate de la fumanta flagranta lumo.

Kiel la *hacheros*, tiel ankaŭ la *boyeros* devis plenumi sian ĉiutagan aŭ pli precize ĉiunoktan devigitan kvanton. Kaj se ili ne atingis tiun kvanton, oni ne pagis la tagon al ili, eĉ se ili estus farintaj kvar kvinonojn de sia devlaboro. Se ili postrestis dumsemajne pli ol dufoje kun sia laboro, oni notis ilin por la „*fiesta*“ aŭ pendumis ilin en la komenciĝanta nokto apud tiuj hakistoj, kiuj pro nesufiĉa liverado estu skuataj el sia pigremo.

Al ĉiu *boyero* oni asignis por la nokto kaj la sekva antaŭtagmezo certan distrikton, en kiu la hakistoj tagon antaŭe faligis ĉiujn arbojn. Kutime la *boyeros* laboris por tri ĝis kvar hakistoj. Sed

la fratoj *Montellano* sukcesis aranĝi tion tiel, ke ĉiu *boyero* kun sia knaba helpanto devis forveturigi la hakitan mahagonon por ses hakistoj. Dum sia labortempo la *boyero* en la asignita distrikto devis tute forigi ĉiujn veturpretajn *trozas*.

Kiom ajn diligenta kaj fervora *boyero* eble estis, sola li ne povus plenumi la laboron. Por tio li havis paron da bovoj kiel helpantojn. Kelkajn indiĝenojn aŭ aliajn homojn oni povas devigi al certa laborkvanto, tiel, kiel oni povas unuformige dresi ilin al tio gasumi aliajn homojn aŭ mortpafi ilin kaj sin mem lasi mortpiki laŭ komando. Kun bovoj tio ne tiel simple fareblas, tial oni nomas ilin ja bovoj, de kiuj oni ne postulas scii ion pri popola honoro. Kaj tial ne sufiĉis, ke *boyero* estas tiel diligenta kiel juna abelo en printempo. Se la bovoj estis malvolemaj aŭ lacaj aŭ freneziĝis pro la svarmoj de alflugantaj mordantaj muŝoj, helpis al la *boyero* nek diligento nek bonvolemo. La bovoj ne volis labori, kaj sen ties helpo la *boyero* eĉ ne unu trunkon povus forveturigi. Ĉar la bovoj ne havis menson, nek la fratoj *Montellano* nek *El Picaro* nek *El Gusano* povis respondecigi ilin por la nesufiĉa laboro de la *boyeros*. Sed la bovservistojn oni respondecigis, ili ne ricevis pagon por la laboro de la nokto, oni skurĝis ilin en „*fiesta*“, oni pendumis ilin, ĉar ili estis la *boyeros,* por ke ili komprenu siajn bovojn, por ke ili laborigu siajn bovojn kaj eduku siajn bovojn tiel, ke tiuj komprenu, ke la mondo konas nur ununuran celon, ke ĝi devas plenumi nur unu taskon, nome fari el la fratoj *Montellano* dum tri jaroj monmilionulojn, por ke ties parencaro kaj amikaro en Hispanio rajtu diri: 'Ili estas efektive diligentaj homoj, ili iris sian vojon, ili uzis en Ameriko sian bonŝancon, ĉar Usono estas la lando de la nelimigitaj ebloj.' Kiel ĉio efektive deruliĝis en la regno de l' mahagono, la mondo ja ne

eksciis, plej malmulte aŭdis pri tio tiuj, kiuj sidis ĉe la konferencaj tabloj el peza mahagonligno kaj diskutis la ekvilibrigon de komercaj bilancoj, kaj kiuj samtempe interkonsiliĝis pri tio, je kia maniero oni povus sukcese malhelpi la disvastigadon de danĝeraj komunistaj ideoj de blankaj kaj koloraj laboristoj.

11/5

Vicente ekaŭdigis eĥan vokon, kiun li sonore sendis tra la nokto, ambaŭ manojn premante kiel paroltubon al sia buŝo.

„Levu la lanternon supren!“ rekriis Andreo.

„Kion vi diras?“

„Levu la lanternon supren, por ke mi ekvidu, kie vi estas?“ ripetis Andreo.

Andreo kuris al la bovoj, kiuj estis pli proksime de li ol Vicente. Li pelis la bovojn al la lumo, kiun Vicente tenis alte. Kiam li estis ĉe la *troza*, kiun Vicente trovis, li diris: „Metu vian nazon alte en la aeron, Nene, por ke vi perceptu la odoron. Tie, kie kuŝas freŝe hakita trunko, estas alia odoro, ol en la ceteraj partoj de la *selva*. Ĉu vi flaras tion?“

„Jes ja, ĝi odoras pli freŝe kaj pli verde. Pli suke.“

„Tiel estas, Nene, se vi klare kaptis la odoron, jen la tuta laboro duoniĝos. Kaj se la vento favore blovas al vi, vi marŝos al freŝa *troza* kiel hundo al freŝe rostita ripopeco. Havas grandan valo-

ron, iri laŭ la nazo. Ofte la lanterno estingiĝas kaj tiukaze vi devos serĉi per via nazo, se vi volas trovi trunkon. Ne ĉiam estas tia bona vetero, kia nun, kiam ni havas sekan tempon."

„Sekan tempon, ĉu? Sed pluvas ja preskaŭ ĉiun duan tagon."

„Tio estas ĉi tie alie ol en la preria lando aŭ en la bienoj kaj en la vilaĝoj. Tia, kia la vetero estas nun, ni nomas ĝin seka. Fakte la vetero neniam estas tute seka ĉi tie. La arbokronoj ĉiuj estas tro densaj. Neniu sunbrilo trairas ĝis la tero. Kaj malsupre ĉie dense troviĝas trunkarbustoj. Ĉio restas seka kaj mucida. Tial ni ĉiam havas la pezajn fortajn nebulojn en la dua duono de la nokto kaj roson tiel abundan, ke oni pensas, ke pluvis dum la tuta nokto. Sed se ni havos foje la pluvotempon, knabo mia, jen atendos vin spektaklo, tiam vi naĝos kvarfoje dum tago kaj kvarfoje en la nokto. Sed tiam ni laboros ne ĝuste ĉi tie, tiam ni estos ĉe la *barrancas*, ĉe la terosulkoj, kaj ĉe la riverego, kien ni flosigos la lignon. Dum tio facile okazas, ke ambaŭ gamboj aŭ la brakoj aŭ la kapo estas forprematajn. Tio iras glite glate, kaj jam la kapo estas for, kiel forpinĉita. Mi prefere ne parolu pri ĉio ĉi al vi, dum vi estas ankoraŭ novulo. Sed tio estas eble tamen grava, ke mi jam nun diras ĉion tion al vi, estas pli bone, se diras mi tion ol la aliaj, kiuj dekfoje troigus tion, por delektiĝi je via timo."

„Proksime estas ankoraŭ plia *troza,* kaj dudek paŝojn pli malproksime estas du pliaj, tiujn mi jam vidis."

„Tio estas bona, tre bone, Nene. Tiukaze ni ne plu devos serĉi en la nokto. Antaŭ ol estos fortrenintaj la kvar trunkoj, leviĝos la mateno, kaj ni trovos la trunkojn pli rapide, ĉar ni tiam povos vidi pli bone ol per la diodamnitaj lanternoj, kiuj apenaŭ taŭgas.

Sed nun ek, al la laboro. Mi rakontis al vi tiom, ke ni preskaŭ duonon de horo perdis pro tio. Helpu retrotiri la bovojn, por ke ni povu kroĉi la ĉenon.“

La tirĉeno estis ĵetita sur bovodorson, por ke ĝi ne posttreniĝu kaj ne kaptiĝu en arbustoj dum la kondukado de la bovoj ĉi tien.

„Nun ni batos unu trenhokon en ĉiun trunkflankon. Rigardu, tiel. La hokoj ja ankoraŭ pli profunde fosiĝos en la lignon, se la bovoj forte ektiros. Kaj nun ni tiros la finaĵon de la ĉeno tra la du hokoj kaj kuntordos ĝin per la kroĉilo.“

„Vi jam delonge laboras kun la bovoj kaj la mahagono, Andreĉjo, ĉu?“ demandis Vicente.

„Ne, nur ĉirkaŭ kvar monatojn. Povus esti ankaŭ ok. Oni ĉi tie tute forgesas la tempon kaj nur tiam, kiam komenciĝas la vera pluvotempo, oni scias, ke denove jaro pasis, kaj ĉar ni ĝis nun ankoraŭ ne havis pluvtempon, mi scias, ke mi ankoraŭ ne estas dum tuta jaro ĉi tie.“

„Nu, tiukaze vi bone lernis.“

„Sed *hombre,* mi ja scias kiel trakti bovojn. Tio estis ja mia negoco, kiel mi diris al vi. Mi estis ja *carretero*. Eĉ pli, *encargado*, karavanestro. Al mi bovoj ne povas paroli ion sen tio, ke mi tuj scius, kio estas pri ili. Mi povas pli bone paroli kun bovoj ol kun vi, Nene. Kaj ankaŭ la bovoj parolas al mi pli kompreneble ol vi.“

Vicente laŭ sia knabeca maniero laŭte ekridis. „Ne rakontu al mi tiajn troigitajn fabelojn, Andreĉjo. Kiel bovoj parolu?“

„*Adelante,* Moreno! Ne, ne vi, *Rojo*, Moreno *adelante!“* Andreo vokis al la bovoj. Tiam li diris: „Ĉu vi vidas tion, kiel nun ektiras nur la bruna kaj la ruĝa firme staras plu?“

„Diable, Andreĉjo, vi estas *gran maestro*, granda majstro“, diris admirante Vicente kun voĉo, kiu evidentigis, ke li preskaŭ ne plu povas spiri pro ekscitiĝo.

„Gvidi la bovojn tiel, ke nur unu el ili ektiras kaj la alia restas staranta, estas necesa, tion vi ankoraŭ vidos. La *troza* profunde enfosiĝas en la marĉan teron, kaj se ambaŭ ektirus, ĝi enfosiĝus eĉ pli. Oni povas eltiri ĝin el la tenaca ŝlimo nur, se unu el la bovoj ektiras kaj trenas la trunkon flanken, por ree ekmovi ĝin.“

„*Adelante!“* vokis Andreo nun al ambaŭ bovoj, kaj ili ektiris.

„Vi iros ĉe la bovoj, Nene, kun via lanterno kaj per la pelbastono vi pikos ilin, por ke ili marŝu fervore. Ek!“

La tirveturado komenciĝis. Fervore ili ne antaŭeniĝis, ĉar bovoj ja ne estas ĉevaloj. Ili iris malrapide kaj memgarde, sed konstante.

Tie la terosurfaco estis firma kaj la marŝo apenaŭ estis malhelpata.

„Nene, atendu!“ vokis Andreo. „Ĉe la kondukado vi devas atenti, ke vi ĉiam serĉu vojon, por ke la *troza* ne venu en tro densan trunkabustaron, kie ni devus eligi ĝin per maĉeto. Ek!“

Andreo postiris la trunkon. Je rimeno li portis la maĉeton en ledingo je la flanko. Ankaŭ Vicente portis maĉeton. Andreo havis en unu el siaj manoj la lanternon kaj en la alia, la dekstra, li havis fortikan feran hokon.

Per tiu ĉi hoko li laboris seninterrompe je la *troza*, li tiris ĝin al tiu kaj al tiu ĉi direkto por bone konduki ĝin; li levis ĝin, se ĝi ekfosiĝis en la teron kaj skuis ĝin furioze, se ĝi ŝajne komencis firmkroĉiĝi en la trunkarbustaro.

Post ĉirkaŭ dudek kvin minutoj ili trenis la trunkon je distanco de kilometro.

„Haltu!“ komandis Andreo. Sed la bovoj jam staris, antaŭ ol Andreo vokis. Li komandis: „Haltu!“ al Vicente, ĉar tiumomente, kiam staris la bovoj, tiu rapidis forte peli ilin, ĉar li supozis, ke ili volas pigri.

„Jen vi rimarkas, Nene, ke la bovoj havas pli da prudento ol vi. Tiuj scias, ke ili nun estas en la *callejon*, en la malvasta strateto, kaj ke ili devos stari ĉi tie. Ĉi tie ni detiros la hokojn kaj retroiros kaj altrenos la aliajn trunkojn, unu post alia, ĝis ĉi tiu *callejon*. Se ni ĉiujn, kiujn ni hodiaŭ devos fortreni, havos ĉi tie ĉe tiu strateto, tiam ni trenos ĉiun el ili unuope plu, ĉirkaŭ kilometron. Se ni trenus ĉiun trunkon tuj ĝis la kolektejo de la trunkoj, ni transportus nur duonon. La bovoj devas ripozi, ili devas paŭzeti, kaj tion ili kapablas nur, se ili faras nur mallongdistanc-

an fortan laboron kaj poste denove estos retrokondukataj, dum ili iras sen io ajn kaj en la malrapida trotado kolektas novajn fortojn.“

„Sed tiom streĉa la laboro ja ne estis, ke ili jam devas ripozi“, objĵetis Vicente.

„Ne kriu tro frue, sucĉinfano. Mi ja jam diris al vi, ke ĉi tie la tersurfaco estas firma. Tiukaze la marŝo estas rapida. Sed atendu nur, ĝis kiam ni trenos la trunkojn en la *callejon*. Tie vi vidos ion surprizan. Tiukaze vi povos esti ĝoja, se ni ne devos alkonduki por ĉiu unuopa *troza* kvar *tiros*, do dudek parojn da bovoj, de la ceteraj bovistoj. Tiukaze ni laborus tridek ses horojn sen interrompo por tamen ankoraŭ fortreni la hakitajn trunkojn de unu tago. Tio nun kaj hodiaŭ ne okazos. Ŝajnas, ke ne pluvos. Sed ni venos al loko, proksime antaŭ la *tumbo*, kie ni bezonos la aliajn kaj devos havi por *troza* kvin *mancuernas*, kvin parojn da bovoj.“

„Sed kio estas tio, *tumbo*?“ demandis Vincente.

„Jen la loko, kie la trunkoj estos suramasagitaj kaj oni atendos, ĝis kiam komenciĝos la pluvotempo kaj pleniĝos la seka sulko aŭ la *arroyo*, por ke vi komprenu tion pli bone, per alta akvo kaj ili tiam povos esti flosigataj ĝis la rivereto kaj poste ĝis la granda riverego.“

Rimarkoj
arroyo = strateto, rojo
barranca = ravino, tersulko
callejon = malvasta strateto aŭ pado

Adelante! = Antaŭen!

11/6

Ambaŭ, Vicente kaj Andreo, remigris al la jungita bovoparo por treni la sekvan *troza* al la *callejon*, al la strateto.

Andreo subite haltis, lumis pli proksime kaj diris: „Vi, Nene, aŭskultu foje, ĉu vi ne vidis tiun trunkon ĉi tie? Ĝi kuŝis ja sur via vojo, kiam ni serĉis trunkojn."

„Kompreneble mi vidis ĝin. Mi havas ja ne gluaĵon sur miaj okuloj", defendis sin la knabo.

„Laŭ mi ŝajne tamen. Kial vi ne menciis ĝin? Ĝi kuŝas ja pli proksime al la *callejon*."

„Mi supozis, ke ĝi ne taŭgas. Ĝi ja ne estas preta, ne kvadrate prihakita."

„Tio estas *troza,* kiu ne estas kvarangule prihakata, tio estas *rollete*. Kaj ke tiu *rollete* estas *troza* por ni, vi povas vidi je tio, ke ĝi havas pintigaĵon por fortrenado."

„Sed kial la *rollete* ne estas prihakita kvarangule laŭlonge?"

„Tio estas longa historio. Kaj ĉar mi devas instrui vin pri la metio, mi ja jam hodiaŭ tuj povos rakonti ĉion ĉi al vi. Cetere, mi estas tre certa, ke mi hodiaŭ ne atingos mian devigitan labor-

kvanton, mian *deber*, ni ambaŭ perdos la tagon kaj eble *El Gusano* ankoraŭ havigos vipmasaĝon al mi. Li ja promesis al mi novan „unktadon“, kiel vi aŭdis, ĉar mi estas tro impertinenta.“

„Sed kial vi estas impertinenta, Andreĉjo? Vi estas la plej fajna kamarada *boyero*, kiu ekzistas surtere“, diris Vicente konvinkite.

„Laŭ opinio via, Nene. Bedaŭrinde, opinio via ĉi tie ne validas. Ĉi tie validas nur la opinioj de *El Picaro* kaj de E*l Gusano*, kaj se vi tiujn molestus per via opinio, tiukaze ili tuj batus vin dekdufoje dorsen kaj vi povus estis ĝoja, se kelkaj batoj el la dekduo hajlus transverse de viaj kapo kaj oreloj. Ek, tiru la bovojn aliaflanken kaj deĵetu la ĉenon al mi malsupren, por ke mi povu kroĉi ĝin.“

La dua *troza* estis trenata al la strateto.

Kiam ambaŭ poste sen balasto retromarŝis, diris Vicente: „Vi volis ja klarigi al mi, kial oni ne prihakas kvarangule tian *rollete*, sed nur senŝeligas ĝin, kaj kial ĝi tiam restos ronda?“

„Vi pravas. Laŭprincipe ĝi povas esti al ni, kaj des pli al vi, tute indiferenta, ĉu la trunkoj restos rondaj aŭ kvarangulaj. Por la hakistoj kompreneble *rollete* signifas malpli da laboro, ĉar ili ne devas longtempe prihaki ĝin kaj jam povas haki la sekvan. La fratoj *Montellano* estas tre lertaj negocistoj. Por ne perdi aĉetiston, ili liveras kaj prihakitajn trunkojn kaj ankaŭ *rollete*-trunkojn. En Usono kaj Britlando la mahagono tiom raras por la homoj, ke ili segas la lignon en tute mincajn panelojn kaj gluas tiujn sur kutiman lignon, kiun ili havas en sia lando, kaj

tiam ili poluras ĉion tion. Tio kompreneble estas trompo. La homoj, kiuj aĉetas mahagonmeblojn, pensas, ke ili efektive havas nur mahagonon en siaj mebloj. Sed nur ekstere estas tute minca surgluita panelo da mahagonligno. Kaj se ĝi tiel bele estas polurita, tio aspektas, kvazaŭ ĉio estus el pura mahagono. Nun vi ekkomprenas, kial certaj aĉetistoj preferas la rondajn trunkojn, ĉar oni povas elsegi el la rondaj trunkoj en la mezo mincajn panelojn, kiuj estas je centimetroj pli larĝaj ol tiuj, kiuj oni segas el kvarangulaj."

„Sed en tiu kazo oni povus lasi rondaj ĉiujn trunkojn", diris post tio Vicente.

„Oni povus, sed oni ne faras. La *rolletes* havas ankaŭ malavantaĝojn. Ili pli facile ekŝiriĝas laŭlonge kaj tiukaze fariĝas aŭ je duono aŭ tute senvaloraj. La trunkoj, kiujn oni prihakas kvarangule, ekŝiriĝas multe malpli ofte kaj ĉe ili la aĉetistoj povas vidi ankaŭ multe pli rapide, ĉu la trunko eventuale disŝiriĝis parte, kio ĉe la *rolletes* videblas malpli bone aŭ tute ne, kaj kio malkaŝiĝos eventuale nur tiam, kiam la aĉetinto jam havas la trunkon en segilo."

„Kiu klarigis ĉion ĉi tiel klare al vi, Andreĉjo?"

„Estas unu el la *hacheros*. Li estas el *Chamula* kaj nomiĝas Celso. Li estas ĉi tie la *tate* en nia kamapadejo, la honorpatro. Li estas jam de jaroj ĉi tie kaj scias pli ol la *contratistas*. Lin ambaŭ, *El Picaro* kaj *El Gusano*, tiom timas, ke ili havas merdon en la pantalonoj, tiel ili timas lin."

„Ĉu lin atendos *fiesta*?"

„Mi pensas, ke ne. Cirilo rakontis al mi, ke antaŭ jaro nia iama *contratista, don Remigio*, notis Celson por *fiesta*, ĉar Celso estis impertinenta. Kiam Celso jam ricevis la batojn, li glate sternis sin kaj dum tuta semajno ne movis manon por laboro. Li estas la plej bona hakisto, kiu iam ajn laboris en *selva*, la ununura, kiu, se li volas, povas havigi kvin tunojn dum tago. Sed li ne faras tion. *Don Remigio* ne povis rezigni pri Celso. Li vokigis lin, sed Celso ne aperis. Jen la granda *contratista* devis viziti lin kaj paroli al li. *Don Remigio* diris, ke li ja finfine faros lin cedema. Jen Celso respondis, ke jes ja, ke li povus fari tion, sed ke ju pli oni batus lin cedemcele des malpli li povus labori, kaj ke estus tute egale al li, ĉu oni aŭ mortpafus aŭ mortbatus lin. Tio estus tute indiferenta al li. Kaj poste li ankoraŭ diris, ke estontece li por ĉiu bato, kiun li ricevos, ne laboros dum tuta semajno, kaj se li ricevus kvindek batojn, tiukaze li do ne laborus dum jaro. *Don Remigio* tiam parolis pli respekte kun li. Kaj Celso ekstaris kaj iris al sia laboro. Li neniam denove ricevis batojn de tiam. Sed nun estas tiel, ke nek *El Gusano* nek *El Picaro* kuraĝas fie trakti lin. Li estas danĝera. Kaj *don Severo* al ili eĉ ordonis lasi Celson tute en paco, ĉar lia laboro estas pli grava kaj pli enspeziga ol la laboro de la du subestroj."

„Do, kial li ne forkuras?" demandis Vicente.

„Tio ne estus facila, eĉ ne por li. Kaj nun finon! Ni nun devos streĉi kaj malplenigi la kampon de la *trozas*. Ne longe daŭros kaj *El Gusano* alvenos ĉi tien sur ĉevalo, kaj se ni ne havos ĉiujn trunkojn en la *callejon*, atendos nin ambaŭ infero. Mi povus elteni tion. Ĉu tion eltenus vi, mi ne scias, sed mi supozas, ke ne. Kaj se oni tanos vian felon, vi eĉ kulpigus min pro tio. La plej bona, kion mi povos fari ĉi tie por vi, tiom longe, kiom vi kaj mi

ĉi tie kunlaboros, estas malhelpi kun ĉiuj fortoj, ke *El Gusano* nin ambaŭ povos noti por '*fiesta*'; ĉar vi, vermeto, ĉe tio suferus plej multe. Do, lasu al ni celkonscie kapti la sorton je la postaĵo.“

Rimarko
Chamula = loko, centro de la cocilaj majaj indiĝenoj en la federacia meksika ŝtato Ĉiapaso

11/7

La suno leviĝis, kiam ĉiuj trunkoj kuŝis jam en la strateto, preta por plia trenado ekde tie.

„Nun ni matenmanĝos“ diris Andreo.

Nokte ili kunprenis maizon en sako, kiu estis ŝarĝita sur unu el ambaŭ bovoj, kaj tiam, kiam ili venis al la laborloko, ĝi estis pendigita al arbo por malhelpi, ke la maizo estu forportata de sovaĝaj porkoj.

„Disŝutu la maizon al la bovoj“, diris Andreo. „Atentu, ke ĝi kuŝu sur plata tero.“

„Ĉu mi deprenu la jugojn?“demandis Vicente.

„Ne, tio farus tro da laboro resurmeti la jugojn.“

Ambaŭ kunportis en basta mansako sian *morral*-on, sian modestan matenmanĝon kaj pendigis sian mansakon apud la maizo je la sama arbo.

Post mallonga tempo Andreo sukcesis bruligi fajreton. Vicente kuris al mucida rojeto kaj plenigis la ladajn kafokruĉetojn kaj samtempe la kalabasojn eltrinkitajn en la nokto, per akvo. Ili ŝutis la muelitan kafon kaj pecon de bruna kruda sukero en la kruĉetojn kaj metis ilin al la fajro.

Ili kunportis kuiritajn nigrajn fabojn envolvitajn en grandajn verdajn foliojn, iom da salo en sekaj maizfolioj kaj aldone dek du grandajn tortiljojn. La tortiljojn ili metis en varmegan cindron, kiu estis tirita el la fajro, kaj la fabojn ili ŝutis en argilan pelveton kaj metis ĝin en la fajron por varmigi la fabojn. Poste ili pecetigis verdajn piprogûojn kaj miksis ilin kun la faboj. Ĉiu el ili havis fasketon da verdaj herbetoj de diversaj specoj, kiujn disponigis la ĝangalo. Kiam la faboj estis varmaj, ili volvis ilin en varmegajn tortiljajn pecojn kaj ŝovis ilin tiel kuntorditaj en la buŝon. La salon ili prenis inter la fingrojn kaj tiam ŝovis ĝin buŝen. La verdajn herbetojn ili poste manĝis. Intertempe la kafo estis kuirita kaj ili trinkis ĝin el fruktoŝelo, kiu servis al ili kiel trinkujo kaj samtempe kiel pelveto, en kiu dum mallongaj laborpaŭzoj estis knedata la *posol*, trinkaĵo el fermentita maizo. Kiam ili trinkis sian kafon, ili elprenis krudajn tabakfoliojn kaj rulumis cigarojn. Vicente, kvankam ankoraŭ preskaŭ knabo, sciis tute bone rulumi cigaron kaj li fumis ĝin kun la sama plezuro, kiel faris tion Andreo.

Ili fumis siajn cigarojn apenaŭ je duono, kiam alrajdis *El Gusano*. Li restis sidanta sur la ĉevalo, kaj sen diri '*Buenos dias!*', 'Bonan matenon!' li tuj vokis: „Ĉu vi trovis ĉiujn *trozas* kaj havas ilin en la *callejon?*“

„*Si, todas*, jes ĉiujn!“ respondis Andreo, sidante ĉe la fajro kaj senhaste plu fumante.

„Antaŭen kaj *arrastrando al tumbo,* tiru ilin malsupren al la tersulko por la flosado. Kaj ne sidadu tiom pigre fumante cigarojn. Por la fumado vi havos tempon vespere.“ *El Gusano* superrigardis la strateton.

„Unue la bovoj devas havi sian maizon“, defendis sin Andreo.

„Tion mi vidas mem, mi ne bezonas vin. por ke vi diru tion al mi“ kvazaŭ gruntis *El Gusano*, antaŭ ĉio tial, ĉar li ne volis konsenti Andreon, malpli por konfirmi, ke ambaŭ viroj en tiu momento tamen ne povus fari ion alian plu kaj tial same tiel bone povus trankvile fumi plu, ĝis la bovoj finmaĉos sian maizon.“

„Cetere, kia estas la *bajado*, la parto de la strateto, kiu kondukas malsupren al la sulko pro la flosado? Ĉu *mucho lodo*, ĉu multe da marĉo kaj ŝlimo?“ demandis *El Gusano*.

„Hieraŭ ni sinkis en ĝin ĝis la koksoj, kaj hodiaŭ tio certe ne fariĝos pli bone“, diris Andreo.

„Kiom da *tiros* vi do bezonos por la *subida* kaj la *bajada*, por la monteto kaj la sulko?“

„Mi sukcesos eble per du *tiros*, per dek bovoparoj. Je la lasta semajno ni bezonis dum kvar tagoj dudek bovoparojn, jen ni sidis kun niaj trunkoj ĝis la brakoj en la ŝlimo“, klarigis Andreo.

„Mi scias tion. Bone, morgaŭ mi sendos al vi du *tiros*, do dek parojn. Cirilo kaj Fidel havos ilin ĉi tie ĉirkaŭ la naŭa.
Kun via *mancuerna* tio faros dek unu bovoparojn, kiujn vi havos tiam. Kaj nun ne tiom longe sidadu kaj fumadu. Morgaŭ vi iros sur la alian flankon de la *arroyo*, jen ili jam hakis dum tri tagoj, kaj ili faris abundan provizon, kiu fortrenendas."

El Gusano donis al sia ĉevalo bateton kaj ektrotis por inspekti la aliajn *boyeros*.

„Je kioma distanco ni devos treni la trunkojn de ĉi tie ĝis la *tumbo*?" demandis Vicente, kiam ambaŭ denove estis solaj.

„Proksimume du *leguas*, ok kilometrojn."

„Kaj ĉiu trunko do devas esti tirata du leguojn?"

„La trunkojn, kiujn ni hodiaŭ suramasigis apud la strateto, ni devos treni du leguojn", diris Andreo. „Tio estas tute nenio, antaŭ du monatoj ni trenis la trozojn sur distanco de kvin leguoj, de la hakejo ĝis la *tumbo*. Sur tia longa vojo oni renkontas ofte dekon kaj pli da sulkoj, *arroyos*. Sed ili ĉiuj estas tiaj sulkoj, kiuj ne kondukas al la granda riverego, kiuj post kelkaj kilometroj deflankiĝas iom post iom aŭ kondukas al unu el la lagoj, kaj la lagoj ne havas rektan konekton kun la riverego. Kelkaj aliaj sulkoj ja kondukas al la riverego, sed ili disvastiĝas je certaj lokoj, kondukas trans vastan rulŝtonaron kaj sinkigas la trunkojn tiom, ke ili ne havas sufiĉe da akvo por drivi, vi povas fidi tion al mi, kaj Celso diris tion al mi, tiom facila tio ne estas malkovri kaj fondi monterion. Ekzistas sufiĉe da ligno por hakado. Sed, se ne estas sulkoj, aŭ se la sulkoj etendiĝas kontraŭdirekte de la

vojo, kiu necesas por povi flosigi lignon al la riverego, tiukaze la monterio preskaŭ nenion valorus, kiom ajn bonan mahagonon ĝi eventuale havus. Se ĉiu *troza* unue devas esti trenita pli ol kvin leguojn, do pli ol dudek kilometrojn aŭ eĉ pli grandan distancon, tiukaze tio ne indus la penon. Jen oni trenadus eble dum tri aŭ kvar tagoj ĉiun *troza* kaj eble eĉ per dudek bovoparoj. La *contratistas* ne havas tian facilan laboron, kian vi pensas. Ili serĉas ofte dum tuta semajno aŭ dum du aŭ tri semajnoj sulkojn, kiuj tute certe kondukos al la riverego, kiam ili havos altan akvon. La *contratistas* tiam devas trapaŝi kun kelkaj maĉetistoj la tutan sulkon, por poste povi certi, kien ĝi kondukas. La sulkoj ofte estas kvindek ĝis cent kilometrojn longaj, antaŭ ol ili atingas la riveregon. Ĉeokaze la viroj marŝas tri aŭ kvar tagojn tra la ĝangalo, ĉiam laŭ sulko, nur por fine konstati post la tuta peno, ke la sulko ne uzeblos por flosigado. Ankaŭ necesas forigi arbojn kaj arbustojn de la sulko, por ke la trunkoj ne estu malhelpataj de obstakloj dum la flosado. Por tio ni havas la maĉetistojn. Tial la monterioj estas tiom multekostaj, kaj nur homoj kun tre multe da mono povas aĉeti ilin, ĉar bona monterio havas larĝajn kaj profundajn sulkojn por la flosigado kaj ĉiuj sulkoj estas esploritaj kaj notitaj, ĉu ili uzeblas ĉu ne. Jam tiu laboro, esplori ĉiujn tiujn sulkojn kaj noti ilin, kostas monatojn de laboro, kaj tio estas laboro farenda, kvankam ĝi rekte havigas eĉ ne unu trunkon."

„Andreĉjo, vi estas la plej saĝa *muchacho*, kiun mi renkontis iam ajn en mia vivo", diris Vicente kun admiro. „Mi tre ĝojas, ke mi fariĝis *gañan* via."

„Tiom saĝa, kiom vi pensas, mi ne estas. Mi tenas nur malfermitaj la okulojn kaj la orelojn, se aliaj homoj, kiuj scias pli ol mi,

speciale la *contratistas* kaj la dungitoj, interparolas kune. Vi devas unue bone lerni la hispanan, tiukaze vi pli bone lernos kompreni, kion diras aliaj. Via indiĝena lingvo, via idiomo, ne multe helpas al vi en via vivo, Nene. Kaj nun ni tiros la trunkojn sur la *callejon* antaŭen. Alkonduku la bovojn kaj fiksu la ĉenon al la jugo."

Andreo ĵetis sian cigaredorestaĵon en la fajron, tretadante estingis la fajron kaj poste denove pendigis la bastujetojn kun la manĝo de la viroj al la arbo.

ĈAPITRO 12

12/1

La nokto nun tute pasis, sed la suno penetris nur brilete kaj trembrile tra la densa foliaro de la arboj. La forta matena roso de la tropika ĝangalo donis al la arboj, arbustoj kaj trunkarbustaĵoj aspekton, kvazaŭ pluvegis dum la lastaj nokthoroj. Kiam la viroj aŭ la bovoj kunpuŝiĝis je arbusto aŭ unu el la pli maldikaj arboj, falis sur ilin akvo tiel, ke ili post kelkaj paŝoj tute malsekiĝis. Kvankam la ardanta suno tie en la strateto apenaŭ estis videbla, ĝi jam komencis ŝarĝi la arbokronojn. La bolanta varmego sub la arboj fariĝis pli kaj pli sufoka, kaj la spirado por homoj kaj bestoj des pli fariĝis streĉa ju pli alte grimpis la suno. La viroj troviĝis kvazaŭ en vaporbanejo; ĉar la akvo, kiu peze ŝarĝis la foliojn de la trunkarbustaro, komencis vaporiĝi. Sed la varmege malsekaj vaporoj ne trovis elirvojon. Ili grimpis alten kontraŭ la densaj arbokronoj, en kiuj ili kaptiĝis kaj restadis kaj dum tio faris la aeron eĉ pli varmega, pli densa kaj pli sufokiga.

Oni trenis la trunkon tra la strateto. Sakrante, kriante al la bovoj, kaj al Vicente seninterrompe vokante komandojn, laboris Andreo.

Dum tio li ĉiutage dekfoje memoris pri sia iama laboro kiel ĉaristo. Ankaŭ dum tiu laboro la ĉaroj estas tirataj kaj trenataj de la bovoj trans aĉaj, rokecaj, rulŝtonecaj aŭ tute marĉaj kaj malsuprenrompitaj vojoj. Ankaŭ tie oni devis streĉe labori por teni la ĉarojn en ordo, por ke ili ne sinku aŭ deglitu de la vojo kaj ne falu subite en abismojn. Tamen, kiom ajn dura kaj turmenta estis tiu laboro. kompare al la fortrenado de trunkoj la kondukado de ĉaro estis dimanĉa posttagmeza ekskurso.

Tio, kio tie nomiĝis *callejon*, strateto, havis komuna kun vojo nur tion, ke oni trenis trunkojn sur ĝi. Kelkajn trunkojn kaj densajn arbustaĵojn, kiuj povus esti obstaklo, oni forhakis, kaj tio estis ĉio, kio fareblis por la plibeligo de la strateto.

La bovoj senhaste trotis antaŭen, seninterrompe pelate de Vicente per krioj aŭ per pikbastono, maĉante, de tempo al tempo grumble muĝante, batante tien kaj tien per siaj vostoj por defendi sin kontraŭ la aperantaj mordantaj muŝoj. Iliaj buŝoj preskaŭ tuŝadis la tersurfacon, ĉar nur en tiu kazo, se ili tenis siajn kapojn tre malalte, ili povis doni al siaj nukoj la tutan bezonatan forton por treni la trunkon. La peza, krude prilaborita longa jugo, estis trabo transverse de iliaj kapoj. Ĝi estis firmligita per rimenoj tiritaj tra la boritaj truoj en iliaj kornoj. La jugo ne permesis, ke bovo povu movi unuope sian kapon sendependе de la alia. Se iun el la bestoj molestis kaj pikis granda insekto, kaj se la besto skuis mekanike la grandan kapon, jen skuiĝis la tuta trabo, kaj tiel la alia besto devis skui sian kapon en la sama

maniero. Ju pli dense aperis la svarmantaj mordantaj muŝoj, des pli sovaĝe moviĝis la plagataj bestoj per siaj kapoj por defendi sin. Iliaj grandaj rondaj okuloj ŝvelis el ties okulaj kavoj kaj ruĝiĝis pro la doloroj, kiujn la bestoj devis elteni. Facile Dio kompatema kaj amanta povus malpliigi aŭ forigi la turmentojn, se plaĉus al Li ne krei mordantajn muŝojn, neniujn moskitojn, neniujn vermetojn, kiuj boras sin en ĉiun vundon de vivantaj bestoj kaj enfosiĝas, se plaĉus al Li malhelpi la ekeston de profundaj marĉoj, kiuj servas al neniu alia estaĵo kaj estis kreitaj nur por utili al la epidemioj de ĉiuspecaj parazitoj kaj insektoj kiel kovejo.

Svarmoj da muŝetoj rampis en la orelojn kaj okulojn de la bestoj kaj de ties homaj kunlaborantoj. Iksodoj atendis en la foliaro de arbustoj kaj lasis fali sin sur bestojn kaj homojn, se arbusto estis nur tuŝita kaj ili tiam mordis sin en la haŭton, profunde enfosigante siajn kapojn, kaj tiom firme kroĉiĝante, ke doloris, kiam oni eltiris ilin, tiel, ke ekestis inflamoj, kiuj doloris eĉ pli, se deŝiriĝis la kapo ĉe la eltirado de insekto kaj postrestis en la karno.

Jam du horojn post la sunleviĝo fluetis la sango de la korpoj de la bovoj kaj de ambaŭ viroj el centoj de vundoj. La fingrograndaj mordantaj muŝoj de la ĝangalo sucis pro sia malsato pri freŝa sango, kiun ili povis kontentigi nur tre malofte, ne nur la sangon, sed ili estis tiel sovaĝaj kaj malsataj, ke ili apenaŭ prenis al si la tempon por trankvila sucado, sed ŝiris tutajn pecojn de karno el la korpoj de siaj viktimoj. Kaj la muŝetoj, kies alvenon kaj pikadon rimarkis nek bestoj nek homoj, kaj kies pikoj eksenteblis nur tiam, kiam la insektoj jam forflugis, postlasis sangoveziketojn sur centoj de lokoj. Tiuj vezikoj konfuzis la

pikitojn dum semajno tiom, ke oni profunde vundgratis la pikitajn lokojn por esperi dum kelkaj minutoj, ke oni trovos dum momento saviĝon de la turmentoj, kvankam oni sciis, ke tia saviĝo estas nur trompa kaj kondukas kun certo al nova kaj eĉ pli dolora jukado.

Konduki ĉaron estis apenaŭ laboro kompare al la trenado de *troza*. La ĉaristo marŝis ridante, babilante, fajfante, kantante apud sia *carreta*. Se la vojo estis seka kaj ne tro komplika, li sidiĝis eĉ en la ĉaron kaj translasis la serĉadon de la plej bona vojo al siaj spertaj kaj lertaj bovoj. Ĉeokaze sekvis vojdistanco, kie oni devis forporti ŝtonojn, kie oni devis forte skui la radajn spokojn por helpi al la ĉaro solviĝi de la ŝlimo, kie oni devis serĉi ŝtonojn por plenigi la truojn de la vojo por ne lasi sinki la altajn radojn aŭ malhelpi la rompon de akso.

Male al tio trunko, kiom ajn malgrava ĝi aspektas kompare al ĉaro, kaŭzas laboron, tiom duran, tiom streĉegan kaj tiom lacigan, postulante tiom da trukoj kaj profundaj scioj, ke oni facile povus veturigi per la sama laborforto dek ĉarojn sen trasuferi dum tio iun specialan malfeliĉon.

Je la unua rigardo ĝi ŝajnas tre facile treni helpe de fortikaj, bone nutrataj bovoj mahagontrunkon tra ĝangalo. Eĉ sur seka pavumita strato tio jam kostus kelkajn penojn. Sed multe pli da penoj ĝi kostus sur plata seka tero, kie neniuj obstakloj de iu ajn maniero malhelpas la senĝenan trenadon. Sed en ĝangala strateto ĝi postulas ĉiujn penojn kaj streĉojn, al kiuj kapablas forta bovoparo kaj du viroj.

En la mahagonkomerco *troza* estas nomata *tuno*.

Mahagono estas tre dura kaj eksterordinare peza ligno. Tamen *troza* ne pezas tunon, ne pezas mil kilogramojn, kalkulate laŭ la pezo. Ĝi estas pli simila al metra tuno, al *tonelada*.

Kiam Vicente iutage demandis Andreon, kiom peza estas freŝa *troza*, Andreo diris, ke laŭ lia opinio *troza* certe havas proksimume dek kvar *arrobas* kiel pezon, do ĉirkaŭ cent kvindek aŭ cent sesdek kilogramojn, sed ke tute precize li ne scias tion. Kaj laŭ li tio tre dependis ankaŭ de tio, ĉu la *troza* estas tre freŝa aŭ seka. Trunkon, kiu havas tiom da pezo, ĝuste manipuladi postulas certe konsiderindajn fortojn. Kvar *arrobas* validas kiel abunda ŝarĝo por portomulo, sed mahagontrunko pezas preskaŭ la kvaroblon de tio, kion oni ŝarĝus sur mulon sur bonaj vojoj. Nur ĉe ŝarĝoj, kiuj kuŝas tre bone kaj glate, kiel ekzemple kruda kafo en sakoj, kaj se la bestoj krome devas iri nur mallongajn distancojn kaj sur vojoj, kie ne estas ŝlimo kaj ne tre ascenda vojo, oni povas ŝargi mulon per du *quintales*, do per ok *arrobas*. La bovoj kompreneble ne devas porti la trunkon sur la dorso, sed ĉu la ŝarĝo kaŭzus malpli da peno, se ĝi estus trenata surtere, oni povas juĝi jam sole laŭ tio, ke kvar muloj certe ne povus fortreni trunkon. Ĉiukaze ne tie, kaj dekoble malpli en tiuj partoj de la strateto, kiuj troviĝis pli malsupre, pli proksime al la *tumbo*.

Rimarko
tonelada = metra tuno = en Hispanio 20 *quintales* = 80 *arrobas*

12/2

La bovoj ektiris kaj la *troza* estis ekmovata.. Grava tasko por la *boyero* estis, kiel Andreo klarigis al Vicente, atenti pri tio, ke la ĉeno tie, kie ĝi estas pinĉita en la tirhokojn, ĉiam troviĝu sub la *troza*. Se turniĝis la *troz*a tiel, ke la ĉeno supreniĝis, necesis turni la trunkon ĉe la seka parto tiel, ke resubiĝis la ĉeno, ĉar nur tiukaze, se la ĉeno troviĝas sub la *chuzo*, jen la ferhoka pinto leviĝas supren, alikaze ĝi boriĝus en la grundon. Sed tio estis la plej facila laboro, turnadi la trunkon ĝuste . La *boyero* ne povis simple promeni kiel apud *carreta*. Seninterrompe necesis tiri la trunkon supren per la ferhoko, kiun Andreo havis en la mano. La pinto ŝoviĝis sub arboradikojn, kiuj etendiĝis transverse de la strateto. Tiukaze necesis halti. Se la radikoj ne estis tro dikaj, oni trahakis ilin. Sed, se ili estis tro duraj, kaj se kostus tro multe da tempo trahaki ilin, oni devis derompi la tirhokojn. Oni turnis la bovojn alidirekte, la hokojn oni batis je alia finaĵo en la trunkon, kaj la bovoj poste retrotiris la trunkon el la arboradikoj. Se tio sukcesis, oni denove eltiris la hokojn kaj denove batis ilin antaŭe ĉe la *chuzo* en la lignon, kaj la trunkon oni tiris supren, por ke ĝi nun estu trenebla trans la radikojn kaj por eviti denovan ŝoviĝon sub radikon.

Krome etendiĝis sulkoj trans la vojon kaj oni devis leveti la trunkon, por ke la trunko ne enfosiĝu. La bovoj tiris per ĉiuj fortoj, kaj se la *chuzo*, la pinto ne estis levita en la ĝusta duono de sekundo trans la obstaklon, tiukaze ĝi tuj pikiĝis kvindek centimetrojn en la teron. Kaj denove necesus elrompi la hokojn kaj enbati ilin sur la alia finaĵo. Renecesis turni la bovojn kaj pluan fojon oni eltiris la trunkon. Sur cent metroj da vojo eblis, ke la turnado kaj eltirado de la trunkoj okazis kvinfoje.

Krome baris la vojon ŝtonoj, branĉoj, trunkoj, ĉiuj aĵoj, en kiuj kaptiĝas *troza,* se ĝi estis kondukata malbone. Kaj ĉiu restado signifis perditan tempon kaj duoblon de laboro.

Tiel ne estis mirige, ke Andreo sur la tuta korpo estis kovrita de ŝvito kaj ĝemis tiom, ke oni supozis lin renversiĝonta, se *troza* estis trenita kilometron kaj ili retrokondukis la bovojn por treni la sekvan trunkon je distanco de unu kilometro. Nur sperta kaj forta viro kapablis iri en tropika varmego, enfermite en varmega malseka aero sen freŝa vento alportanta frideton, apud trunko kaj seninterrompe levadi la pezan ŝarĝon kaj gvidi ĝin sur la ĝustan vojlinion. Per malĝusta ektiro de la bovoj la trunko povus fali sur la nudajn piedojn de Andreo aŭ de Vicente kaj, se la viroj ne estis atentemaj, la *troza* batus tiom draste kontraŭ iliaj piedoj, ke ili rompiĝus. Ankaŭ tio de tempo al tempo okazis, kaj la ununuraj konsolaj vortoj, kiujn aŭdis la akcidentulo estis: 'Vi pli bone estus devinta memgardi. La tagoj, dum kiuj vi ne laboros, oni kompreneble ne pagos al vi. Post ses tagoj vi denove surpiedu aŭ ni pendumos vin dum kvar horoj por instrui al vi atenti pri viaj ostoj. Ni pagis por viaj ostoj nian valoran monon kaj ne lasos trompi nin pri ĝi, ĉu vi komprenas tion, stinkanta pigra ulo el *Chamula*?.'

Sed kelkaj *boyeros* aŭ la bovoknaboj, kiuj kiel *gañanes* pelis la bovojn, kompreneble ne devis gluti tiujn bonvolemajn konsolvortojn. Se iu el ili glitis sub trunkon, kiam ĝi estis trenata trans durajn radikojn aŭ trans ŝtonojn kaj rokojn, jen oni trovis la knabon aŭ same tiom ofte la boviston, kiam la alia fine haltigis la bovojn, tiom dispremita kaj disfrotita, ke ne restis multe plu de la akcidentulo por disipi konsolvortojn al tiuj restaĵoj. Kaj se

El Picaro havus eĉ la intencon pendumi ilin, tiukaze la pecoj unuope defalus, kaj tio, kio eble ankoraŭ kroĉiĝinte restus je la ŝnurego, ne plu indus la penon entombigi ĝin. La animo ja delonge estus elpremegita kaj se plaĉus al ĝi vivi plu, jen ĝi ŝvebadus en tiu momento ie kaj certe troviĝus en regiono, kie oni ne pagas salajrojn kaj ne pendumas pigrajn aŭ rezistemajn mahagonlaboristojn.

„Nun ni havas la lastajn du kilometrojn antaŭ ni, la lastan duonon de leguo kun la *trozas*“, diris Andreo, kiam ili elkroĉis la lastan trunkon proksime ĉe tiuj, kiuj jam estis trenitaj tien.

„La bovoj nun denove devos spirkapti aeron, ĉar ekde ĉi tie ili tuj iros plu. Kaj tio donos al ni la okazon sidadi dum momento kaj rulumi cigaron kaj fumi.“

Kun lasta veturado la viroj ĉiam kunportis la bastujetojn, la *morrales*, por havi ilin proksime.

La bovoj same tiom malsekis per ŝvito kiel ambaŭ laboristoj. Ili movis siajn kapojn laŭ strange sama ritmo, ankoraŭ nun firme ligitaj per rimenoj al la peze ŝarĝanta jugo por plenigi siajn pulmojn per aero. Iliaj flankoj ŝveladis kaj rekuntiriĝis. Iliaj grandaj okuloj ŝajne ankoraŭ pli ŝvelis el la okulaj kavoj. Estis apenaŭ loko sur ilia korpo, kiu ne estis ruĝa de la malsupren fluetanta sango.

„La kompatindaj *bestias*“, diris Vicente, tre proksimiĝante al la bovoj, kaj platbatante kelkajn muŝojn, kiuj enmordiĝis surdorse. Forta, freŝa sango ŝprucis tiom el la sattrinkintaj insektoj, ke ĝi trafis la vizaĝon de Vicente.

12/3

De tempo al tempo en la pli bonstataj kompanioj estis adminstranto, kiu diris centfoje: '*Las pobres bestias!* La kompatindaj bestoj!' Kaj ofte postrestis ankaŭ bedaŭro por la indiĝenaj peonoj kaj aliaj laboristoj, kiuj tie oferis siajn sanecon, vivon kaj personan bonfarton, por ke la mondo povu havi mahagonŝrankojn. Tiuj humane pensantaj adminstrantoj kaj estroj interne de la lastaj jaroj pli ol unufoje provis mildigi la suferojn de la laboristoj kaj de la bovoj. Kelkaj el la administrantoj en la unuaj tagoj post sia alveno apenaŭ povis akcepti tion, kion ili vidis tie, ili tuj sidiĝis kaj skribis longan raporton al la kompanio, klarigante en ĝi, ke la leterskribanto ne povas elteni vidi tiajn suferojn, kaj ke la kompanio sendu alian viron aŭ ŝanĝu tion. Sed la poŝtrajdisto ne ekrajdis je tiu sama tago, sed nur post kvar semajnoj. Intertempe la nova alveninta administranto kutimiĝis al ĉio ĉi, kion li vidis kaj travivis tie. Li legis sian raporton ankoraŭfoje, ne komprenis, ke li efektive kapablis skribi tion kaj disŝiris ĝin. Li mem intertempe ja lernis, eĉ se nur en limigita amplekso, toleri la samajn suferojn, kiujn tie devis toleri ankaŭ ĉiuj aliaj homoj. Turmentis lin mordaj muŝoj, iksodoj kaj moskitoj tiom, kiom ĉiujn aliajn. Li devis rajdi al la kampadejoj, lia mulo estis retenata en ŝlimo, kaj li devis helpi ĝin elturni sin el la marĉo, li eble ne atingis certan kampadejon antaŭ noktiĝo, ĉar li eraris pri la vojo kaj devis pasigi la nokton en la ĝangalo, je tiu loko, kie li troviĝis, kiam komenciĝis la nokto. Poste venis energie postulantaj leteroj de la kompanio, kiuj respondecigis lin por laŭregula kaj plena liverado. Tiel apenaŭ pasis tri monatoj, kaj la administranto jam ne rimarkis eĉ nur iun el la suferoj, kiujn li supozis ne povi rigardi dum la unuaj tagoj de sia laboro sen perdi la menson.

Ĉiu nova adminstranto sentis en la unuaj semajnoj de sia ĉeesto tie la seriozan deziron malpliigi la suferojn kaj turmentojn de la homoj kaj bestoj. Tiun deziron kaŭzis malpli ofte homo- aŭ bestamo, sed ĝi kreskis pli ofte el la strebado altigi la liveran kvanton. La administranto pensis, ke ju pli facile li faros la laboron por la laboristoj des pli ili povos liveri. Kaj ĉiu nova administranto provis novan sistemon, pri kiu li asertis, ke ĝi estas perfekte taŭga.

Iu el ili, kiu alvenis tien, havis la grandiozan ideon konstrui specon de ĉaro, kiu ruliĝis sur fortikaj, larĝaj kaj tre malaltaj radoj, kiuj pli similis al rulcilindroj ol al radoj. Li pensis, ke oni povus fortreni la trunkojn per speco de ĉareto kiel lubrikite, kaj ke eĉ eblos transporti tri aŭ kvar trunkojn per unu fojo sur tre malsekaj stratetoj.

La ideo estis bonega laŭ teorio. Sed kiam oni provis praktiki ĝin, montriĝis, ke la *boyeros* helpe de la ĉareto dum unu semajno povis atingi nur malpli ol trionon de tiom, kiom ili atingis laŭ la pli frua, ŝajne pli plumpa metodo! La ĉaretoj puŝiĝis pli profunde kaj pli malesperige en la ŝlimon ol unuopa *troza*. Se ĉareto foje jam ŝoviĝis sub fortajn radikojn, tiukaze kostis grandegan penon denove eltiri ĝin per hokoj tiel, ke ĝi ne rompiĝu dum tio.

Alia administranto havis la bonan kaj ankaŭ tre ĝustan ideon, ke oni povus starigi lokomobilojn kaj poste treni la trunkojn per fortaj dratkabloj. Sed kiam li alvenis en la monterion kaj konatiĝis al la vojoj kaj travivis ilin rajdante, konstatante ĉe tio, kiom ofte li devis deseliĝi kaj piedieri dum kilometroj en la tenaca ĝangala argilo kaj en la marĉa ŝlimo, ĉar la mulo kun sia ŝarĝo

sur la dorso sinkis ĝis sela alto, jen li spertis, ke lia ideo ne estis entreprenebla, ĉar lokomobilo sur tiaj vojoj ne transporteblis tien eĉ dismuntite en partojn. Kaj kiom da ĉevalfortoj tia lokomobilo devus havi por treni trunkojn je kabloj trans radikojn kaj tra marĉan terenon, li tute forgesis prikalkuli.

Plia posteulo ekmiris, kial antaŭaj adminstrantoj ne ekhavis la simplan ideon veturi tien per motorboatoj sur la ĉefa riverego kaj poste sur la flankaj riveroj kaj tiel alporti maŝinojn sur tiuj boatoj. Ankaŭ tiu ideo ŝajne estis bona en *Villahermosa*, en tiu urbo, kiu atingeblis de la haveno per motorboatoj. Sed kiam li estis foje en la monterio kaj kontrole veturis kun tre lertaj kaj spertaj *cayuqueros* per kanuoj partojn de la riverego, li eksciis, ke motorboato povus veturi tien nur tiukaze, se ĝi estus flugboato, kaj eĉ tia boato havus malfacilaĵojn trairi la vojon sen ĉiam esti en la danĝero perdiĝi.

Se la mahagono kreskus rapide tiom, kiom en fabriko estas fareblaj aŭtomobiloj, tiukaze indus la penon konstrui fervojojn kaj aŭtomobilstratojn. Sed, se la fervojo ne tute proksime preterirus la lokon, kie la mahagono estas hakata, tiukaze okazus la sama; ĉar tiukaze, kiel ankaŭ pli frue, kiel jam dum multaj jarcentoj, oni devus treni la trunkojn per bovoj ĝis proksime de la fervojo; kaj la vojo, sur kiu oni trenus la trunkojn, estus la sama, kia ĝi estas nun: ŝlima, rokeca, monteta, transverse prikreskata de miloj da fortaj kaj malfortaj radikoj, kiuj estas rezistemaj kiel dratŝnuregoj. Ĉar nur tie, kie troviĝas ĉiuj kondiĉoj por tiaj vojoj, renkonteblas ankaŭ la kondiĉoj, laŭ kiuj kreskas mahagono.

Kiujn ajn proponojn oni faris en burooj, kiaj ajn ideoj estis prezentataj, ĉiam montriĝis, ke la metodo, per kiu la trunkoj aktuale estas hakataj, fortrenataj kaj forflosigataj, estas la ununura metodo, per kies helpo mahagonligno produkteblas kaj transporteblas en la mondo.

Ĉiuj malfacilaĵoj, ĉiuj suferoj, ja eĉ la plimulto de ŝajne nenecesaj kruelecoj trovis sian kaŭzon en rilatoj, kontraŭ kiuj la homo evidente estas senpotenca. Alia ekonomia sistemo verŝajne sub tiaj cirkonstancoj tute rezignus pri mahagonligno aŭ provus kreskigi la mahagonon en specialaj plantejoj, tiom bone organizitaj, ke ĉiu *trozo* kreskus proksime de asfaltita aŭtovojo, por ke oni povu levi ĝin per motorgruo sur kamionojn. Tiukaze tuno da mahagono verŝajne kostus dek mil dolarojn; sed almenaŭ tiel oni ne plu vendus indiĝenojn pro ties ŝuldoj en la sklavecon, oni ne plu skurĝus kaj pendumus ilin senkompate. Ja ankaŭ ne eblas fari militon sen meti homojn en uniformon kaj sklavigi ilin kaj subigi ilin al silentaj rezistmalkapablaj objektoj de idiotaj kaj brutalaj superuloj. Oni ne povas havi militon kaj liberon samtempe; tiel, kiel oni ne povas havi mahagonon kaj samtempe humanecon kaj kompaton al homoj kaj bestoj en la ĝangalo. Ĉar eĉ tiukaze, se *contratistas* kaj *capataces* kondutus kontraŭ la indiĝenoj kiel sanktuloj, restus ankoraŭ plu la mordantaj muŝoj, moskitoj, iksodoj, marĉoj, radikoj, pumoj, serpentoj, la senkompata ardo de la tropika suno. Kaj certe supozeblas, ke mordaj muŝoj, moskitoj, ŝlimo, ŝtalecaj radikoj kaj la ĝemiga varmego devas plenumi gravan taskon rilate la kreskadon de la mahagono. Nenio estas sen io alia.

12/4

El kalabasaj trinkujoj verŝis Andreo kaj Vicente akvon en siajn trinkpelvojn. Poste ĉiu depinĉis pecon de sia posolo, kiu estis volvita en dikajn verdajn foliojn kaj tiel konserviĝis freŝa. La posolpecon oni knedis tiam en la akvo kaj likvigis ĝin tiel, ke tiu akvo ricevis aspekton kvazaŭ ĝi estus flava blanka kaĉo. Tiun kvazaŭkaĉon oni tiam ankoraŭ bone miksis perfingre, por ke ankaŭ la lasta resteto de la pasto solviĝu. Kiam la viroj ŝajne estis kontentaj pri sia kaĉo, ili ŝovis pinĉaĵon de la kruda salo en la buŝon kaj trinkis la likvaĵon iom post iom kaj kun profunda trankvilo kaj bonfarto.

Ili sidiĝis sur trunkon. Ili surhavis nenion alian krom ĉifonitaj blankaj kotonpantalonoj suprenkuspitaj ĝis proksime de la koksoj. Ilia bronzokolora supra korpoparto estis nuda. Iliaj piedoj estis sen sandaloj, kvankam ili ofte tretis sur dornojn kaj sandaloj estus utilaj al ili, speciale kiel protekto kontraŭ skorpioj, kiujn ili facile povis enpiedigi per surtretado. Tamen la portado de sandaloj estis ne nur tro multekosta al ili, sed ankaŭ tro temporaba. Se ili foje ĝis la koksoj troviĝis en la tenaca praarbara ŝlimo kaj provis eltiri la sandalvestitan piedon, jen disŝiriĝis la malmultaj rimenetoj, per kiuj la g*uarache*, la sandalo, estis ligita al la piedo kaj la sandalo estis retenita profunde en la marĉo. La elfosado kostus tempon kaj ne malofte estis vana. La marĉo kunfalis kiel densa supo. Tuj kiam la piedo estis tirita eksteren, ĝi kuntiriĝis kaj la sandalo ne plu troveblis. Se la piedo foje estis eltirita, jen la loko, kie ĝi estis retenita, ne plu troveblis precize, kaj la sandalo eble eĉ troviĝis eĉ duonon de metro apud tiu loko, kie la viro serĉis ĝin. Tial estis plej bone havi simple nenion je la piedoj.

Kvankam la viroj nun jam dum certa tempo sidis kviete kaj kontemple, ĝue trinkante, sian posolon, ili ankoraŭ nun forte anhelis pro la laborstreĉo. Iliaj manoj kaj gamboj tremis kaj de tempo al tempo ili malfermis sian buŝon ridinde vaste por kapti aeron. Ilia hararo estis malseka de ŝvito kaj iliaj pantalonoj aspektis kiel ĉifonoj tiritaj el la akvo.

„Ĉu vi ankaŭ en via bieno havas posolon?“ demandis Andreo.

„Kompreneble“, respondis Vicente. „Sed ni kunprenas posolon nur tiukaze, se ni iros al foirplaco, aŭ se ni laboros dum tuta tago sur kampoj kaj nur malfrue vespere iros hejmen.“

„Posolo estas tre bona afero, Nene. Ĉi tie pli ol en bieno. Kiam mi estis ĉaristo, ni neniam havis posolon, en tiu regiono oni ne konas ĝin. Sed plej ofte ni marŝis nokte kaj dormis dum hela tago. Nokte oni malpli soifas ol en hela tago. Kaj mi nun volas diri al vi tuj ankaŭ la sekvan, Nene. Ne trinku tro da akvo. Vi trinkis preskaŭ ĉe ĉiu akvejo. Sed en multaj el la akvejoj embuskas febro. Malica febro. La akvo en la kampadejo estas pli bona. Sed tie, kie vi ne konas ĝin, estu memgarda. Stomako plene ŝtopita per akvo estas tre danĝera. Posolo likvigita en akvo danĝeras malpli. Vi bridas vian soifon pli bone per posolo ol per akvo. La posolo okupas grandan spacon en via stomako kaj vi malpli sopiras plenigi la tutan stomakon per akvo. Se vi ne havas posolon, jen gargaru la buŝon nur per akvo, sed ne trinku ĝin kvazaŭ torente. Kaj ĉiam kunglutu iom da salo. Sciu, Nene, en la monatoj, dum kiuj mi nun jam laboras ĉi tie, ni sole en nia kampadejo enfosis jam ok virojn, kiuj mortaĉis je malario. Tio iras tiel rapide kiel porkofiko, jes ja! Vi subite skuiĝas, tiam

fariĝas al vi terure varmege, kaj tuj poste fridege, kaj tio tiel alternas kelkfoje. Tiam vi parolas amason da stulta salivo kaj timas vin – sole Satano scias, kion vi eble vidas dum via frenezo, sed devas esti monstre terure. Tiam vi kurbiĝas kaj batas ĉien. Kaj subite vi estas for, tiel, kiel platbatita muŝo. Kaj tiam oni enfosos vin. Tie, kilometron malantaŭ la *oficina*, kie *El Picaro* loĝaĉas kun la hundo *El Gusano*, troviĝas la *Campo Santo*, la tombeja loko. Sovaĝaj porkoj venas nokte kaj elfosas la tombojn kaj voras la kadavrojn. Jen kelkaj krucoj, sed ne estas animoj sub la krucoj. La porkoj lasas kuŝi tie neniun."

Vicente malfermegis siajn grandajn infanajn okulojn, kiam Andreo rakontis tion. Sed poste li ekridis. „Vi ja nur mistifikas min kaj volas tiri min je piedo."

„Ne estas afero por mistifiki iun", diris Andreo serioze. „Estas tiel, kiel mi diras al vi. Kaj se vi ne volas esti vorita de la porkoj, jen prefere ne trinku tiom da akvo. Kaj, se vi devas trinki ion, tiukaze nur kun posolo kaj salo."

Vicente hakis foliaron de la arboj kaj ĵetis ĝin antaŭ la bovojn, kiuj akceptis ĝin kun la sama bonfarto, kun kiu la du viroj trinkis sian posolon.

Tiam ambaŭ fumis mallongan dikan cigaron.

„Kaj nun plu, por ke ni fine jam estu altrenintaj ĉiujn trunkojn antaŭ ol je la dekdua *El Gusano* estos ĉe la *tumbo* por rigardi, ĉu ni havas ilin ĉiujn tie. Tiam li inspektos la trunkojn, ĉu la *muchachos* efektive enbatis la ĝustajn markojn, por ke la fratoj *Montellano* ekkonu sian lignon, kiam ĝi alvenos en la havenon

Puerto Alvaro Obregon. Ili, *El Picaro* kaj *El Gusano*, nun tre atentas pri tio, ke la marko videblu je ĉiu *troza*, por ke la fratoj *Montellano* povu kalkuli ilin je sia favoro. Sciu, ke ili ricevas premion por ĉiu *troza*. Se ili kaptas trunkon sen marko, ĉar iu *muchacho* forgesis ĝin haki en la lignon, jen ili traktos lin per kvindek skurĝbatoj, ĉar la markoj necesas por ilia mono. La *cabrones*, tiuj diodamnitaj. Ek, altiru la bovojn!“

Rimarko
posol aŭ potzol = posolo = trinkaĵo el fermentita maizo, komune kutima en Ĉiapaso.

12/5

La *troza* estis ligita per ĉeno kaj la veturo komenciĝis.

“Permesu al mi foje fari vian laboron, Andreĉjo“, diris Vicente.

„Volonte, mi faros vian laboron, kun plezuro.“

Andreĉjo ekiris antaŭ la kapoj de la bovoj kaj iom dekstre. Vicente ekkaptis la hokon kaj komencis konduki la trunkon. Ili treniĝis nur dek metrojn kaj tuj la *chuso* de la *troza* enpikiĝis sub radikon, la bovoj haltis kvazaŭ ili estus enmasonitaj.

„Nu, Nene, vi devas atenti! Diable bone vi devas atenti, por ke la pinto de la trunko ne pikiĝu teren kaj ne sub radikon. Por tio vi havas ja vian hokon, por ke vi konduku la trunkon ĝuste kaj lerte levu ĝin antaŭ ebla firmkroĉiĝo.“

„Tion mi faris, Andreĉjo, sed la *troza* estas tro peza. Mi ne povas levi ĝin sola kaj eĉ ne turni, por ke la ĉeno ne ŝoviĝu supren kaj la *chuso* ne tro profunde falu.“

Andreo ridis. „Nur tion mi volis scii kaj vidi, Nene, bebeto mia, suĉinfaneto. *El Gusano* hodiaŭ matene diris al mi, ke mi instruu vin dum semajno, kaj poste vi estu memstara *boyero*, kun knabo, kiun sendos al ni la *oficina*. Tion mi sciis ja antaŭe, ke vi estas tro malforta por levi trunkon. Kaj se vi daŭre ne povus levi trunkojn kaj per tio zorgi pri tio, ke la pinto ne firmkroĉiĝu en la grundo aŭ en la ŝlimo aŭ sub transversa radiko, tiukaze vi movus trunkon eĉ ne duonon de kilometro.“

Vicente kapjesis kaj rigardis Andreon mirigite. „Andreĉjo, mi ne sciis, ke vi estas tiel damne forta.“

„Ankaŭ mi estis iam tiom malforta kaj tiom malmemstara surpiede kiom vi, Nene, sed tio estis jam antaŭ longa tempo, kiam mi devis helpi en *Tenejapa* en butiko. Ek do, reiru antaŭ la bovojn, Nene, kaj mi kondukos la trunkon. *El Gusano* elblovos ja venenon tra la nazo, se mi diros al li, ke vi interne de la venontaj ses monatoj ne povos esti *boyero*, eĉ se li ordonus lasi pendumi vin ĉiuvespere du horojn por rompi vian reziston.“

Poste ili trenis la trunkojn unu post la alia ĝis la *Arroyo Ciego*, ĝis la Blinda Sulko.

ĈAPITRO 13

13/1

Kiam ambaŭ viroj alvenis tien kun la unua *troza*, ili vidis, ke antaŭ ili estis tie jam aliaj *boyeros* kaj demetis siajn trunkojn ĉe la rando de la sulko. Sur tiu loko kolektiĝis kelkaj *boyeros*, kiuj altrenis trunkojn el diversaj direktoj. La plua vojo ĝis la *tumbo* fariĝis tiel komplika, ke ĉiuj jungitaj bovoparoj de tie devis labori kune. Eĉ tio ne sufiĉis. De la kampadejo oni sendis ankoraŭ kelkajn aldonajn bovoparojn, tiel, kiel El Gusano matene promesis tion al Andreo.

Ambaŭ *muchachos* retropelis la bovojn sen ŝarĝo por altreni la sekvan trunkon.

„Kial la sulko nomiĝas *Arroyo Ciego*, Andreĉjo?“ demandis Vicente. „Sulko ja ne vere povas esti blinda“, li aldonis ridante laŭ la speco de knaboj, kiuj ne certas pri tio, ĉu ĵus pli maljuna viro mensogis al li aŭ ĉu tamen eblas, ke la pli aĝa kaj pli sperta viro diris ĵus la veron.

„Tiu *arroyo*“, klarigis Andreo, dum ambaŭ leĝere promenis unu apud la alia kaj antaŭenpelis la bovojn, „tiu sulko havas plezuran rakonton kun multe da humuro. Ĝi estas gaja rakonto por tiu, kies monon ĝi ne kostas. Vi eble observis, ke la sulko estas dekliva en la direkto al la rivero. Se ni havos pluvotempon, tiam torentos la akvo en tiu sulko en la riveron. Kaj se ni tiam surtavoligos la trunkojn kaj la fluoj komenciĝos kaj la sulko plenos de akvo, tiam de ĉi tie la trunkoj sufiĉe bone flosos. Kiam oni hakis arbojn tie antaŭjare, nur iom pli antaŭe ĉe tiu sulko, *don*

Remigio laŭirante rigardis tiun sulkon. Sed li ne iris ĝis la fino, ĉar li ja vidis, ke la sulko kondukos al la rivero.“

„Tial oni surtavoligis ĉe tiu sulko ĉirkaŭ kvin kilometrojn pli antaŭe proksimume ducent tunojn da mahagono por flosigado. La pluvotempo venis. La alta akvo plenigis la sulkon kaj la *muchachos* gaje kaj plezure ŝovis la trunkojn en la sulkon. La trunkoj belege forflosis sen fari multe da laboro pro necesaj liberigoj dum la ŝovado. Sed ĉe la ĉefa kontrolejo de la rivero, do ĉe la *oficinas*, kie oni kaptas la trunkojn por kontado kaj kalkulado, mankis la ducent tunoj, pri kiuj *don Remigio* sciis tute certe, ke ili estis forflosigitaj. Li havis sian markon sur ĉiuj trunkoj, kaj tamen mankis ducent tunoj. La *trozas* oni devis serĉi. Por *don Remigio* kaj la *muchachos* tio ne estis facila laboro migri laŭ la tuta sulko. Ĉiun paŝon en la ĝangalo ili devis elhaki per maĉetoj por ĉie povi observi la sulkon. Kaj kion pensas vi, kio okazis?“
„Tion mi ne povas diveni“, diris Vicente.

„Certe, Nene. Oni trovis ĉiujn trunkojn en marĉo. La sulko survoje deflankiĝis aŭ, pli bone dirate, disforkiĝis. La ĉefa sulko kondukis en la marĉon kaj apuda sulko, kiu ne estis sufiĉe profunda por ke trunkoj povu flosi en ĝi, etendiĝis plu kaj verŝajne rekte en la riveron. La provo kapti tiujn ducent tunojn el la marĉo, kostis al *don Remigio* sufiĉe da laboro. Li devis ordoni la konstruadon de balzoflosoj, sur kiuj la *muchachos* povis atingi kaj kapti la trunkojn en la marĉo. Celso diris al mi, ke apenaŭ cent tunoj estis kapteblaj; la ceteraj ankoraŭ troviĝas en la marĉo kaj perdiĝis. La sulko estas blinda, kiel vi jam scias, mi celas diri, ke ĝi ne havas enfluejon al la rivero, kvankam je la unua momento ĝi faris la impreson, ke ĝi laŭorde fluos en la riveron. Sed tio ne estu zorgo nia, al zorgo nia vi konatiĝos, se

ni havos ĉiujn trunkojn antaŭ la blinda sulko kaj devos tiri ĝin sur la alian flankon, ĉar ĉefa sulko, kondukanta al la rivero, estas ankoraŭ preskaŭ duonon de leŭgo pli malproksime, sur la alia flanko de la blinda sulko."

13/2

Horon kaj duonon poste ĉiuj *boyeros* havis la trunkojn ĉe tiu sulko. Sekvis nun la tasko por ili treni la trunkon sur la alian flankon. Ili tuj eklaboris.

Ili serĉis la lokon de la sulko, kie estas la plej bona deklivo. Tie kelkaj *muchachos* grimpis malsupren kaj forhakis ĉiun arbuston kaj ĉiun arbustaĵon, kiu povus esti malhelpema al la falantaj trunkoj. La *arroyo* havis profundon proksimume dudekmetran. La flankoj deklivis sufiĉe krute. Ĝia larĝo estis eble dek du metroj.

Kiam unu el la flankoj estis purigita, la viroj ekokupiĝis pri la alia flanko. Intertempe aliaj okupiĝis pri tio kunligi la bovoparojn per ĉenoj. Dek du jungitajn bovoparojn oni kunligis per ĉenoj al sekvantaro.

Sur la grundo de la sulko la arbustaĵo estis plej densa. Eŭlalio, unu el la *boyeros*, staris ĝis la brusto en la arbustaĵo kaj hakis per maĉeto dekstre kaj maldekstre por purigi la sulkon. La grundo estis plenigita per rulŝtonoj, kiuj parte falis de supre kaj parte dum la iro de la tempo flosis tien. Andreo laboris kun sia maĉeto kelkajn metrojn pli antaŭe je la kontraŭa sulkoflanko kaj tie forhakadis arbustaĵojn. La *gañanas*, la knaboj de la *boyeros* forportis la hakitaĵojn por tute purigi la sulkon.

Andreo rektiĝis dum momento por deskui la ŝviton, kiu fluis en liajn okulojn.

Li vokis al Vicente: „He, Nene, la hakitaĵojn vi devos ja forporti kelkajn pliajn metrojn, alie ili ĝenos nin, kiam ni lasos gliti la trunkojn malsupren.“ Kiam li diris tion, li sekvis per la okuloj Vincenton, kaj dum tio li ekvidis Eŭlalion, kiu hakis sur la grundo la arbustaĵon kaj ĝuste ekvidebligis ŝtonojn.

Li ĵus volis turni sin al sia propra laboro, kiam li ankoraŭ kvazaŭ hazarde rigardis al la ŝtonrulaĵoj surgrunde. Kaj samtempe li ekkriis laŭte: „*Una culebra*, Eŭlalio, jen serpento!“ Eŭlalio certe aŭdis la minacantan klakadon de la serpento, sed kelkajn sekundojn poste lia cerbo ne tute akceptis la bruon, ĉar li opiniis, ke li eble eraras kaj la bruo devenas de la *muchachos*, kiuj laboris streĉe je la bovjungitaroj kaj tie tintigis kaj klakigis ĉenojn kaj jungilarojn. Sed kiam Andreo kriis *'Una culebra!'*, jen Eŭlalio instinkte retrosaltis. Sed li stumbletis pro radiko, kiu postrestis de la dehakita arbustaĵo, kaj tiel li perdis tute la ekvilibron, kiun li eble ankoraŭ estus povinta gajni, kiam li paŝis sur la lozajn ŝtonojn, kiuj cedis subpiede kaj faligis lin. Pro tio li etendis kontraŭ sia volo nudan piedon al la serpento, kiu, pro la detruado de sia hejmo, ege koleriĝinte eksagis kiel vipoklako renkonte al Eŭlalio, sian korpon rektiginte je duono, en la sama sekundo, kiam Andreo vidis ĉi tion de sia altigita starloko. Ĝia vaste malfermita venenodenta buŝo ĉe la unua atako verŝajne trafus nur la suprenkuspitan pantalonon de Eŭlalio, kaj ĉar la pantalono proksime de la koksoj estis sufiĉe pufa, la dentoj eble disŝirus nur la pantalonon sen vundi la korpon, kaj Eŭlalio povus gajni sufiĉe da loko por retrosalti pli grandan distancon. Sed ĉar li

falis kaj aldone etendis eĉ piedon al la serpento tiom, ke ĝi malproksimis apenaŭ pli ol kvaronon de metro, kaj ĉar la serpento perceptis tiun piedon kiel armilon kontraŭ si mem, ĝi evidente batis siajn dentojn kun grandega kolero kaj kun ĉiuj siaj fortoj eĉ dufoje profunde en la piedan karnon de Eŭlalio, en la malsupran suroparton, je la dua atako aldone eĉ unu aŭ sekundojn kroĉiĝinte en la karno. Kiam la serpento jam finis siajn atakojn, ĝi sin turnis kaj moviĝis kun la rapideco kaj strebemo de sago en la prihakitan arbustaĵon je la grundo de la sulko, en tiu direkto, en kiu Vicente forigis la arbustaĵajn hakitaĵojn.

„Nene, *una culebra!*“ kriis Andreo avertante la knabon.

Sed Vicente jam aŭdis la vokon, per kiu Andreo vokis Eŭlalion. Tial Vicente surgrimpis jam duonon de la sulkovando, kiam la serpento alvenis tien, kie Vicente okupiĝis pri tio ŝovi la arbustaĵojn flanken.

La viroj, kiuj supre ĉe la rando de la sulko traktadis la bovojn, same aŭdis la kriadon de Andreo kaj nun alvenis tien kun la maĉetoj por kapti la serpenton. Estis kelkaj inter ili, kiuj bonvenigus la viandon de serpento kiel frandaĵon, des pli, ĉar la manĝo, kiun la kuiristo prezentadis al ili, estis tiom magra kaj tiel senŝanĝa, ke ĉiu aldono, kiu estis viando aŭ rigardeblis kiel viando, estus pliriĉigo de ilia vivo. Kiel junaj kaj nekredeble streĉe laborantaj homoj ili ĉiam estis malsataj, kaj io ajn, kio povis pligrasigi iliajn manĝojn, estis kvazaŭ neatendita donaco de la ĉielo. Pelate de sia malsato pri plenvalora nutrado, ili eĉ ne preterlasis elfosi grandan formikejon, kiun ili dum sia laboro malkovris, se por tio restis posttagmeze ankoraŭ tempo al ili. Ili sekigis la formikojn, kaj kelkajn tagojn poste ili fritis ilin en

graso, spicis ilin abunde per akra kapsiko, envolvis ilin en varmegajn tortiljojn kaj manĝis ilin kun grandega ĝuo. Ĉeokaze havi por manĝo dikajn formikojn frititajn en graso estas en ĉiu kazo pli bone kaj pli nutrige ol ĉiutage ĉiam devi manĝi nur tortiljojn kaj nigrajn fabojn kun verda pipro.

Sed kiel ajn rapide la viroj persekutis la serpenton, ĝi konis sian terenon pli bone. Supre kaj ekstere de la sulko ĝi ne eskapus la virojn. Sed ĝi malfacile kapteblis en la profunda *arroyo*, kiu estis dense prikreskata per dornaj tropikaj arbustaĵoj, kies grundo estis plenigita per loza rulŝtonaro, en kies flankoj al ĉiuj direktoj estis fositaj truoj, irejoj kaj kavernetoj de iuj ajn bestoj vivantaj en tiu arbustaĵo. Se la serpento sukcese fuĝis tien, estis sensence plu persekuti ĝin.

„Damne“, kriis Cirilo, „ĝi estis forta bestaĉo, tion mi ja devas diri. Mi vetas, ke ĝi estis longa du kaj duonon da metroj, se ne eĉ pli, ĝi estis certe tiel dika kiel mia brako. Domaĝe, ke ni ne povis kapti ĝin. Kia bona rostaĵo ĝi alie estus ĉivespere!“

„Mi neniam tuŝus eĉ peceton de serpento, eĉ se mi devus morti pro malsato“, diris *Sixto*, kiu skuiĝis pro naŭzo. „Bonan rostaĵon de granda lacerto mi ja volonte akceptus, grasan *iguana*. Jen la ĝusta viando, tiom delikata kaj bongusta kaj ankoraŭ pli bona ol tiu de kaprido. Sed manĝi serpenton, ĉu? Certe ne mi.“

„Tiukaze vi simple ne scias, kio bonĝustas surtere“, korektis lin *Cirilo*. „Kiel oni povas manĝi lacerton? *Iguan*oj estas venenaj. Ĉu vi ne scias tion?“

„Ni manĝis hejme sufiĉe da ili, kaj neniam iu mortis pro tio. Tion mi rajtas diri al vi.“
Ili reiris al sia laboro.

Eŭlalio post sia falo rapide suprensaltis kaj same postkuris la serpenton. Ankaŭ li reiris kaj daŭrigis sian laboron forhaki la arbustaĵon de la sulko.

Andreo staris supre ĉe la rando de la sulko kaj vokis al Eŭlalio: „Mi supozis, ke la serpento mordis vin, almenaŭ ĝi tiel aspektis.“

„Ne, mi tro rapide retiris la gambon“, respondis Eŭlalio.

13/3

Kiam la sulko estis pretigita, la viroj puŝis la trunkojn sur tiu flanko malsupren, ĝis kiam ĉiuj estis suramasigitaj en la sulko. Poste oni batis hokojn en la trunkon kaj la bovoj komencis tiri ilin supren sur la transflankan bordon. Kun malpli ol dekopo da bovoparoj ili apenaŭ atingus la celon. Dum la viroj tie ankoraŭ laboris, alvenis tien pliaj aljungitaj bovoparoj, kiuj same trenis trunkojn ĝis tien por helpi. Kaj tiam la tuta *campamento*, la tuta labortaĉmento de la *boyeros* kunestis. Ĉiu bovoparo havis sian specialan knabon. La spertaj *boyeros* kvazaŭ gluiĝis al la kruta sulkoflanko, per hokoj ŝovante la trunkon tien kaj tien, por ke ĝi ne tro profunde boriĝu en la molan sulkoflankon, dum oni tiris ĝin supren. Sed post la transigado de kelkaj *trozas* la flanko estis kvazaŭ tute plugita kaj kun ĉiu plua *troza* kostis ilin pli da peno treni la trunkon supren.

Oni provis ekkapti la trunkon transverse kaj alhokigi ĝin je ĉiu finaĵo samtempe. Sed tiam ekestis novaj komplikaĵoj. La trunko treniĝis nun laŭ sia tuta larĝo trans la malfermŝiritan molan sulkoflankon kaj la ŝarĝo fariĝis tro peza, tiel, ke la bovoj ne plu kapablis tiradi. La viroj elĉenigis denove la trunkojn kaj trenis ilin kiel kutime, do kun la alten direktata pinto supren. Ili ŝovis longan branĉon sub la pinton kaj sur ĉiu flanko grimpis supren kvar viroj, kiuj poste samtempe levis la branĉon, por ke la pinto ne pikiĝu en la sulkoflankon. Sed ĉe ĉiu ektirado de la bovoparoj la viroj perdis sian apogon je la flanko, ili falis kun la branĉo grunden kaj denove devis suprengrimpi por levi la trunkon kun la sekva tirado pluan metron supren.

Okazis post tia malsuprenfalado, ke Eŭlalio diris al Andreo: „Mi ne plu povas spiri, Andreĉjo. La sulko estas tiom sufokiga.“ Li grimpis sur siaj manoj kaj piedoj supren sur la flanko kaj supre haltis apud arbo, kie li enspiregis kun vaste malfermita buŝo freŝan aeron.

Post iom da tempo ŝajnis al li kvazaŭ li estus rekolektinta fortojn, kaj ĉar li vidis, kiel penege la viroj devas labori por movi plian trunkon, li volis regrimpi en la sulkon por helpi ilin. Sed kiam li volis movi la gambon, li sentis en la suro tiklan jukadon, kaj tiam ŝajnis al li, kvazaŭ ekdormus la piedfingroj. Sed tiu sento tamen rapide pasis. Li faris duan provon malsuprengrimpi la sulkon, kiam li eksentis fortan doloron en la suro. Li sentis la doloron kiel pikadon kaj samtempe kiel kunpremadon interrompitan de subitaj konvulsioj.

Denove li provis ekpaŝi, kaj plian fojon li sentis, ke li ne sekure staras sur siaj piedoj. Li sidiĝis sur la teron kaj rimarkis, ke el la

suro fontas sango, kiu ŝajnis al li tre malhela. Li rigardis la vundon kaj vokis Andreon, kiu ĵus alvenis supre al la rando de la sulko kaj per sia hoko provis tiri flanken la suprentrenitan trunkon, dum la ceteraj viroj de malsupre postŝovis la trunkon por helpi al la bovoj tiri ĝin trans la randon.

„Ĉe la falo vundigis min dorno“, diris Eŭlalio al Andreo. „Eblas, ke la dorno estas venena. Aŭ estis la splitaĵo de venena *Chechen*-ligno. Aŭ muŝo pikis min. Kaj ŝajnas, ke ĝi estas venena. Mi sentas tie ion duran kaj ŝvelintan.“

„Montru tion al mi, Eŭlĉjo“, diris Andreo, surgenue ĉe li.

Li rigardis la vundon pli proksime. Tiam li lasis refali la gambon de Eŭlalio. Lia vizaĝo fariĝis ektimigita. „Vi, Eŭlalĉjo, tio estas, Dio damnu ĝin, tre malica afero. Mi pensis, ke ĝi maltrafis la celon. Sed ĝi trafis vin, kaj perfekte. Jen la mordovundoj de la dentoj, tute klare videblaj. Tio ne estas mordomuŝoj kaj ankaŭ ne dornoj.“

Ĉiuj *muchachos* staris supre ĉe la sulkorando por kapti aeron, dum la bovoknaboj ŝiris la jungilarojn de la bovparoj malantaŭen, por tiri supren la sekvan trunkon.

Rimarko
Chechen-ligno (*Metopium brownei*) = nomata ankaŭ *Black Poisonwood* (Nigra Venenligno, *Caribbean Rosewood* (Kariba Jakarando)

13/4

„He, *muchachos*!“ vokis Andreo. „Venu ĉi tien, kaj ekbruligu fajron. La diodamnita bestaĉo nomata *chingada Culebra* mordis Eŭlalĉjon. Vicente, montru foje vian faringon al mi.“ Vicente alvenis libervole kaj malfermis vaste sian buŝon.

Andreo rigardis la lipojn de la knabo kaj demandis poste: „Ĉu moskito pikis vin, aŭ ĉu vi havas enŝiraĵon buŝe?!“

„Ne, Andreĉjo.“

„Bone tiukaze kuŝigu vin do apud la gambo de Eŭlalio kaj sucu la sangon el liaj punktaj vundetoj. Sed per tuta forto.“

Sen demando kaj sen penso Vicente faris tion, kion lia mastro postulis de li.

Andreo prenis sian maĉeton kaj akrigis gratante la pinton per ŝtono. „Elkraĉu tion, kion vi nun havas en via buŝo, Nene. Ĉu vi eble eĉ glutis malsupren la elsucitan sangon?“

„Tia ŝtipkapulo mi ja ne estas, Andreĉjo.“ Vicente ridis. „Krome mi faris tion jam dufoje en nia bieno, kiam knaboj estis morditaj de *culebra*. Sed nur unu el ili transvivis, la alia mortis pro tio.“

Andreo surgenuiĝis apud Eŭlalio kaj pritranĉis per la pinto de sia maĉeto la suron tiom, ke ambaŭ pintoj de la mordo fariĝis unu vundo. Tiam li ankoraŭfoje per forta tranĉo krucis ĝin transverse por vaste malfermi la vundon.

Li alvokis alian knabon, rigardis ties buŝon kaj ordonis al li, ke li plu sucu je la nun tre vastigita vundo. Intertempe brulis jam fajro kaj la *muchachos*, kiuj sciis, kiel traktendas la mordo de *culebra Cascabel,* havis du maĉetojn en la fajro. Kiam la maĉetoj ekardis, Andreo metis ilin elbrulige sur la vundon. Tiam li ankoraŭ pli vaste malfermtranĉis la vundon, elbruligis ĝin pluan fojon kaj tiam li frotis ardantajn karbopecetojn en la rostitan karnon.

Dum ĉiuj ĉi kruelaj traktadoj Eŭlalio neniel tordis la vizaĝon. Li fumis seninterrompe je tre granda cigaro, kiun Cirilo ĵus rulumis por li. Ĉion, kion la viroj faris aŭ konsilis li lasis pacience okazi sen ion kontraŭdiri kaj sen mem konsili ion.

„Se ni havus nur manplenon da serpentoherboj ĉi tie aŭ laŭordan pinĉprenon da *Calomel*, kiun li povus gluti, tiukaze tio certe estus helpo por li, pensas mi“, diris Matias.

„Ĉio ĉi tute ne helpas“, enmiksiĝis Fidel. „Nenio de tio, kion vi faras, helpas, Andreo. Ni bezonas malnovan indiĝenon el nia vilaĝo, kiu scias kiel kuraci serpentomordojn.“

Santiago sidiĝis apud Eŭlalion, dum li mem rulumis cigaron al si. „Maĉu vian tabakon pli ol fumi ĝin, Eŭlalĉjo“, li konsilis. „kaj se vi fervore maĉis ĝin, tiam miksu tion kun varmega cindro kaj ŝtopu ĝin tiom profunden en la vundon, kiom eblas.“

„Bona ideo“, diris Andreo. „Mi tute ne sciis, ke vi estas tiel prudenta. Sed tion ni foje faru.“

Ne nur Eŭlalio, ankaŭ ĉiuj ceteraj *muchachos*, kiuj fumis cigarojn, komencis formordi grandajn pecojn de siaj cigaroj kaj ekmaĉis ilin.

13/5

En tiu momento alrajdis *El Gusano*. Dum certa tempo li restadis sidante sur sia ĉevalo. Li venis tute proksimen al la rando de la sulko sur la transa flanko, kie li ŝajne pripensadis, ĉu li provu sidi plu sur la selo por tiel atingi la alian flankon de la sulko aŭ ĉu li pli bone farus, se li deseliĝus kaj grimpus perpiede sur la alian flankon.

Li konvinkiĝis, ke la ĉevalo havus sufiĉe da malfacilaĵoj malsuprengrimpi sen rajdisto la sulkoflankon kaj ankoraŭ multe pli da malfacilaĵoj poste grimpi sur la alian flankon. Estis sufiĉe komplike jam por la bovoj, kiujn ili kondukis transen sur alia malpli dekliva loko. Sed tiumomente tie la tero de la flankoj estis tiom moligitaj kaj difektitaj de la trunkoj trenitaj sur ĝi, ke ĉevalo je tiu loko sinkus, se ĝi provus transgrimpi la sulkon. Kaj sinki ĝis la kolo en la molan teron kaj ridindigi sin antaŭ la *muchachos* tute ne plaĉus al *El Gusano* en tiu momento.

Li sidadis plu sur sia ĉevalo kaj kriis nur transen: „Stinkantaj *golfos*, kanajloj kaj pigruloj, kial vi nun jam denove devis sidiĝi kaj fumi cigarojn, kvankam jam la tagmezo proksimiĝas kaj la trunkoj ankoraŭ ĉiuj ĉi tie kuŝadas? Mankas ankoraŭ duono de leguo ĝis la *tumbo*."

„Eŭlalion mordis serpento", vokis Pedro, „tial li ne povas labori."

„Sed pro tio vi, stinkanta fiularo, ja ne devas esti kun li, se li ne povas labori.“ Nun li tamen deseliĝis, iris lante laŭ la sulko dudek metrojn plu kaj grimpis tie transen.
Li proksimiĝis al la grupo, rigardis la brulnigritan vundon kaj diris: „Vi estus devintaj ŝmiri pulvoron sur ĝin.“ „Sed de kie ni prenu pulvoron?“ demandis Santiago.

„Aŭ maĉitan tabakon“, diris *El Gusano*.
„Tiun ni ĝuste surmetas“, respondis Andreo.

„Nu, plu do! Cetere, la mordaĵo estas nun jam sufiĉe bone traktita laŭdoktore. Ĉio elbruliĝis. Vi nun povos labori plu, *muchacho*“, li diris, turnante sin al Eŭlalio. „Ne fariĝu dorlotita, knabeto. nur pro mordo de serpento. Min jam mordis centoj de *culebras*, kaj mi vivas ankoraŭ nun.“

„Sed tio estis ja *cascabel“* , klarigis Pedro. „Ni vidis ĝin.

Laŭaspekte ĝi bone elkreskis, preskaŭ tri metrojn.“

„Kial ne eĉ kvin metrojn? Kaj kial ne eĉ leono aldone?“ mokis *El Gusano*. „Vi nun jam sufiĉe sidadis ĉi tie. Vi devas transigi la trunkojn al la *tumbo* aŭ mi envicigos vin ĉiujn hodiaŭ nokte je la dekunua, se vi finfaros tion ne tuj. Kaj kiam mi revenos ĉi tien kaj trafos vin tiam ankoraŭ plu tiel pigre sidantaj, mi donacos ion al vi, sed bonan, tion mi promesas al vi.“

Li turniĝis, rampis trans la sulkon je la loko, de kie li venis, sidiĝis sur la ĉevalon kaj rajdis al la hakistoj por laŭorde laborigi ilin.

La viroj miksis tiam la maĉitan tabakon kun varmega cindro, faris el tio densan kaĉon, ŝmiris ĝin sur la vundon kaj bandaĝis ĝin firme per kota ĉifono, kiun Andreo ŝiris el sia pantalono. Eŭlalio ekstaris kaj ĉiuj *muchachos* reiris al sia laboro.

Rimarkoj
culebra = serpento
cascabel = sonserpento

13/6

Oni trenis la lastajn trunkojn el la sulko, kaj poste komenciĝis je la sulkorando la fortrenado de la surtavoligitaj trunkoj al la *tumbo*.

„Malfermu nun viajn gapilojn, Nene!“ diris Andreo al Vicente. „Nun vi konatiĝos al certaj aferoj. Ĝis nun vi ja ne laboris, sed nur promenis kun la bovoj. *El Gusano* scias precize, kial li ĝuste nun foriĝis, ĉar nun la afero fariĝos gaja. Nun komenciĝos la vojo, sur kiu vi povos sinki ĝis super la oreloj en la ŝlimon; kaj, se neniu vidos tion ĝustatempe, vi estos retenata en la ŝlimo kvazaŭ alnajlita, kaj la dek aŭ dek du bovoparoj kun la *troza* treniĝos super trans vin kaj puŝos vin tiom profunde en la ŝlimon, ke eĉ Dio ne povus retrovi vin je la Lasta Juĝo. Ne tro proksimiĝu al la bovoj! Kiam ili ektiros, ili batos per la hufoj dekstren kaj maldekstren kaj tretados per siaj piedoj ĉion, kio preteriras ilian vojon.“

La sekvaj kvincent metroj estis deklivaj. La *boyeros* utiligis tion. Ili kunligis tuj tri aŭ kvar trunkojn kaj veturigis ilin per unu fojo

ĝis la plej profunda loko de la dekliva tereno. Tial daŭris ne longe, ĝis jam ĉiuj trunkoj estis envicigitaj plian fojon.

La vojo de tie ĝis la flosiga sulko estis tre larĝa tera falto. Dum miloj de jaroj putriĝis en ĝi arboj kaj plantoj, kiuj formis molan teron. Sekve de la densaj kronoj de la gigantaj ĝangalaj arboj atingis la tersurfacon apenaŭ sunbrilo, kiu povus elsekigi la molan grundon de tiu ĉi sulko. De ambaŭ flankoj kaj ankaŭ pro la deklivo ĉiu malsekaĵo kolektiĝis en tiu falto, egale ĉu pluvis aŭ ĉu la peza roso degutis en fruaj matenaj horoj de la arboj kaj arbustaĵoj. Tiel rezultiĝis, ke tiu falto kapablis formi ŝliman marĉon, tiel, ke oni rajtigite povus nomi ĝin marĉo. Sed kutima marĉo havas pli da akvo, tamen tiu ŝlimo en multaj rilatoj estas pli danĝera ol marĉo, se oni devas travadi ĝin aŭ trarajdi aŭ se oni devas tiri pezajn trunkojn tra ĝi. Estis pli simple treni trunkojn tra marĉo ol tra tia speco de ŝlimo, kiu estas tiel ofte renkontebla en la ĝangalo, ke oni ricevas la impreson, kvazaŭ la tuta ĝangalo konsistus nur el ĝi. Veturigi trunkojn per sufiĉe longaj ĉenoj kaj sufiĉe granda kvanto de bovoparoj estis plezuro kompare al la trenado de la trunkoj tra tia marĉa ŝlimo. En marĉo, se ĝi ne estis tro prikreskata, *troza* de tempo al tempo eĉ povis flosi. Sed la grasa tero de la ŝlima marĉo estis tiel tenaca, tiel firme kungluita, tiel peze argila, ke *troza* tratrenita tie estis ĉirkaŭkroĉita de la tenaca, glueca kaj kalkeca amaso kvazaŭ de giganta monstro, kiu ne pretas redoni la predon, kiun ĝi foje jam havas inter la ungoj. *Troza*, kiu alvenis la *tumbo*-n kaj estis veturigita dum la lasta distanco tra tiu marĉa ŝlimo havis la trioblan, ja kvarfojan amplekson de sia laŭnatura diametro, ĉar la tenaca ŝlimo firmkroĉiĝis sur la *troza* kaj kuntreniĝis. Tiu ŝlimo estis tenaca tiel, ke ofte ĝi ne simple permane deŝeligeblis

de la *troza*, ĉar necesis kiel helpiloj maĉetoj, hakiloj kaj fortikaj branĉoj por forigi la duran kaj tenacan ŝlimon.

Kiam *don Severo* kaj *El Picaro* antaŭ du semajnoj kun la helpo de kelkaj *muchachos* esploris la tutan regionon de la starigota ekspluata areo por fiksi la diversajn ekspluatatajn terenojn kaj por malkovri la flosigsulkojn kaj marki ilin, ili certe trovis tiun terofalton, tra kiu estis trenataj ĉiuj *trozas*, kiujn oni hakis en tiu kampo. Tutan tagon ili uzis por trovi alian kaj pli bonan alveturpadon por tiu *tumbo*. Sed montriĝis, ke sur kvinkilometra larĝo ĉiuj vojoj al la ĉefa sulko kondukis tra tiaj terofaltoj. Kaj ĉar ĉiuj ĉi terofaltoj estis tiaj marĉaj ŝlimoj, oni decidis, simple elekti la plej mallongan vojon, kaj tio estis tiu, antaŭ kiu la *boyeros* ĵus kunvicigis la trunkojn.

13/7

Matias, Pedro kaj Fidel antaŭiris por rigardi la vojon laŭ la tuta longo. Kiam ili revenis, diris Matias: „Nun unue foje aŭskultu, *muchachos*! Nun ni unue ĉiuj kunsidiĝu, rulumu cigaron kaj fumu trankvile. Kaj se vi volas ekscii ion, ni sufiĉe bele povos rakonti al vi ĉion, kion ni vidis kaj travivis. *El Gusano* pensis, ke ni morgaŭ tagmeze havos ĉiujn trunkojn ĉe la *tumbo*. Sed mi diras al vi, se ni havos ĉiujn trunkojn ĉe la *tumbo* post tri tagoj, jen *El Gusano* kaj *El Picaro* povos ĝoji elkore. Kion vi opiniias, Pedro kaj Fidel? Ĉu mi eble ne pravas?“

„Certe vi pravas“, diris Pedro koncize.

„Povos daŭri ankaŭ semajnon“, plibonigis Fidel.

Pri tio diris *Sixto*, dum li trankvile lekadis sian freŝe rulumitan cigaron: „Tiukaze ni ja ĉiuj povos ĝoji pri abunda punpendumado, se ni ne havos la trunkojn transen almenaŭ post du tagoj.“ „Kaj se la hundofilo eĉ ĉiun el ni punpendumos, kaj ĉiun ok horojn dumnokte, tio tamen tute ne helpos al li, dum malpli ol tri tagoj ni ne transigos la trunkojn.“ Matias bruligis sian cigaron. Forte enspirinte, li aldonis: „Kaj se ni ĉiuj estus ĝustaj *muchachos*, kaj ne havus merdon en niaj pantalonoj, tiukaze ni ne laborus dum tuta tago por ĉiu horo, kiujn la putinknaboj pendumus nin.“

„Tiukaze la '*fiestas*' rekomenciĝus, ili lanĉus sur la ledohaŭton de ĉiu el ni kvindek batojn“, diris Cirilo.

Matias ridis furioze. Sonis pli kiel bojado ol kiel ridado. Kaj li diris: „Kion tiuj *cobardes*, tiuj malkuraĝuloj, tiuj fikemuloj kaj stinkantaj idoj de *puta* ankoraŭ je mi aŭ je Fidel aŭ je vi, Sixto, deledigu? Mian dorson tiuj bestaĉoj tiom krude skurĝadis, ke mi jam delonge ne plu havas surdorse nur vundojn kaj postrestintajn cikatrojn de sangaj strioj, sed jam dikan kalan haŭton. Tiuj povus surledigi al mi kvincent skurĝobatojn kaj mi fumus ĉe tio tamen mian cigaron tiel serene kaj kontente kiel nun.“

Nun enmiksiĝis Andreo: „Tion ili scias, ke la bastonado kaj skurĝado eĉ ne plu kuntirigus muskolon en nia vizaĝo kaj, ke tio ne plu helpus. Tial ili ja eltrovis la belegan punpendumadon.“ „Tute nenion ili eltrovis“, opiniis Procoro, alia *boyero*. „Tute nenion. Tiuj estas tro stultaj por eltrovi ion, tion eltrovis la fratoj *Montellano*. Per tio ili havigis al si la tutan monon, per kiu ili povis aĉeti ĉi tie la tri monteriojn. Demandu foje la *hacheros*,

kiel ili liveras ĉiutage tri ĝis kvar tunojn, pro timo pri la punpendumado. Kaj ankaŭ ni ankoraŭ trasuferos tion. Tion mi jam nun diras al vi: se la hakistoj anstataŭ la kutimaj du tunoj devos havigi tri aŭ kvar tunojn, tiukaze ni kompreneble ĉiutage devos forveturigi la duoblon, aŭ kun aŭ sen bovoj. Kaj se la bovoj obstine spitos kaj sternos sin, tiukaze vi povos plu porti la trunkojn sur viaj dorsoj."

„*Somos los Indianos Colgados*, ni estas la indiĝenoj pendumataj", diris Fidel.

„Aŭ *los Indianos ahorcados*, la ĝismorte pendumataj indiĝenoj", aldonis *Sixto*.

„Tio estus pli bone ol nur *'la colgados'*". Procoro blovadis fumnubetojn el sia cigaro. „Unufoje *'ahorcado'*, ĝuste ĝismorte pendumita estas multe pli bone. Tiukaze oni havos la tutan mizeron ĉi tie de la nuko. Sed esti ĉiam nur dum certa tempo pendumata kaj la sekvan tagon devi labori la duoblon, por ke oni vespere ne estu denove pendumata dum kvar horoj, tio estas eterna infero. Ni devus mortbati ĉiun el ili, ne nur *El Picaro*–n kaj ne nur *El Gusano*-n, sed ĉiujn aliajn *capataces*, en ĉiuj kampadejoj, kaj aldone ankoraŭ la diodamnitajn tri fratojn *Montellano*."

„Sed antaŭe ni traktu ĉiun el ili per kvincent batoj, poste kuracu ilin, kaj tiam dum kvar semajnoj plenverŝu ilin ĝiskreve ĉiuvespere per varmega kafo kaj *aguardiente* kaj poste ĉiufoje pendumadu ilin dum ses horoj. Kaj, se ĉiuj iliaj membroj estos tiel longe etenditaj kiel fadenŝnuretoj, ni pendigu ilin al arbo kaj ekbruligu ĝin. Mil sakrojn, se mi iutage povus fari tion al ili, jen

mi volonte irus en la inferon dekfoje.“ Matias ekstaris, ĵetis la restaĵon de sia cigaro kolere sur la teron, tretis sur ĝin kaj turnadis la piedon dum tio forte tien kaj tien, kvazaŭ li volus bori la cigaran stumpon profunde en la teron.

„Precize tiel“, li diris sovaĝe, „precize tiel mi volus bori la kapon de la mizera hundinofilo, la infere malbenitan kapon de *El Gusano*, ĉi tie en la teron.“

„Kiu ne volus fari tion?!“ diris Andreo. „Sed ĉio ĉi tute ne helpos al ni, ni prefere forveturigu la trunkojn.“

Rimarko
puta = putino

ĈAPITRO 14

14/1

Dek du bovoparoj tiris la trunkon. Ambaŭflanke vadis tri *boyeros*, ŝovante per siaj hokoj la trunkon tien kaj tien kaj ŝirante ĝin el la marĉa ŝlimo. La viroj vadis en ŝlimo ĝis la koksoj kaj ili havis apenaŭ potencon pri la trunko, kiu seninterrompe sinkis en la ŝlimon kaj troveblis kaj eltireblis nur en tiu okazo, se oni sekvis la ĉenon kroĉitan per hokoj al la trunko.

La knaboj kaj la ceteraj *boyeros* vadis apud la bovoj, pelante la bestojn per pintaj bastonoj, per krioj kaj sakrado. Ankaŭ la bovoj vadis ĝis la lumboj en tenaca ŝlimo, kaj ili eble eĉ pli devis

peni moviĝi antaŭen ol la viroj. Ili povis eligi siajn gambojn neniam tute el la tenaca kaĉo, sed trenis sin per siaj korpoj tra la profunda suĉanta argilo.

Post ĉiu kvina paŝo la taĉmento devis halti. La viroj kaj la bovoj spiregis kaj bezonis freŝan aeron. Kaj tio, kio de la homoj kaj bestoj videblis, gutadis pro ŝvito. La muŝoj ŝvebis dense svarmante super la taĉmento, jen ili mordis en la karnon de la viroj jen en tiun de la bovoj, ili elŝiris pecon kaj postlasis trembrilan strion de fluanta sango, flugis pli alten kaj mordis en alian karnoparton, reelŝiris peceton kaj denove flugis pli alten por ataki je plua loko denove.

Dum la jungitaj bovoparoj staris, la viroj penis per ĉiuj siaj fortoj tiri kaj suprenigi la trunkojn, kiuj tute trempiĝis en la ŝlimo kaj interkroĉiĝis kun radikoj kaj lianoj. Kiam la *troza* fine liberis, oni ekpelis la longan vicon de bovoparoj. Eble oni antaŭeniĝis dudek paŝojn, kaj tiam la *troza* jam denove sinkis en la ŝlimon kaj malaperis por la okuloj. La bovoj, ankoraŭ plenforte tirante, tiris la trunkon ankoraŭ kelkajn paŝojn plu antaŭ ol ili haltis, kaj tiam la *troza* jam puŝiĝis en la ŝlimon tiom, ke eĉ duobla kvanto de bovoparoj ne povus tiri ĝin plu. La tuta taĉmento rehaltis. La elfosado de la *troza* okazis kun sakroj kaj ĝemado. Kaj se ĝi fine estis eltirita plian fojon, tiukaze la viroj sukcesis denove treni ĝin proksimume dudek paŝojn, ĝis kiam ĝi sinkis plian fojon kaj oni denove devis elfosi ĝin.

La knaboj, irante apud la bovoj, pelis ilin kaj dum tio devis seninterrompe ellevadi kaj elŝiradi la tirĉenojn, por ke tiuj ne firmpinĉiĝu sub radikoj kaj marĉigita arbustaĵo, kiu troviĝis ĉiam pli sub la ŝlimo ol super ĝi. Nelerta paŝo glitigis ilin sub la

piedojn de la bovoj. La bestoj, kiuj kun ĉiuj siaj fortoj tiris antaŭen, kvazaŭ freneziĝis kaj sovaĝiĝis plagate de miloj de insektoj, preskaŭ blindigite de la infereca humida ardo, kaj pro la laborstreĉoj, la kriado de la pelknaboj kaj la seninterrompa pikado de la bastonoj Tial ili tretis la knabon, kiu senatente glitis sub iliajn piedojn, senkompate en la ŝlimon. Okazis ĉiam interne de kvindek metroj, ke knabo malaperis denove sub la kruroj de bovoj en ŝlimo. La taĉmento ne haltigeblis precize je ĝustatempa momento. Kvankam la *muchachos* provis haltigi la du plej proksimajn bovoparojn, la antaŭirantaj bovoparoj tamen tiris plu kaj la sekvaj urĝis ilin. Nur ilia granda lerteco pri la uzado de sia korpo kaj la fleksebleco de ĉiuj membroj, savis la knabojn, kiuj glitis sub la bovokrurojn.

Pro tiu kaŭzo la unua averto, kiun ricevis nova *boyero* de spertuloj, ĉiam estis la sekva: 'Knabo, atentu, por ke vi ne glitu sub la bovojn! Sed, se vi foje estos sub ili, ne atendu ĝis la taĉmento haltos, sed elturniĝu eĉ pli rapide kaj pli lerte ol persekutata lacerto.' Tiu averto havis la sekvon, ke la novuloj ne iris sufiĉe proksime al la bovoparoj, se la taĉmento moviĝis antaŭen, kaj tial la novuloj konsiderinde hezitigis la tagan laborkvanton.

Ĉiu bovoparo bezonis sian propran knabon por teni moviĝanta la taĉmenton kaj atenti pri la tirĉeno, por ke ĝi ne tordiĝu. Sed tio postulis tiom proksiman aliron al la laborantaj bovoj, ke knabo ĉe tio kvazaŭ ĉiam je duono estis sub bovokorpo kaj sufiĉis, ke li glitis nur per unu piedo en truon, el kiu bovo ĝuste eltiris la antaŭan kruron, kaj jen li jam laŭ sia tuta longo troviĝis

sub ambaŭ bovoj. Ĉiu *muchacho* devas atenti pri si kaj sia propra vivo. Neniu povis helpi lin, ĉar ĉiu unuope devis labori trifoje tiom, kiom oni kutime atendas de homo.

14/2

Per ĉiu plia *troza*, kiu estis veturigita al la *tumbo*, pliprofundigis sin la ŝlimo. Se ĝi eble havis dum la komenco de la veturigoj ankoraŭ certan denson kaj firmecon, tiukaze la marĉa ŝlimo fariĝis pro la trenado de la pezaj trunkoj, pro la stamfado de la kruroj de dek du aŭ dek kvar paroj da pezaj bovoj kaj la knedado, kaŭzata de la piedoj de la knaboj kaj viroj, post kelkaj mahagontrunkaj veturigoj tiom kaĉa kaj ŝlima kiel pasto. Ju pli ĝi alprenis la ecojn de mola pasto, des pli profunde la *troza* sinkis en ŝlimon, des pli profunde sinkis la gamboj de la bovoj en molan grundon, des pli malfacile kaj penige fariĝis por la bestoj eltiri siajn krurojn, kaj des pli da fortoj, kiuj servu por la tirado de la trunkoj, ili devis disipi nur por moviĝi plu en tiu profunda kaj tenaca ŝlimo. Kaj ne nur tio. Ju pli mola kaj ju pli profunda, plimoligita kaj pli disigita fariĝis la pasta ŝlimo des pli ĝi kroĉiĝis en la formo de pezaj platoj kaj buloj al la *troza* kaj al la bestaj kruroj kaj gamboj de la viroj kaj knaboj. La kruroj de la bovoj ekaspektis kiel elefantaj kruroj kaj fariĝis samtempe pezaj kiel la kruroj de elefantoj, dum la *troza* ricevis la trioblan amplekson kaj la kvinoblan pezon. Tuj kiam la *troza* estis tirita al la surfaco, kompreneble la knaboj kaj viroj deskrapis la superfluajn tavolojn de ŝlimo. La veturigo tamen daŭrigis sin apenaŭ dum kvin metroj, kaj jam la *troza* rekreskis ĝis la duoblaj kaj trioblaj ampleksoj kaj pezoj.

Sed kion helpu lamentado! Se la *troza* enspezigu monon, oni devas vendi ĝin, kaj se oni devas vendi ĝin, necesas transporti la trunkon al la merkato. Kiel ĝi atingas la havenon, ne estas la afero de la aĉetisto, sed tiu de la vendisto. La vendisto prefere eligus la mahagonon el la ĝangalo per traktoroj moviĝantaj sur ŝtalaj transportbendoj. Sed tie, kien li povus veturigi la grandajn traktorojn, ne kreskas mahagono. La alta prezo de la oro trovas sian kaŭzon je la raro de tiu metalo kaj je la penoj havigi ĝin. La alta prezo de la mahagono kontraŭe al tio trovas sian kaŭzon je la penoj de la transporto. Kostas malpli da penoj, malpli da tempo kaj malpli da mono transporti abian lignon el la interna Finnlando al haveno en Centra Ameriko ol mahagonon el la ĝangaloj de Centra Ameriko al la sama haveno. Tial en la havenoj de Centra Ameriko ligno, kiu venas el la arbaroj de Rusio, Svedio kaj Finnlando, multoble pli malmulte kostas ol ligno el la praarbaroj de tiuj amerikaj respublikoj.

14/3

Kiam meze de la vojo la sesa *troza* de tiu tago firmpikiĝis profunde en la marĉo, rigardis ĝin la bovoj pro sia memkonservemo kiel devon fini la laboron je tiu tago.

Dum la aliaj, la viroj, ankoraŭ elfosis la sinkintan trunkon, komencis sterni sin unu bovoparo post la alia. Kiam la *troza* fine estis libera, haltis ĉiuj bovoparoj en la ŝlimo. La *boyeros* sciis, ke de tiam nek pikado per pelobastonoj nek vipobatoj instigus la bovojn labori plu. Ili tiutage laboris jam du horojn pli longe ol kutime. Sed, ĉar ili troviĝis en tiom longa tirvico, ties grega instinkto kaj societema sento forgesigis ilin dum certa tempo

pensi pri la troo de laboro. Sed tiam la sama grega instinkto havis la rezulton, ke ili ĉiuj sternis sin kaj ĉiuj samtempe rifuzis plu labori.

Vicente, per plenaj pulmoj spiregante kaj saturite de ŝvito, proksimiĝis al Andreo kaj diris: “Finfine nia laboro ĉesis. Mi estas tute kaputa.“

„Ni ĉiuj estas kaputaj, Nene. Sed nur la bovoj havas nun paŭzon ĝis la unua en la nokto. Ne ni. Ni iros nun al la *campo* por manĝi. Sed poste ni ankoraŭ devos labori dum duono de la posttagmezo antaŭ ol ni ripozos.“

„Sen la bovoj ni ja ne povus veturigi trunkon“, diris Vicente.

„Bone divenite, infaneto mia.“ Andreo ekridis glugle. Ankaŭ li anhelis kiel la ceteraj uloj. Kaj ankaŭ lia korpo estis kovrita de multe da ŝvito, kiu fluetis kaj gutis roze ruĝa malsupren de multnombraj lokoj, ĉar ĝi miksiĝis kun la fajnaj sangostrioj, kiuj fontis el la pikvundoj. Spite al sia laciĝo li kapablis ridi kun Vicente. Kaj li ripetis: „Certe, Nene. Sen bovoj ni ne povus veturigi trunkojn. Mi rimarkas, ke vi scias uzi vian kapon.“

„Tion mi ja diras, Andreĉjo, se ni ne havas bovojn, ni ne povas fortreni trunkojn kaj ne devos plu labori.“

„Eble estis tiel en via bieno, filĉjo mia. Ne ĉi tie. Ĉi tie oni laboras tiom longe, kiom vi ankoraŭ povos stari. Kaj, se vi ne plu povos stari, vi laboros sur via postaĵo, rampante. Sed labori vi devos. *El Gusano* jam hieraŭ diris al mi, ke ni devos trabati sur la alia sulkoflanko strateton per trahakado de la ĝangala densejo, por

ke ni ricevu liberan vojon tien, kie oni nun ankoraŭ dehakos arbojn. Sur la alia flanko la mahagonarboj staras dekoble pli enspezigaj ol sur tiu ĉi flanko. Sed la vojo estas eĉ pli marĉa ol ĉi tie."

„Ĉu eĉ pli ŝlima kaj pli marĉa ol ĉi tie?" Vicente demandis mirigite. „Ĉu tio vere eblas?"

„Ĉi tie ĉio estas ebla. Kaj ĉar sur la alia flanko sekve de la terena dekliveco la marĉo estas tiom mola, ke la t*rozas* tuj boriĝus dek metrojn profunden en la grundon, se ili estus trenataj, tial ni devos konstrui c*alzadas*. Kaj tion ni hodiaŭ posttagmeze faros ĝis kiam ni ĉiuj renversiĝos kaj tuj dormos tie, kie ni falis."
„*Calzadas*, kio estas tio?"

„Tion vi ekscios hodiaŭ posttagmeze dum ilia konstruado, kaj vi krome lernos aldone ĉe la konstruado de la *calzadas*, ke ĉiu laboro, kiu ĉi tie farendas, estas simile kruele peniga kaj streĉa. Ĉi tie oni neniam donacos ion al vi. Kaj ĉi tie neniam iu laboro estas facila kaj tute ripoziga."

14/4

Kiam la *muchachos* jam dum kelkaj minutoj spirkaptis aeron, ili komencis eljungi la bovojn. La pezajn jugotrabojn, el kiuj ĉiu pezis ĉirkaŭ dudek kvin kilogramojn, kaj kiuj ŝarĝis la bovajn nukojn de la dua matene, oni senrimenigis kaj deprenis. La bestoj movis liberigite siajn kapojn kaj nukojn, kiuj certe estis kvazaŭ paralizitaj kaj la bovoj bonfarte komencis leki la vundojn fare de la mordintaj muŝoj kaj de aliaj insektoj kaj grati kaj skrapi la dolorantan haŭton per dentoj.

Finfine ĉiuj bovoj estis dejungitaj. Ili troviĝis ankoraŭ en sia taĉmento tie, kie ili sternis sin. Iliaj korpoj dum la kampado profunde sinkis en la ŝlimon. Ili ŝajne sufiĉe bonfartis en la ŝlimo, kiu estis iom pli frideta ol la ardante varmega aero ĉirkaŭanta ilin; ĉar la ŝlimo fridetigis ne nur iliajn korpojn, sed trankviligis samtempe ankaŭ la teruran jukadon de la insektaj pikoj. Kaj amaso da *garrapatas*, de grandaj kaj malgrandaj iksodoj, kiuj enmordiĝis en la haŭton, sentis minacon kontraŭ sia vivsekureco en tiuj lokoj de la bovokorpoj, kiuj estis ĉirkaŭataj de la ŝlimo. Ili tial komencis tiri siajn fortikajn pinĉilojn el la haŭto kaj penis, rampante laŭ la bovokorpo, atingi la surfacon. La instinkto atentigis tiujn insektojn, ke ili estus perditaj, se la ŝlimo sur la bovokorpoj krustiĝus, subsune kvazaŭ ŝtoniĝus kaj kunpremus kaj tiel mortigus ilin.

Sed ankaŭ la bovoj sciis pro instinkto, eble eĉ pro spertoj, ke pro kuŝado en ŝlimo kaj poste sub la suno la ŝlimo sur la haŭto krustiĝas kaj kvazaŭ ŝtoniĝas, kaj, ke ĝi tiel liberigos ilin de centoj, ja de miloj de tiaj molestaj parazitoj.

Certa kvanto de la viroj kun siaj trinkpelvoj iris al akvofonto, kiu fontis ĉirkaŭ ducent metrojn malproksime kaj flanke de la strateto el rokfendeto kiel minca strio. Ne estis multe da akvo, kaj por povi uzi ĝin, la viroj devis unue fari kavon, por ke la minca strio kaptiĝu en ĝi kaj la akvo kolektiĝu. Ĉiu el ili tie plenigis sian pelvon, gargaris la buŝon kaj poste knedis en la ŝlima akvo, kiun li denove ĉerpis per la pelvo, etan bulon el posolo.

Sed la plimulto de la viroj estis tro lacaj por migri al tiu fonto. Ili preferis, tuj longe etendiĝante, sterni sin kaj ripozi je tiu flanko de la strateto, kie estis iom pli da sekeco.

14/5

Subite, kvazaŭ saginte el la densejo, troviĝis antaŭ ili *El Picaro*. Li sidis sur ĉevalo kaj rondrigardis la taĉmenton. La viroj restis tie, kie ili estis.

„Apenaŭ estas la dekunua kaj vi jam finis la laboron, ĉu?“ li vokis.

Pedro, rulumante cigaredon, diris: „La bovoj ne plu volas labori.“
„Kompreneble ne, se vi trolacigis ilin. Sed, se vi pli bone helpus al la bovoj kaj pli rapide kaj pli alte levus la trunkojn el la koto, tiel, ke la kompatindaj bestoj ne devu tiri tiom supermezure, jen ili ne estus tro lacaj. Pigrularo vi estas, kaj mi certe devos foje dancigi la vipon inter vi, por vigligi vin. Mi foje pendumigu duonon de via societo dum du horoj hodiaŭ vespere por vigligi vin. Vi ĉi tie ne estas en la ferioj kaj por ripozo, sed por labori. Ek do, gvidu la bovojn al la paŝtejo! Kaj nokte je la dekdua enviciĝu kaj fortrenu la restaĵon de la trunkoj!

Estas peko *por Dios*, por Dio kaj la homoj, kiel vi pigrumas ĉi tie kaj hontego, ke tiaj fortikaj brunaj hundoj kiaj vi meze de la tago sternas sin laŭlonge sur sian kotan postaĵon kaj ne plu emas labori. Ek, la bovojn al paŝtejo! Kaj kiam vi estos vorintaj en la kampadejo vian damnitan manĝaĉojn, tiukaze ek al la transa flanko por krei strateton! Mil damnoj! Mi ja ankoraŭ instruos al vi ĝuste labori ĉi tie. Mi devus hajligi sur ĉiun el vi dudekon, por vivigi la taĉmenton. Ĉu vi vere ne hontas kaputlaborigi la kompatindajn bovojn tiel, ke la bedaŭrindaj bestoj eĉ ne plu povas anheli? *Santa Purisima* estas mia eterna atestant-

ino, ke vi estas pedikoplenaj stinkantaj turmentistoj, fetoranta idaro de indiĝenoj, jen tio, kio vi estas, filoj de fava de bestoj,hundinoj kaj *cabrones*!“

Li rigardis al ĉiuj flankoj por transrigardi la batalkampon kaj trovi novan inspiron. Li efektive trovis ĝin.

„*Los yugos*, la jugojn, mil damnoj, ankaŭ tiujn vi ne devus lasi kuŝi en la kaĉo, se vi denukigis ilin. Tro vi pigras porti ilin eĉ nur kelkajn paŝojn al seka loko!“

Fidel, ekapogante sin iom sur sia brako, sed sen leviĝi de sia loko, kie li kuŝis, diris: „Kial ni transen trenu ilin kun tiom da peno tra la koto, se ni nokte tamen devos remeti ilin sur la bovojn je la sama loko, kie ili estas nun?“

„Fermu la grimacilon, aŭ mi klakfermos ĝin perpugne, impertinenta hundo!“ vokis *El Picaro*.

„Mi diris tion nur, por ke vi sciu, kial ni lasis kuŝi la jugojn tie, kie ili estas nun“, parolis Fidel plu. Aŭdeblis je lia voĉo, ke li ne parolis por doni klarigon, sed, ke li parolis por *ĉagreni El Picaro*-n. *El Picaro* sentis tion tute bone. Sed kiel ĉiuj *capataces*, kaj kiel ĉiuj skurĝistoj kaj torturaj servistoj, ankaŭ *El Picaro* estis tiel atentema, troigi aferon ne tro, ĉar li sciis, ke li ne estas en pliforto kaj, ke li troviĝas en ĉirkaŭejo, kie li ne povus fuĝi sian sorton, se ĝi foje ekmoviĝus. Li vidis tre bone, ke la *muchachos* sekve de sia trolaciĝo troviĝis en tia humuro, ke tute eta kaŭzo sufiĉus por suprensaltigi iun el ili kaj ataki lin por ŝiri lin de la ĉevalo kaj por mortbati lin kiel hundon, kaj poste enfosigi lin en ŝlimo. Kiel al *El Picaro* povus helpi la revolvero? El ses

pafoj, se li entute povus pafi ses da ili, ne trafus kvar el ili en tiu ekscitiĝo la celon. Kaj se la ses pafoj iam estus elpafitaj, li estus tute perdita.

Li diris nenion plu, lante ekbruligis cigaredon kaj turnis la ĉevalon. Li retrorajdis kelkajn paŝojn kaj tiam klake batis sian ĉevalon kaj samtempe uzis la pezajn spronojn, por ke la ĉevalo saltu sur la alian flankon de la strateto, de kiu estis pli proksime ĝis la kampo. La ĉevalo saltis.

Sed *El Picaro*, kiu tie ja ne observis la laboron, sed nur la ripozantojn, subtaksis la malfacilaĵojn, kiujn kaŭzis tiu strateto. Certe li pensis, ke la marĉa ŝlimo troviĝas nur je la supraĵo. Estus damne naŭza afero kun sia ĉevalo lante vadi trans la strateton.

Sed vivdalvide kun la viroj li volis montri, ke tiu strateto ne kaŭzas pli da peno ol multaj aliaj. Kaj tiel li saltis kun sia ĉevalo tiom profunde en la moligitan kaj disŝiritan ŝlimon, ke li, kvazaŭ kiel enpafite, malaperis ĝis trans la selon en la kaĉa ŝlimo.

La ĉevalo stamfe provis liberigi sin per la piedoj, sed ju pli ĝi tretadis per la piedoj, des pli profunde la besto sinkis.

14/6

La *muchachos* ĉiuj trankvile sidis plu.

El Picaro ne alvokis ilin por helpo. Tio damaĝus lian dignon. Li deglitis de la selo kaj sinkis tuj ĝis la brusto en la ŝlimon. Li disrulis lazon, faldis maŝon, volvis ĝin ĉirkaŭ la ĉevalbuŝon kaj la

finon de la lazo ĉirkaŭ sian manon kaj ŝiris sin kun sakrado kaj ĝemoj el la ŝlimo.

La ĉevalo plifaciligite de la ŝarĝo de la rajdanto, pene moviĝadis en la ŝlimo, ĝis ĝi trovis pli firman grundon sur radikoj aŭ grandaj ŝtonoj kaj kapablis leviĝi duonon de metro. El Picaro intertempe alvenis flanken de la sulko kaj de tie, nun jam staranta sur malpli marĉa grundo, li tiris la beston al si, donante per la lazo al la ĉevalo firman tenon kaj samtempe direkton.

Ne tute tiel, sed simile tiel, kiel tie ĉiuj aliaj viroj aspektis, aspektis nun ankaŭ li. La viroj de dislimo de sia nigra drata hararo ĝis malsupren al la plandoj estis kovritaj per nigre griza kaĉo, kiu lante komencis krustiĝi sur iliaj korpoj, de kiam ili tie kuŝis ripozante. La hararo de ĉiu estis kungluita kaj krustigita, kaj la ununura vestaĵo, kiun ĉiu surhavis, ĉifonita blanka pantalono, estis abunde ornamita kaj saturita per ŝlimo. Ke la pantalono estis farita el kotonŝtofo, oni ne povus konstati kun certo; ĝi same tiel bone povus esti vestaĵo, kiu konsistis el nenio krom marĉa ŝlimo. Entute ĉiu viro aspektis tiel, kvazaŭ li de supre ĝis malsupre estus vualita en nigre griza pasto, preta esti ŝovata en bakfornon por poste eliri kiel kukoviro. Kaj kiel plenkreskinta spickuka ĉevalo aspektis nun ankaŭ la rajdobesto de *El Picaro*. Li mem diferenciĝis de la aliaj viroj nur per tio, ke lia hararo ne estis kungluita kaj lia vizaĝo nur kovrita de ŝlimaj ŝprucaĵoj. Sed, ĉar li surhavis ĉemizon, pantalonon, ledogamaŝojn kaj botelojn, tial kostis al li eĉ pli da peno ol al la aliaj viroj, liberigi sin de la marĉa ŝlimo, kiu gluiĝis al li.

Permane li viŝis la malsekan tenacan koton de siaj vestoj, poste de la selo kaj de la ĉevalflankoj.

„Fulmotondro!“ li kriis kolere, „tion mi ja, mil damnoj, ne sciis, ke ĉi tie la diodamnita koto estas tiom profunda kaj tiel insida!“

„Se vi demandus nin, tiukaze ni dirus tion al vi“, vokis Santiago transen.

Kaj Fidel vokis laŭte kaj impertinente: „Ĉar vi ja ankaŭ alikaze scias ĉion, ni supozis, ke vi devus scii ankaŭ tion, kiom profunda la *lodo* ĉie tie estas.“

Nun enmiksiĝis Andreo: „Se ni povus treni ĉiujn trunkojn jam antaŭtagmeze, ni certe estus farintaj tion. Nun vi ja almenaŭ scias, kial ni ne povis fortreni ĉiujn.“

El Picaro rektiĝis kiel pavo, ĉar li sukcesis tiri sin sen helpo de la *muchachos* el la koto. Li ŝanĝis nun la paroltonon kaj diris: „Mi interŝanĝos al vi por la nokto duonon de la bovoparoj per ripozintaj kaj aldonos ankoraŭ ses pliajn bovoparojn. Konduku ĉiujn bovoparojn nun al la kampadejo kaj poste al la granda paŝtejo, mejlon malantaŭ la kampadejo. Mi elserĉos la bovoparojn por vi. Kiu pensus, ke la koto ĉi tie estas tiom dika kaj profunda!“

„Sur la alia flanko de la sulko, kie oni jam dehakas arbojn, ĝi estas eĉ duoble pli profunda“ diris Matias, „kaj la strateto estas dufoje tiom longa, kiom ĉi tie.“

„Jes, tion mi scias“, diris *El Picaro* surseliĝante. „Mi sendos informon al *don Severo* kaj postulos du pliajn bovoparojn de li.“

El Picaro forrajdis, malpli fiere kaj malpli parade ol li venis. Kaj tiel, kiel li forrajdis, oni tre bone povus supozi lin kavaliero el malnova legendo, kiu estas sorĉita de malica sorĉisto kaj nun troviĝas en la stato de ŝtoniĝo tuj haltonta por fantome timigi kiel ŝtonigita kavaliero estontecajn genrojn.

„Li aspektis tiel ridinda“, diris Santiago rikane, „ke mi preskaŭ supozis, ke li provos tiri sin je la propraj oreloj el la kaĉo.“

Furioze Fidel aldonis: „Se li dum tio estus forŝirinta sian naŭzan napokapon, tio estus delektiĝo por mi.“

„Kial delektiĝo?“ demandis Procoro, kiu turniĝadis al la alia flanko kaj rigardis al Fidel.

„Kial delektiĝo? Kiel vi nur povas demandi tiom stulte kaj naive, homo?! Tiukaze mi ne sentus min devigita iutage senkapigi lin per sabro. Ĉar estas tiel, ke mi iutage certe faros tion, tiun sentonmi ne povas denukigi. Ĝi persekutas min tage kaj nokte, se mi nur vidas la grimacojn de ili ambaŭ, tiun de Gusano kaj tiun de Picaro. Ili faras tion tiel facila kaj agrabla al ni havi tiajn belajn kaj ebriigajn sentojn kaj pie peti la karan Dion en la ĉielo, ke tiu sufiĉe baldaŭ donu ĉeokaze eblon por realigi tiun senkapigon .“

Rimarko
lodo = ŝlimo

ĈAPITRO 15

15/1

Sufiĉe longe ripozinte, la jugon ne plu sentante sur la nuko, kaj tial sciante, ke hodiaŭ ilia laboro estas finita, la bovoj ekstaris kaj lasis gvidi sin al la kampadejo per malgranda peno de la viroj.
„Sed kie estas Eŭlalio?“ demandis subite Andreo, kiam la taĉmento ekmoviĝis. „Mi ne vidis lin dum horo. Damnite, nur nun konsciiĝas al mi, ke li ne estis en la taĉmento.“

Kelkaj viroj ekkuris en la ĝangalon, kriante lian nomon.
Post kelkaj vokoj ili aŭdis respondi Eŭlalion per malforta voĉo.

„*Aqui estoy, compañeros!* Mi estas ĉi tie, kamaradoj.“

Du el ili kuris al li.

Li sidis kaj apogis sin kontraŭ arbo. Lia vizaĝo estis iom verda, facila ŝaŭmo pendis sur liaj ŝvelintaj lipoj. La gambo mordita de la serpento montris ĝis supren al la genuo ruĝviolan nebulece konturitan koloron. Ĝi estis ŝvelinta, ardanta kaj bula, ĝi aspektis kvazaŭ ĝi volus krevi.

„Mil damnoj, *compañeros*, mi ne povas iri“, diris Eŭlalio lace.

Du viroj levis lin kaj portis lin sur siaj ŝultroj, sekvante la taĉmenton, al la *campo*.

Kiam ili alvenis tien, tri knaboj pelis la bovojn al la paŝtejo, kie la *zacateros*, la nutraĵservistoj de la kampadejo amasigis foliaron, sekajn maizostaŭdojn kaj herbojn, kiuj matene estis detranĉitaj sur kelkaj senarbaj lokoj de la ĝangalo. Sed la bovoj estis tro lacaj por manĝi. Ili ronĝadis dum iom da tempo je la magraj herboj de la paŝtejo. Poste ili serĉis ombrajn lokojn sub la arboj, kiuj troviĝis unuope sur la nekultivata paŝtejo kaj ripozis. Nur pli poste, posttagmeze, ili trotos al la rojo, trinkos ĝis pleneco, kaj poste en la frideto de la vespero komforte serĉos sian manĝon.

La kuiristo ankoraŭ ne pretigis la manĝon por la viroj.

Kaj tio donis al ili la okazon sin sterni en la *boyero*-kabano sur siajn petatojn, kie ili tuj ekdormis.

Rimarko
petato = mato el fragmito

15/2

Andreo iris al la *oficina* de *El Picaro*. *El Picaro* balancis sin en hamako pendigita sub la elstaranta tegmento de la kabano, kiu servis al li kaj al *El Gusano* kiel *oficina* kaj loĝejo. El Gusano troviĝis ĉe la hakistoj por observi, ke neniu eble eĉ fariĝu dormema, sed strecu liveri tri aŭ eĉ kvar tunojn.

„*Jefe*“, diris Andreo al *El Picaro*: „Venu foje transen al nia *choza*. Tie kuŝas Eŭlalio kaj ne povas iri.“

El Picaro, kiu fumis cigaredon trançita el kruda tabako en pecetojn kaj rulumita per kutima pakpapero, senzorge balancis sin plu kaj demandis flegme: „Kiun problemon li havas? Certe li ne volas helpi hodiaŭ posttagmeze konstrui *calzadas*. Mi ja kurigos lin."

Andreo respondis nenion. Li restis staranta antaŭ la portiko, tenante ĝentile mane sian truigitan kaj ŝlimkovritan palmĉapelon.

„Bueno, vengo", diris fine El Picaro, „en ordo, mi venos!" Li glitis el la hamako kaj iris transen al la *choza*, kie vivis la *boyeros*, kiam ili tie tranoktadis en la *campo*.

Kompreneble, speciale, se ilia laborloko estis tro malproksime de la kampadejo kaj la bovoj troviĝis sur paŝtejo pli proksime de la laborloko, dormis la *boyeros* kaj *gañanas* en kabanoj, kiuj rapide starigeblis el trunketoj kaj palmfolioj, kaj kiuj estis tiel facile konstruitaj, ke ili simple servpretis nur tiom longe, kiom la viroj devis labori proksime de tiuj kabanoj.

Dum *El Picaro* iris al la kabano, li preteriris la kuirejon.

La kuirejo estis palmtegmento metita sur palisojn. Nur je tiu flanko, kie kutime blovis la vento, estis starigita vando, kiu konsistis el mincaj trunketoj kunplektitaj per lianoj kaj ekstere pripendigitaj per foliobranĉoj. La kuirado okazis sur la tero, kie brulis kelkaj fajroj, super kiuj pendis kavetigitaj lado- kaj emajlopotoj kaj diversaj grandaj kaj malgrandaj argilaj potoj. La kuiristo, indiĝeno, tiel, kiel ĉiuj laboristoj tie, havis helpanton, dekjaran knabon. Tie ankaŭ la onklino akompanis la kuiriston,

kiu certe estis duoble tiom granda kiom li, kaj kiu vivis kun li en speco de geedzeca komuneco. Sed tiu ino neniam helpis kuiri al li. Ŝi nur manĝis, fumis dum la tuta tago nekredeble dikajn cigarojn, kiujn ŝi rulumis por li kaj si mem. Kaj se ŝi nek fumis nek manĝis, ŝi kuŝis en hamako, kiu estis fiksita je du el la fostoj, kiuj portis la tegmenton. Estis bone konate en la *campo*, ke tiu olda, grasa, sufiĉe ŝrumpa kaj sekve de la malofta lavado tre malbone odoranta onklino pasigis kvaronon aŭ duonon de la noktoj kun iu el la *boyeros* aŭ la *hacheros* por certa kvanto da kruda tabako, por *aguardiente* aŭ peco de bunte pripresita lana ŝtofo, por bunta satenrubando aŭ ĉeno kun vitroperloj. La kuiristo ne estis kontraŭ tio. Sed li atendis, ke, kiam oni pagis per *aguardiente*, li ricevos la pli grandan kvanton. Tiukaze li trinkis senmezure kaj draŝadis senkompate la felon de la onklino, dum li elkriis en la mondon, ke ŝi estas olda neplibonigebla putino, kiun li iutage sufokos per siaj propraj manoj.

„He, kota hundo!“ kriis *El Picaro* al la kuiristo. „Kial vi ankoraŭ nun ne pretigis la diodamnitan manĝaĉon por la *muchachos?* Mi foje vigligu vin, se la *musicos*, la muzikistoj, venos. Fidu al mi.“

„La *comida*, la manĝo, ankoraŭ en tiu ĉi sekundo estos preta, *jefe*, tute certe“, respondis la kuiristo.

„Se ne, jen mi vipos vian vizaĝon, putinfila fetoranta ĉielohundo.“

La kuiristo proksimiĝis al la kuireja knabeto, kiu kaŭris ĉe la ekflamigita fajro kaj blovetis ĝin, por ke ĝi brulu pli bone.

„Fibubo“, li kriis al la knabo, „se vi pli bone gardus la fajron, tiukaze la hunda manĝaĉo delonge estus preta.“ Li levis iun el la branĉoj, kiuj kuŝis ĉe la fajro kaj draŝis ĝin senkompate sur la dorson de la knabo.

La knabo eksaltis supren kaj forkuris. „Venu tuj al mi, mordema bufeto!“ vokis la kuiristo.

Sed la knabo haltis en sekura distanco. De tie li vokis: „Se vi min ankoraŭfoje batos, jen mi laboros kiel bovoknabo.“

„Venu al mi“, diris nun la kuiristo pacigeme, „mi ne batos vin.“

La knabo revenis en la kuirejon. La kuiristo frapis kareseme lian postaĵon kaj diris mallaŭte: „Mi ne opiniis tion tiel, Pabĉjo. Mi devis nur iom tradraŝi vin dum la ĉeesto de *El Picaro*, por ke li supozu, ke kulpas vi la heziton, ĉu vi komprenas? Alie li aŭ pendumus aŭ skurĝus min, kaj tiukaze min la olda fisorĉistino malice mokus. Vi ja scias, kia ŝi estas. Ne ofendiĝu pro la malmultaj batoj, ĉu en ordo, Pabĉjo mia?“

„Nu, certe mi ne ofendiĝis, *don Filemon*“, diris pacigite la knabo kaj reokupiĝis pri sia laboro.

Rimarko
choza = kabano

15/3

El Picaro jam alvenis en la kabanon. Eŭlalio kuŝis sur sia petato kaj ĝemis. Kelkaj viroj kaŭris proksime de li. Ili mantenis pelvojn kun akvo, helpis trinki al li kaj fridetigis lian kapon kaj la gambon per akvo.

„Kiun problemon vi havas, *muchacho“*, demandis *El Picaro*.

„Murdis lin sonserpento, kiam ni senarbustigis la sekan sulkon“, klarigis Andreo.

„Tio aspektas damne malica“, diris *El Picaro*, palpante la gambon. „Ĝi nun ankaŭ jam super la genuo bluiĝis. Jen ne restos alia eblo, Eŭlalio, krom forsegi la gambon.“

„Jes, tion pensas ankaŭ mi, *jefe*“, respondis Eŭlalio, kiu tute akceptis sian sorton.

„Eble estas pli bone simple forhaki la gambon“, vokis Pedro, „tio fareblus pli rapide.“

„Vi estas *burro*, vera azeno“, objetis Santiago al Pedro. „Se ni dehakus la gambon, kaj se tio ne okazus lerte, la osto povus splitiĝi kaj tiam daŭrus semajnojn antaŭ ol la osto kunkreskus.“

„Kion vi mem diras pri tio, Lalĉjo?“ demandis Andreo.

„Al mi estas egale, kiel vi disigos la gambon. Ĝi doloras tiom terure, ke ne povos pli dolorigi, egale ĉu oni dehakos aŭ forsegos

ĝin. Se mi nur povus liberiĝi de la gambo, mi estus jam tute kontenta. Ĉar longe mi ne plu eltenos tion. La damnita veneno jam tramordis sin ĝis la koksoj."

„Vi devis diri tion jam pli frue al ni, ke la serpento vin mordis", diris Cirilo, „tiukaze ni tuj estus povinta trakti ĝin. Ni tro malfrue faris tion, jen la kaŭzo."

„Lasu min en paco pri viaj bonaj konsiloj", ĝemis Eŭlalio. „Mi jam mem ne sciis tion pli frue, ke ĝi mordis min. Mil damnoj. Kaj nun finfine fortranĉu aŭ forsegu aŭ forhaku la diodamnitan gambon, por ke mi havu pacon kaj ne kvaku ĉi tie tiom da stultaĵoj."
„Andreo", vokis *El Picaro*, „venu kun mi al la *oficina*!" Ambaŭ foriris kaj alportis post kelkaj minutoj botelon kun *aguardiente*, arbosegilon kaj kelkajn ĉifonaĵojn de malnova ĉemizo.
El Picaro ĉirkaŭrigardis, prenis unu el la pelvoj, elversis la akvon, plenigis la pelvon ĝis la rando per *aguardiente* kaj diris al Eŭlalio: „Eltrinku, por ke vi ne sentu tiom tion!"

Eŭlalio enversis la brandon per unu fojo. Tiam *El Picaro* prenis cifonon, trempis ĝin en alian pelvon, en kiun li versis la brandon, lavis per ĝi la segilon, kaj poste la gambon de Eŭlalio super la genuo ĝis kiam ĝi estis pura kaj malsekegigis ĝin per brando.

„Ni devas firme bandaĝi la gambon supre sub la koksoj", vokis Andreo, „por ke li ne elsangadu. Kaj varmegan grason el la kuirejo, ni ĝin nepre bezonos por varmege engrasigi la vundon, kaj poste sukeron sur ĝin, abunde." „Salon, vi opinias, ĉu?" diris Pedro.

„Brunan sukeron, mi diris, nepre sukeron“, decide diris Andreo. „Kaj vi, Matiaso, iru al la *cocinero*, al la kuiristo, kaj alportu ĉi ĉion, ŝprucante varmegan grason kaj sukeron. La sukero estu bone pistita, tiel,ke ĝi aspektu kiel polvo. Ek, kuregu!“

15/4

Eŭlalio intertempe falis en partan obtuzecon de la rapida glutado de *aguardiente*, kiun li tiom rapide pafis tra la ĝorĝo, li ŝajne nur nebule konsciiĝis, kio okazas ĉirkaŭ li.

„Kiu bone kapablas segi?“ demandis Andreo kaj ĉirkaŭrigardis. „Faros mi tion“, respondis Santiago. „Mi spertas pri tio; antaŭ ol mi fariĝis *carretero*, mi laboris en *Ocosocoautla ĉe don Benigno* kiel viandohakisto kaj mi scias, kiel oni devas segi ostojn.“

„Bone, tiukaze segu do!“ ordonis *El Picaro*.

Santiago prenis la segilon, kontrolis la dentojn kaj diris tiam: „Firmtenu lian kapon kaj la brakojn, ankaŭ la alian gambon, por ke li ne komencu tretadi per ĝi. Kaj ĉi tie unu el vi firme tenu la femuron, tie, kie ni ligaturis ĝin, kaj unu el vi kaptu malsupre la gambon. Kaj firme tenu!“

„Vi devas lasi gamborestaĵon, Santiago“, opiniis Andreo, „stumpon por povi bandaĝi la oston.“

„Tion mi scias mem, ŝtipkapulo. Sed prave, jen ni forgesis la kudradon. Kuru foje iu el vi al la maljuna putino kaj alportu fort-

ikan flikkudrilon kaj fortan fadenon, sed tiom longan, ke ĝi sufiĉu por kelkfoja kunkudrado de la karnofaldoj."

Baldaŭ kudrilo kaj fadeno estis ĉemane. El Picaro trempis ambaŭ aĵojn en brandon kaj tenis ilin pretaj. Unu el la viroj staris proksime kun pelvo da varmega graso, kaj alia kun sukero.

Eŭlalio singultis, li provis kurbiĝi, sed oni premis lin forte sur lian petaton kaj firmtenis lin je ĉiuj membroj. Li ĝemis kelkfoje, li kvazaŭ gruntis kaj singultis, dum li rigardis per malfermitaj okuloj, kio okazas kun lia gambo. Dum kelkaj minutoj li ŝajne ne tute konsciiĝis, ĉu temas pri la propra gambo aŭ pri tiu de unu el la viroj, kiuj sin premadis al li de ĉiuj flankoj, ĉar ĉiu el ili devis plenumi difinitan taskon.

Ĉio sukcesis tute kontentige al ĉiuj helpantoj.

Kiam la viroj finfine povis iri al la manĝejo, Eŭlalio jam falis en dormon, post kiam li ankoraŭ rapide trinkis duan abundan gluton, kiun *El Picaro* verŝis en lian buŝon.

La tagmanĝo de la viroj ne estis menciinda. Sed ĉar ne disponeblis pli bona, ĝi devis sufiĉi al ili. Jen rizo kuirita kun verda kaj ruĝa kapsiketoj, kelkaj pecoj da ledo nomataj *carne seco,* jen oste dura viando, nigraj faboj kun verda pipro kaj prisprucataj per kelkaj gutoj de ranca graso. Aldone kiel fina trinkaĵo la saŭco, kiu nomiĝis kafo.

Apenaŭ la manĝo estis vorita, *El Picaro* staris jam antaŭ la kabano: „Ek, *muchachos*, antaŭen! Konstruu la *calzadas*! Andreo,

vi scias ja kie. *El Gusano* montris al vi hieraŭ la lokon, kie oni hakos arbojn ekde la sekva semajno.“

„*Si, jefe*“, respondis Andreo.

La viroj formarŝis, armite per longaj ĝangalaj tranĉiloj, tielnomataj maĉetoj.

15/5

Andreo, Pedro kaj Santiago paŝis laŭ la vojo, kiun *El Gusano* difinis kiel *callejon*-on. *El Gusano* nur proksimume priskribis la strateton. Estis poste la tasko de la spertaj *boyeros* elekti la strateton tiel, ke ĝi ofertu la malplej multajn malfacilaĵojn por la forveturado de la *troza*.

Estis distanco de preskaŭ dek kilometroj ekde la hakejoj ĝis la flosiga sulko. El tiuj dek kilometroj estis kvin marĉaj. La tri esploristoj provis ĉirkaŭiri la marĉon kaj malkovri alian vojon. Sed kiom ajn strece ili serĉadis, la vojo, kiun *El Gusano* fiksis, estis tamen ankoraŭ la plej bona. La ceteraj kondukis ĉiuj trans rokaj montetoj aŭ trans pli ol dudek sulkoj, kiuj parte estis sekaj kaj parte sur la grundo kovritaj per alta marĉotavolo. Tiuj sulkoj estis formitaj dum la tropikaj pluelverŝiĝoj de torentaj akvoj, ili tranĉiĝis ĉiun jaron pli profunde en la teron kaj estis poste tiom profundaj, ke daŭrus horojn transigi eĉ nur ununuran trunkon trans tian sulkon. La malavantaĝo estis, ke neniu el tiuj sulkoj havis rektan ligon kun unu el la flosigeblaj riveroj. Ili finiĝis en marĉoj, marĉa ŝlimo kaj lagoj aŭ en plu irantaj subteraj kanaloj, kavernoj kaj kanaletoj. Estis eble, ke unu el tiuj multnombraj sulkoj tamen sendis iel sian akvon al rivero; sed por konstati

tion, por esplori tion, oni certe bezonus semajnojn, kaj eblus, ke oni malkovrus post semajnojn longa esplorado, ke la sulko descendas en malaltaĵon, kie ĝi finiĝas en tera fendo aŭ, ke ĝi pli kaj pli larĝiĝas trans plian rokecan rulŝtonaran areon, kie *troza* ne plu flosus, sed meze de la ŝtonamaso kaptiĝus kaj perdiĝus.

Krome ja ne estis la tasko de la tri viroj fari esplorojn. La hakejoj kaj ankaŭ la *tumbo*, kie la ligno estis deponata por povi flosigi ĝin je la komenco de la pluvotempo, estis ordonita al ili. Ili nur devis elhaki per maĉetoj el la ĝangalo la strateton, sur kiu la trunkoj estu forveturigataj.

La ceteraj *boyeros* kaj la knaboj jam komencis haki la *varales*, la trunkojn, per kies helpo la *calzada* estu konstruita.

Nur, ĉar en tiu regiono la riĉo je mahagono estis dekoble pli granda ol en tiu regiono, kie tiutage matene estis fortrenitaj la trunkoj, tio valoris la penon disipi semajnon pri tio konstrui specialan *calzada*. Tuj kiam ĉiuj *trozas* el la regiono, kie oni fortrenis ilin tiutage, estos alvenintaj je tiu *tumbo*, kio verŝajne estos atingita postmorgaŭ tagmeze, la *boyeros* kaj ties knaboj havos la taskon fari nenion alian krom konstrui la stratetojn de la nova regiono. Dum tiu tempo la bovoj ripozos kaj bone manĝos ĝis sateco por kolekti fortojn dum tiu semajno. Pri la bovoj kaj ties ripoztagoj oni pensis seninterrompe, ĉar ili kostis multe da mono kaj malpli facile havigeblis ol la indiĝenoj, kiujn oni povis kolekti surstrate laŭdire ebriaj por puni ilin per kvindek pesoj pro ĝenado de la publika kvieto kaj poste vendi ilin al *enganchador*, al laborista agento, ĉar ili ne povus pagi tiujn kvindek pesojn, kaj la agento vendus ilin plu al monterio.

15/6

Reveninte de la inspekta marŝo, Andreo ordonis al Pedro, ke tiu kun la helpo de ses viroj senarbustigu la strateton, ĉar la arbustaĵoj alie dum la veturado barus la vojon.

Li mem komencis konstrui kun la ceteraj viroj kaj knaboj firman strateton. Nur tie, kie la tereno estis marĉa kaj ŝlima aŭ mola kaj malseka tiel, ke ĝi fariĝus ŝlimo jam kiam estus transtrenitaj nur du tri aŭ kvar *trozas*, oni konstruis la tielnomatan *calzada*-n, kvazaŭ pavimitan strateton.

Brake larĝaj trunkoj longaj tri ĝis kvar metrojn estis metitaj unu apud la aliaj sur la grundon de la strateto. Poste oni kunplektis la trunkojn per lianoj, bastŝnuroj kaj rimenoj el arboŝeloj. Tio estis la tielnomata pavimado. Sur tia *calzada* facile veturigeblis *troza* per du bovoparoj trans la marĉe ŝliman grundon; kaj tiel vigle, kiel trotadis la bovoj, okazis ankaŭ la veturado. Ĉar oni ne trenis la trunkojn sur la kalva grundo kaj la bovoj ne devis treti en la tersurfacon, la marĉa ŝlimo ne pliprofundiĝis. Nur pro la pezo de la bovoj, kiuj trotis trans ĝin, krome pro la trunkoj transe trenitaj sur ĝi, kaj fine sekve de la skuado kaj puŝado de la pavimo, okazis kompreneble, ke tiukaze, se jam konsiderinda kvanto de *trozas* estis transtrenita, la *calzada* komencis sinki. Kutime ĝi sinkis unue je unu el la finaĵoj, je tiu flanko, kie la tero estis plej mola kaj plej marĉa. Se la *calzada* jam kliniĝis foje al flanko, deglitis la veturigata *troza* sur ĝin. Sed ĉar la bovoj ektiris, la *troza* pikiĝis flanke sub la firman strateton kaj damaĝigis ĝin. Aŭ la bovoparoj ne povis firmteni sin sur la klinita glata trunkstrateto kaj glitis flanken malsupren kaj tiris la trunkojn en la marĉan ŝlimon, kio rezultiĝis la samajn penojn kaj tur-

mentojn kiel je la trunkoj, kiuj komplete estis veturigataj tra la ŝlimo.

Pro tiuj kaŭzoj ne sufiĉis konstrui tian *calzada*, oni devis senin-terrompe ripari kaj renovigi ĝin tiom longe, kiom oni trenis *trozas* trans ĝin. La konstruado kaj ĉiama plibonigado kaŭzis tiom da kromlaboroj kaj detenis tiom da viroj de pli gravaj laboroj, ke *calzada* estis konstruata nur tiukaze, se tre multaj *trozas* estis transigendaj sur tiu vojo; aŭ tiukaze, se la forveturigado de malmultaj *trozas* trans la marĉe ŝlima tereno kostus pli da tempo kaj penoj ol sume la konstruado de la *calzada* kaj la forveturigado.

„Jen la kaŭzo, Nene“, klarigis Andreo, „kial *calzadas* estas nur esceptokaze konstruataj. Kiel la trenado okazadas sen *calzadas*, tion vi hodiaŭ ja sufiĉe observis. Kaj ni ankoraŭ ne estas je la fino. Hodiaŭ meznokte ni rekomencos denove kaj ĝismatene je la deka aŭ dekunua, tiom longe kiom la bovoj akceptos tion. Tio kostos al ni kaj al la bovoj ankoraŭ du damnite durajn tagojn. Sed, se ni tie transe longtempe konstruadus tian *calzada*, tiukaze tio kostus al ni kvar aŭ kvin tagojn, kaj por tiom malmultaj trunkoj tio ne validus la penon.“

„Sed tiukaze ni almenaŭ devus turmentadi nin malpli“, diris Vicente.

„Tio ĉi tie neniam estas la temo, ĉu ni turmentadas nin pli aŭ malpli. Pri kio temas, tio estas nur la pli rapida liverado. Kaj tiel aŭ tiel, ni, la *muchachos*, estas tiuj , kiuj pagos, kiuj ĉiam devas pagi tion.“

15/7

Kiam la suno malaltis kaj la rapide komenciĝanta nokto anonciĝis per frideta venteto, vokis Andreo: „*Muchachos*, ni finu la laboron hodiaŭ. Je noktomezo ni jam denove devos leviĝi.“

Procoro memoris Andreon pri tio, ke *El Gusano* diris, ke ili laboru ĝis la kompleta sunsubiro ĉi tie je la strateto.

Pri tio opiniis Fidel: „Tio interesas nin kiel plena noktovazo, kion diras la *cabron*. Ni ekiru nun, mi laboraĉis sufiĉe.“

„Kiu estas la *cabron*, kaj en kiun vazon li metis sian nazon?“ vokis *El Gusano* al la viroj.

El Gusano nerimarkite de la laboristoj alrajdis jam kaj, ĉar la tero estis malseka, neniu aŭdis la hufojn de lia ĉevalo.

Fidel impertinente paŝis antaŭen kaj diris laŭte: „Mi diris tion, mi! Kaj ni vere hodiaŭ sklavlaboris jam sufiĉe.“ Dum li antaŭpaŝis, li prenis sian maĉeton firme en manon kaj tenis ĝin nun tiel, kvazaŭ li intencus ekataki lin ĉe la plej eta movo, kiun *El Gusano* entreprenus kontraŭ li.

El Gusano vidis la geston. Li levis la brakon kun la vipo alten. Ne estis certe, ĉu li volas vipi la ĉevalon aŭ salti surĉevale al Fidel por bati lin per la vipo.

Sed en tiu sama sekundo li rimarkis, ke ĉiuj viroj, jam pretaj por reiri al la kabano, kunstaris en aro, ĉiuj kun siaj maĉetoj enmane, kaj ĉiuj rigardante al li. Li ne sciis, ĉu la viroj volas nur

provoke impresi lin, aŭ ĉu ili lin serioze intencas minaci. Li pensis, ke estos pli prudente decidi tiun demandon kun certo ne nun kaj ne tie. Leĝere li sinkigis la brakon kun la vipo kaj diris: „Iom pli vi ja povus fari ankoraŭ hodiaŭ, por ke la strateto fariĝu pli rapide preta. Sed eble vi pravas, vi estas lacaj. Sed je la dekdua ĉiuj eliĝu! Mi venos voki vin. La *trozas* morgaŭ ĉiuj devos esti apud la *tumbo*. *Don Severo* strikte ordonis tion."

Sen atendo de respondo, li turnis sian ĉevalon kaj forrajdis.

ĈAPITRO 16

16/1

La *muchachos* retromigris al la kampadejo, tute lacigite pro dekkvinhora laboro plena de streĉega laboro. Kiam ili alvenis tien, fariĝis jam malhele.

Horon poste ili iris al la kuiristo por akcepti sian vespermanĝon: nigrajn fabojn spicitajn per verda pipro, krome tortiljojn kaj kafon.

Dum ili manĝis, demandis Pedro: „Cetere, kion faras nia *compañero* Eŭlalio? Ĉu iu okupiĝis pri li?"

„Jes", respondis Andreo, „mi iris al li kaj donis al li kafon. Li aspektas kvazaŭ li rekolektus fortojn kaj samtempe kvazaŭ li volus morti. Mi ne scias kiel ĵuĝi tion."

„Post la manĝo ni foje esploru, kiel ni povus helpi al li“, diris Matias dum li elkuleris siajn fabojn per peco da tortiljo kaj ŝovis ilin en la vaste malfermitan buŝon.

Fidel trinkis gluton da kafo kaj opiniis: „Tiukaze ni ne plu povos fari multon. La gambon ni forsegis de li, kaj se ni segadus je li ankoraŭfoje, jen restus ja de la ulo tute nenio.“

Surtere antaŭ la kuirejo kaŭris surtere la manĝantaj viroj ŝpareme prilumataj de la flagranta fajro de la kuirkabano kaj de du lanternoj plenaj de fulgo, kiujn la kuiristo pendigis je du fostoj de la kabano.
Dum la viroj ankoraŭ tie kaŭris, venis ankaŭ la *hacheros* al la kuirejo por ricevi sian manĝon.

Ofte, se la hakejoj estis tro malproksime de la kampadejo, la hakistoj kaj la *boyeros* matene kunprenis dum la formarŝo facilan manĝon kaj varmigis ĝin proksime de sia laborloko. En tiu okazo ili ricevis sian plenan tagmezan manĝon vespere. La tielnomata plena tagmeza manĝo, la *comida*, diferencis de la facila manĝo, kiun la viroj ricevis matene kaj vespere, nur per tio, ke krom la nigraj faboj ili ankoraŭ ricevis rizon kaj peceton da seka viando aŭ kvazaŭ ftizan olesardenon. Kompreneble direndas, ke rilate la manĝon tie ekzistis multe pli da justeco ol en militaj armeoj de civilizitaj landoj. *El Picaro* kaj *El Gusano* ricevis eĉ ne unu mizeran fabon pli da bona manĝo ol la *muchachos*. Kaj eĉ *don Severo*, se li estis, kiel nun, en la laborkampadejo, ricevis preskaŭ la saman manĝon, eble iomete pli serenige luksigitan per unu aŭ du skatoletoj da olesardenoj dum semajno. Nur la

uloj en la *Oficinas Centrales* de la monterio, tie, kie estis la magazeno kaj kien venis la komercistoj, kapablis permesi al si ion pli bonan.

16/2

Se la mahagono en la regiono estis bone enspeziga kaj la viroj komencis labori pli malproksime ol marŝhoron de la *campo*, oni forlasis la kampadejon kaj starigis en la mezo de la nova ekspluata regiono novan kampadejon, oficejon por la *contratista* aŭ la komisiita kontrolanta *capataz*, novan kuirejon kaj novajn loĝkabanojn. Ĉar ĉiuj tiuj konstruaĵoj estis tre primitivaj kaj oni ne uzis alian materialon ol tiun, kiun ofertis la ĝangalo, daŭris la starigado de nova *campo* apenaŭ tagon. Kaj oni ree forlasis ĝin, kiam nova malproksima regiono estis malfermita kaj ekspluatata. Nur la *oficinas*, la urbo, aŭ la ĉefkomandejo de la monterio, restadis senŝanĝe je sia origina loko.

Ĝi devis restadi tie, ĉar ĝi formis la centron por la koncesio. La koncesion la kompanio aŭ la entreprenistoj perdis, se, ĉiam laŭ la cirkonstancoj, oni forlasis la centron jam dum ses aŭ dek du monatoj kaj neniu laboris plu en la koncesia tereno. La registaro tiukaze havis la rajton rigardi la koncesion kiel finita kaj transdoni ĝin al nova entreprenisto. Kompreneble, okazis ofte, ke pasis tri, kvin ja eĉ dek jaroj, antaŭ ol la registaro eksciis, ke oni rezignis pri la koncesio. La kompanioj kaj entreprenistoj pagis nur impostojn por la mahagono, kiu jam estis ŝargita sur ŝipojn. La nepagado de impostoj havis eble la kaŭzon, ke en la koncesia regiono estis malmulte da produktiveco, eble pro manko de mahagono aŭ pro manko de laboristoj. La kaŭzo neniel devis esti, ke oni rezignis pri la koncesio. Kaj, ĉu oni rezignis pri ĝi aŭ ĉu

ĝi estis retenata, tio konstateblis nur per tio, ke la registaro elsendis komision. Tio estis tre multekosta; kaj ĉu la komisiono efektive trovis la monterion aŭ ĉu ĝi efektive penis trovi ĝin, tion la registaro povis scii certe neniam. La ĉefkomandejo de la kompanio aŭ de la entrepreno en la haveno aŭ en *Villahermosa* transdonis nur raportojn tiajn, kiaj estis koloritaj laŭ la precipaj cirkonstancoj favore al la propraj negocoj. Tiuj negocoj ofte estis nenio alia krom puraj spekuladaj negocoj, kiuj pli facile lasis kaŝi sin per la firmtenado de la koncesio.

Kompreneble, la fratoj *Montellano* ne pensis pri tio rezigni pri sia koncesio. Male, ili ekspluatos ĝin ĝis la lasta arbo trovebla de ili. Kaj, se ili malkovrus koncesian terenon efektive forlasitan ne tute ekspluatitan, ili saltus sur ĝin per tiel robusta sovaĝo, ke oni povus pensi, ke ili volas vori la tutan ĝangalon.

16/3

Estis sufiĉe granda aro de indiĝenaj viroj, kiuj ĉirkaŭsidadis dum la vespermanĝo ĉe la kuireja kabano. La viroj manĝis, ŝmacis, sipis, babilis, klakadis per siaj pelvetoj kaj kruĉetoj, ekstaris, kaŭriĝis denove sur alia loko, vokis, fajfis, zumis, kverelis. Kelkaj kaŭris tute kunruliĝintaj kaj komencis dormi ĉe siaj trinkpelvetoj kaj argilaj potetoj.

Kelkaj viroj ekstaris por iri al la kabanoj kaj sterni sin sur siaj petatoj.

Jen *El Picaro* proksimiĝis al la grupo de la *boyeros*. Ili ekvidis lin nur tiam, kiam li staris jam tute proksime antaŭ ili, ĉar delonge estis nokto. La rebrilo de la fajroj kaj de la du lanternoj,

kiuj ŝajne eterne cerbumis, ĉu ili do vere lumu aŭ prefere estingiĝu per lasta zorgoplena flagrado, etendiĝis nur dum kelkaj paŝoj ĝis la tenebro.

El Picaro ankoraŭ abunde estis kovrita per marĉa ŝlimo. Eĉ lia vizaĝo kaj lia hararo plu montris sufiĉe da spuroj de la eleganta rajdo, kiun li provis fari tra la ŝlimo. Sed la ŝlimo estis nur sekigita kaj krustigita kaj pendis sur liaj vestoj kiel kiraso. De multaj lokoj la krustigita ŝlimo komencis jam defali kaj deŝeliĝi aŭ disfali en polvon. *El Picaro* certe atendis la sekvan pluvelverŝiĝon por starigi sin tute vestinte en la pluvon, por ke tiu delavu la ŝlimon de lia vestaro, de liaj botoj kaj de lia densa hararo, kaj sen tio, ke li mem devus peni pri tio. Ne estis tiel, ke li ŝatis la koton per si mem. Unu el la kaŭzoj, kial li ankoraŭ nun ĉirkaŭiradis kun tiu ŝlimokrusto, estis tiu, ke li havis nur tiujn vestojn. Ankaŭ la kvar ĉemizoj, kiujn li havis, estis ĉiuj simile truigitaj kaj simile krustigitaj, ĉar malofte pasis tago, en kiu li ne devis rajdi kaj vadi tra marĉa ŝlimo kaj, ĉar li sufiĉe ofte falis laŭlonge en ĝin. La alia kaŭzo, kial li ankoraŭ portadis la koton sur si, estis tiu, ke li trovis ĝis tiam eĉ ne unu minuton da tempo por lavi sin aŭ elserĉi ĉemizon, kiu aspektus pli bone ol tiu, kiun li ĝuste portis sur la korpo. Al ĉio ĉi aldoniĝis, ke li estis same tiel laca, kiel la ceteraj viroj, kiuj tie laboris, kaj, ke li povis kungrati dum tiu horo nek sufiĉe da forto, nek ambicion por lavi sin kaj deŝeli kaj defroti la krustojn de sia ĉemizo kaj de sia pantalono. La ĝangalo kaj la laborado en la ĝangalo ne permesas privilegiojn, la mastro statas tiurilate kiel subulo, kaj la oficiro kiel soldato; vespere ambaŭ estas same lacaj kaj de ambaŭ perdiĝas eĉ la lasta flameto de ambicio kaj ŝato de pureco, tuj kiam ili glutis sian magran manĝon.

El Picaro restis staranta inter la *boyeros*. Kelkaj el la *muchachos* flegme rigardis supren al li por diveni, kion li celas kaj kiujn novajn ordonojn li intencas meti. Sed la plimulto de la viroj tute ne atentis lin.

„Vi povus ankaŭ leviĝi kaj diri *'Buenas noches, jefe!'* se mi venas ĉi tien“, li komencis paroli.

Neniu el la viroj moviĝis. Nur Vicente, parte pro timemo, ke *El Picaro* povus bati lin, diris ne laŭte: „Bonan vesperon, *patroncito*!“ Sed en tiu momento li rimarkis, ke neniu el la viroj malfermis la buŝon por saluti El *Picaro*-n, kaj li hontis kaj havis la senton, ke li estas perfidulo de siaj kamaradoj.
Sed neniu ekscitiĝis pri tio; ĉar neniu el la viroj deziris, ke *El Picaro* tiun kompatindan hometon, kiu pro laco kaj trostreĉiteco fariĝis tute hurletema, piedbatu kelkfoje sur la magran korpon.

Ankaŭ transe ĉe la hakistoj oni aŭdis, kion *El Picaro* diris tie, ĉar li vokis tion sufiĉe laŭte kaj kun la intenco, ke ĉiuj, kiuj sidadis ĉe la kuirejo aŭdu tion.

Kiam *El Picaro* silentis kaj krom Vicente neniu moviĝis, diris Celso al la grupo, en kiu li kaŭris kaj manĝis siajn fabojn: „*Bueno*, bone, ke neniu ekstaris, kaj ke nur la vermeto, la tielnomata knabeto, malfermis la buŝon; ĉar mi povas ĵuri al vi, se iu el vi estus dirinta 'Bonan vesperon, *jefe!'*, jen mi ĉinokte farus kaĉon el lia fia grimacilo per miaj pugnoj.“

„He, kion vi diras tie?“ vokis *El Picaro*, kiu aŭdis, ke Celso parolas, sed sen kompreni, kion li diris.

„Mi diris, ke mi poluros lian grimacon“, respondis Celso.

„Kiun vi intencas bati sur la grimacon?“ demandis *El Picaro*.

„Tiun, kiu malfermas sian buŝon je malĝusta tempo“, respondis Celso kaj kaŝis sian vizaĝon malantaŭ sia ladokruĉeto, el kiu li trinkis poste abundan gluton da kafo.

El Picaro en la nesufiĉa lumo ne povis vidi klare, kiu parolis. Sed ŝajne li havis ion alian en la kapo, ĉar li tuj forgesis tion, kion Celso diris, kaj li eĉ ne penis iomete cerbumi, kiel Celso opiniis tion.

Li rerigardis al la *boyeros*, rulumis cigaredon, iris al unu el la fajroj, kie li ekbruligis ĝin kaj revenis denove al la loko, kie li staris antaŭe. Tie li elblovis nubon da fumo kaj diris: „Kelkaj el vi venu al mi, al mia *oficina*. Mi donos al vi ŝpatojn. Estos pli bone, se vi ankoraŭ nun enfosos Eŭlalion. Li estas morta. Ni ne povos lasi kuŝi lin ĝis morgaŭ, ĉar li tiukaze fetorus kaj peste odorigus la tutan ĉirkaŭon. Vi ja scias, kie estas la *cementerio*, la tombejo. Estas diodamnita afero ĉi tie, ke la laboristaro neniam kompletigeblas. Kaj *don* Severo kvazaŭ ĉiam sidas sur mia nuko. Mi pensis, ke Eŭlalio elturniĝos. Post semajno li povus ligi bastonon al sia diodamnita stumpo kaj forte haki kaj forlabori sian konton. Sed mil diabloj, ĉi tie ĉio fuŝe deruliĝas.“ Li mansignis kelkajn *muchachos* al si, por ke ili sekvu lin al lia *oficina*.

16/4

La viroj ekstaris kaj iris al la kabano, kie kuŝis Eŭlalio. „Ne plu eblos helpi al li“, diris Matias. „Li estas morta. La peno pri la

segado de la gambo estis superflua. La damnita veneno certe jam estis en la kokso, kiam ni forigis ĝin. Eble li havis ankoraŭ duan mordan vundon, pli supre, kiun ni ne vidis. Certe.“

„Laŭaspekte li estas bela blua kadavro.“ Santiago rigardis la mortinton en la neklara, fumeca lumo tute proksime kaj kun kortuŝiga pieco, kiu estis kvazaŭ neparolita preĝo. Sed kiam li ekkonsciiĝis pri siaj sentoj, li deskuis ilin per rapida movo de sia kapo. Por ne veki ĉe la ĉirkaŭstarantaj viroj nesciantaj kion fari kaj kion diri, eĉ la plej etan alludon pri la impreso, ke li eble eĉ ploremas, li diris kun sia kutima ironia paroltono: „Kaj nun ni eĉ devos elfosi lian forsegitan gambon, kiun ni jam entombigis, por ke ni povu meti ĝin al la cetera korpo, ĉar tiukaze, se la anĝeloj venos je iu bela tago por veki lin, li devus damne pene lamiri pro sia stumpo dum la serĉado de la gambo.“

„Ĉu vi ne pensas, Santiago“, opiniis pri tio Andreo, „ke Dio lin same tiel bonvenigos, se li lamiros sur nur unu gambo al li?“

„Pri tio mi ne estas tiel certa, Andreĉjo. Dio eble ektimos, se li vidos lin tiel ĉifonpantalona kaj kovrita per dika ŝlima krusto. Kaj cetere, tia mizera bovoservisto, kia estas li kaj ĉiu ĉi tie, skurĝvundita kaj kun cikatriĝintaj ŝvelaĵoj ĉie, kun haŭtskrapaĵoj de la pendumado, plena de koto kaj ŝlimkrustoj, nekombita, kun tiom truigita kuspita pantalono, ke oni vidas malantaŭe la postaĵon kaj antaŭe la pisilon, kiu tiel prezentiĝos apud ĉiuj tiuj papoj, kardinaloj, episkopoj, prelatoj kaj la freŝe lavitaj anĝeletoj, kiuj tie flirtadas, ne, kamaradoj, tion mi ne povas imagi, ke tie Eŭlalio estos bonvenigata kaj akceptata kiel samrangulo. Tion rakontu neniu al mi, kaj se iu volus rakonti tion al mi, jen li mensogus.“

Andreo surgenuiĝis apud Eŭlalio kaj penis premfermi ties okulojn, kiuj ne volis fermiĝi. Li mansignis poste al la viroj kaj ili tiris Eŭlalion sur ties mato en la mezon de la kabano. Sur la maton la *muchachos* metis la fulgantajn laborlanternojn ĉirkaŭ la mortinto, du el ili je ambaŭ flankoj de la kapo, kaj du el ili je ambaŭ flankoj de la piedoj, tiel, kiel ili faris tion hejme en la bieno aŭ en siaj vilaĝoj. Sed hejme ili uzis kandelojn kaj pli ol nur ĝuste kvar. Sed, ĉar tie neniu havis kandelojn, la fulgantaj, malfermitaj meĉolampoj devis servi por tiu pia servo.

„Dio koleros nek je ni nek je li, ankaŭ ne *Madre Santisima*, se ĉi tie brulas anstataŭ la kandeloj nur niaj mizeraj *linternas*, ĉar ni ne havas ion pli bonan“, diris Pedro, kvazaŭ li volus senkulpigi sin al la ĉielo, ke ili ne povas oferti al la mortinto pli bonajn *funerales*, do pli bonan entombigan ceremonion.

16/5

Vicente kaj kelkaj el la aliaj knaboj kaŭriĝis kaj komencis kanti litaniojn. El tiuj litanioj ili apenaŭ komprenis eĉ vorton ĝuste, ĉar tio, kion ili kantis, estis lernata nur per ofte ripetita aŭdado. Ĉar ĝi estis je triono fuŝa latino kaj je plua triono eĉ pli fuŝa hispana, kaj la lasta triono estis miskita el kvar diversaj indiĝenaj dialektoj, tial certe eĉ Dio en la ĉielo havus damnitajn malfacilaĵojn kompreni, kion la knaboj tie malsupre en la ĝangalo fakte volus sciigi al li. Sed la monotona kantado certe fontis rekte el ilia kortuŝiteco kaj estis en ĉiu kazo pli honesta ol naŭdek procentoj el ĉiuj kantadoj, kiuj en civilizita lingvo, kompreneblaj al ĉiuj ĉeestantoj, estas kvazaŭ gurdataj ĉe malfermitaj tomboj, kaj eĉ kun mienoj el kiuj facile ellegeblus, sen esti astrologo, ke ĉiuj, la kantistoj kaj la spektantoj, havas nur unu

penson: „Ho, sankta Bimbambum, se la starado estus nur jam je la fino kaj ni povus enversi bonan konjakon. Tio daŭras ja tiom longe, kiom la nasko de hundidoj, ĝis la olda babilaĉulo nomata pastro, finos la paroladon. Jes ja, mil diabloj! Ĉu li ankoraŭ nun havas ion aldonan por diri? Tuj pluvos kaj mia edzino surmetis sian novan ĉapelon kaj tiu kostis al mi amason da valora mono. Scias nur la diablo, kial mi lasis logi min kuntroti al tiu entombigo. Tiu deruliĝus tute bone ankaŭ sen mi. Dio estu laŭdata! Nun li komencas ja konsekri lin kaj paroli pri la polvo kaj la cindro kaj ĵeti tri pinĉprenojn da koto en la fosaĵon. Jen jam falis pluvoguto sur mian nazon, vere ekpluvas nun, kaj mi ne kunprenis ombrelon! Dum la tuta tago brilis la suno kaj ĝuste nun komencas pluvi. Nun mi eĉ devas demeti la ĉapelon kaj rigardi mian graskovritan ĉapelrubandon kaj priflari la remburaĵon.“

Rimarko
Bimbambum = onomatopeo por Dio, kiu estas tiel karakterizata per laŭtaj, sed tamen belsonaj sonoriloj de preĝejoj

16/6

Andreo eltiris la duan petaton, kiu troviĝis sub tiu, sur kiu kuŝis Eŭlalio, dum Fidel kaj Matias levis la korpon. Per la dua petato Andreo kovris nun la korpon, post kiam la suba petato jam estis volvita ĉirkaŭ Eŭlalio.

„Nu, kie vi havas la gambon?“ vokis Matias.

„Jen ĝi“, respondis Procoro kaj ŝovis ĝin al la stumpo. Cirilo menciis aldone: „Ĝi estis la lasta momento, kiam ni elfosis la gambon, la hundoj jam komencis elgrati ĝin.“

„Vi estus devintaj enfosi lin en la *Campo Santo*“, obĵetis *Sixto*.“

„Por tio ni hodiaŭ tagmeze ne havis tempon, Gusano ja tuj urĝis nin, ke ni ekmarŝu por konstrui transflanke de la sulko la novan strateton.“

Ankaŭ la supra petato nun estis volvata ĉirkaŭ la korpon. Kelkaj el la viroj alportis lianojn kaj longajn bastrimenojn. La korpo, tute envolvita en ambaŭ petatojn, estis ĉirkaŭligita per ŝnuroj, por ke ĝi ne glitu el la matoj dum la portado.

Kiam ĝi tute estis kunŝnurita kaj jam aspektis kiel longa pakedo, surgenuiĝis ĉiuj viroj, krucosignis sin kaj komencis kanti kun la knaboj. Ĉiu kantis siamaniere, kaj certe estis eĉ ne triopo el ili, kiu kapablis kanti la saman litanion aŭ la saman avemarion, eĉ se ili volus fari tion. Sed kiaj ajn estis la vortoj, kiujn ili kantis, aŭ la necerta konfuza melodio, per kiu ili esprimis siajn sentojn, ĉiukaze ili pensis dum tio pri Eŭlalio, Eŭlalio, kiun ili vidis ankoraŭ hieraŭ sana ĉirkaŭ si kaj kiu hodiaŭ adiaŭis de ili por iri al alia monterio kiel *boyero*. Traktadi bovojn kaj veturigi *trozas* al la *tumbo*, estis la ununura, kion Eŭlalio komprenis bone. Tial ekzistis ĉe neniu el la *muchachos* dubo pri tio, ke, kien ajn iros Eŭlalio aŭ kien ajn li alvenos, li devos denove labori kiel *boyero* kaj denove devos transigi trunkojn.

Eble oni malpli skurĝus lin pere de iu *El Gusano* aŭ malpli ofte pendumigus lin je ordono de iu *don Severo*, eble li ricevus de

tempo al tempo bonan viandon dum la manĝado kaj pli da nigraj faboj kaj pli da freŝaj tortiljoj; eble li ricevus novan ĉemizon kaj bonkvalitan blankan katunpantalonon kaj ĉeokaze grandanime plenigitan trinkpelvon kun altkvalita malnova komiteko, sed *trozas* li devos transigi ĉiutage, de noktomezo ĝis la dekunua antaŭtagmeze, kaj posttagmeze konstrui stratetojn. Tio estis certa. Kaj tio estis la firma neskuebla konvinko de ĉiuj mahagonlaboristoj. Eŭlalio ja dizertis sen tio, ke li forlaboris siajn ŝuldojn. Tiom longe, kiom tiuj ne estos forlaboritaj ĝis la lasta centavo, li devos veturigi trunkojn, kien ajn li iros. Homoj foriris kaj venis, sed la ŝuldoj restis. Nenombreblaj miloj de kamparanoj vivis en privataj aŭ ŝtataj bienoj aŭ feŭdaj posedaĵoj kiel servutuloj kaj devis forlabori ŝuldojn, kiuj devenis de iliaj patroj, kiuj siaflanke transprenis la ŝuldojn de siaj patroj. 'La lojala forlaborigado de la patra ŝuldo estas la pia devo de la obeema filo, por ke la patro devu malpli longe suferi en la purgatorio kaj trovu pacon en la transmondo.' La *cura*, la pastro, diris tion ĉiufoje, kiam li venis al la bieno kaj konsekris en la kapelo de la bieno la geedziĝojn de la peonoj kaj baptis ties infanojn. Kaj tial ĉiuj *muchachos*, kiuj tie kantis litaniojn, certe supozis, ke Eŭlalio ankaŭ nun transigos trunkojn. Ke por peono iam estos ekzisto ĉi tie aŭ en la transmondo, kie li ne devos labori, kie li ne havos forlaborendajn ŝuldojn, ne kompreneblus por ili. La laboro ja eble estos malpli streĉa, la manĝo pli bona kaj la traktado pli milda; sed oni devos labori. Ĉar Eŭlalio ne sciis ion alian krom labori kun bovoj kaj transigi trunkojn, tio estos denove lia laboro, kaj ĉio tio okazus tute laŭnature. „*Una vez peones, para siempre quedamos peones.*“ La sorto faris el ni proletojn kaj kamparanojn, kaj tial ni estos dum eterneco peonoj. *Ni la muerta nos libra.* Eĉ la morto ne liberigos nin de nia sorto.

Kiu pensas tiel, kiu tiel estis edukita pensi, nur tiu estas la vera proleto. Li estas la proleto, kiu estas celata en ĉiu propagando, li estas la proleto, pri kies sorto oni kverelis kaj pro kiu oni sangis en ĉiuj liberigaj militoj de proletoj; kaj li estas la proleto, kiu en neniu revolucio iam ajn estos liberigita.

16/7

La viroj ĉesigis la kantadon, krucosignis sin, poste la mortinton, kaj poste denove sin mem. Ili estis nun pretaj levi Eŭlalion por formarŝi kun li.

Jen en la kabano aperis *El Gusano*. Li ĉirkaŭrigardis, vidis la pakaĵon surtere kaj diris: „Tiom da lanternoj ja vere ne devus bruli. Nur la diablo en la diodamnita infero scias, kiam ni ricevos freŝan kerosenon. Torĉoj el branĉoj sufiĉus."

„Jes, ankaŭ tiuj sufiĉus, *jefe*." Santiago rektiĝis, estingis per blovado la lanternon, kiun li tenis enmane kaj du aliajn lanternojn, kiuj staris proksime antaŭ liaj piedoj.

Sen plu okupiĝi pri *El Gusano* li diris: „*Vamonos, muchachos!* Ni ekiru!"

La viroj fariĝis viglaj, levis la pakaĵon sur siajn ŝultrojn kaj marŝis el la kabano.

Dum ĉiuj ĉi movoj kaj agoj ili ŝovadis kaj puŝadis *El Gusano*-n de unu loko al alia, kvazaŭ li estus meblo, kiu baras la vojon. Li antaŭe enpaŝis kiel komandanto, kiu intencas preterlasi neniun okazon por interveni kiel ordonanto. Ĉe tiu afero ne estis lia

tasko ordoni ion kaj neniu petis lin aŭ *El Picaro*-n pri konsilo aŭ pri helpo. Li provis konduti kvazaŭ li sentus sin respondeca gvidi la entombigon aŭ iel enmiksiĝi. Kiam la viroj fine jam marŝis, li volis sekvi. Li moviĝis tiel, kvazaŭ li estus ankaŭ nun la ĉefo kaj devus fari honoron al la mortinto, ne kiel suferigito aŭ funebranto, sed por ne permesi forgesi al la viroj, ke sen liaj komandoj ili ne povus aŭ eĉ ne rajtus entombigi siajn mortintojn.

Sed la viroj tiel lerte kunpremiĝadis al bulo, ili kuris tien kaj tien kaj seninterrompe ŝoviĝis tiel pelmele, ke ne restis malfermita fendeto por fariĝi vera partoprenanto de la marŝo. Tute neatendite li retroviĝis kelkajn paŝojn pli malantaŭe kaj ne sciis, kiel tio okazis; ĉar li, laŭ sia opinio, ja ĝuste ankoraŭ estis inter la *muchachos*.

Neniu turniĝis malantaŭen al li. La viroj subite tre rapide marŝis, tiel, ke li pensis, ke li ridindigus sin, se li provus postkuri ilin kiel postlasita hundo. Li haltis kaj postrigardis la funebran procesion.

La eta aro rapide malaperis en la nokto, li vidis dum kelkaj sekundoj plu nur la flameton de la fulganta lanterno, kiu ŝancelis tien kaj tien, tute etiĝis kaj poste malaperis per unu fojo.

16/8

La *muchachos* portis nur unu lanternon. Ĉiujn aliajn ili estingis ĉe la forlasado de la kabano kaj metis ilin surteren. Ilia gesto estis tiel klare leku-min-postaĵece, ke eĉ *El Gusano* ne povis miskompreni tion. Eĉ ne guton da malkara keroseno ili volas

havi kiel donacon de li, dum ili portas sian kamaradon al la tombejo. La ununura lanterno, kiun ili plu havis ĉe si, estis necesa pro la tenebro.

Iom irinte kaj alveninte la densejon, ili komencis dehaki branĉojn kaj branĉetojn kaj uzi ilin kiel torĉojn.

La *cementerio* malproksimis nur dek kvin minutojn. Tiom longe, kiom nova labortereno ne estis konstruita tro malproksime de la tombejo, la viroj uzis la tombejon, kiun aranĝis la viroj, jam, kiam la unua viro mortis en la nova *semaneo*. Tial la c*ampo santo* por nove malfermita *semaneo* ĉiam jam delonge antaŭe estis aranĝita en la direkto, en kiu la plej novaj laboraj terenoj estu uzataj. Per tio la tombejo, foje aranĝita, povis servi dum longa tempo. Nur se la novaj laborterenoj estis tro malproksime en novaj lokoj, oni devis prepari novan *campo santo,* por ke ne tro da tempo perdiĝu ĉe la entombigoj. Ĉiu tempo de la viroj apartenis kiel nekontestata kaj laŭleĝa propraĵo al la posedantoj de la koncesioj. Kaj ju malpli da tempo estis disipita je tia superflua laboro, kia estis la hasta subterigo de *muchacho,* des pli da tempo restis por utila laboro. Plej ofte okazis, ke oni devis entombigi iun viron jam post tri tagoj en la nova tombejo.

Ĉu en tiu *campo santo*, sur kiun la *muchachos* nun alvenis, estis entombigitaj multaj aŭ malmultaj, estis malfacile konstatebla. Kvanto da malaltaj montetoj estis distre lokita malregule sur la tuta ejo. Tie kaj tie en la tero troviĝis disrompitaj kaj veterbatitaj krucetoj, faritaj el krude prihakitaj trunketoj. En ĉiuj flankoj oni vidis kavetojn, pri kiuj oni devis supozi, sen scii multon pri tio, ke tie metron profunde aŭ eĉ multe malpli profunde korpo kunfalis en si mem, tiel, ke la supraĵo de la tero postsinkis. Ĉe la plej

multaj montetoj kaj kavetoj fosadis bestoj, verŝajne porkoj kaj hundoj. Kelkaj el la hundoj venis kun laboristoj, ĉar la hundo ne volis disigi sin de sia mastro. Kaj se la mastro poste mortis, serĉis lin la hundo sub la tero. Sed tio estis esceptoj. La hundoj, kiuj vagadis dekope en la kampadejoj, estis ĉiam malsataj kaj same tiel, kiel la eterne malsataj bredataj kaj sovaĝaj porkoj, ili devis mem zorgi pri tio, kie kaj kiel ili ricevos sian manĝon, se ili volis vivi. Se ili ne povis ricevi sian nutraĵojn de la vivantoj, ili devis preni ilin de la mortintoj. Por sole ĉasi en la ĝangalo, la hundoj, kaj des pli la bredataj porkoj, estis tro timemaj kaj tro pigraj. La sovaĝaj porkoj en la ĝangalo estis ja en sia hejmo, sed ili provis, eĉ pli ol la bredataj bestoj vivi kaj manĝi tiel oportune, kiel tio estas laŭnature kutima por porko. En kvereloj pri la kutima predo la sovaĝaj porkoj ĉiam venkis kontraŭ bredataj porkoj kaj kontraŭ malsataj hundoj, kaj ili translasis al la venkitoj la terenon nur en tiu kazo, se ili sekve de tro plenŝtopita stomako ne plu povis moviĝi.

Rimarkoj
campo santo = restadejo sankta = tombejo
cementerio = tombejo
semaneo =laborejo

16/9

Post kelkaj minutoj fosaĵo estis preta. Kelkaj el la viroj rekomencis kanti litanion. Sed ĉifoje malpli pro korobezono, sed pli pro tio, ĉar ili ne sciis, kion fari pli bonan, dum ili fosis la kaveton.

„Se ni havus nian maljunan vilaĝan ŝamanon ĉi tie“, diris *Procoro* al Valentin, kiu staris apud li kaj rulumis cigaron, „jen Eŭlalio ne estus mortinta tiel aĉe. *Por Dios*, kiom da homoj jam estis morditaj de sonserpentoj, kaj ili ĉiuj ankoraŭ vivas. Mi konas ses knabojn, ĉiuj en mia aĝo, kaj ili kaj mi, ni ĉeokaze, nur pro plezuro, lasis mordi nin de sonserpento, dum ni ludis kun ĝi. Poste ni kriis kaj kuris al la *brujo*, do al la maljuna tubere kovrita medicinviro, kaj tiu donis al ni supon, kaj ĉio reestis en ordo.“

„Nu, ne mensogu tiel fanfarone ĉie tie“, respondis Valentino, „en la bieno, kie mi plenkreskis, tie ja fine mortis ĉiu, kiun mordis *cascabel*. En tiu kazo helpas nenio.“

„Kaj mi diras, ke tamen ekzistas rimedo kontraŭ tio, kiu helpas ĉiam“, asertis nun Santiago, miksiĝinte en la interparoladon. „Mi scias tion kun certo de almenaŭ kvindek viroj, kiujn mi konas, ke ekzistas diversaj bonaj medicinoj kontraŭ serpentomordoj. Kaj krome estas ankoraŭ tiaj, kiajn oni povas gluti antaŭe. Kaj se oni glutis ilin, oni ja povas ĉasi serpentojn, kaj kapti la serpentojn permane. Ili tiukaze povus vin mordi kiel freneziĝinte, kaj tamen ne damaĝus vin, tute ne.“

Superatutante tiujn voĉojn, vokis nun Cirilo: „Vi scias ja tute nenion, nur merdon, jen tio, kion vi scias. Vi estas ĉiuj *burros*, stultaj azenoj. Kiu estas mordita de tia serpento kia tiu, kiu mordis Eŭlalion, tiu ĉiam transmondiĝos.“

„Se li ĉiam transmondiĝos, kial vi ne rakontis tion al ni hodiaŭ tagmeze?“ demandis Fidel. „Tiukaze ne necesus tiel turmenti la

kompatindan Lalĉjon per la forsegado de la gambo, se li ja tamen devus mortaĉi.“

„Tion mi ja ne diras“, pravigis sin Cirilo, „ke oni ne faru ĉion, kion oni scias, kaj kion oni konas por almenaŭ provi konservi iun vivanta. Kelkfoje ja helpas, se la gambo aŭ la mano estas forhakita. Sed tiukaze oni devas fari tion tuj, kaj ne nur tiam, kiam la veneno jam bluigis la umbilikon. Tiukaze oni povas ŝpari la penon al si.“

„Satano ĉiun el vi forportu!“ tondre obĵetis Andreo. „La diablo vin forportu! Foje tenu fermita por iom da tempo viajn didamnitajn babiltruojn!“

16/10

„Tion mi diras al vi“, parolis nun plua voĉo, kiu proksimiĝis el la tenebro de la grupo. „Kiun celon la kverelado havu ankoraŭ? Li estas morta kaj mortaĉis mizere. Kaj nun lasu lin fine putriĝi, por ke li ricevu pacon. Se vi ankoraŭ longe kriados kaj kverelados, li eble eĉ ekstaros, rampos el sia pakaĵeto, kiun vi tiel priplorige aĉe kunŝnuris, batos al vi ĉiuj sur vian fivizaĝon kaj poste envolviĝos. Kia entombigo ĉi tie, meze de la nokto, kun la kadavro ĉepiede kaj kun kverelo pri tio, ĉu oni ĝuste aŭ malĝuste provis kuraci lin. Malĝuste vi kuracis lin, bovoj! Tial li mortaĉis. Se vi ĝuste estus kuracinta lin, li ankoraŭ havus sian gambon, kaj hodiaŭ nokte kun vi povus ekmarŝi por transigi trunkojn.“

Estis Celso, unu el la *hacheros*, kaj unu el la plej maljunaj kaj plej spertaj *muchachos* de la monterio, kiu venis por rigardi kiel

okazas la entombigo. Nur du hakistoj ĉeestis, la aliaj restis en la kampadejo, sternis sin, ĉar ili ŝajne eĉ pli elĉerpis siajn fortojn ol la *boyeros*. Kaj ĉar li estis mortinto de la *boyeros*, tial estis nur ties solenaĵo, kaj la hakistoj ne sentis devon partopreni je distro, kiu ne koncernis ilin. Se la hakistoj enfosis siajn mortintojn, ili same ne sopiris esti ĝenataj de la *boyeros* dum sia plezuro.

„Tio ja ĝuste estas la problemo, Celso, kial ni kverelas ĉi tie“, diris Cirilo, renkonte irante al Celso. „Oni faris ĉion tion malĝuste. Se oni laŭorde estus kuracinta lin, kaj en la ĝusta tempo, tiukaze li nun ĉi tie saltadus kiel juna kaprido.“

Celso paŝis al la fosaĵo, kie ili ankoraŭ fosis, por fari ĝin sufiĉe vasta kaj oportuna. Kun supera gesto li forprenis de unu el la du fosantaj viroj la ŝpaton. „Elpiku ankoraŭ futolarĝon tie kaj tie kaj poste estos preta la tuta aĉa truo“.

Li elĵetis jen tie du ŝpatplenojn da malseka nigra tero, jen tie ĉi du, kaj tiam faris paŝon al la rando. „Do, enmetu lin nun. Sufiĉe profunda ĝi estas, ke la *sainos*, la damnitaj sovaĝaj porkoj ne povos elfosi kaj vori ĝin. Kaj se la bestaĉoj, la *chingados*, tiuj damnitaj perfiduloj, lin tamen voros, ili ja ne plu suferigos lin.“

Matias kaj *Sixto* levis la pakaĵon, svingis lin unufoje dekstren kaj unufoje maldekstren kaj lasis fali lin en la fosaĵon.

Celso, starante ĉe la alia flanko, diris: „Li kuŝas ja damnite kurbigite en la kaveto, kun la postaĵo surtere kaj kapon kaj gambojn etenditaj en la aeron. Sed li havas ja tempon, mi opinias, kutimiĝi al tiu neoportuna situo.“ Poste li krucosignis la pakaĵon, post

tio li krucosignis sin mem, prenis la ŝpaton kaj ĵetis kelkajn ŝpatoplenojn de tero en la fosaĵon. Li transdonis la ŝpaton al unu el la viroj kaj diris: "Mi ja ne venis ĉi tien por fari ĉi tie la tutan laboron sola. Ĉar estas *muchacho* de vi, kiu mortaĉis, enfosu lin do mem, mil sakrojn!" Etendante ĉiujn membrojn, li diris poste: „Kiom laca mi estas! Infero kaj diablo! Mi estas laca kiel hundo! Kaj tamen, kiel volonte mi draŝus la ŝpaton kiel bastonon sur la kraniojn de tiuj du diodamnitaj kojotoj."

En la flagranta lumo de la fulgantaj torĉoj ĉirkaŭrigardante, li serĉis sian cigarostumpon, kiun li metis sur branĉon, kiam li prenis la ŝpaton. Li trovis ĝin, ekbruligis ĝin per ardetanta branĉeto kaj malaperis en la densejo por reiri al sia *choza*.
Dum oni ŝutfermis la fosaĵon, kantis la knaboj kaj kelkaj el la viroj denove litanion, de kiu ili sciis nur kvar liniojn, kiujn ili ripetis sen interrompo, sen interkonsentiĝi pri unu komuna lingvo kaj eĉ multe malpli pri la sama melodio.

Kiam ĉirkaŭ futo da tero estis ŝutita sur la pakaĵon, saltis du *muchachos* en la fosaĵon kaj firmtretadis la teron per siaj nudaj piedoj. Poste ili metis branĉojn sur ĝin, ĵetis je plua fojo teron sur ĝin kaj ĝin ree firmtretis. Fine la kaveto estis ebenigita.

La monteto estis tia sensignifa kaj faris tian hazardan impreson, ke oni povus supozi, ke tie kuŝas entombigita dujara infano kaj oni aldone ŝparis eĉ teron je la tombo.

Santiago intertempe lerte prihakis du bastonajn pecojn da ligno per sia maĉeto kaj kunligis ilin per la deŝirita finaĵo de liano al kruco.

Tuj kiam la monteto estis firmtretita, li pikis la kruceton en la molan teron.

La *muchachos* staris trankvile dum minuto, ili krucosignis sin trifoje, kaj Andreo diris ne laŭte: „*Madre Santisima,* Plejsankta Dipatrino, benu lian kompatindan animon. *Ave Maria!*

Kaj ĉiuj viroj ripetis: „*Ave Maria, Purisima en el cielo, Madre de Dios, Virgencita Santisima, ruega por nosostros*, kaj donu al li vian benon kaj eternan pacon! Amen!“

Poste ili staradis ankoraŭ dum minuto kaj rigardis al la eta monteto. Matias surgenuiĝis kaj turnis la kruceton ankoraŭ iomete, kvazaŭ ĝi ne sufiĉe ĝuste estus metita en la teron laŭ lia opinio. Poste li kunskrapis atenteme pli da tero proksime al la kruceto kaj firmpremis ĝin per la fingropintoj.

La viroj vidis nun, ke ĉio estas farita. Ili turniĝis kaj iris al siaj kabanoj.

El granda foro eĥis la obtuza kriado de grupo da bleksimioj, kiuj alte en la arbokronoj pasigis la nokton. Ĝi tondris ĝangale kiel la kriado de koleraj pumoj. Kvankam ĝi ŝajne terurige kaj timige minacis disŝiri la nokton, tio ne afliktis la ĝangalon. Ĝi kantis kaj violonis, ĉirpis kaj flutis, hurletis kaj lamentis, jubilis kaj ĝemis sian praeterne saman kanton kun la persistemo de la murmurado de la maroj.

FINO

GLOSARO

adelante = Antaŭen!
angla futo = diametre ĝi estas 3o,48 centrimetrojn larĝa
aguardiente = kutima brando, ne tre bonkvalita
arriero = mulisto, mulpelisto
arroyo = tersulko, rojo
artesanos = metiistoj

barranca = ravino, tersulko
Bimbambum = onomatopeo por Dio, kiu estas tiel karakterizata per laŭtaj, sed tamen bonsonaj sonoriloj de preĝejoj
boyero = brutpelisto, bovoservisto
Bueno. Y de qué sabes trabajar, muchacho? = Kian specon de laboro vi faris ĝis nun, junulo?
burro = azeno

cabrón = fikulo, merdulo, virkapro, idioto ks.
Cachito = La malgranda (frato) en la kunteksto
callejon = malvasta strateto aŭ pado
cajero = kasisto
calzada = strateto, trunkaro por firmigi la grundon
Cámara de diputados = parlamento de deputitoj
campo santo = restadejo sankta = tombejo
cantina = kantino
capataz = subestro, skipestro, gvidanto de laborgrupo, kontrolisto, inspektisto
capataces = pluralo de c*apataz*
caribes = kariboj
carretero = ĉaristo
cascabel = sonserpento

cayuqueros = trunkboatistoj, kanuveturigistoj
cementerio = tombejo
Chamula = loko, centro de la cocilaj majaj indiĝenoj en la federacia meksika ŝtato Ĉiapaso
Chechen-ligno (*Metopium brownei*) = nomata ankaŭ *Black Poison-wood* (Nigra Venenligno, *Caribbean Rosewood* (Kariba Jakarando)
choza = kabano
chula = friponino
ciudad = urbo
comedor = manĝohalo
comiteco añejo = komiteko, kiu estas pli longe aĝigita en lignaj bareloj ol simpla komiteko
Con su pelmiso = *Con su permiso* = kun via permeso
contratista = kontraktisto
copita = glaseto
cucarachas = blatoj
culebra = serpento

diputado = deputito, parlamentano
doñja = sinjorino

El Caudillo = La gvidanto
El Faldon = la basko
El Guapo = la belulo
encargado = iu ajn respondeculo aŭ laborestro, zorganto por certa afero
enganchador = varba agento
enganche = varbado, kontraktfarado
escuela = lernejo
Escuela Rural = lernejo kampara

Gachupines aŭ *Cachupines* = derivaĵo de la azteka vorto *„gatzopin“*, tradukita; rajdisto“ Dum la kolonia tempo en Meksiko, kiu tiam ankoraŭ nomiĝis Nov-Hispanio, oni nomis la koloniistojn naskitajn en Hispanio *peninsulares*, malŝate: *gachupines*). Ili formis la regantan klason kaj okupis ĉiujn gravajn politikajn oficojn. Komence de la meksika sendependiga milito pastro *Miguel Hidalgo y Costilla*, anstataŭ la kutima dimanĉa prediko, alvokis je la 16-a de septembro en 1812 laŭ buŝaj legendoj per sia *Grito de dolores* (dolora krio) al la rezisto kontraŭ la tiranoj. Ĉe tio li vokis: *„Viva la Virgen de Guadalupe* (Vivu la sanktulino de Guadalupe!) *Muerte al mal gobierno*, (Morton al la fia registaro), *Muerte a los gachupines* (La morton al la *gachupines*“)

gerente = administranto, negoca estro, manaĝero
hachero = hakisto
habanero = speco de komiteko, kiu estas iom pli bona ol malkara komiteko
hispana kolumo = fimozo (malvastigo de la penisa prepucio)
hacha = hakilo
Hasta mañana = Ĝis morgaŭ!
hombre = viro

kaciko = indiĝena vilaĝestro, tribestro, en tiu ĉi ĉapitro moke uzata por El Porfirio

mecha = meĉo
leper = leprulo
lepero = pigrulo
lodo = ŝlimo

machetero = maĉetisto
mayordomo = intendanto, domkortega mastro, administranto, domisto

mescal = meskalo = alkohola trinkaĵo, distilaĵo el la agavoplanto
mesera = kelnerino
Mi alma y mi corazón sangran = Mia animo kaj mia koro sangas
mujer = edzino, vivkunulino
municipalidad = municipo aŭ municipio (urbo aŭ teritorio havanta relative sendependan registaron)
municipo = loka administrejo

No, jefe, perdoneme! = Ne, ĉefo, mi petas pri pardono.

oficinas = burooj

patache (hisp.) = kuntekste: karavano, ekspedado
patroncito = patronĉjo
pero = sed
pescuintle = speco de kuniklo, luksa manĝo en Meksiko kaj apudaj landoj
petato = mato el fragmito
Por Dios = pro Dio
por favor = bonvolu
posol aŭ potzol = posolo = trinkaĵo el fermentita maizo, komune kutima en Ĉiapaso
puta = putino

rurales = *Guardia Rural*, sub diktatoro Por*firio Diaz* federacia rura kavaleria kaj ĝendarma polico, neregularaj helptrupoj

semaneo = laborejo, labordistrikto, kie oni hakas la mahagonarbojn
señorita = fraŭlino
(Solo) Dios sabe = (Nur) Dio scias
Soy el mozo = Mi estas la servbubo

Su humilde servidor, patroncito = Humile je via servo, patronĉjo.

tendero = posedanto de magazeno, komercisto, vendisto de nutraĵoj
tienda = vendejo, butiko
tiro = jungitaro (du aŭ kelkaj bestoj, kune jungitaj al ĉaro)
tonelada = metra tuno = en Hispanio 20 *quintales* = 80 a*rrobas*

zacateros = brutflegistoj